

Laŭ Ŝe

Kamelo Ŝjangzi



esperantigis Wang Chongfang

Ĉina Esperanto-Eldonejo

Pekino 1988

e-Librigis Elerno

majo, 2006

PRI LA AŬTORO



Laŭ Ŝe (1899–1966) estis ĉina moderna romanisto kaj dramisto, kiu naskiĝis en Pekino. Elkreskinte en malriĉa manĉura familio, en 1913 li sukcese ekzameniĝis kaj eniris en la Pekinan Normalan Lernejon, kiu donis al siaj studentoj senpagajn nutron kaj loĝon. Post sia diplomitiĝo en 1918 li estis sendita labori unue kiel estro de elementa lernejo kaj poste kiel ĉinlingva instruisto de mezgrada lernejo. En la jaroj 1924–1930 laŭinvite li instruis kiel lekciisto de la ĉina lingvo en la Kolegio de Orientalismaj Studoj, Londona Universitato. Dum sia restado en Anglujo li verkis *La Filozofio de Laŭ-Ĝango* kaj aliajn du romanojn.

Post sia reveno en Ĉinion en la printempo de 1930 li instruis en la fakultato pro la ĉina literaturo unue de Universitato Ĉjilu en Ĝĵinan kaj poste de la Ŝandong-a Universitato en Ĉingdao. En la somero de 1936 li ekziĝis de la instrua laboro kaj sin okupis ekskluzive je verkado. Dum la sep jaroj de la universitata instruado Laŭ Ŝe verkis *Kamelo Ŝjangzi* kaj plurajn aliajn romanojn, dekojn da noveloj kaj multajn eseojn, prozaĵojn ktp. En novembro de 1937 pro la Kontraŭjapana Rezistmilito li forlasis sian hejmon kaj veturis al Uhan, kaj en 1938 alvenis en Ĉongĉing per vojo nereкта. Dum la ok jaroj de la milito (1937–1945) li direktis la efektivan laboron de la tutlanda Rezistada Asocio de Verkistoj kaj Artistoj kaj samtempe verkis *Restanta Nebulo* kaj aliajn dramojn kaj multajn popularajn literaturaĵojn, novelojn, eseojn, traktaĵojn, poemojn ktp. ankaŭ la du unuaj ĉapitroj de la romano *Kvar Generacioj sub la Sama Tegmento*, kiu spegulas la mizeran vivon kaj la persistan batalon de la popolo en la malamik-okupitaj regionoj, estis verkitaj en tiu tempo.

En marto de 1946 Laŭ Ŝe laŭinvite forveturis en Usonon por fari tie prelegojn, kaj revenis en sian patrujon fine de 1949. Post la fondiĝo de la Popola Respubliko lia fervoro por verkado pliardiĝis, kaj li verkis unu post alia dudek tri dramojn, inter kiuj estas *Drakbarba Kanalo*, *Tetrinjejo*, kaj pro tio ricevis la honoran titolon “Popola Artisto”. Laŭ Ŝe siatempe ankaŭ funkciis kiel membro de la Kultura kaj Eduka Komisiono en la Administra Konsilantaro de la Centra Popola Registaro, vicprezidanto de la Tutlanda Federacio de

Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj, prezidanto de la Pekina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoĵoj, ktp. en 1966, post la komenciĝo de la “Kultura Revolucio”, Laŭ Ŝe suferis severan persekutadon kaj tragike mortis la 24an de aŭgusto, en sia 67-a jaro.

Laŭ Ŝe postlasis al ni riĉegan verkaron. *Kamelo Ŝjangzi* estas lia ĉefverko.

Kamelo Ŝjangzi estas elstara romano, kiun verkis en 1936 Laŭ Ŝe, fama ĉina verkisto sur la fono de la malnova Pekino en la tridekaj jaroj de la lasta jarcento. La romano priskribas la tragikan sorton de sia heroo, la rikiŝisto Kamelo Ŝjangzi, kaj per tio montras la mallumon kaj putrecon de la malnova socio kaj la kruelan detruon al homoj. La romano havas riĉajn lokajn kolorojn kaj spiras fortan viv-odoron.

Mi elektis kaj tradukis lian verkon *Kamelo Ŝjangzi* tial, ĉar mi multe respektas lin pro lia nobla persona karaktero. Mi legis lian romanon *Kamelo Ŝjangzi* jam en mia juneco kun granda ŝato.

tradukinto

I

Tio, kion mi ĉi-sube rakontos, estas pri Ŝjangzi, ne pri kamelo, ĉar “Kamelo” estas nur lia moknomo. Do mi komencu per Ŝjangzi kaj nur preterpase klarigos, kiel gluiĝis al li tiu ĉi moknomo.

La rikiŝistoj en Beiping estas dividitaj en diversajn kategoriojn. La junaj, kiuj estas fortaj kaj facilpaŝaj, luprenas al si nur elegantan rikiŝon kaj laboras tuttage, komencante kaj ĉesigante la laboron kiam ajn al ili plaĉas. Tirinte sian rikiŝon al kitima rikiŝoparkadejo aŭ pordego de iu sinjora domo, ili atendas tie klientojn, kiuj volas rapidan kuranton. Se bonŝancon ili havas, nur per unu fojo ili povas perlabori unu aŭ du jŭanojn*. Sed iafoje povas okazi ankaŭ, ke ili senfare pasigas la tutan tagon, ne enspezante eĉ la sumon sufiĉan por la rikiŝa lupago. Tamen malgraŭe ili ne donas atenton al tio. Ĝenerale, ili havas du ambiciojn. Unu estas servi ĉe iu sinjoro kiel laŭmonate dungita rikiŝisto, kaj la alia — aĉeti al si rikiŝon. Havante sian propran rikiŝon, ili povas laŭplaĉe aŭ labori kiel laŭmonata dungito aŭ tiri okazajn klientojn, ĉar la rikiŝo estas lia propraĵo.

Al alia kategorio apartenas tiuj iom pli aĝaj, kaj tiuj, kiuj pro sia malfortikeco kuras ne tiom rapide, aŭ kiuj pro familiaj konsideroj ne kuraĝas lasi la tutan tagon pasi sen ajna enspezo. La plimulto el ili tiras sufiĉe novan rikiŝon kaj, ĉar la tiranto kaj la rikiŝo ambaŭ estas bonaspektaj, ankaŭ ili povas postuli pli malpli altan prezon. Iuj el ili laboras tuttage, aliaj nur duontage. El tiuj ĉi lastasj la pli energiaj ĉiam preferas la noktan skipon en ĉiu sezono. En la punkto estas bezonataj pli da zorgoj kaj lerteco, do nature la enspezo estas pli alta.

La rikiŝitoj pli-ol-kvardekjaraj kaj malpli-ol-dudekjaraj apenaŭ povas vicigi sin en la du suprediritajn kategoriojn. Iliaj rikiŝoj estas kadukaj kaj ili ne kuraĝas fari noktan tiradon, tial ili devas eliri kun sia rikiŝo tre frue en la espero, ke ĝis la tria aŭ la kvara posttagmeze ili povos perlabori sufiĉe da mono por la rikiŝa lupago kaj sia vivopano. La kadukeco de la rikiŝo kaj manko de rapideco devigas ilin fari pli longedaŭrajn tiradojn por malpli alta pago. Al ili apartenas ankaŭ tiuj, kiuj transportas varojn al melono-, frukto- aŭ legomobazaroj; kvankam por tio ili ricevas malpli multe, tamen almenaŭ ili ne bezonas rapide kuradi.

La junuloj de malpli ol dudek jaroj — el kiuj iuj komencis sin okupi je tiu ĉi profesio jam de sia dekunua aŭ dekdua jaro — poste apenaŭ povas fariĝi

belaj rikiŝistoj, ĉar dum sia knabeco ili jam trouzis sian forton. Povas esti, ke ili tiras la rikiŝon dum la tuta vivo kaj neniam prosperas en sia profesio. Koncerne la pli-ol-kvardekjarulojn iuj el ili jam trouzis siajn muskolojn por rikiŝotirado dum ok aŭ dek jaroj kaj nun pro malfortiĝo ili estas kontentaj okupi nur la duan lokon. Ili iom post iom konsciiĝas pri tio, ke pli-malpli frue ili povos falegi kaj morti sur strato. Iliaj tirmaniero, lerteco en prezodiskutado kaj uzo de pli mallongaj aŭ malrektaj vojoj estas sufiĉaj por igi ilin rememori sian pasintan gloron kaj levi sian naŭzon supren antaŭ la pli juna generacio. Sed tiu ĉi malgranda pasinta gloro neniel povas lumigi iliajn malhelajn perspektivojn, kaj tial ili ofte ĝemspiras, kiam ili deviŝas la ŝviton de sia frunto.

Kaj tamen, kompare kun alia grupo de pli-ol-kvardekjaruloj, ili ŝajne ankoraŭ ne atingis la mizerplejon. Tiu ĉi lasta grupo konsistas el viroj, kiuj neniam antaŭe atendis, ke ili povos havi rilatojn kun la rikiŝo, kaj tamen, falinte en seneliran situacion, ili estis devigitaj ekpreni rikiŝajn timonetojn. Kiam policanoj kaj lernejservistoj estas eksigitaj, kaj kiam bankrotintaj kolportistoj aŭ senlaboraj metiistoj havas nenion pli por vendi aŭ lombardi, kunpremante la dentojn kaj kun larmoj en la okuloj ili suriras sur tiun ĉi vojon al la morto. Tiuj ĉi viroj jam forvendis la plej bonajn jarojn de sia vivo, kaj nun ili transformas la maizpanon, per kiu ili sin nutras, en sangon kaj ŝviton, kiuj gustadas sur la stratojn. Malfortaj, senspertaj kaj senamikaj, ili estas malŝatataj eĉ de siaj rikiŝistoj-kamaradoj. Iliaj rikiŝoj estas plej kadukaj kaj la pneŭmatikoj estas malŝvelemaj. Eĉ kurante ili devas peti sian klienton pri pardono, kaj tial ili kalkulas nutrajn dek kvin kuprajn monerojn kiel tre belan pagon.

Ekzistas ankoraŭ aliaj kategorioj de rikiŝistoj, kiuj distingiĝas unuj de aliaj per siaj papartaj kutimaj vojlinioj kaj gradoj de klereco kaj lerteco. Tiuj, kiuj loĝas en la okcidenta antaŭurbo ĉirkaŭ Ŝijjŭan kaj Hajdjan, nature preferas preni al si klientojn, kies veturcelo estas la Okcidentaj Montoj aŭ la universitatoj Janĝing kaj Ĉinghŭa; tiuj, kiuj venas el la norda antaŭurbo ekster la pordego Andingmen, preferas sekvi la vojliniojn al Ĉinghe kaj Bejjŭan, dum tiuj en la suda antaŭurbo ekster la pordego Jongdingmen volas iri ne pli malproksimen ol ĝis Nanjŭan... Tiuj ĉi faras nur longdistancajn kurojn, kiuj estas pli enspezigaj, kaj rigardas nekonsiderinda la sumon de tri aŭ kvin kupraj moneroj, kiujn oni ricevas por unufoja kuro mallongdistanca. Sed dum la kurado ili perdas la spiron pli baldaŭ ol la rikiŝistoj de Dongĝjaŭminŝjang, la diplomatia kvartalo.

Tiuj ĉi lastaj, kiuj servas nur al alilandanoj, estas veraj longdistancaj kurantoj. Ili fieras pri sia povo senhalte kuradi de la diplomatia kvartalo ĝis la

Jadfonta Monto, la Somera Palaco aŭ la Okcidentaj Montoj. Kaj krome, tiuj ĉi viroj havas ankaŭ apartan kapablon, kiu nebligas al la ordinaraĵoj rikiŝitoj konkuri kun ili pri la klientoj: ili ĉiuj povas paroli fremdajn lingvojn. Ili povas kompreni, kiam anglaj aŭ francaj soldatoj postulas, ke rikiŝitoj portu ilin al la Somera Palaco, la lamaejo Jonghegong aŭ la “ok Stratetoj”, kaj ili ne instruas siajn piĝinojn al aliaj. Antaŭ ilia kurmaniero estas aparta. Kun modera rapideco, la kapo malsupren, direktante la rigardon nek dekstren nek maldekstren, ili tiras la rikiŝon antaŭen ĉiam ĉe la vojrandoj sen deflankiĝo, kun mieno indiferenta pri la mondo kaj samtempe tre memfida. Ĉar ili servas al alilandanoj, ili rajtas ne porti la numeritan veŝton, kiu estas deviga por la aliaj rikiŝitoj. Anstataŭe ili ĉiuj portas longmanikan blankan ĉemizon, nigran aŭ blankan pantalonon kun tre vastaj krurumoj strikte ligitaj ĉe la maleoloj per rubandetoj, kaj nigrajn tol-plandumajn ŝuojn kun ripo alkudrita sur la mezo. Ili estas puraj, elegantaj kaj viglaj. Ekvidinte tiam kostumon, aliaj rikiŝitoj ne konkuras kun ili pri klientoj, nek vetkuras kontraŭ ili, kvazaŭ ili apartenus al tute alia profesio

Post la supra mallonga analizo, ni revenu al la situacio de Ŝjangzi, por meti lin sur lian lokon tiel precize — ni esperas — kiel oni metas ĝustan ŝraŭbon en maŝinon. Antaŭ ol Ŝjangzi ricevis la moknomon “Kamelo”, li estis relative sendependa rikiŝito; alivorte, li apartenis al la kategorio de tiuj, kiuj estas junaj kaj fortaj kaj posedas sian propran rikiŝon. Havante propran rikiŝon, li estis la mastro de sia sorto, rikiŝito de alta klaso.

Sed tia situacio ja ne estis facile atingebla por li. Por havigi al si la rimedojn aĉeti la rikiŝon li laboregis almenaŭ tri aŭ kvar jarojn kaj verŝis oni ne scias kiom multe da ŝvitgutoj. Li akiris la rikiŝon per penegadoj en vento kaj pluvo, per simpligo de siaj nutraĵoj kaj trinkaĵoj. Tiu rikiŝo estis la frukto de kaj la rekompenco por ĉiuj liaj baraktoj kaj suferoj, kvazaŭ la sola medalo de militisto, kiu batalis cent batalojn. Dum la tagoj, kiam li tiradis luitan rikiŝon, li estis kiel turbo turnosvingata jen de nordo al sudo, jen de oriento al okcidento, de frumateno ĝi vespero, laŭ alies volo. Sed tia turnado ne faris al li kaptrunon, ke li perdu la vidon de sia celo. En sia imago li ĉiam bildigis al si tiun estontan rikiŝon, povantan alporti al li liberecon kaj sendependecon kaj fariĝi parto de li, kiel liaj manoj kaj piedoj. Havante sian propran rikiŝon, li ne plu estos tiranata de la rikiŝoposedantoj, nek plu devos humiliĝi antaŭ iu ajn alia. Kun sia forto kaj sia propra rikiŝo, li povos kvazaŭ ludante perlabori siajn vivrimedojn.

Ŝjangzi ne timis ŝvitigan laboron, nek havis la pardoneblajn, sed ne sekvindajn, kutimaĵojn de ordinaraĵoj rikiŝitoj. Liaj saĝoj kaj penegemo estis sufiĉaj por realigi lian revon. Se lia situacio estus iom pli bona, aŭ se li antaŭe

ricevus iom pli da eduko, li certe ne enviciĝus en la “pneŭmatika Brigado”, kaj je kio ajn alia li sin okupus, li certe scipovus uzi ĉiujn siajn ŝancojn. Malfeliĉe, li havis nenian alternativon krom fariĝi rikiŝisto. Nu, tre bone, eĉ en tiu ĉi okupo li montris sin kapabla kaj inteligenta. Li estis tiel strebema, ke eĉ en la infero li volus fariĝi elita spirito.

Ŝjangzi naskiĝis kaj kreskis en la kamparo. En sia dekoka jaro, perdinte siajn gepatrojn kaj la kelkajn muojn* da malgrasa tero, li forkuris al la urbo. Kun fortika korpo kaj simpla koro de kampara knabo, li provis fari preskaŭ ĉian penigan laboron. Sed li baldaŭ konstatis, ke la rikiŝotirado estas okupo pli facila por perlabori monon. La pago por aliaj penigaj laboroj estas limigita, dum la rikiŝotirado donas pli da varieco kaj bonŝancoj, ĉar rikiŝisto povas perlabori, en oportunaj tempo kaj loko, pli ol li esperis, kompreneble, li sciis ankaŭ, ke tio ne tute estas hazarda. Por altiri elektemajn klientojn la rikiŝo devas esti eleganta kaj la tiranto viglaspekta.

Sed post ioma konsidero Ŝjangzi sentis, ke li havas la kvalitojn postulatajn por esti rikiŝisto, ĉar li estas juna kaj forta. Kvankam pro manko de sperto li ne kuraĝis komenci per nova rikiŝo, tamen tio ne estis malfacilo nevenkebla: kun sia fortika korpo li estis certa, ke post dek tagoj aŭ du semajnoj da provado li sendube fariĝos pli-malpli bona kuranto. Poste li luprenos novan rikiŝon, kaj tre baldaŭ li povos trovi al si laŭmonatan laboron; kaj tiam dank’ al ŝparado dum unu aŭ du jaroj, eĉ tri aŭ kvar, li certe povos aĉeti al si vere belan rikiŝon. Rigardante siajn junajn muskolojn, li konvinkiĝis, ke tio estas nur problemo pri tempo, kaj la celo, al kiu li strebas, estas certe atingebla — aera revo ĝi ne estas!

Kvankam apenaŭ dudek-jara, li tamen kreskis alta kaj fortika. La tempo ankoraŭ ne muldis lian korpon en definitivan formon, sed li jam aspektis kiel plenkreskulo — viro kun naiva kaj iom petolema vizaĝo. Rigardante tiujn altklasajn rikiŝistojn, li pripensis, kiel li streĉos sian zonon por pli okulfrape montri siajn fortikan bruston kaj rektan dorson. Li turnis la kaponj flanken por rigardi siajn ŝultrojn: kiel impone larĝaj ili estas! Liaj maldika talio, blanka vasta pantalono kaj maleoloj, ĉirkaŭligitaj ĉiu per maldika rubandeto, forte kontrastas kun liaj “supermezuraj” piedoj. Jes, li sendube fariĝos unu el la plej elstaraj rikiŝistoj. Kaj ĉe tiu ĉi penso li naive ekridetis.

Ŝjangzi ne havis belan aspekton. Kio fairs lin plaĉa estis lia vigla mieno. Li havis iom malgrandan vizaĝon, rondajn okulojn, karnecan nazon, kaj densajn, mallongajn brovojn. Lia kapo estis ĉiam glate razita. Sur liaj vangoj estis neniom da superfla karno, tamen lia kolo estis preskaŭ tiel dika kiel lia

kapo. Lia vizaĝo ĉiam havis sanecan ruĝkoloron, kaj sur ĝi, de la vangosto ĝis la dekstra orelo, estis granda, brila cikatro — postsigno de mordovundo, kiun azeno donis kiam li dormetis sub arbo en sia infaneco. Li ne donis multajn atenton al sia aspekto; li ŝatis sian vizaĝon same kiel sian korpon, ĉar ambaŭ estis fortikaj. Por li la vizaĝo estis kvazaŭ alia membro kaj tial ĝia fortikeco estis la sola, kio gravis. Eĉ post kiam li venis en la urbon, li ankoraŭ povis fari surkapan staradon longdaŭran kaj, tenante tian pozicion, li sentis sin kvazaŭ firma vertikala arbo.

Ŝjangzi ja estis iagrade kiel arbo, fortika, silenta kaj tamen plena de vivo. Li ĉiam havis siajn proprajn pensojn kaj intencojn, sed li ne volis malkaŝi ilin. Inter rikiŝistoj personaj suferoj kaj malfacilaĵoj estas ĉies paroltemoj, kaj ĉe rikiŝoparkadejoj, en malgrandaj tetrinkejoj aŭ en la grandaj miksloĝataj kortoj ĉiu raportas, rakontas, eĉ kriante, pri siaj malfeliĉoj, kiuj poste kuradas de buŝo al buŝo kvazaŭ popolkanto, fariĝante publika posedaĵo. Ŝjangzi kiel kampara knabo ne estis tiel lertlanga kiel urbanoj. Se parolflueco estas naturdoto, evidente li ne estis dotita per ĝi, tial li ne volis imiti la klaĉemajn urbanojn. Li zorgis nur pri siaj aferoj kaj gardis sian langon, kio donis al li pli da tempo por meditado, kvazaŭ liaj okuloj estus ĉiam direktitaj internen al lia koro. Farinte ian decidon, li ĉiam tuj ekmarŝis laŭ la vojo, kiun li malfermis en la animo; kaj se lia marŝo estis barita, li falis en silenton por unu aŭ du tutaj tagoj kunpremante siajn dentojn, kvazaŭ lia koro estus mordata.

Farinte la decidon sin okupi je rikiŝotirado, li tuj ekagis. Unue li luprenis malnovan, kadukan rikiŝon por iom sin ekzerci en praktiko. En la unua tago li enspezis preskaŭ neniom da mono. Kvankam en la dua la negoco estis sufiĉe bona, tamen tuj poste li falis tute elĉerpita en la liton por du tagoj, ĉar liaj maleoloj estis terure ŝvelintaj. Li elportis la doloron, sciante, ke tio estas neevitebla, kaj ke, se li ne trapasos la elprovon, li neniam povos fariĝi vera rikiŝisto.

Post kiam la pideoj refortiĝis, li povis libere kuri kaj li multe ĝojis, ke nun li havas nenion alian por timi. Li bone konis la stratojn de la urbo, kaj eĉ se li iafoje vane faris ĉirkaŭvojon, tio ne gravis, ĉar forton li havis en abundo. Koncerne la lernado de la rikiŝotira maniero, tio ankaŭ ne estis malfacila por li, kiu havis spertojn, akiritajn en la pasinteco, pri puŝado, tirado kaj portado de pezaj objektoj. Cetere, li konsideris, ke se li estos singardema kaj ne konkuros kun aliaj en kurado, kredeble li povos eviti perturbiĝon.

En la marĉandado pri la rikiŝa veturprezo, li estis tro mallertlanga kaj tro incitiĝema por konkuri kun siaj spertaj kaj ruzaj kolegoj. Konsciante sian

malavantaĝon li malofte iris al la rikiŝoparkadejoj, sed atendis klientojn tie, kie ne troviĝis aliaj rikiŝoj. En tiaj lokoj li povis trankvile diskuti la prezon kun kliento, kaj iafoje li eĉ nur simple diris “Ensiĉu, kaj pagu laŭ via plaĉo!” lia mieno estis tiel honesta, naiva kaj agrabla, ke oni ne povis ne konfidi lin, ĉar ŝajnis neebla, ke tia simpla kamparulo povas esti fripono. Oni povus suspekti nur pri tio, ke li estas nov-veninto el la kamparo, kiu ne konas la vojon kaj tial havas nenian ideon pri la tarifo. Sed se oni demandis: “Ĉu vi konas tiun lokon?” li respondis per rideto de afektita stulteco miksitita kun petolemo, kio mirkonfuzis lian klienton.

Poste du aŭ tri semajnoj da kurado liaj kruroj plifortiĝis, kaj tiam li sciis, ke lia kurmaniero jam estis tre bela. La kurmaniero montras la lertecon kaj rangon de rikiŝisto. Tiuj, kiuj kuras kun siaj pied-antaŭoj turnitaj eksteren frapante la pavimon per la pideplatoj kvazaŭ per palmofoliaj ventumiloj, sendube estas novicoj el la kamparo. Tiuj, kiuj kun forte mallevita kapo sin trenadas antaŭen nur en preskaŭa kuro, estas maljunuloj en la aĝo super kvindek jaroj. Aliaj veteranaj spertuloj, kiuj estas apenaŭ fortaj, havas malsaman metodon; ili profunde klinas sin antaŭen, levas siajn krurojn alten kaj ŝvingas la kapon antaŭen ĉe ĉiu paŝo, kvazaŭ ili tirus la rikiŝon per granda forto, sed fakte ili kuras ne pli rapide ol la aliaj; ili faras tian afektadon nur por konservi sian dignon.

Ŝjangzi kompreneble prenis neniun el tiuj manieroj. Kun liaj longaj kruroj, nemoviĝanta dorso kaj senbrujaj, elastaj paŝoj, la timonetoj ne balanciĝis kaj lia kliento estis portata antaŭen sekure kaj komforte. Se li volis halti, kiel ajn rapide li kuris, li povis ekhalti tuj kaj tute en momento nur per delikata frotado de siaj grandaj piedoj sur la tero je unu aŭ du paŝoj, kvazaŭ la rikiŝo estus ludilo en liaj manoj. Kun dorso iom klinita kaj manoj malfirme tenantaj la timonetojn, li estis facilmovata, vigla kaj precizema, kaj kvankam li ŝajnis ne hastema, li tamen kuris rapide per firmaj paŝoj. Ĉiuj ĉi tiuj kvalitoj ja povis esti kalkulataj kiel tre maloftaj eĉ inter la laŭmonate dungitaj rikiŝistoj.

Li ŝanŝis sian luitan rikiŝon por iu nova. En la tago, kiam li komencis tiri la novan rikiŝon, li jam informiĝis, ke tia rikiŝo, kian li luis, — kun molaj risortoj, bele prilaboritaj latunaj partoj, diktola pluvŝirmilo kaj antaŭa kurteno, du lampoj kaj longgorĝa latuna korno — valoras pli ol cent jŭanojn. Se la farbitaj kaj la latunaj partoj ne estas en tiel bona stato, tiam cent jŭanoj sufiĉas. Proksimume dirite, se li havos nur cent jŭanojn, li povos aĉeti al si rikiŝon. Se en ĉiu tago li povos ŝpari unu ĝjaŭon*, cent jŭanoj postulos mil tagojn. Mil tagoj! Ho, kia longa tempo! Sed li faris firman decidon nepre aĉeti al si rikiŝon,

eĉ se tio postulus dek mil tagojn!

La unua paŝo, kiun li devis fari, estis trovi laŭmonatan laboron. Se lia dunganto estos sinjoro multe societema kaj festenema, tio signifos ĉirkaŭ dek bankedojn ĉiumonate kaj ekstrajn du aŭ tri jŭanojn kiel trinkmonon por li. Plus la unu aŭ du jŭanoj, iafoje eĉ tri aŭ kvin, kiujn li povos ŝpari el siaj ĉiumonataj elspezoj, la sumo atingos kvindek ĝis sedsdek jŭanojn jare! Tio multe, multe alproksimigos lin al lia celo. Kaj ĉar li ne fumis, nek drinkis, nek faris hazardludon, cetere, ĉar li ne havis familion, tial li povis efektiviĝi kion ajn li volis, kondiĉe nur ke li kunpremu siajn dentojn kaj persistu. Li ĵuris al si, ke en unu jaro kaj duono li, Ŝjangzi, nepre havigos al si propran rikiŝon. Kaj ĝi nepre estu freŝe nova!

La vere sukcesis trovi al si laŭmonatan laboron. Sed la realo ne tute akordis kun la espero, kaj kvankam li kunpremis siajn dentojn dum unu jaro kaj duono, tamen lia deziro ankoraŭ ne plenumiĝis. Kiel laŭmonate dungita rikiŝisto li ja laboris kun tre zorga konscienco. Sed bedaŭrinde en tiu ĉi mondo ĉiu afero havas du falnkojn, kaj lia konscienco neniel malebligis al liaj dungantoj lin eksigi. Iafoje post du aŭ tri monatoj, aliffoje post nur unu semajno aŭ dek atgoj, li devis serĉi por si alian, novan laboron. Kompreneble, dum li klopodis por trovi novan laboron, li devis sin okupi per tirado de okazaj klientoj, kio estis kiel oni rajdas sur ĉevalo kaj samtempe serĉas alian; ĉar li ja ne povis resti senlabora.

Dum tiaj tempoj li ofte stumblis en sia laboro. Sed malgraŭe li truddevigis sin energie labori, ne nur por perlabori siajn vivrimedojn, sed ankaŭ por daŭrigi la ŝparadon por sia rikiŝo. Tamen tia konstanta sindevigo estis riska, kaj li apenaŭ povis koncentri sian atenton dum la kurado. Li ĉiam lasis sin distri de iaaj pensoj, kaj ju pli li pensis, des pli li timis kaj ĉagreniĝis. Se plu tiel estos, kiam li povos aĉeti al si rikiŝon?

Kial fariĝis tiel? Ĉu li ne sufiĉe strebadis? Obsedate de tiaj pensoj, li perdis sian kutiman singardemon. Liaj pneŭmatikoj suriris sur forĵetitajn metalpecetojn kaj krevis, kaj tiam li povis fari nenion alian ol ĉesigi la laboron. Estis des pli malbone, ke li kelkfoje tuŝegis irantan homon kaj foje eĉ perdis nabĉapon de la rikiŝo, kiam li haste trapuŝis sin tra la homamaso. Se li havus laŭmonatan laboron, neniu el tiuj malagrabloj povus okazi; sed la fakto deprimis lin, kaj li fariĝi mallerta kaj malvigla. Kompreneble, li devis kompensi la difektojn de la rikiŝo, kio des li lin afliktis. Kaj tial, por eviti ankoraŭ pli grandajn damaĝojn, li iafoje dormadis la tutan tagon anstataŭ labori. Poste, kiam li vekiĝis, li ekpentis, ke li vane perdis tiom da tempo, kaj pro tio li sentis

memriproĉon.

Kaj plie, en tiaj tempoj, ju pli li maltrankviliĝis, des pli li fariĝis avara kaj simpligis sian nutraĵon, kvazaŭ pensante, ke li estas el fero. Sed kontraŭ atendo li trovis, ke ankaŭ li povas fali en malsanon. Malsaniĝinte, li ankoraŭ domaĝi la monon kaj ne volis aĉeti medikamenton. Rezulte de tio, lia malsano pligraviĝis, kaj li estis devigita ne sole elspezi monon por medikamento, sed eĉ ripozi plurajn sinsekvajn tagojn. Tiuj ĉi repuŝoj igis lin des pli forte kunpremi siajn dentojn kaj des pli energie penegi, sed malgraŭ tio la mono venis al li neniom pli rapide.

Forpasis tri plenaj jaroj, kaj finfine li sukcesis kolekti cent jŭanojn!

Li jam ne povis plu atendi. Lia origina deziro estis aĉeti plej novan, plej bone ekipitan, plej plaĉan rikiŝon. Sed nun li decidis preni nur tian, kia kostis ne pli ol cent jŭanojn. Ne, plu atendi li jam ne povis! ĉar li timis, ke povus okazi io neatendita, kio perdigus al li kelkajn jŭanojn. hazarde li aŭdis, ke unu laŭmende farita rikiŝo, por kiu ĝia mendinto ne povas pagi, estas por vendo. Ĝi estis proksimume tia, kian li deziris, kaj, ĉar la mendinto rezignis sian antaŭpagon por ĝi, la rikiŝovendejo volis vendi ĝin je prezo malpli alta ol ĝia origina kosto — pli ol cent jŭanoj.

Ŝjangzi, kies vizaĝo ruĝe radiis, kun tremantaj manoj, klakmetis naŭdek ses jŭanojn sur la tablon kaj diris: “Tiun ĉi rikiŝon mi volas!” la vendejomastro, kun la intenco levi la prezon ĝis la ronda sumo, ne ŝparis laŭdojn al la rikiŝo. Li tiris la rikiŝon el la budo kaj returne en ĝin, plurfoje malfaldis la kapuĉon kaj sonigis la kornon, akompanante ĉiun sian movon per plej belaj vortoj. Fine li dufoje piedbatis la ŝtalajn radradiojn.

“Aŭskutu ĉi tiun sonon!” li diris. “Klara kiel tiu de sonorilo! Tian rikiŝon vi povas tiradi ĝis ĝi disfalos en pecojn, eĉ se unu el tiuj spokoj tiam kurbiĝos, vi revenu kaj ĵetu ĝin al mi en la vizaĝon! Cent jŭanojn, ne malpli! Eĉ je nur unu feno* malpli mi ne vendas.”

Ŝjangzi denove kalkulis sian mono. “Mi volas tiun ĉi. Naŭdek ses!”

La mastro sciis, ke li renkontis homon kun menso unutraka. Li ĵetis rigardon al la mono, poste glitigis la okulojn al Ŝjangzi, kaj fine diris kun suspiro: “Nu, bone, pro amikeco! La rikiŝo apartenu al vi. Ĝi estas garantita por ses monatoj: krom se vi disfrakasos ĝin, mi senpage faros ĉian riparon. Jen la garantikaron!”

La manoj de Ŝjangzi tremis des pli forte. Li enpoŝigis la karton kaj prenis la rikiŝotimonetojn, sentante sin ploronta. Tirinte la rikiŝon al kvietaj angulo, li haltis por bone pririgardi tiun ĉi altvaloran posedaĵon. Li vidis sian bildon

spegulitan en ĝia brile lakita kotŝirmilo, kaj ju pli li rigardadis, des pli li ĝin amis. Eĉ tiuj partoj, kiuj antaŭe ne plaĉis al li, nun povis esti tolereblaj, ĉar la rikiŝo jam apartenis al li. Satrigardinte ĝin, li sidiĝis sur la nova tapiŝeto en la piedapogilo, kun okuloj fiksitaj sur la brila latuna korno ĉe la timoneto. Subite li ekmemoris, ke li nun jam estas dudekdu-jara. Ĉar liaj gepatroj mortis kiam li estis tre juna, li ne sciis la precizan daton de sia naskiĝtago, kaj de kiam li venis en la urbon, li neniam festis sian naskiĝtagon. Nu, hodiaŭ li jam havis sian propran rikiŝon, kial do li ne farus la hodiaŭon ankaŭ sia naskiĝtago? Ĝi ja estis facile memorebla: kaj ĉiaokaze, ĉar la rikiŝo estis la frukto de lia ŝvito kaj sango, tial estis tute nature, ke li kaj lia rikiŝo dividis la saman naskiĝtagon.

Kiel do celebri tiun ĉi “duoblan naskiĝtagon”? Ŝjangzi decidis, ke lia unua kliento devos esti bonvestita sinjoro, kaj nepre ne virino, kaj la celloko de la veturo devos esti la pordego Ĉjanmen aŭ Dong’an-bazaro. Tie li povos ĉe pli bona manĝostando preni ian manĝaĵon, ekzemple varmajn sezamkukojn kun rostita ŝafaĵo. Poste se li trovos alian bonan klienton, estos pli bone. Se ne, li ĉesigos la laboron por la tago. — Hodiaŭ ja estas la naskiĝtago!

De kiam li ekhavis sian propran rikiŝon, aferoj ĉe li pli kaj pli bonstatiĝis. Ĉu laborante kiel laŭmonata dungito, ĉu sin okupante per portado de okazaj klientoj, li ne plu bezonis zorgi pri la rikiŝa lupago, kaj ĉio, kion li perlaboris, apartenis al li. Kontenteco faris lin pli afabla, kaj sekve lia negoco prosperis. Post ses monatoj li fariĝis eĉ pli ambicia., pensante ke, se plu tiel estos, post aliaj maksimume du jaroj, li certe povos aĉeti alian rikiŝon, kaj pli poste ankoraŭ alian... kaj tiam li eĉ povos fondi sian propra rikiŝejon!

Sed plejofte esperoj vaniĝas en la fino, kaj tiuj de Ŝjangzi ne estis escepto.

Notoj:

1. Bejping: T.e. Pekino. De 1928 ĝis 1949 ĝi estis nomata Bejping. Tiam ĝi estis ne ĉefurbo, sed grava urbo en norda Ĉinio.
2. nokta skipo: La nokta skipo komenciĝis je la kvara posttagmeze kaj daŭris ĝis la tagiĝo.
3. la universitatoj Janĝing kaj Ĉinghŭa: Famaj universitatoj de Ĉinio, tiam situantaj en la nordokcidenta antaŭurbo de Bejping.
4. la pordego Andingmen: La malnova Pekino estis ĉirkaŭata de longaj muregoj kaj dividita en Internan kaj Eksteran urbojn. En la mezo de la Interna Urbo estis la Malpermesita Rubo, en kiu situis la Imperiestra Palaco. Ili ĉiuj havis muregojn kaj tial en Pekino estis multaj pordegoj. Andingmen estis unu el

la nordaj urbopordegoj.

5. Ĉinhe kaj Bejjūan: Loko en la norda antaŭurbo de Bejping.

6. Nanjūan: Loko en la suda antaŭurbo.

7. Dongĝjaŭminŝjang: tie antaŭe estis ambasadorejoj de diversaj landoj.

8. La diplomatia kvartalo Dongĝjaŭminŝjang estis en la orienta parto de la urbo, dum la Jadfonta Mont, la Somera Palaco kaj la Okcidentaj Montoj situis en la okcidenta antaŭurbo, 10-20 kilometrojn for de la urbo.

9. “Ok Strateto”: Tiama kvartalo de bordeloj.

10. Pneŭmatika Brigado: Temas pri la rondo de rikiŝistoj.

11. la pordego Ĉjanmen: La fronta pordego de la iama Malpermesita Urbo kaj ankaŭ la ĉefa pordego de la Interna Urbo.

12. dong’an-bazaro: La tiama plej fama kaj granda bazaro en Bejping.

II

La ĝojo plikuraĝigis Ŝjangzi kaj, kun sia propra rikiŝo li kuradis eĉ pli rapide. Kompreneble, li estis aparte singarda pri sia propra posedaĵo, sed, rigardante sin mem kaj sian rikiŝon, li sentis, ke li iel kulpus, se li ne kurus kiel eble plej rapide.

De kiam li venis en la urbon, li jam kreskis ankoraŭ unu celon. Kaj nun li ankaŭ havis la senton, ke li devas ankoraŭ kreski. Vere li jam fariĝis pli fortika ol antaŭe kaj jam portis malgrandajn lanugajn lipharojn, sed li ankoraŭ volis kreski. Ĉiufoje, kiam li devis profunde klini la kapon por trairi malgrandan dompordon aŭ malantan stratpordon, lia koro estis plena de silenta ĝojo pro tio, ke li sentis sin ankoraŭ kreskanta. Tio elvokis en li ankaŭ la strangan senton, ke li jam estas plenkreskinta kaj samtempe estas ankoraŭ knabo.

Kun sia fortika korpo kaj sia bela rikiŝo — la risortoj estus tiel flekseblaj, ke eĉ la timonetoj kvazaŭ vibradis dum la kurado; la kaleŝaĵo estis brila, la kuseno blanka kaj pura kaj la korno laŭta — li sentis, ke li esuts kulpa kontraŭ ili ambaŭ, se li ne kurus rapidege. Tio estis ne el vantemo, sed el la konscio, ke li nepre devas kuri, kuregi, por plene elmontri la fortecon de siaj muskoloj kaj la belecon de sia rikiŝo. Tiu rikiŝo ja estis vere aminda, ĉar post ses monatoj ĝi kvazaŭ jam ricevis vivon kaj povis scii, kion li intencis fari: ĉiufoje, kiam li subite flankeniĝis, fleksis sian kruron aŭ rektigis sian talion, ĝi tuj donis plej kontentigan respondon. Inter ili estis nenia miskompreno kaj nenia malkonkordo. Kiam ajn ili venis sur ebenan, liberan vojpecon, Ŝjangzi kuris kaj kuregis, malstreĉe tenante la timoneton nur per unu mano kaj la mallaŭta siblado de la kaŭĉukaj pneŭmatikoj malantaŭe instigis lin kuri pli rapide, firmaŝe. Post atingo de celloko la vestoj de Ŝjangzi tiel malsekiĝis, ke li eĉ povus eltordi el ili multe da ŝvito, kvazaŭ ili estus ĵus eligitaj el akvo, kaj tiam li sentis sin laca, sed feliĉa kaj fiera, kvazaŭ li estus galopinta dekojn da lioj sur pursanga ĉevalo.

Esti kuraĝa ne signifas esti riskema, kaj Ŝjangzi, kvankam kuraĝa, neniam estis riskema. Se malrapida kurado malkontentigus lian klienton, do tro rapida kurado, kiu povus kaŭzi difekton al lia rikiŝo, estus malutila al li mem. La rikiŝo estis lia vivo, kaj li sciis kiel li devas esti singarda pri ĝi. La kuraĝo kombinita kun la singardemo faris lin pli kaj pli memfida, kaj li konvikiĝis, ke li kaj lia rikiŝo ambaŭ estas nedetruiblaj.

Kaj tial li ne nur tutforte kuradis, sed ankaŭ ne donis atenton al la

laborhoroj. Por li, tiri rikiŝon por akiri siajn vivrimedojn estis la plej vira afero en ti ĉi mondo; se li volis labori neniu povis lin haltigi. Li preskaŭ ne donis atenton al la onidiroj, kiuj rondiris en la urbo — la reapero de soldatoj en Ŝjĵūan, la refoja ekbatalo en Ĉangŝindjan, la denova perforta rekrutado ekster la pordego Ŝjiĝimen, la jam duontagon daŭranta fermiteco de la pordego Ĉjĵūamen — neniu el tiuj lin maltrankviligis. Kompreneble, kiam la butikoj jam fermiĝis kaj armitaj policianoj kaj soldatoj de sekurigaj trupoj vidiĝis preskaŭ ĉie sur la stratoj, li ne volis serĉi al si malagrabraĵon kaj haste ĉesigis la laboron, same kiel ĉiuj aliaj. Sed la onidirojn li ne kredis. Li sciis, kiel li devas esti singarda, des pli, ke la rikiŝo estis lia, tamen li, veninta el la kamparo, ne estis tiom vigle atenta pri danĝero kiel urbanoj. Cetere, li havis fidon je sia propra forto, kaj kredis ke, eĉ se li falus en danĝeron, li povus sin elsavi. Fakte li ja ne estis facile ofendebla, tiel altkreska kaj larĝaŝultra li estis!

Preskaŭ ĉiujare onidiroj kaj novaĵoj pri milito elkreskis kun la printempa tritiko. Por nordanoj tritikspikoj kaj bajonetoj povis esti kalkulataj kiel simboloj de iliaj espero kaj timoj respektive.

La rikiŝo de Ŝjangzi atingis ĝuste la aĝon de ses monatoj, kiam la tritiko bezonis printempan pluvon. Kvankam pluvo ne ĉiam falas kiam ĝi estas plej sopirata, tamen milito ĉiam venas, tute egale, ĉu ĝin oni volas aŭ ne. Sed ĉi-foje ĉu la novaĵoj estis veraj aŭ malveraj, Ŝjangzi ŝajne jam forgesis, ke li iam antaŭe prilaboradis kampojn, kaj al li estis indiferece, ĉu milito ruinigos la grenon aŭ falos neniom da printempa pluvo. La sola afero, pri kiu li zorgis, estis lia rikiŝo. Ĝi povis provizi lin per dabingoj kaj ĉiaj nutraĵoj; ĝi estis movebla kaj magia kampo, kiu ĉiam obeeme sekvis lin de loko al loko. Ŝjangzi sciis, ke pro manko de pluvo kaj pro la novaĵoj pri milito plialtiĝis la prezo de greno; sed same kiel ĉiuj urbanoj, li povis nur fari plendojn, li havis nenan rimedon kontraŭ tio. Se greno fariĝis kara, kion oni povas fari kontraŭ tio? Tia sinteno faris lin pensi nur pri sia propra vivpano, tiel ke li elpuŝis ĉiujn pensojn pri katastroj kaj plagoj el sia kapo.

Se la urbanoj estas senpovaj kontraŭ ĉi tio, ili tamen scias kiel disvastigi onidirojn — iuj el kiuj estas centprocentaj fabrikitaj mensogoj, aliaj havas nur grajnon da vero en si — por pruvi, ke ili ne estas malsaĝuloj, nek nenifarantoj. Same kiel fiŝetoj, kiam ili havas nenion alian por fari, ili naĝas al la akvosurfaco kaj memkontente blovas tute senutilajn aerveziketojn. Iliaj plej interesaj onidiroj estas tiuj pri milito. Aliaj plejofte estas centprocentaj elpensaĵoj, same kiel rakontoj pri fantomoj aŭ vulpospiritoj, kiuj, vi estas certa, neniam povas enkarniĝi. Sed ĝuste ĉar pri milito estas nenia fidinda novaĵo,

onidiroj pri milito ricevas multe-kredatecon kaj eĉ montriĝas profetecaj. En detaloj ili eble iras tro malproksimen de la vero, sed rilate la demandon, ĉu okazos milito aŭ ne, ili plejofte estas precizaj. “Okazos milito!” se ekkuras tia onidiro, batalo certe eksplodas pli aŭ malpli frue. Koncerne la demandon, kiuj armeoj interbatalos kaj kiel, ĉiu homo havas sian malsaman aserton.

Ŝjangzi ja ne estis sen scio pri tio. Sed, kvankam tiuj, kiuj vendas siajn muskolfortojn — inkluzive rikiŝistojn — neniam bonvenigas militon, tamen ili ankaŭ ne bezonas timi pri sia ruiniĝo kaŭzita de ĝi. La plej panikiĝemaj estas la riĉuloj. Tuj kiam ili aŭdas, ke la situacio estas malboniĝanta, ili komencas pensi pri forkuro. Mono pavimas ilian vojon kaj plirapidigas ilian forkuradon. Sed ili ne povas kuri sur siaj propraj kruroj, kiuj estas tiel peze ŝarĝitaj per iliaj riĉaĵoj, tial ili devas dungi multajn aliajn homojn kiel siajn krurojn. Iliaj kestoj kaj valizoj devas esti forportitaj, iliaj junaj kaj maljunaj familianoj devas esti forveturigitaj. Ĝuste tiam tiuj, kiuj vendas siajn muskolfortojn, trovas bonan ŝancon por altigi la prezon.

“Al la pordego Ĉjanmen, la orienta Stacidomo!”

“Kien?”

“Orienta — Stacidomo!”

“Nu, donu simple unu jŭanon kvar ĝjaŭojn! En tia maltrankvila tempo de milito, ne marĉandu!”

Ĝuste en tiaj cirkonstancoj Ŝjangzi eltiris sian rikiŝon ekster la urbopordegojn. Onidiroj jam cirkulis pli ol dek tagojn kaj la prezoj altiĝis, sed portempe la milito ŝajnis ankoraŭ malproksima de Bejping. Ŝjangzi ankoraŭ laboris kiel kutime, ne prenante la onidirojn kiel pretekston por iom ripozi. Iutage li iris al la okcidenta urboparto kaj rimarkis ion nekutiman. Ĉe la okcidenta fino de la strato Hugŭosi kaj ĉe la T-strato Ŝingĝekoŭ estis neniuj rikiŝoj, kiu proponis porti pasaĝeron al Ŝjijŭan aŭ la uinversitato Ĉinghŭa. Li vagis proksime de Ŝingĝekoŭ kelkan tempon kaj aŭdis, ke neniuj veturiloj jam kuraĝas forlasi la urbon, ĉar oni kaptas kiel ĉarojn, tiel ankaŭ rikiŝojn tie ekster la pordego Ŝjiĝimen. Li decidis trinki bovlon da teo kaj poste sin direkti suden. La preskaŭa senhomeco ĉe la rikiŝoparkadejo antaŭsentigis veran danĝeron, kaj kvankam timulo li ne estis, tamen li vidis enenian motivon por riski sian vivon. Ĝuste en tiu momento aperis du rikiŝoj el la sudo. La pasaĝeroj aspektis kiel du studentoj kaj la kurantaj rikiŝistoj estis kiantaj “He, al Cinghŭa! Ĉu iu volas?”

Tiuj kelkaj rikiŝistoj ĉe la rikiŝoparkadejo ne respondis. Iuj el ili rigardis la du rikiŝistojn kun indiferenta rideto, aliaj sidis tie kun malgranda pipo inter siaj lipoj kaj eĉ ne levis sian kapon. “Ĉu vi ĉiuj estas mutuloj? Al Cinghŭa!” la

du rikiŝistoj daŭrigis kriadon.

“Se por du jŭanoj, mi volus!” iu malalta junulo kun razita kapo diris ŝerce por rompi la silenton

“Venu do kaj trovu ankoraŭ unu!” la du rikiŝistoj haltis.

La junulo embarasiĝis, ne sciante kion fari. Ankoraŭ neniu ekmoviĝis. Ŝjangzi povis vidi, ke eliri el la urbo estas vera danĝero; alie kial neniu kuraĝas kapti la okazon por akiri du jŭanojn nur per unufoja kuro al Ĉinghŭa, kio ordinare kostas nur du aŭ tri ĝjaŭojn. Ankaŭ li ne volis iri tien. Sed videble la razita junulo jam decidis, ke se iu alia iros kun li, li prenos la riskon. Li ĵetis rigardon al Ŝjangzi kaj diris: “kion vi pensas pri tio, altulo?”

La vorto “altulo” ekridigis Ŝjangzi; ĝi estis laŭdo. Li komencis konsideri. Tiel komplimentite, li devas subteni la proponon de tiu ĉi aŭdaca mallongulo kun razita kapo. Kaj krome, du jŭanoj ja estas sumo sufiĉe granda, kian oni malofte povas ricevi. Koncerne danĝeron, ĉu en ĝin li vere enfalos? Ĝuste antaŭ du tagoj li aŭdis, ke ĉe la Ĉiela Altaro svarme loĝas trupoj, sed propraokule li vidis nenian ombron de soldato. Tiel rezonante, li tiris la rikiŝon antaŭen.

Kiam ili atingis la pordegon Ŝjiĝimen, tie apenaŭ troviĝis homoj. Timo komencis ataki la koron de Ŝjangzi. Eĉ la alia rikiŝisto fariĝis maltrankvila, tamen li diris kun rideto: “Ni pluiru, frato! Se malfeliĉo devas veni, ĝin eviti neniu povas. Hodiaŭ jam estas la tempo!” Ŝjangzi sciis, ke al ili neeviteble okazos io malbona, sed, post tiom da jaroj en la urbo nun li ja ne povas rompi sian vorton kaj retiriĝi pro timo kiel virino.

Ekster la urbomurego vere ili renkontis neniun rikiŝon. Ŝjangzi klinis sian kapon, ne kuraĝante rigardi ambaŭflanken de la ŝoseo, kaj lia koro frapegis kvazaŭ kontraŭ liajn ripojn. Atinginte la ponton Gaŭljangĉjaŭ, li ĵetis rigardon ĉirkaŭen, sed vidis neniun soldaton, kaj li denove iom trankviliĝis. Li pensis en si: du jŭanoj ja estas du jŭanoj kaj por akiri tian sumon oni nepre devas esti iom aŭdaca. Sur la ŝoseo estis teurure kviete kaj, kvankam kutime li estis silentema, tamen ĉi-momente li eksentis la emon diri ion al sia kamarado.

“Ni prenu la mallongan vojeton, ĉu bone? La ŝoseo...”

“Kompreneble!” la alia tuj ekkomprenis. “Tiu vojeto estas pli sekura.”

Sed antaŭ ol ili sin turnis al la vojeto, ambaŭ rikiŝistoj, iliaj rikiŝoj kaj pasaĝeroj, jam ĉiuj falis en la manojn de dekelkaj soldatoj.

Kvankam jam estis la jartempo por pilgrimantoj oferi incenson en la templo sur la monto Mjaŭfengŝan, tamen la vetero ankoraŭ estis tia, ke nur sola maldika ĉemizo ne estis sufiĉa por ŝirmi la homon kontraŭ la nokta malvarmo.

Ŝjangzi estis senigita je ĉio alia krom griza soldata jako kaj blua kotontola pantalono, kiujn li portis sur si. Ili odoraĉis pro ŝvito — tial ili jam estis, antaŭ ol estki metitaj sur lin. La ĉifona soldata uniformo rememorigis lin pri liaj blanka kotona ĉemizo kaj indantrenaj subŝtofitaj vestoj. Kiel puraj kaj elegantaj ili tiam estis! Kompreneble, en tiu ĉi mondo ja ekzistas multaj aĵoj pli elegantaj ol indantrena tolo, sed Ŝjangzi sciis, kiel malfacile estis por li mem atingi tian gradon de pureco kaj eleganteco. Nun la ranca ŝvitodoraĉo eliĝanta el la uniformo igis lin senti, ke liaj antaŭaj luktoj kaj sukcesoj estis dekoble pli noblaj. Ju pli li rememoris la pasintecon, des pli li malamis tiujn soldatojn. Ili forrabis de li ĉion, liajn vestojn, ŝuojn kaj ĉapon, lian rikiŝon kaj eĉ lian tolzonon, postlasante al li nenion alian krom bluaĵoj sur la tuta korpo kaj multaj haŭtveziketoj sur la piedoj. Liaj vestoj estis nenio, kaj kontuzoj povis baldaŭ resaniĝi, sed lia rikiŝo, tiu kara rikiŝo, pro kiu li sange ŝvitadis plurajn jarojn, perdiĝis! Tirite al la soldataj barakoj, ĝi tuj malaperis! Ĉiujn aliajn afliktojn li povis forpeli kaj forgesi, sed kiel li povus forgesi tiun rikiŝon?

Li ne timis penigan laboron, sed aĉeti alian rikiŝon ja estis por li afero tute ne facila. Tio postulis almenaŭ plurajn. Ĉiuj liaj antaŭaj penoj kaj klopodoj jam vane pereis, kaj nun li devis rekomenci tuj de la nulo. Tion pensante, Ŝjangzi eklarmis. Li malamis tiujn soldatojn, malamis la tutan mondon. El kia rajto ili tiel tiranis kaj humiligis homojn?

El kia rajto?

“El kia rajto?” li kriis.

Lia voĉo, kvankam donante al li ian animfaciligon, abrupte rememorigis lin pri lia danĝero. Ĉion alian li povis lasi portempe; antaŭ ĉio li devis forkuri pov savi sian vivon.

Sed kie li nun troviĝis? Pri tio li ne povis respondi kun certeco. Dum la lastaj tagoj li sekvis la retiriĝantajn soldatojn banante sin en ŝvito. Marŝante, li devis porti, puŝi aŭ tiri iliajn ekipaĵojn; post kiam ili haltis, li devis porti akvon, fari fajron por kuirado kaj manĝigi la ŝarĝobrutajn. De la mateno ĝis la vespero li penis kolekti siajn lastajn fortojn en siajn manojn kaj piedojn, kaj dume lia spirito estis absolute vaka. Nokte, kusiĝinte sur la tero, li tuj enfalis en pezan dormon, kaj ŝajnis al li, ke se li neniam revekiĝos, tio ne certe estos ia malbona afero.

Li malprecize memoris, ke la trupoj unue retiriĝis en la direkto al la monto Mjaŭfengŝan; poste, kiam ili atingis la nordan flankon de la monto, lia tuta atento estis koncentrita sur la grimpadon, ĉar tiam li estis obsedata de timo pri falo al la valfundo kaj pri disŝiriĝo de sia karno fare de rabobirdoj. Ili rondiradis

inter la montoj plurajn tagojn, ĝis la tereno fariĝis malpli montoza, kaj iuvespere, kiam la suno jam subiris malantaŭ ili, li vidis ebenaĵon en malproksimeco. Kiam oni klarionis al la vespermanĝo, kelkaj soldatoj revenis kun pafilo sur la ŝultro kaj kondukis kelkajn kamelojn.

Kameloj! Ŝjangzi sentis sian koron vigle ekmoviĝi kaj sian menson subite relumiĝi, same kiel erarvanto ekvidinte konatan vojmontrilon ree sin orientas. Kameloj ne povas grimpi, kio signifis, ke ili jam alvenis al ebenaĵo. Kiom li sciis, kamelojn oni bredas en vilaĝoj okcidente de Bejpin. Ĉu povus esti, ke la ĉirkaŭvojaj jam venigis ilin al la pasejo Moŝikoŭ? Li ne sciis, kia strategio tio ĉi estas, se tiuj ĉi soldatoj kapablantaj nur retiriĝi kaj rabadi havas ankaŭ ian ajn strategion. Sed pri unu afero li estis certa, kaj tio estis, ke, se ili jam vere atingis la pasejon Moŝikoŭ la trupoj, ne povante trovi al si elirejon el la montoj, nun sin direktas al la ebenaĵo por sin savi. Moŝikoŭ estis strategia nodpunkto inter la Okcidentaj Montoj nordoriente kaj Ĉangŝingdjan aŭ Fengtaj sude, kaj transe de la pasejo estis ankoraŭ unu vojo, kiu kuris rekte al la okcidento. Kiam li konsideris la eblajn movadojn de la trupoj, li samtempe ankaŭ desegnis en la kapo sian propran vojo, ĉar nun jam estis tempo po li sin forsavi. Se la soldatoj denove retiriĝos al la montoj, tiam lin certe minacos malsatmorto, eĉ se li sukcesos forkuri de ili. Tial nun li devis kapti la okazon, se li volis sin savi. Li kredis, ke forkurinte el iliaj ungegoj li povos rapide veni rekte al Hajdjan, ĉar li bone konis ĉiujn lokojn en tiu regiono. Se li nur fermis la okulojn, en lia kapo tuj aperis mapo; ĉi tie estas Moŝikoŭ, — ho ĉielo kompatema, nepre faru ĝin Moŝikoŭ! — se li direktos sin nordorienten preter la Orpinta Monto kaj Tombo de Princo Li, li povos alvenis al la Ok Vidindejoj; poste, sin turninte ĉe Sipingtaj orienten, li povos atingi la Abrikotan Pasejon kaj Nanŝingŭang. Por havi pli da ŝirmo, li pli bone iru laŭlonge de la montoj kaj sin direktu de Bejŝinĝŭang morden, tra Ŭejĝjacun, denove norden al Nanhetan, ankoraŭ norden al la Ruĝa Montsupro kaj la Palaco de Princo Ĝje kaj fine al Ĝingji-ĝardenoj. Atinginte tien, eĉ kun fermitaj okuloj li povos trovi sian vojon al Hajdjan. Ĉe tiu ĉi penso lia koro saltegis preskaŭ ekster la bruston! En la lastaj tagoj lia tuta sango kvazaŭ forfluis en liajn kvar membrojn, sed nun ĝi kvazaŭ estis refluinta en lian bruston, tiel ke lia koro brule varmiĝis, dume liaj brakoj kaj kruroj fariĝis malvarmaj. Febra espero igis lin tremi per la tuta korpo.

Ĉe la noktomezo li ankoraŭ restis sendorma. Espero ĝojigis lin, sed timo faris lin maltrankvila. Li deziris dormi, sed ne povis endormigi, kuŝante sternita sur fojno. Ĉio estis kvieta, nur la steloj tremetis samritme kun lia koro. Subite

iu kamelo eligis plendan krion, ne malproksime de li. Simile al subita ekkrio de koko en la nokto, ĝi vekis en lia animo malgajecon kaj samtempe donis al li ian konsolon.

Kanonoj komencis murmuri en la foro; tre malproksime, sed sendube kanonoj. Li ne kuraĝis sin movi, sed la tendaro tuj ektumultis. Li retenis sian spiron, nun jam estis lia ŝanco! Li sciis, ke la trupoj certe denove retiriĝos kaj probable sin direktos al la montoj. La spertoj de la lastaj tagoj diris al li, ke en la batalo tiuj soldatoj povas nur sovaĝe sin ĵetadi en ĉiu direkto, kvazaŭ abeloj enfermitaj en ĉambro.

Aŭdinte la kanonbrun, la trupoj certe forkuros, tial pli bone li restu viglatenta. Retenante la spiron, li rampis antaŭen kun la celo serĉi la kamelojn. Li bone sciis, ke ili donos al li nenian helpon, sed ĉar li kaj ili same estis kaptitoj, li sentis ian simpatian al ili. Pli granda ĥaoso nun regis en la tendaro. Li trovis la kamelojn, kaŭrantajn kvazaŭ montetoj da tero en la mallumo; ili faris nenian bruon krom sia peza spirado, kvazaŭ nenio okazus ĉirkaŭe. Tio plikuraĝigis lin kaj li kaŭriĝis apud ili, simile al soldato sin ŝirmanta malantaŭ sablosakoj. Tiam subite venis al li en la kapon la ideo: se la kanonbruo, kiu venas de la sudo, ne signifas veran batalon, ĝi almenaŭ estas averto, ke tiu vojo estas fermita. Do la soldatoj devos denove retiriĝi al la montoj. Se tiel estos, ili ne povos preni la kamelojn, kaj tiuokaze li kaj la kameloj dividos la saman sorton. Se la soldatoj prenos la brutojn, tiam li estos perdita; sed se ili forgesos la kamelojn, tiam li do povos sin forsavi. Li alpremis sian oreilon al la tero, aŭskultante paŝbruojn, kaj lia koro furioze bategis.

Li ne sciis, kiom longe li jam atendis, sed neniu venis por forkonduki la kamelojn. Fine li, preninte al si kuraĝon, sidiĝis supren kaj elrigardis tra interiliaj duoblaj ĝiboj. Ĉirkaŭe regis mallumo, kaj li povis vidi nenion. Nun jam estis la tempo por kuri for. Ĉu por vivo, ĉu por morto, kuru nur!

Notoj:

1. Ĉangŝindjan: Loko sudokcidente de Bejping.
2. la pordego Ŝjiĝimen: unu el la okcidentaj urbopordegoj.
3. la pordego Ĉjihŭamen: unu el la orientaj urbopordegoj.
4. la Orienta Stacidomo: Tiam ĉe la pordego Ĉjanmen estis orienta kaj okcidenta stacidomoj. La orienta Stacidomo estis por pasaĝertrajnoj.
5. Vd. noton 3 de ĉapitro I.
6. Hajdjan: Urbeto en la nordokcidenta antaŭurbo.

7. Ok Vidindejoj: Famaj vidindaj lokoj ĉe la Okcidentaj Montoj, okcidente de Bejping.

III

Ŝjangzi jam kuris pli ol dudek paŝojn, kiam li abrupte haltis, ne volante forlasi tiujn kamelojn. Ĉio, kio restis al li en la mondo, estis nur lia vivo. Li eĉ ĝoje levus pecon da kanaba ŝnuro de sur la tero, ĉar ĝi, kvankam senutila, povus iom konsoli lin, sentigante al li, ke liaj manoj ne estas tute malplenaj. Kompreneble, antaŭ ĉio li devis forkuri por sin savi, sed kian utilecon havus la vivo senigita je ĉio? Li devis preni kun si la kamelojn, kvankam li havis ankoraŭ nenan ideon, kion fari kun ili, ĉar ili ja estis almenaŭ io, kaj sufiĉe granda io.

Li tiris la kamelojn, por igi ilin leviĝi. Kvankam li ne sciis kiel trakti ilin, tamen li ilin ne timis, ĉar veninta el la kamparo li kutimis al bestoj. Tre, tre malrapide la kameloj leviĝis sur siaj piedoj kaj, antaŭ ol li estus certiĝinta pri tio, ĉu ili estas ligitaj kune aŭ ne, li tuj ekiris, ne konsiderante, ĉu li trenas post si nur unu aŭ ĉiujn.

Apenaŭ li ekpaŝis, li ekpentis pri sia decido. La kameloj, kutimantaj porte pezan ŝarĝon, iras malrapide. Krome, ili iras ankaŭ tre singarde pro timo je glitfalo. Kaveto da akvo aw amaseto da koto povas igi ilin rompi al si kruojn aŭ tordi al si genuon. La valoro de la kamelo kuŝas tute en ĝiaj kruoj; se ĝiaj kruoj estas kripliĝintaj, ĝia tuta valoro estas perdita. — kaj cetere, Ŝjangzi ja celis nur sin forsavi!

Kaj tamen li ne volis ilin forlasi. Li fidis Providencon kaj firme tenadis tiujn kamelojn, kiujn li ricevis por nenio.

Post sia longtempa okupiĝo pri rikiŝotirado Ŝjangzi jam havis bonan senson de direkto. Sed, malgraŭ tio, li tamen nun sentis sin iom erariĝinta. Rovintde la kamelojn, li estis forte absortita per ili, kaj kiam li sukcesis tiri ilin sur la piedojn, li havis nenan ideon pri orientiĝo, ĉar estis tiom mallume kaj li sentis sin tiom maltrankvila. Eĉ se li sciis kiel sin orienti laŭ la steloj, li ne kuraĝus tion fari, ĉar — al li — la steloj ŝajnis ankoraŭ pli maltrankvilaj, svarme inter puŝiĝante en la nigra nokta ĉielo. Ne kuraĝante plu rigardi la ĉielon, li klinis la kapon kaj, kvankam brulante pro malpacienco, malrapide paŝis antaŭen kun timo. Ĝuste tiam venis al li la ideo: Kondukante la kamelojn, li prefere prenu la ĉefvojon anstataŭ iri laŭlonge de la montopiedoj. Inter la pasejo Moŝikoŭ — se ĝi vere estis Moŝikoŭ — kaj Hŭangcun, la vojo estis rekta. Ĝi taŭgis por kamelirado kaj povis evitigi al li ĉirkaŭiron. Tiu ĉi lasta oportuneco estis multe grava por la rikiŝisto, sed sur tiu vojo estis nenia ŝirmo!

Se li okaze renkontos alian grupon da soldatoj, kion do fari? Eĉ se tiajn li ne renkontos, kiu povus kredi, ke li, kun la ĉifona soldata uniformo, la kota vizaĝo kaj la longaj haroj, estas kamelisto? Ne, li neniel aspektos kiel tia. Kio li vere aspektos, estos dizertinto! Se li estos kaptita de trupoj, estos ne tiel serioze; sed se iuj vilaĝanoj lin kaptos, li almenaŭ estos enterigita viva. Tiel pensante, li komencis tremi per la tuta korpo. La molaj pasoj de la kameloj irantaj malantaŭ li subite teruris lin. Se li deziris sin forsavi, li devus forlasi tiujn ĝenaĵojn. Sed tamen li ne volis ellasi el sia mano iliajn nazŝnurojn. Do li pluiru, ne konsiderante, kien li venos kaj kion malbonan li renkontos. Se li sukcesos eliri viva, al li apartenos la bestoj, ricevitaj por neniom da mono; se ne, li do submetos sin al sia sorto!

Tamen li demetis sian soldatan jakon kaj deŝiris de ĝi la kolumon; post tio ankaŭ la lastaj du latunaj butonoj, kiuj ankoraŭ plenumis sian devon, estis same deŝiritaj kaj forĵetitaj en la mallumon, kaj ili falis eĉ sense. Li ĵetis la senkoluman, senbutonan jakon oblikve sur sian ŝultron kaj ligis la du manikojn en nodo sur sia brusto, kvazaŭ li portus pakon sur sia dorso. Li sentis, ke nun li jam aspektas malpli kiel venkita soldato, kaj li refaldis sian pantalonon iom pli surpen. Eble li aspektis ankoraŭ ne kiel vera kamelisto, sed almenaŭ li estis malpli kiel dizertinto. Plie, la koto sur lia vizaĝo kaj ŝvito sur lia korpo probable donis al li aspekton pli de karboministo ol de io ajn alia.

La marŝo de Ŝjangzi funkciis malrapide, sed ĝisfunde, kaj unu fojon iu ideo venis al li en la kapon, li tuj agis laŭ ĝi. En la nigra mallumo estis neniuj, kiu povus lin vidi, do estis ne necese, ke li tuj ekagu; sed li ne povis plu atendi, tiom pli, ke li ne sciis kiom baldaŭ tagiĝos. Ĉar li ne iros tra la montoj, li trovos neniun ŝirmon por sin kaŝi, tial, se li intencos fari vojiron ankaŭ dum la tago, li devos kredigi al la pasantoj, ke li estas karboministo. Li tiel pensis kaj ankaŭ agis, nun li jam sentis sin pli facila en la animo, kvazaŭ la danĝero estus jam fopasinta kaj Bejping jam kuŝus ĝuste antaŭ li. Li devis perdi neniom da tempo kaj kiel eble plej baldaŭ veni en sekureco al la urbo, ĉar li jam ne havis monon, nek nutraĵon ĉe si. Li intencis rajdi sur kamelo por konservi sian forton kaj mildigi la malsaton; sed li devus igi la kamelon genuiĝi por ekrajdi, kaj tio signifus perdi iom pli da tempo. La tempo estis tro valora, ke li ĝin perdu. Cetere, sidante tiom alte, li ne povus bone vidi la teron. Se la kamelo glitfalus, ankaŭ li falus kune kun ĝi. Ne, prefere piediru tiamaniere.

Li havis nenian ideon pri tio, kie li estas kaj kien li sin direktas, sed konsciis nur, ke li devas plu marŝi laŭ la ĉefvojo. En tia malfrua nokta horo, elĉerpita pro la laciga penegado dum la lastaj tagoj kaj premata de la timego

post la eskapo, li sentis sin malbone de la kapo ĝis la piedoj, kaj lia koro estis plena de maltrankvileco. Post marŝo de ia distanco liaj malrapidaj egalaj paŝoj iom post iom igis lin dormema. La nigre malluma nokto kaj la humida, malvarma nebulo sentigis lin pli forlasita. Kiam li fiksas sian rigardon sur la tero, ĝi ŝajnis havi multajn terĝibojn, sed liaj piedoj tuŝis nur ebenan supraĵon. Tia singardo kaj impresado de trompiĝo pliigis liajn maltrankvilecon kaj malpaciencon. Li decidis ne rigardi la teron, sed nur direkti la okulojn rekte antaŭen kaj piedtrene marŝi. Li povis vidi absolute nenion ĉirkaŭ si, kvazaŭ la tuta mallumo en la mondo en alian. Kaj la silentaj kameloj ĉiam sekvis lin.

Li iom post iom al kutimiĝis al la mallumo kaj lia menso ŝajnis ĉesi funkcii. Liaj okuloj pretervole fermiĝis. Li ne sciis, ĉu li estas ankoraŭ marŝanta aŭ jam haltinta, sed li sentis, nur balancan movadon, kvazaŭ drivante sur ondanta nigra maro, kaj la mallumo kunfandiĝis kun lia koro, malkvieta kaj konfuzita. Subite li sentis sian koron ekskuita, kvazaŭ li aŭdus ian sonon aŭ estus atakita de li ne sciis kia ido. Liaj okuloj denove malfermiĝis. Li estis ankoraŭ marŝanta antaŭen, ĉio estis kvietita, kaj kio ĵus venis al li en la kapon, nun jam estis for el lia menso. Lia koro forte bategis kelkan tempon, poste iom post iom ree kvietiĝis. Li ordonis al si, ke li ne refermu la okulojn, nek lasu sian fantazion libere kuri; la plej grava afero estas alveni al la urbo kiel eble plej rapide. Sed kun spirito vaka, liaj okuloj tre emis refermiĝi; li devis koncentri sian spiriton sur io por resti maldorma. Li sciis, ke li povus ekdormi por tri plenaj tagnoktoj, se li lasus sin fali sur la vojo.

Pri kio do li pensu? Li havis ioman kapturon, kaj li sentis sian korpon malagrabla malseketa. Lia kranohaŭto jukis, liaj piedoj doloris kaj en lia buŝo estis seka, amara gusto. Ĉio, pri kio li povis pensi, estis lia propra kompatinda stato; sed eĉ sur tio li ne povis koncentri sian spiriton kun sia kapo tiel vaka kaj tiel turniĝanta, kvazaŭ ekmemorinte sin mem li tuj denove forgesus sin, simile al kandelo forkonsumiĝanta, kiu apenaŭ povas lumigi eĉ sin mem. Krom tio, la mallumo ĉirkaŭe igis lin senti, kvazaŭ li ŝvebus en nigra nubo. Li sciis, ke li ekzistas kaj estas marŝanta antaŭen, sed, ĉar mankas pruvo pri tio, li estis tiel necerta pri si mem, kvazaŭ li sola estus flosanta sur vasta maro. Li neniam antaŭe suferis tian turmenton de necerteco kaj absoluta soleco. Kvankam ordinare li ne estis societema, tamen starante sole en la taglumo, kun la suno brilanta super li kaj ĉio ekzistanta ĉirkaŭe, li ne sentis timon. Nun li ankoraŭ ne timis, sed lia necerteco pri ĉio jam estis pli ol kiom li povis elporti.

Se la kameloj estus tiel malfacile trakteblaj kiel muloj aŭ ĉevaloj, li eble devus plivigliĝi por ilin prizorgi. Sed male ili estis obeemaj, tiel obeemaj, ke

tion li eĉ ne povis toleri. En sia plej granda konfuziĝo, li subite suspektis, ke ili ne plu estas malantaŭ li, kaj tio lin konsternis. Li preskaŭ konvinkiĝis, ke tiuj grandaj bestoj povas senbrue malaperi en iun malluman flankvojon sen lia scio kaj iom post iom disfandiĝi kvazaŭ pecegoj da glacio. En ia momento — li mem ne sciis kiam — li sidiĝis. Se li nun mortus kaj rericevus sian konscion post la morto, li ne povus rememori kiel kaj kial li sidiĝis, aŭ ĉu li sidis kvin minutojn aŭ unu horon. Li ankaŭ ne sciis, ĉu li unue sidiĝis kaj post endormiĝis aŭ inverse. Probable li unue endormiĝis kaj poste sidiĝis, ĉar lia elĉerpiteco jam atingis tian gradon, ke li povus eĉ starante dormi.

Li subite vekigis. Tio estis ne iom-post-ioma natura vekigo, sed subita eksalto pro timo, kvazaŭ en la momento, kiam li malfermis la okulojn, li jam eksaltus el unu mondo en alian. Ĉio ankoraŭ estis malluma, sed li klare aŭdis kokokrion. La sono estis tiel klara, ke ĝi kvazaŭ tranĉus lian cerbon, farante lin plenvekiĝinta. Kie estis la kameloj? Tiumomente nenio alia gravis por li. La ŝnuro estis ankoraŭ en lia mano, la kameloj ankoraŭ apud li. Li trankviliĝis. Li sentis sin tro malforta por stariĝi kaj lia tuta korpo lin doloris, tamen li ne kuraĝis lasi sin denove ekdormi. Li devis pensi, pensi profunde, tio estis la sola, kion li povis fari. Kaj ĝuste tiam li ekmemoris sian rikiŝon kaj ekkriis. “El kia rajto?”

“El kia rajto?” tamen la krio estis vana kaj nenion helpis. Li iris kontroli, kiom da kameloj li havas. Palpante per siaj manoj, li kalkulis: estis tri. Por li tio ne estis tro multa, nek ro malmulta, kaj nun li koncentris siajn pensojn sur ilin; kvankam li ankoraŭ ne sciis kion fari poste kun ili, tamen li jam iel antaŭvidis, ke lia estonteco dependos tute de ili. “Kiel ne forvendi ilin kaj aĉeti alia rikiŝon?” li preskaŭ eksaltis sur siajn piedojn, sed li restis senmova, hontante, ke li antaŭe ne elpensis tian plej naturan, evidentan solvon. Sed la ĝojo superis la honton, kaj li faris sian decidon. Ĉu ĵus li ne aŭdis kokokrion? Eĉ se kokoj iafoje krias je la unua aŭ dua horo nokte, tio tamen signifas, ke la tagiĝo jam ne estas malproksima. Kaj kie estas kokoj, tie devas esti vilaĝo. Eble ĝi estas eĉ Bejŝin’an, kie oni bredas kamelojn. Li devis rapidigi sian iradon por alveni tien antaŭ la tagiĝo. Forvendinte la kamelojn tie, li povos aĉeti al si alian rikiŝon tuj post sia eniro en la urbon. En tiu ĉi maltrankvila batalplena tempo ĝia prezo devas esti iom malpli alta. Nun li direktis ĉiujn siajn pensojn nur al la aĉeto de rikiŝo, vidante nenian malfacilon en la vendo de la kameloj.

Ĉe la penso pri la rilato inter la kameloj kaj lia tuta malbonfarto malaperis. Se li povus aĉeti cent muojn* da tero por la prezo de la tri kameloj, aŭ interŝanĝi tiujn kontraŭ kelkaj perloj, li ne estus tiel ĝoja. Li rapide stariĝis, tiris

la kamelojn sur iliajn piedojn kaj ekiris. Li ne sciis la kurantan prezon de la kamelo, sed li iam aŭdis, ke en la malnovaj tagoj, antaŭ la apero de trajnoj, unu kamelo kostis unu grandan ĵuanbaŭon*, ĉar la kamelo estas pli forta kaj manĝas malpli ol la ĉevalo aŭ mulo. Li esperis ricevi ne tri grandajn ĵuanbaŭojn por la tri kameloj, sed nur okdek ĝis cent juxanojn — ĝuste sufiĉe por aĉeti unu rikiŝon.

Ju pli antaŭen li marŝis, des pli heligis la ĉielo antaŭ li. Jes, li estis sin direktanta la la oriento. Eĉ se li prenis eraran vojon, lia ĝenerala direkto tamen estis ĝusta. Li sciis, ke la montoj estas okcidente kaj la urbo oriente. Antaŭ momento ĉirkaŭ li regis peĉnigra mallumo, sed nun, iom post iom, aperis nebula lumo kaj, kvankam li ankoraŭ ne povis distingi kolorojn, tamen kampoj kaj foraj arboj jam ricevis sian formon en la matenkrepusko. La steloj iom post iom paliĝis kaj la ĉielo, vualita de tavolo da grizaĵo, kiu povis esti paliĝis kaj la ĉielo, vualita de tavolo da grizaĵo, kiu povis esti nuboj aŭ nebulo, ŝajnis multe pli alta ol ĵus antaŭe. Ŝjangzi jam kuraĝis levi la kapon. Li ankaŭ povis flari la odoron de la herboj apud la vojo kaj aŭdi birdajn trilojn. Nun ke li jam vidis la nebulajn formojn de objektoj, ankaŭ liaj aliaj sensorganoj rekomencis plenumi sian funkcion. Li denove povis vidi ankaŭ sin mem kaj, kvankam en tia ĉifona vesto kaj kun tia kompatinda aspekto, tamen li almenaŭ povis sin certigi, ke li estas ankoraŭ vivanta. Kiel bela ŝajnis la vivo al li, kiu kvazaŭ ĵus vekigis el inkubsonĝo!

Pririgardinte sin mem, li turnis la kapon kaj ĵetis rigardon al la kameloj. Ili aspektis same mizeraj kiel li kaj samtempe ankaŭ amindaj por li. Tiam estis ĝuste la harŝanĝa sezono por la bestoj kaj iliaj grizruĝaj haŭtmakuloj montriĝis inter la disaj tufoj de molaj, pendantaj longaj haroj, kiuj estis pretaj defali en ĉiu momento. Ili estis kiel grandegaj almozuloj de la animala regno. Plej mizeraj estis iliaj senharaj koloj, tiel longaj, kurbaj kaj malgraciaj, sin elstreĉintaj kiel malvigligintaj malgrasaj drakoj. Sed, kiel ajn malbelaj ili aspektis, Ŝjangzi ne trovis ilin abomenindaj, ĉar ili ja estis vivaj estaĵoj.

Kaj li kalkulis sin kiel la plej bonŝancan homon en la mondo, ĉar Ĉielo donis al li tiujn ĉi tre karajn kreaĵojn, kiuj estis sufiĉaj por interŝanĝo kontraŭ rikiŝo. Tia bonŝanco ja estis treege malofta, kaj li ne povis deteni sin de ekrido.

La griza ĉielo komencis rugiĝi, la kampoj kaj foraj arboj ŝajnis pli mallumaj ol iam ajn. La ruĝo kaj grizo kunfandiĝis tiel, ke en iuj lokoj la ĉielo estis viola, en aliaj karmezina, dum plejparte ĝi estis vinbere purpuragriza. Iom pli poste, hela orkoloro aperis tra ruĝo, kaj ĉiuj tiuj koloroj lumiĝis. Subite fariĝis kristale klara. Poste la matenaj nuboj en la oriento fariĝis malhele rugxaj

kaj la ĉielo ĉe la zenito montriĝis blua. La ruĝaj nuboj estis trapenetritaj de oraj radioj, kiuj interplektiĝis en majestan, brilantan araneaĵon en la sudorienta ĉielo kun la nuboj kiel vefto, la radioj kiel varpo. La kampoj, arboj kaj sovaĝaj herboj ŝanĝiĝis de malhela verdo al hela smeraldkoloro. La branĉoj de antikvaj pinoj estis ruĝ-ore kolorigitaj, la flugiloj de flugantaj birdoj ore brilis. Ĉio ŝajnis ridetanta. Ŝjanngi volus ĝojekrii al la maro da ruĝa lumo, kvazaŭ li neniam vidus la sunon de kiam la soldatoj lin kaptis. Kun kapo klinita, koro plena de blasfemoj, tiam li estis ĉiam forgesinta la sunon, la lunon kaj la ĉielon. Nun li estis libere marŝanta laŭ la vojo, kiu fariĝis des pli luma, ju pli antaŭen li marŝis. La suno faris la rosoperlojn sur la herboj ore brilantaj, prilumis liajn brovojn kaj harojn, kaj varmigis lian koron. Li forgesis ĉiujn siajn suferojn, ĉiujn danĝerojn kaj dolorojn. Kiel ajn ĉifona kaj malpura li estis, la varmo kaj la lumo de la suno ne esceptis lin, kaj li estis vivanta en mondo de lumo kaj varmo. Li estis tiel feliĉa, ke li volus ekkrii pro ĝojego.

Refoje rigardinte siajn cifonajn vestojn kaj la tri harsanĝantajn kamelojn, li ekridis. Kiel strange estas, li penisi, ke eĉ kvar tiaj mizeraspektaj kreaĵoj povis sukcese eskapi el la danĝero kaj nun povas marŝi sur tiu ĉi vojo renkonte al la suno. Ne necesas prijuĝi, kiu estas justa kaj kiu maljusta; laŭ li ĉio okazas laŭ la volo de la Ĉielo. Trankviliĝinte, li daŭrigis malrapide sian vojon. Se nur la Ĉielo lin protektas, li bezonas timi nenion. Kie li nun estas? Pri tio li jam ne volis demandi iun, kvankam kamparanoj jam laboris sur la kampoj. Plej bone estas, ke li daŭrigu la vojon, kaj eĉ se li ne povos tuj forvendi la kamelojn, tio ne multe gravas. La vendo povas prokrastiĝi ĝis tiam, kiam li revenos en la urbon. Ho, kiel li sopiras denove vidi Bejping! Kvankam li ne havas familion nek propraĵojn tie, tamen ĝi ja estas lia hejmo. La tuta urbo estas lia hejmo, kaj reveninte tien li povos tuj trovi iajn rimedojn

En la malproksimeco estis vilago, vilaĝo sufiĉe granda. La salikoj ekster ĝi estis kiel vico da altaj gardistoj, kaj volvaĵoj de kuirfumo ŝvebis super la malaltaj dometoj. De malproksime aŭdiĝis hundaj bojoj, kiuj sonis al li tre oreplaĉe. Li direktis sin rekte al la vilaĝo, ne esperante trovi ian bonŝancon tie, sed nur por montri, ke li timas nenion. li estis homo honesta kaj nature li ne bezonis timi la bonajn vilaĝanojn. Ĉu ili ĉiuj ne estas sin banantaj en la sama paca sunlumo? Li intencis peti de iu iom da trinkakvo, sed, se li ne sukcesos, ankaŭ tio ne gravas. Kion do signifas ioma soifo por li, kiu jam eskapis de la morto en la montoj?

En la vilaĝo li ne donis atenton al la bojado de hundoj kontraŭ li, sed la fiksa rigardo de virinoj kaj infanoj lin ĝenis. Li certe estas tre strangaspekta

kamelisto, li pensis. Se ne, kial oni tiel gapas al li? Tio multe ĉagrenis lin. Antaŭe la soldatoj traktis lin kiel koton, nun la vilaĝanoj tiel rigardadas lin, kvazaŭ li estus monstro. Kion li povis fari kun tio? Antaŭe li ĉiam fieris pri siaj staturo kaj forto, sed dum la lastaj tagoj li pro nenia kaŭzo estis maljuste kaj ofende mistraktita. Direktante siajn okulojn super la tegmenton de iu domo, li ree ekvidis la helan sunon, sed ĝi ial ŝaŭnis malpli ĉarma ol antaŭ momento.

La vilaĝo havis nur unu ĉefstraton, sur kiu troviĝis tie kaj tie flakoj da porka kaj ĉevala urino kaj malpura akvo, kiuj spiris odoraĉon. Timante, ke la kameloj glitfalos, Ŝjangzi decidis iom ripozi. Ĉe la norda flanko de la strato staris domo de relative bonhava vilaĝano. Ĝi estis tegoltegmenta domo sen vera pordego kaj portalo; antaŭe de ĝi estis nur unu lignobarilo. En la kapo de Ŝjangzi trafulmis la penso: tegola tegmento signifas riĉulon, dum lignobarilo signifas, ke la mastro de la domo estas kamelposedanto. Nu, bone, li ripozu ĉi tie kalkan tempon kaj eble li trovos bonŝancon por forvendi la kamelojn.

“She, she, she!” li ordonis la kamelojn genuiĝi. Tio estis la sola kamelvoko, kiun li sciis, kaj li fiere uzis ĝin por montri, ke li estas vera kamelisto. La kameloj efektive genuiĝis, kaj li sidiĝis triumfiene sub malgranda saliko. Ĉiuj fiksrigardis lin kaj li alrigardis ĉiun, sciante, ke nur tiamaniere li povas mildigi ilian suspekton.

Baldaŭ poste iu maljunulo venis el la korto. Li portis bluan kotonan jakon nebulonumitan kaj lia vizaĝo brilis. Oni povis certiĝi ĉe la unua ekvido, ke li estas homo bonhava. Ŝjangzi faris rapidan decidon.

“Ĉu vi havas akvon, sinjoro? Mi deziras iom trinki.” “Ah!” La maljunulo, forfratante la koton de sia brusto, ĵetis ekzamenan rigardon al Ŝjangzi, poste atente pririgardis la tri kamelojn. “Estas akvo. De kie vi venis?”

“Ĉe okcidente.” Ŝjangzi ne kuraĝis diri precize, ĉar li ankoraŭ ne estis certa, kie li estas.

“Ĉu tie estas soldatoj?”

“Mi estis kaptita de ili, sed ĵus forkuris ĉi tien.”

“Ah! Ĉu jam ne estas danĝero al kameloj ekster la okcidenta pasejo?”

“La soldatoj jam ĉiuj iris sur la montojn. La vojo nun estas sendanĝera.”

“Nu!” La maljunulo malrapide balancis la kapon. “Atendu momenton, mi donos al vi trinki”

Ŝjangzi sekvis lin en la korton, kie li vidis kvar kamelojn.

“Kial vi ne restigas ĉe vi miajn tri, por fari unu karavanon?”

“Ba! Unu karavanon” antaŭ tridek jaroj mi havis tri tiajn. Sed la tempo aliiĝis. Kiu povus havi la rimedojn por bredi kamelojn?!” li staris, fiksan-

vakan rigardon al la kvar bestoj. Post iom da tempo li daŭrigis: “Kelkajn tagojn antaŭe mi intencis, kune kun najbaro, konduki ilin ekster la pasejon, por ilin paŝti tie. Sed estas soldatoj jen oriente jen okcidente, kiu kuraĝus iri tien? Vidante ilin entenataj ĉi tie en la korto dum la somero, mi afliktiĝas multe afliktiĝas. Jen rigardu tiujn muŝojn! Kaj kiam fariĝos pli varme, furiozos ankaŭ moskitoj. Estas terure vidi bonajn brutojn tiel suferi, vere terure!” Li ripetade balancis la kapon, kvazaŭ li havus multon por diri kaj plendi.

“Restigu ĉe vi miajn tri, sinjoro, kaj paŝtu ilin ĉiujn kune tie ekster la pasejo.” Ŝjangzi preskaŭ petegis. “Eĉ plej vivenergiaj animaloj, se ili pasigos la someron ĉi tie, estos duone mortigitaj de muŝoj kaj moskitoj.”

“Sed kiu havus la monon por aĉeti ilin, en tiaj jaroj, kia la nuna, kiu povus havi la rimedojn, por bredi kamelojn?”

“Volu restigu ilin ĉe vi, je ia ajn prezo. Ilin forvendinte, mi povos reiri en la urbon kaj perlabori vivrimedojn.”

La maljunulo denove esplore rigardis Ŝjangzi. Ŝajnis al li, ke tiu ĉi junulo ne estas bandito. Poste li reregardis la tri kamelojn ekster la korto, kiuj vere plaĉis al li, kvankam li bone sciis, ke aĉeti ilin ne alportos al li profiton. Sed, same kiel libroamanto deziras aĉeti ĉiun libron, kiun li vidas, kaj kiel ĉevalbredisto, vidante bonajn ĉevalojn, ilin ekamas kaj sopiras aĉeti, tiel la homo, kiu iam havis tri karavanojn da kameloj, ĉiam avidas pli multajn. Cetere, Ŝjangzi diris, ke li volas ilin vendi je malalta prezo. Kiam spertulo havas okazon por aĉeti ion je pli malalta prezo, li inklinas forgesi, cu ĝi servos aŭ ne al ia ajn celo.

“Knabo, se mi havus kontantan monon sufiĉan, mi vere volus ilin aĉeti!” la maljunulo diris el sia koro.

“Prenu ilin, malgraŭe, kaj pagu kiom vi volas!” Ŝjangzi petegis tiel serioze, ke la maljunulo iom embarasiĝis.

“Por diri la veron, knabo, antaŭ tridek jaroj tiuj ĉi tri kameloj ja kostis tri grandajn ĵuanbaŭojn. Sed en tiu ĉi malfacila tempo, kun malordo kaj milito tie kaj tie, mi... Nu, pli bone provu ilin vendi aliloke!”

“Pagu kiom vi volas!” Ŝjangzi povis trovi nenion alian por diri. Li sciis, ke la maljunulo diris la veron, tamen li ne volis provi vendi la kamelojn tie aŭ aliloke. – Se li ne sukcesos ilin forvendi, li eble falos en ian alian malagrablaĵon.

“Nu, jen vidu, mi hontas proponi al vi nur dudek ĝis tridek ĵuanojn, sed eĉ tia sumo estas vere tro granda, ke mi ĝin pagu al vi. En la nunaj jaroj ĉiu ja vivas en malfacila situacio.”

La koro de Ŝjangzi eksentis malvarmon. Dudek ĝis tridek jŭanoj? La sumo ja estis tre malproksima de la prezo de rikiŝo. Sed li volis pli rapide fini la negocon, kaj cetere, li ne kredis, ke li povos havi la bonŝancon trovi alian aĉetanton por la kameloj.

“Pagu al mi kiom vi povas, sinjoro!”

“Kio estas vaia okupo, knabo? Evidente vi ne estas kamelpelisto.”

Ŝjangzi diris al li la veron.

“Ho, ja vi riskis vian vivon, por akiri tiujn ĉi brutojn!” la maljunulo simpatiis kun li kaj trankviliĝis, certiĝinte, ke la kameloj ne estas ŝtelaĵo. Kvankam tio ne multe diferencis la ŝtelado, tamen en efektiveco ja estis la soldatoj inter li kaj la antaŭa posedanto de la kameloj. En tempo de milito oni ne povis juĝi la aferojn laŭ ordinaraj normoj.

“Nu do, amiko, mi donu al vi tridek kvin jŭanojn. Se mi dirus, ke tio ne estas modera prezo, mi estu hundo. Kaj se mi povas pagi je unu jŭano pli, mi ankaŭ estu hundo. Mi havas jam pli ol sesdek jarojn, do, kion pli mi diru?”

Ŝjangzi hezitis. Koncerne la monon, li ĉiam estis avara. Sed la sincera kaj amika parolo de la maljunulo, kiun li aŭdis post kiam li travivis tiujn tagojn kun la soldatoj, igis lin honti plu marĉandi kun la maljunulo. Cetere, tridek kvin jŭanoj en la mano estas pli fidindaj ol esperataj dek mil, kvankam la sumo estas tro malgranda por lia vivriskado. Tri kameloj, vivaj kaj vivoplenaj, sendube valoras multe pli ol tridek kvin jŭanojn. Sed kion li povus fari?

“Nu, la kameloj estu viaj, sinojro. Nur faru al mi alian favoron, mi petas. Donu al mi ĉemizon kaj ion por manĝi.”

“Konsentite!”

Ŝjangzi satrinkis malvarman akvon. Poste preninte siajn tridek kvin brilajn arĝentajn monerojn kaj du maizkukojn kaj surmetinte ĉifonan blankan jakon, kiu apenaŭ kovris lian bruston, li ekiris tiel haste, kvazaŭ li volus tuj atingi la urbon per unu salto.

IV

Ŝjangzi kuŝis malsana tri tagojn en iu malgranda gastejo en Hajdjan, je brulante de febro, jen tremante de malvarmo, kun kapo nebuleca. Purpuraj veziketoj aperis sur liaj dentokarnoĵoj. Li suferis soifonj kaj havis nenian apetiton. Post tritaga fastado la febro cedis, sed li sentis sin terure malforta. Probable dum tiu tempo oni sciigis de liaj deliraj paroloj pri la historio de la tri kameloj, kaj tial, post kiam li finfine revenis plene al la konscio, oni jam nomis lin “Kamelo Ŝjangzi.”

De kiam li venis en la urbon, li ĉiam estis nomata nur “Ŝjangzi”, kvazaŭ li neniam havus familian nomon. Nun kun “Kamelo” alkroĉita la “Ŝjangzi”, oni donis eĉ malpli da atento al lia familia nomo. Antaŭe li neniam zorgis pri sia nomo, sed nun kun bedaŭro li sentis, ke li faris malbonan negocon, akirante tiom malmulte por tiuj kameloj kaj tamen ricevante la moknomon.

Tuj kiam li povis nur stari, li decidis eliri por promeni, sed li ne atendis, ke liaj kruroj estos tiom tro malfrotaj por obei al li, kaj apenaŭ li atingis la pordon de la gastejo, li jam falsidiĝis teren. Li sidis tie duonsvene longan tempon, kun la frunto kovrita de malvarma ŝvito. Li tion sltenis. Poste li malfermis la okulojn kaj aŭdis sian stomakon murmuri. Li sentis sin iom malsata. Longe peninte li stariĝis kaj malrapide iris al iu kolportisto vendanta huntunojn. Lia aĉetis bovlon da ili kaj ree sidiĝis sur la tero. Lia unua sorbo de huntunsupo kaŭzis al li vomemon kaj li tenis la kokaĵon en la buŝo kelkatempe, ĝis fine li sindevige ĝin englutis. Li ne plu deziris trinki. Kaj tamen, iom poste, li sentis, ke la varma supo iras kaj iras malsupren kaj eniĝas en la stomakon. Li laŭte ruktis du fojojn, kaj tio certigis lin, ke li povas pluvivi.

Kun iom da nutraĵo en la stomako, li donis pririgardon al si mem. Li estis multe pli maldika kaj lia ĉifona pantalono jam estis tiel malpura kiel eble. Li malemis sin movi, kaj tamen li devis tuj reakiri sian antaŭan elegantecon, ĉar li ne volis kun tia mizera aspekto eniri en la urbon. Sed tio signifis elspezi monon. Razo, ŝanĝo de vestoj kaj aĉeto de novaj ŝuoj kaj ŝtrumpetoj ĉiuj postulis pagon, sed li devis tuŝi neniun el la tridek kvin jŭanoj, ĉar tiu ĉi sumo, eĉ netuŝita, estis multe nesufiĉa por aĉeti rikiŝon. Sed li eksentis kompaton al si. Kvankam li pasigis ne multajn tagojn kun la soldatoj, tamen tio ŝajnis inkubsonĝo, inkubsonĝo, kiu konsiderinde maljunigis lin, kvazaŭ subite al lia aĝo jam aldoniĝus pluraj jaroj. Liaj grandaj manoj kaj piedoj evidente estis liaj propraj, tamen ili ŝajnis kvazaŭ subite trovitaj ialoke. Li sentis sin tre afliktita kaj ne

kuraĝis revoki en la memoron siajn pasintajn suferojn kaj danĝerojn, kvankam ĉiam konsciante ilin, same kiel dum pluva petriodo oni scias, eĉ sen rigardo al la ĉielo, ke estas griza tago. Lia korpo ŝajnis al li aparte kara, kaj li ne devis plu esti tiel kruela al ĝi. Li stariĝis. Kvankam li sciis, ke li estas ankoraŭ tre malforta, tamen li devis ne plu perdi la tempon kaj tuj iri sin bonaspektigi, kvazaŭ nur kun kapo razita kaj en vesto nova li certe povus tuj reakiri sian forton.

Ĉio, kio servis por lia bonaspektigo, kostis nur du jŭanojn du ĝjaŭojn. Unu jako kaj unu pantalono el maldelikata, tre maldensa kotonŝtofo netinkturita kostis unu jŭanon, nigraj tolŝuoj ok ĝjaŭojn, maldelikataj ŝtrumpetoj unu ĝjaŭon kvin fenojn, kaj unu pajloĉapelo du ĝjaŭojn kvin fenojn. Siajn ĉifonaj vestojn li interŝanĝis por du pkoj da alumetoj.

Prezinte la alumetojn, li ekiris laŭ la vojo al la pordego Ŝjiĝimen. Apenaŭ li iris kelkan distancon, li jam sentis laciĝon kaj malfrotiĝon, sed, kunpremante siajn dentojn, li sin tenis persiste. Li ne devis preni rikiŝon; kiel ajn estis, tio estis por li neimagebla. Por kamparano, ĉu ok aŭ dek lioj povus esti kalkulataj kiel ia distanco konsiderinda? Kaj li mem ja estis rikiŝisto. Cetere, estus ridinde, se homo, granda kaj fortika kiel li, estus veninta de tia malsaneto. Eĉ se li falus kaj ne povus restariĝi sur siaj piedoj, li preferus alruliĝi tra la vojo al la urbo, ol rezigni penadon. Se hodiaŭ li ne povus atingi la urbon, tiuokaze ja estus lia finiĝo. La sola, kion li fidis, estis lia propra forto, tute egale, kian ajn malsanon li havis.

Ŝanceliĝante li iradis antaŭen. Apenaŭ li iris kelkan distancon for de Hajdijan, li jam ekhavis stelojn antaŭ la okuloj. Li apogis sin al saliko por rekolekti siajn fortojn kaj, kvankam la ĉielo kaj la tero ŝajnis furioze turnigxadi ĉirkaŭ li, tamen li rifuzis sidiĝi por ripozi, kiam lia kapturino iom post iom kvietiĝis, lia koro kvazaŭ refalus de granda alteco en lian bruston kaj, devisinte la ŝviton de la frunto, li daŭrigis sian vojon. Lia kapo estis razita, liaj vestoj kaj ŝuoj estis novaj; li pensis, ke li jam faris sufiĉon por si mem, tial nun por liaj kruroj venis la vico plenumi sian devon: marŝi!

Sen refoja halto li marŝis ĝis antaŭ la pordego Ŝjangzi. La svarmado de tieaj homoj kaj ĉevaloj, la tumulto bruo, la odoraĉo de la tera polvo tiel mola sub liaj piedoj, ĉiuj estis tiel karaj al li, ke li volus kliniĝi kaj kisi la malpuran kaj malbonodoran teron, la teron, kiun li amis, kiu estis lia fonto de mono. Li ne havis gepatrojn, ne fratojn; la ununura amiko lia estis tiu ĉi antikva urbo. Ĝi jam donis al li ĉion, tial eĉ se li suferus malsaton ĉi tie, ĝi estis por li pli aminda ol la kamparo. Ĉi tie estis aferoj por vidi kaj aferoj por aŭdi, kaj estis lumo kaj

sono ĉie. Se li nur energie laboris, ĉi tie estis mono nekalkulebla, kaj ankaŭ senfinaj bonaj aĝoj, pli multaj ol kom li povis konsumi. Ĉi tie eĉ almozetantoj povis ricevi viandan supon, dum en la kamparo estis nenio alia krom maizfaruno. Kaj atinginte la okcidentan flankon de la ponto Gaŭljangĉjaŭ, li sidiĝis sur la bordo kaj verŝis kelkajn larmojn de ĝojo.

La suno jam kuŝis sur la okcidenta horizonto. Sur la riveraj bordoj, maljunaj salikoj kurbe kreskis, kun suproj kliniĝantaj en ora lumo. En la rivero estis malmulte da akvo, sed abundo da akvaj herboj donis al ĝi aspekton de longa grizverda zono, mallarĝa kaj malhela, elspiranta malfortan humidan odoraĉon. La tritiko sur la norda bordo jam spikiĝis, kaj la folioj sur iliaj mallongaj sekaj tigoj estis kovritaj de polvo. Sude de la rivero, en la lotuslageto, malpeze naĝis etaj, freŝverdaj folioj, ĉirkaŭ kiuj de tempo al tempo aperadis malgrandaj veziketoj. Oriente, sur la ponto, cirkulis homoj kaj veturiloj. Vidate en la oblikvaj sunradioj, ili ŝajnis aparte hastemaj, kvazaŭ ili ĉiuj sentus ian maltrankvilon, konsciante la proksimiĝon de la vesperkrepusko. Sed en la okuloj de Ŝjangzi ĉio ĉi tio estis tre ĉarma. Por li tiu ĉi rivero kaj tiuj ĉi arboj, lotusoj, tritiko kaj ponto estis la solaj, kiuj meritis sian nomon, ĉar ili ĉiuj apartenis al Bejping.

Li sidis tie trankvile, libera de hastemo foriri. Ĉio ĉirkaŭ li estis tiom konata, tiom kara, ke li volonte sidus tie ĝis la morto, satigante siajn okulojn je la vidado.

Ripozinte tie longan tempon, li iris manĝi bovlon da delikata toŭfuo ĉe la kapo de la ponto. La vinjagro, sojsaŭco, paprikoleo kaj haketitaj poreoj, miksite kun varmega blanka toŭfuo, odoris tre agrable. La ebriiga spica odoro tiklis lian nazon tiel forte, ke li preskaŭ perdis la spiron. Kun la bovlo en la manoj, li fiksas la okulojn sur la malhele verdajn poreajn pecetojn, kaj liaj manoj komencis tremadi. Li prenis plenbuŝon da varmega toŭfuo kaj ĝi malsupreniris tra lia gorĝo en la stomakon. Li servis al si ankoraŭ du malgrandajn kulerojn da paprikoleo. Post kiam li finmanĝis la toŭfuon, lia zono jam estis tramalsekiĝinta de ŝvito. Kun okuloj duonfemitaj li antaŭtenis la malplenan bovlon kaj petis ankoraŭ unu porcion.

Stariĝinte li sentis, ke li denove aspektas kiel homo. La suno estis ankoraŭ ĉe sia plej malalta loko en la okcidento, la nuboj purpurigitaj de la suno tinkturis la riveron rozkolora. Li dronis en ekstazo kaj volus ĝojkrii. Palpinte la glatan cikatron sur sia vizaĝo kaj la monon en sia poŝo, li refoje ĵetis rigardon al la sunlumo sur la gvatturo. Li forgesis sian malsanon, forgesis ĉion alian. Puŝate kvazaŭ de ia dezirego, li decidis enpaŝi en la urbon. La enirejo de la urba

pordego estis plenplena de diversspecaj veturiloj kaj pasantoj, el kiuj ĉiu estis en hastemo trairi la pordegon, kvankam neniu kuraĝis moviĝi tro rapide. La krakado de vipoj, la krioj, la insultoj, la sonoj de kornoj, la tintado de sonoriletoj kaj la laŭtaj ridadoj intermiksiĝis kaj fariĝis konfuza bruego, kvazaŭ la pordega enirejo estus megafono kun ĉiu individuo en ĝi voĉbruanta. Ŝjangzi boris sian vojon tra la moviĝanta homamaso, trovante lokon por siaj grandaj piedoj jen ĉi tie, jen tie, kvazaŭ longa, maldika fiŝo gaje naĝanta laŭ la ruliĝantaj ondoj, ĝis fine li enpuŝiĝis en la urbon. Antaŭ li etendiĝis la bulvardo tiel larĝa kaj rekta, ke li jam povis vidi Ŝingjekoŭ ĉe la ekstremo. Ekvidinte ĝin, liaj okuloj brilis tiel hele, kiel la reflektita lumo sur la orientaj tegmentoj. Kaj li kontente balancis la kapon al si mem.

Lia litaĵo ankoraŭ estis en Rikiŝejo Harmonio ĉe la strato Ŝjianmendaĝje, kaj nature li direktis sin tien. Ne havante sian familion, li ĉiam loĝis en la rikiŝejo, kvankam li ne ĉiam luis ĝian rikiŝon por tiri.

La posedanto de la rikiŝejo, Kvara Sinjoro Liŭ, estis jam preskaŭ sepdekjara, tamen li ankoraŭ havis friponan koron. En sia juneco li iam estis gardisto de milita provizejo, funkciigis hazardludejon, faris sklavonegocon kaj praktikis uzuron li havis ĉiajn kvalifikojn por tiuj ĉi okupoj: forto, sagaco, artifikeco, sociaj rilatoj kaj ia reputacio. Antaŭ la falo de Ĉing-dinastio li partoprenis en amasbatalo, forrabis virinojn de bonaj familioj, kaj pro tio li iam estis submetita al torturo. Torturate, li ne kuntirus la brovojn, nek petis kompaton, kaj per tio li gajnis al si la reputacion de firma eltenemo al kruela provo.

Li eliris el la malliberejo ĝuste tiam, kiam fondiĝis la respubliko. Tiutempe la forto de la polico estis kreskanta, kaj Kvara Sinjoro Liŭ vidis, ke neniu povas plu montris sin kiel lokan heroon, kaj ke eĉ se Bravulo Huang Tjanbo reviviĝus, li apenaŭ povus trovi okazon por montri sian heroecon, kaj tial li komencis sin okupi pri rikiŝa negoco. Kiel homo mondsperta li sciis kiel trakti malriĉulojn – kiam esti severa al ili kaj kiam kiomete mildigi la premon. Kaj li havis brilan talenton por organizado. Neniu el la rikiŝistoj kuraĝis ruzi kontraŭ li. Ekridante al ili kaj tuj poste rondigante la okulojn, li povis fari ilin komplete konfuzitaj, kvazaŭ ili jam havus unu piedon en la paradizo kaj unu en la infero. Tial ili vole nevole lasis sin manipuli de li.

Nun li jam havis pli ol sesdek rikiŝojn, el kiuj eĉ la malplej bonaj estis almenaŭ sepdek-procente novaj, ĉar li ne konservis kadukajn rikiŝojn. La lupago, kiun li postulis, estis pli alta ol aliloke. Sed ĉe la tri festoj de ĉiu jaro li lasis du pluajn tagojn sen lupago ol la aliaj rikiŝoluigantoj. Lia rikiŝejo havis

loĝejon, kie needziĝintaj rikiŝistoj povis loĝi senpage, kondiĉe ke ili regule pagu la rikiŝan lupagon. Se iu ne povis pagi kaj volis ankoraŭ resti tie, la mastro retenis lian litaĵon kaj forĵetis lin kiel rompitan terpoton. Kaj tamen se iu ajn havis ian urĝan aferon aŭ ian subitan malsanon, sciigite pri tio, Liŭ neniam hazitis trairi fajron kaj akvon por helpi lin. Tio estis alia maniero, per kiu li akiris sian reputacion.

Kvara Sinjoro Liŭ havis aspekton de tigro. Kvankam preskaŭ sepdekjara, li havis dorson rektan kaj kalkulis dek aŭ dudek liojn da marŝado kiel nenion. kun siaj grandaj rondaj okuloj, granda nazo, kvadrata mentono kaj elstaraj kojnodentoj, kiuj aspektis kiel tigro precipe tiam, kiam li malfermis la buŝon. altkreska kiel Ŝjangzi, li razigis sian kapon ĝis brileco kaj ne havis barbon, nek lipharojn. Li fieris rigardi sin kiel tigron kaj bedaŭris nur, ke li havas neniun filon, sed nur “tigran” filinon en la aĝo de tridek-sep aŭ ok jaroj. Ĉiu, kiu konis Kvaran Sinjoron Liŭ, certe konis ankaŭ lian filinon, Huniŭ (tigreca knabino). Ankaŭ ŝi havis tigran aspekton, kiu fortimigis de ŝi virojn, kaj tial, kvankam ŝi estis lerta helpanto por sia patro, tamen neniu kuraĝis peti ŝian manon. Ĉio en ŝi estis vireska, eĉ ŝiaj insultoj havis viran econ kaj iafoje ankaŭ kun iom da ŝia aldona krudeco. Kun Kvara Sinjoro Liŭ prizorganta la eksterajn aferojn kaj Huniŭ la internajn, Rikiŝejo Harmonio estis plej efike funkciigata. Ĝia prestiĝo estis tiel alta en la rondoj de la rikiŝistoj, ke la metodoj de Liŭ-familio estis ofte menciataj kiel de rikiŝotirantoj, tiel ankaŭ de rikiŝoposedantoj, same kiel instruituloj citas el la klasikaj libroj por subteni sian argumenton. Ŝjangzi iam luis rikiŝon el Rikiŝejo Harmoinio, antaŭ ol li havis sian propran. Tiam li deponis sian ŝparitan monon ĉe Kvara Sinjoro Liŭ kaj, kiam la sumo fariĝis sufiĉa, li reprenis ĝin kaj aĉetis tiun novan rikiŝon.

“Kvara Sinjoro, rigardu mian rikiŝon!” Ŝjangzi tiris sian rikiŝon en la rikiŝejon.

La maljunulo ĵetis rigardon al ĝi kaj balancis la kapon. “Vere ne malbona!”

“Mi restos ĉi tie, ĝis mi trovos laŭmonatan laboron kaj trasloĝiĝos ĉe mian dunganto.” Ŝjangzi aldonis kun fiero.

“Bone.” La maljunulo ree balancis la kapon.

Kaj tial, kiam Ŝjangzi laboris kiel laŭmonata dungito, li loĝis ĉe sia dunganto; kaj kiam li perdis la laboron kaj sin okupis per tirado de okazaj pasaĝeroj, li do loĝis en Rikiŝejo Harmonio.

Ke iu povis loĝi en Rikiŝejo Harmonio ne luante ĝian rikiŝon, tio ŝajnis al la aliaj rikiŝistoj afero malofta. Tial iuj konjektis, ke Ŝjangzi estas parenco de la maljunulo Liŭ; aliaj asertis, ke Ŝjangzi ekplaĉis al la maljunulo kaj tiu intencas

edzigi lin al Huniŭ, dezirante teni lin kvazaŭ filon en sia hejmo. Estis iom da envio en tiu ĉi aserto, sed se vere tio okazos, tiam Rikiŝejo Harmonio certe apartenos al Ŝjangzi post la morto de la maljunulo. Do ili kuraĝis diri nenion ofendan al Ŝjangzi kaj nur faris eblajn konjektojn.

Fakte la favora traktado al Ŝjangzi fare de la maljunulo ja estis el alia motivo. Ŝjangzi estis tia persono, kiu, en novaj cirkonstancoj, ankoraŭ kroĉiĝis al siaj malnovaj kutimoj. Se li aliĝus al la armeo, li neniel povus ŝajni sin stulta por tirani popolanojn tuj kiam li surmetis la soldatan uniformon. En la rikiŝejo li neniam estis senokupa: ĉiam kiam li ĉesis ŝviti, li tuj trovis ion por fari – purigi la rikiŝojn, enpumpi aeron en pneŭmatikojn, sunumi kontraŭpluvajn kapuĉojn, lubriki la nabojn... bezonante nenies ordonon, li faris tiujn ĉi aferojn memvole, kiaj ankaŭ en bona humoro, kvazaŭ li farus al si bonegan amuzon. En la rikiŝejo ordinare loĝis ĉirkaŭ dudek rikiŝistoj. Post kiam ili ĉesisgis la laboron, ili pejofte sidadis babilante aŭ enlitiĝis kaj dormi. Ŝjangzi estis la sola, kies manoj ĉiam faris ion. En la komenco ĉiu pensis, ke li penas plaĉi al Kvara Sinjoro Liŭ, por akiri ties favoron; sed post kelkaj tagoj ili konstatis, ke li tute ne havis ideon pri tio; li estis tiel naiva kaj sincera, kaj ili havis nenion por diri.

La maljunulo Liŭ neniam donis al Ŝjangzi laŭdan vorton, nek ĵetis al li eĉ unu plian rigardon; sed en sia kapo li ja havis siajn proprajn konsiderojn. Sciante, ke Ŝjangzi estas bona laboremulo, li volonte permesis lin plu loĝi en la rikiŝejo, kvankam tiu jam ne luis lian rikiŝon. Kun Ŝjangzi tie, la korto kaj la enirejo estas ĉiam balaitaj tiel puraj kiel eble, por ne paroli pri io ajn alia.

Koncerne Huniŭ, al ŝi eĉ pli plaĉis tiu ĉi altstatura kampulo. Kion ajn ŝi diris, li atente aŭskultis kaj neniam kontraŭparolis. La aliaj rikiŝistoj, multe turmentataj de suferoj, kutime parolis en kruda maniero. Ŝi neniom timis ilin. Sed ŝi ankaŭ ne volis doni al ili multan atenton, rezervantae ĉion, kion ŝi devus diri, por Ŝjangzi. Ĉiufoje, kiam li trovis laŭmonatan laboron, la patro kaj lia filino ekhavis la senton, kvazaŭ ili perdis amikon. Kiam ajn li revenis, eĉ la insultoj de la maljunulo ŝajne fariĝis malpli krudaj.

Nun Ŝjangzi venis en rikiŝejon Harmonio, kun siaj du pakoj da alumetoj en la manoj. Ankoraŭ en mallumiĝis. Kvara Sinjoro Liŭ kaj lia filino vespermanĝis. Ekvidinte, ke li envenas, Huniŭ demetis siajn manĝbastonetojn.

“Ha, Ŝjangzi!” ŝi ekkriis. “Ĉu lupu forrabis vin aŭ vi forveturis al Afriko por elfosi oron?”

“Hm!” Ŝjangzi eldiris nenion.

La maljunulo kuirigis siajn grandajn okulojn sur lia korpo de supre

malsupren kaj inverse, sed silentis.

Ankoraŭ portante sian novan pajlĉapelon, Ŝjangzi sidiĝis kontraŭ ili.

“Se vi ankoraŭ ne manĝis, manĝu kun ni.” Huniŭ kondukis al li kvazaŭ bonvenigante intiman amikon.

Ŝjangzi ankoraŭ sidis tie, kaj subite sentis iom da nedirebla varmeco. Li ĉiam rigardis Rikiŝejon Harmonio kiel sian hejmon. Laborante kiel rikiŝisto laŭmonate dungita, li ofte ŝanĝis mastrojn, kaj kiam li sin okupis je tirado de okazaj pasaĝeroj sur la stratoj, la klientoj neniam estis la samaj. Nur ĉi tie oni ĉiam permesis al li loĝi kaj li ĉiam havis kunbabilantojn. Kaj nun, ĵus sin forsavinte, li revenis al siaj konatoj kaj ili eĉ invitis lin kune manĝi. Tio preskaŭ instigis lin suspekti, ke ili intencas lin prifriponi, kaj tamen samtempe li ankaŭ sentis la emon eklkarmi.

“Mi ĵus manĝis du bovlojn da delikata toŭfuo,” li diris kun ĝentileco.

“Kie vi estis?” La grandaj rondaj okuloj de Kvara Sinjoro Liŭ ankoraŭ fiksiĝis sur li. “Kie estas via rikiŝo?”

“Rikiŝo?” Ŝjangzi ekkraĉis pro kolero.

“Venu kaj manĝu! La manĝaĵo ne venenos vin! Ĉu du bovloj da delikata toŭfuo povus vin satigi?!” Huniŭ ektiris lin al la tablo, kvazaŭ ŝi estus lia amema pliaĝa bofratino.

Antaŭ ol levi la bovlon, Ŝjangzi elpoŝigis sian monon. “Kvara Sinjoro, unue gardu por mi ĉi tiujn tridek jŭanojn.” Li retenis la restajn monerojn kaj reŝovis ilin en sian poŝon.

Kvara Sinjoro Liŭ levis la brovojn kaj demandis pli per ili ol per vortoj: “De kie venis tiu ĉi mono?”

Manĝante Ŝjangzi rakontis al ili sian tutan aventuron.

“Hm, vi malsaĝa knabo!” Aŭdinte tion, la maljunulo skuis sian kapon. “Se vi alkondukus tiujn kamelojn en la urbon kaj vendus ilin al buĉisto, vi ricevus almenaŭ dek kvin jŭanojn por ĉiu kapo. En vintro, kiam iliaj haroj estos plene reelkreskintaj, tri kameloj povus gajniĝi al vi entute sesdek jŭanojn!”

Antaŭe Ŝjangzi jam sentis ioman bedaŭron kaj nun, aŭdinte tion ĉi, li eĉ pli ĉagreniĝis. Sed, post ioma pripenso li venis al la konkludo, ke estus peko vendi tiujn vivantajn bestojn al buĉisto. Li kaj la kameloj kune eskapis, ili havis egalan rajton pluvi. Kaj li diris nenion, sed sentis faciliĝon en la animo.

Dum Huniŭx prilevis la tablon, Kvara Sinjoro Liŭ ĵetis la kapon posten kvazaŭ por ion pripensi. Subite li ekridetis, montrante la du elstarajn kojnodentojn, kiuj ŝajnis kreski pli fortikaj kun la aĝo. “Do vi malsaniĝis en Hajdĵian, he? Kial vi ne rekte revenis per la Huzangcun-ĉefvojo, vi

malsaĝulo?”

“Mi prenis la pli longan vojon, kiu kuras preter la okcidentaj Montoj, ĉar mi timis, ke oni kaptus min sur la ĉefvojo. Pensu nur, ke iuj timis, ke iuj ja povus preni min por dizertinto”

Kvra Sinjoro Liŭ ekridetis kaj iom movis la okulglobojn. Li timis, ke Ŝjangzi mensogas kaj ke la tridek jŭanoj eble estas rabaĵo, tiuokaze li ne volus ĝin gardi por alia. En sia juneco li rompis preskaŭ ĉiun leĝon tiaman, sed nun ĉar li pretendis, ke li jam revenis sur la virtan vojon, li devis esti singarda, kaj li ankaŭ bone sciis kiel esti tia. En la rakontado de Ŝjangzi estis nur tiu ĉi suspektindaĵo, sed Ŝjangzi klarigis ĝin tute ne konfuzite, kaj la maljunulo trankviliĝis.

“Kion do vi volas fari kun ĝi?” Li demandis, montrante la monon per la fingro.

“Ion ajn, kion vi konsilas.”

“Aĉetu alian rikiŝon?” La maljunulo ree nudigis siajn elstrajn kojnodentojn, kvazaŭ por diri: “Ĉu vi intencas ankoraŭ senpage loĝi ĉi tie kun via propra rikiŝo?”

“La sumo ne sufiĉas. Se mi aĉetos rikiŝon, ĝi devos esti nova.” Ŝjangzi tiel dronis en siajn pensoj, ke li ne rimarkis tiujn kojnodentojn.

“Ĉu vi volas prunton? Kun interezo de dek procentoj. Por alia, dudek kvin!”

Ŝjangzi ne skuis la kapon.

“Pli bone estus pagi al mi dek procentojn ol fari la aĉeton per partopagoj al la rikiŝobutiko.”

“Mi ankaŭ ne faros popartopagan aĉeton,” diris Ŝjangzi kvazaŭ en tranco. “Mi ŝparos iom post iom. Kiam mi havos sufiĉe, mi kontante aĉetos.”

La maljunulo rigardis lin kvazaŭ iun strangan ĉifron, kiu, kvankam malplaĉa, ne povis lin kolerigi. Poste li levis la monon. “Tridek jŭanoj”. Ĉu precize?”

“Precize!” Ŝjangzi stariĝis. “Nun mi deziras iri dormi. Jen, mi donacas al vi pakon da alumetoj.” Li metis unu pakon sur la tablon, poste staris tie kun stulta mieno. “Ne rakontu al la aliaj pri la kameloj!” li diris.

Notoj:

1. Vd. noton 6 de ĉapitro II.
2. Ĉing-dinastio (1644-1911): La lasta imperiestra dinastio en la ĉina historio.

3. respubliko: Temas pri la Respubliko de Ĉinio fondita en 1912.
4. Bravulo Huang Tjanba: Ĉina legenda heroo.
5. tri festoj: La tri ĉefaj tradiciaj festoj en Ĉinio estas: la Printempa Festo (la novjara tago), la Drakboata Festo kaj la Aŭtunmeza Festo, kiuj okazas respektive en la unua de la unua monato, la kvina de la kvina monato kaj la dekkvina de la oka monato laŭ la luna kalendaro.
6. manĝbastonetoj: dum manĝado ĉinoj kutimas uzi ne forkon kaj tranĉilon, sed paronj da bastonetoj por preni manĝaĵojn kaj ilin enbuŝigi

V

Kvankam Kvara Sinjoro Liŭ ne diris eĉ unu vorton pri tiu travivaĵo de Ŝjangzi, tamen la historio pri kameloj tre rapide disvastiĝis de Hajdjan en la urbon. Antaŭe oni povis trovi nenian kulpon en Ŝjangzi, nur lia obstineco sentigis al ili, ke li estas diferenca de ili kaj iom malfacile traktebla. Tamen, post kiam lia moknomo “Kamelo” fariĝis vaste konata, ilia sintenado al li ŝanĝiĝis, kvankam Ŝjangzi ankoraŭ restis silentema kaj malsocietema. La ĝenerala opinio estis, ke li akiris multe da mono per ia nehonesta rimedo. Estis diversaj onidiroj pri lia riĉiĝo: iuj diris, ke li trovis oran brakhorloĝon; aliaj asertis, ke li ricevis por nenio trident ĵuanojn; ankoraŭ aliaj, kiuj kredis sin plej bone informitaj, deklaris balancante la kapon, ke li alkondukis tridek kamelojn de la Okcidentaj Montoj.

Kiel ajn nepopolaraj iu povas esti ĉe siaj kunuloj, se li akiri multe da mono eĉ per malhonesta rimedo – oni ĉiam traktas lin kun respekto. Estas vere, ke por homoj vendi siajn fortojn por la vivopano ja ne estas afero facila, kaj pro tio ĉiu esperas monon nehonestan; kaj ĉar tia mono estas tiom malofte trovebla, homo kun la bonŝanco ricevi iom da mono neatendita devas esti kaulkulata kiel sorbofavorato, kiu distingiĝas de la homoj ordinaraj. Tial la silentemo kaj malsocietemo de Ŝjangzi subite fariĝis la deteniĝemo de granda persono; li devis esti tia homo, kaj estis tute nature, ke aliaj penis proksimiĝi al li.

“Nu do, Ŝjangzi, rakontu al ni! Rakontu, kiel vi riĉiĝis!”

Tiajn vortojn Ŝjangzi aŭdis ĉiutage, sed li restis silenta. Kiam ili tro forte bombardis lin per tia peto, la cikatro sur lia frunto iom ruĝiĝis kaj li eksplodis de kolero:

“Riĉiĝi? Mi? tiuokaze, pro diablo, kie do estas mia rikiŝo?”

Vere, kie estas lia rikiŝo? Tio ĵetis ĉiujn en pripenson. Sed estas ĉiam pli bone ĝoji pro ies feliĉo ol esti maltrankvila pro ies malfeliĉo; do ĉiuj forgesis lian rikiŝon kaj turnis siajn pensojn al lia fortuna. Pli poste, kiam ili vidis, ke li ankoraŭ tiradas rikiŝon, ne ŝanĝinte sian okupon, nek aĉetinte al si teron kaj domojn, ilia sintenado kontraŭ li iom malvarmiĝis. Kaj, kiam iu menciis lian nomon, ili ne plu demandis, kial li estas nomata “Kamelo” el ĉiuj bestoj, kvazaŭ tia nomo plej konvenus al li.

Tamen Ŝjangzi ne povis tiel facile forgesi tin aferon. Li sopiris aĉeti novan rikiŝon kiel eble plej baldaŭ, kaj ju pli forta fariĝis lia deziro, des pli li pensis pri sia unua rikiŝo. Tagon post tago li laboregis, plendante pri nenio, sed dum

laborado tiu lia travivaĵo de tempo al tempo trudiĝeme revenis al li en la kapon. Ekmemorinte ĝin, li tuj sentis sin sufokata kaj vole nevole sin demandis: Kion utilas tiel penegi? La mondo ja ne volas pli juste trakti vin pro via penegado! El kia rajto oni forrabis de vi la rikiŝon? Eĉ se vi havigos al vi ankoraŭ unu, kiu povus scii, ĉu tia sama afero ne okazos denove?

La pasinteco estis kvazaŭ inkubsonĝo, kiu perdis al li la fidon pri la estonteco. Ifoje li preskaŭ enviis aliajn, vidante, ke ili drinkas, fumas aŭ serĉas al si plezuron ĉe prostituitinaĉoj. Se tiel penegi estis senutile, kial ne ĝui la hodiaŭon?" iliaj motivoj estis pravaj. Koncerne lin, eĉ se li portempe restis for de la virinoj, kial ne drinki unu aŭ du tasetojn por eskapi de siaj ĉagreno kaj zorgoj? Alkoholaĵo kaj tabako kvazaŭ havis aparte allogan forton por li, ĉar laŭ li ili kostis nekare, sed el ili li certe povis ĉerpi konsolon kaj strebi antaŭen, forgesante sian pasintan mizeron.

Tamen li ankoraŭ ne kuraĝis tuŝi ilin. Li devis ŝpari ĉiun eblan groŝon, nur tiamaniere li povos ree aĉeti la si rikiŝon. Eĉ se li aĉetus rikiŝon hodiaŭ por perdi ĝin morgaŭ, li tamen devis ĝin aĉeti. Tio estis lia ambicio, lia espero, preskaŭ lia religio. Se li ne povis denove tiri sian propran rikiŝon, tiam ŝajnis al li, ke vane li vivas. Li ne aspiris fariĝi oficisto, nek riĉiĝi, nek aĉeti bienon. Ĉio, kion li kapablis fari, estis rikiŝotirado, kaj lia plej granda espero estis aĉeti al si propran rikiŝon. Se li ne povis tion fari, li sentis sin kulpa kontraŭ si mem. De mateno ĝis nokto li meditadis pri la problemo kaj kalkuladis sian monon; forgesi tion signifus forgesi sin mem kaj fariĝi besto kapabla nur kuri sur la stratoj, besto sen ia ajn vivcelo kaj pli belaj perspektivoj. Kiel ajn eleganta estis la rikiŝo, se ĝi estis nur luita, li ne povis meti sian koronj en ĝian tiradon – ĝi estis kvazaŭ ŝtonego, kiun li portus sur sia dorso. Kaj tamen, eĉ kun luita rikiŝo li neniam maldiligentis, sed ĉiam zorgis pri ĝia pureco kaj brilpoluriteco kaj gardis ĝin de ebla koluzio aŭ difektiĝo. Sed tio estis nur el singardemo: li trovis en tio nenian plezuron.

Jes, purigi sian propran rikiŝon estis kvazaŭ kalkuli sian propran monon – fonto de vera ĝojo. Tial li devis ankoraŭ deteni sian de la uzado de tabako kaj alkoholaĵo kaj eĉ ne povis permesi al si trinki pli bonkvalitan teon. Elegantaj rikiŝistoj kiel li, post rapida kurado, kutime iris al tetrinkejo por regali sin per tio, kiu kostis po dek kupraj moneroj por paketo, kaj du paketoj da blanka sukero. Tio helpis al li reakiri sian spiriton kaj forigi el si la varmon. Kiam Ŝjangzi kuregis tiel, ke de liaj oreloj gutadis ŝvito kaj en lia brusto kvazaŭ brulus fajro, li avidis tian trinkadon, nek el kutimo, nek el varntemo, sed pro tio, ke li efektive bezonis tion. Sed li nur pensis pri tio, kaj en efektiveco li uzis

ankoraŭ tepolvon, kiu kostis nur po unu kupra monero por pako. Iafoje li riproĉis sin pri tio, ke li tiel kruele traktis sin; sed kion alian la rikiŝisto povus fari, se li volis ŝpari iom da mono ĉiumonate? Obstine li kunpremis siajn dentojn kaj atendis, atendadis la tagon, kiam li povos aĉeti al si rikiŝon. Lia propra rikiŝo ja povos kompensi al li ĉion!

Ŝjangzi faris sian plejblon por malgrandigi siajn elspezojn kaj samtempe lasis forgliti neniun okaon por akiri monon. Kiam li ne estis laŭmonate dungita, li laboreis tuttage, de frumateno ĝis tre malfrue, kun la celo nepre perlabori certan sumon por ĉiu tago, ne konsiderante, kioma horo estas kaj kiel lacaj estas liaj kruroj. Kellkfoje li eĉ laboris kontinue la tutan tagnokton sen ajna ĉeso por ripozo.

Antaŭe li neniam prenis al si klientojn de aliaj, precipe de maljunaj, malfortaj rikiŝistoj. Se per siaj forto kaj eleganta rikiŝo li konkuris kun ili pri klientoj, neniu el ili estus lia egalulo. Sed nun li ne plu havis tian skrupulon. Ĉio, pri kio li pensis, estis mono, ju pli multe, des pli bone, sen konsidero al tio, kiom peza estas la laboro aŭ de kiu li ĝin prenas al si. Se li nur povis gajni klienton, nenio alia estis konsiderinda – li estis kvazaŭ malsata sovaĝa besto. Ekhavinte klienton, li tuj kuris kun iom da kontenteco, sentante, ke nur konstanta kurado estas la sola rimedo por realigi lian esperon aĉeti rikiŝon. Iel kaj tiel, la reputacio de Ŝjangzi nun jam fariĝis multe malpli bona ol kiam li ne ricevis la moknomon “Kamelo”. Ofte okazis, ke li ekkuris ikun alies kliento, sekvate de salvo da blasfemoj. Anstataŭ responde krei ion ajn alili li nur rapide kuris antaŭen kun klinita kapo. Pensante: “Se mi ne devus aĉeti rikiŝon, mi neniel povus esti tiel senhonta!” Tio estis kvazaŭ lia nedirita pardonpeto al ili ĉiuj.

Ĉe la rikiŝoparkadejoj aŭ en la tertrinkejoj, kiam li vidis ĉiujn fiksi siajn kolerajn okulojn al li, li intencis klarigi al ili la aferon. Sed konsidere ilian malvarman sintenon, plus la fakto ke ordinare li neniam drinkis, monludis, ŝakludis aŭ babilis kun ili, li povis nur engluti siajn vortojn kaj enŝlosis ilin en si. Lia neelportebla embaraso iomk post iom ŝanĝiĝis en koleron, kiu bolis en lia koro, tiel ke kiam ili lin okulpafis, li respondis per la samo. Komparante ilian nunan malestimon kun la respekto, kiun ili montris al li tuj post lia eskapo de la montoj, li eĉ pli ĉagreniĝis. Sidante sola en tetrikejo kun sia tekruĉo, aŭ ĉe rikiŝoparkadejo nombrante la kuprajn monerojn, kiujn li ĵus ricevis de kliento, li penis per sia tuta forto subpremi sian koleron kvankam li ne timis interbatalon, tamen li ne volis tian. Ordinare la aliaj neniam hazitis ĉe interbatalo, sed ili devis konsideri la sekvojn antaŭ ol ekbatali kontraŭ Ŝjangzi,

ĉar neniu el ili estis lia egalulo kaj, cetere, estus hontinde, se ili plurope sin ĵetus al unu sola. Ne povante trovi ian ajn rimedon eltiri sin el la embaraso, li kontraŭvole regis sian koleron, pensante, ke post kiam li sukcesos aĉaei al si rikiŝon, ĉio ordiĝos. Tiam li ne devos zorgi pri la ĉiutaga lupago, sed povos agi grandanime kaj ne pli ofendi aliajn, konkurante kun ili pri klientoj. Tion pensinte, li ĵetis rigardon al ili ĉiuj, kvazaŭ dirante: “Ni atendu kaj vidu.”

Konsidere lian sanstaton, li efektive ne devus tiom energie laboregi. Post kiam li revenis en la urbon, ankoraŭ ne tute resaniĝinta, li tuj rekomencis labori. Kvankam li ne volis konfesi sian postmalsanan malfortecon, tamen li ofte sentis sin laca; sed li ne kuraĝis ripozi, kredante, ke pli da kurado kaj ŝvitado povas forigi tian laciĝemon. Koncerne la nutradon, li ne kuraĝis malsatigi sian stomakon, nek preni troi bonaj manĝaĵoj. Li povis vidi, ke li multe malgrasiĝis, sed, ĉar li estis ankoraŭ tiel alta kiel antaŭe kaj liaj muskoloj estis ankoraŭ tiel fortikaj, li trankviliĝis. Li kredis, ke li, pli grandkreska ol aliaj, certe povas elteni pli da suferoj. Al li neniam venis en la kapon la ideo, ke estante tiel granda kaj laborante tiel energie li bezonas pli da nutraĵo. Huniŭ jam plurfoje diris al li: “Ho vi! Se vi plu tiel laboregos kaj sputos sangon, ne kulpigu iun ajn alian!”

Li sciis, ke ŝiaj vortoj estas por lia bono, sed ĉar liaj aferoj ne iris kiel li deziris kaj li ne fartis tiel bone kiel antaŭe, li estis iom koleriĝema. Aŭdinte la admonon de Huniŭ, li kolere okulpafis ŝin kaj diris: “Se mi ne tiel kuregus, kiam mi povos aĉei rikiŝon?”

Se iu ajn alia tiel okulpafus Huniŭ, ŝi blasfemus lin plurajn horojn. Sed al Ŝjangzi ŝi estis vere aparte ĝentila kaj amzorgema. Ŝi nur faris lipgrimacon kaj respondis: “Eĉ se tiel, vi devas esti pacienca. Ĉu vi pensas, ke vi estas el fero, he? Vi devas ripozi tri sinsekvajn tagojn.” Vidante, ke li ne volas ŝin aŭskulti, ŝi aldonis: “Nu, bone, laŭ via bontrovo. Ne kulpigu min, se vi falus mortinta!”

Ŝjangzi jam iom ne plaĉis ankaŭ al Kvara Sinjoro Liŭ, ĉar liaj tro intensa labormaniero kaj longaj laborhoroj malutilis al la rikiŝo. Kvankam rikiŝojn luatajn por tuta tago oni povis uzi dum pli aŭ malpli longaj horoj, tamen se ĉiuj tiel trouzus ilin kiel Ŝjangzi, ili difektiĝus almenaŭ je ses monatoj antaŭtempe kaj eĉ la plej fortika ne povus elporti tian kruelan uzadon. Cetere, Ŝjangzi nun tiel intense sin okupis je pasaĝerportado, ke li apenaŭ havis tempon por helpi pourigi rikiŝojn kaj fari aliajn laborojn, kaj tio estis ankoraŭ unu perdo. La maljunulo sentis sin iom ĉagrenita, sed diris neion. Potaga luado de rikiŝo sen limigo de uzhoroj estis la regulo, kaj helpo ĉe purigo de rikiŝoj estis favoraĵo, ne devo; do li, homo kun tre bona reputacio, ne povis malaltigi sian dignon por

diri ion ajn ĉi-rilate al Ŝjangzi. Li povis fari nenion alian ol ĵeti al li el la okulanguloj rigardojn de malkontenteco kaj forte kunpremis la lipojn.

Iafoje li ekintencis forpeli Ŝjangzi; sed ekrigardinte sian filinon, li ne kuraĝis. Li neniam konsideris Ŝjangzi kiel sian eblan bofilon, sed, ĉar tiu ĉi obstina junulo plaĉis al lia filino, al li estis ne dece ŝovi sian nazon en la aferon. Ŝi estis lia sola filino kaj, ĉar ŝajne jam ekzistis preskaŭ nenia espero edzinigi ŝin, li neniel povis forpeli ŝian amikon.

Por diri la veron, Huniŭ estis por li tia bona helpanto, ke li ja ne volis foredzinigi ŝin, kaj pro tiu ĉi egoisma celo li sentis sin iom kulpa al ŝi kaj sekve iom timis ŝin. Dum ŝia tuta vivo li ne timis la ĉielon, nek la teron, tamen nun en sia alta aĝo li timis eĉ sian propran filinon! Li pravigis tian hontindaĵon per la penso: se li nur timas iun, tio pruvas, ke li ne estas tute sen konscienco. Estante tia, li eble ricevos absolvon por siaj pekoj en la mortlito. Do, tre bone, ĉar lia timo al la filino estis pravigebla, li ne devis forpeli Ŝjangzi. Sed tio ne signifis, ke li toleras ĉian absurdaĵon fare de ŝi kaj volas edzinigi ŝin al Ŝjangzi. Ne. li povis vidi, ke ŝi ne estas malinklina al tia edziniĝo, sed Ŝjangzi ja neniel kuraĝis havigi al si filinon de riĉa familio.

Do sufiĉis al li nur estis singarda kontraŭ tio kaj ne necesis ĉagreni la filinon.

Ŝjangzi ne rimarkis la vizaĝesprimon de la maljunulo. Li ne havis tempon por tiaj bagatelaĵoj. Se li iam volis forlasi Rikiŝejon Harmonio, tio certe estis ne pro tiaj neatentindaj aferoj, sed pro tio, ke li deziris ricevi laŭmonatan laboron. Li jam iom malvolontis tiri okazajn klientojn, unue ĉar liaj kamaradoj jam malestimis lin pro tio, ke li konkuris kun ili pri klientoj, kaj due ĉar li ne estis certa pri la kvanto de siaj ĉiutagaj enspezoj. Hodiaŭ li perlaboris pli, morgaŭ eble malpli; tiel li ne povis antaŭvidi, kiam li povos havigi al si per ŝparado monsumon sufiĉan por aĉeti al si propran rikiŝon. Se li nur poovus kalkuli je fiksa sumo ŝparata en ĉiu monato, eĉ se tre malgranda, li sentus sin esperplena kaj trankvila. Li apartenis al tiaj homoj, kiuj volas, ke ĉiu afero estu certa kiel “unu rafano en unu kavo”.

Li sukcesis trovi laŭmonatan laboron. Sed ĝi estis same malkontentiga kiel tirado de okazaj pasaĝeroj. Ĉi-foje li estis dungita de Jang-familio. S-ro Jang estis el Ŝanhajo, lia unua edzino el Tjanĝin kaj la dua el Suĝoŭ. Inter ili, kiuj parolis ĉiu sian dialekton nordan aŭ sudan, naskiĝis miriga nombro da infanoj.

La unuata laboro tiea jam konfuzis Ŝjangzi. Frue en la mateno la unua sinjorino veturis per lia rikiŝo al la legombazaro. Reveninte, li devis tuj rikiŝe porti la sinjoridojn kaj fraŭlinetojn al iliaj lernejoj. Iuj lernis en malsupera

mezlernejo, aliaj en elementa lernejo, ankoraŭ aliaj en infanĝardeno. Iliaj lernejoj, aĝoj kaj aspektoj estis malsamaj, sed ili ĉiuj estis same abomenide petolemaj; precipe en la rikiŝo, tiam eĉ la plej bonkoduta kvazaŭ estis pli ruza ol simio. Post kiam la infanoj estis forportitaj, s-ro Jang devis veturi al la oficejo. Portinte lin tien, Ŝjangzi devis rapide reveni por porti la duan sinjorinon al Dong'an-bazaro aŭ al iuj aliaj lokoj, kie ŝi faris vizitojn. Post ilia reveno, la infanoj devis esti venigitaj hejmen por tagmanĝo. Post la tagmanĝo ili ree veturis al la lernejoj. Farinte ĉion tion, Ŝjangzi pensis, ke li povas preni sian manĝon; sed ĝuste en tiu ĉi momento la unua sinjorino, tiu kun la Tjanĝina akcento. Ordonis al li, ke li portu akvon. En la domo de s-ro Jang la trinkakvo estis liverata de akvoportisto, sed la vestlava akvo devis esti alportata de la rikiŝisto. Kvankam tio ĉi estis ekster la kondiĉoj de la interkonsento, tamen por ne perdi sian laboron, Ŝjangzi ne kuraĝis protesti kaj silente plenigis la akvovazegon. Ĝuste kiam li formetis la sitelojn kaj estis levonta sian manĝobovlon, la dua sinjorino sendis lin por aĉeti ion.

La du sinjorinoj ĉiam estis en malbonaj interilatoj, sed pri la dommastrumaj aferoj, neniam permesi al la servistoj ripozi momenton, kaj ambaŭ ne ŝatis vidi la servistojn manĝi. Ne sciante tion, Ŝjangzi pensis, ke la unua togo okaze estas tago aparte laborplena. Tial li diris ankoraŭ nenion kaj aĉetis kelkajn dagingetojn per sia propra mono. Tio estis kvazaŭ konsumi lian vivsangan, tamen por ne perdi la laboron li estis devigita tion fari kun kunpremitaj dentoj.

Kiam li revenis de la aĉeto, la unua sinjorino ordonis al li balai la korton. La mastro kaj la du mastrinoj ĉiam estis tre elegante vestitaj kiam ili iris eksteren, sed iliaj korto kaj domo estis kvazaŭ granda rubejo. Vidante la korton, Ŝjangzi tiel naŭziĝis, ke li tuj komencis ĝin balai, forgesante, ke tia laboro ne devas esti taskita al rikiŝisto. Post kiam la korto estis balaita, la dua sinjorino diris al li, ke li balaŭ ankaŭ la ĉambrojn. Ŝjangzi ankoraŭ ne protestis, sed li forte miris, kiel la ĉambroj, en kiuj loĝas tiuj ĉi elegantaj, respektinda sinjorinoj, povas esti tiel malpuraj, ke oni preskaŭ ne volas meti la piedojn sur la plankon.

Post lia purigo de la ĉambroj, la dua sinjorino ŝovis en liajn brakojn kotan peloleman bebon apenaŭ unujaran. Ŝjangzi fariĝis senkonsila. Ĉian laboron, kia postulis forton, li povis lerte fari, sed li neniam antaŭe braktenis infaneton. Li tenis la sinjoridon per ambaŭ manoj, timante faligi ĝin, se li malstreĉus la manojn, aŭ premdolorigi ĝin, se ĝin li tenus tro forte. Li komencis ŝviti. Li intencis doni tiun ĉi trezoron al la servistino Onjo Ĝang, virino kun nevinditaj grandaj piedoj el norda Ĝjangsu-provinco; sed kiam li trovis ŝin kaj diris tion al

ŝi, ŝi tuj verŝis sur lin torenton da insultoj.

Ordinare Jang-familio tenis servistojn ne pli ol tri aŭ kvar tagojn, ĉar la mastro kaj la du mastrinoj ĉiam traktis ilin kiel sklavojn, kvazaŭ nur ĝismorte ilin laborigante, ili povus plenvalorigi la sumeton, kiun ili pagis al siaj servistoj. Tiu ĉi Onjo Ĝang estis escepto. Ŝi estis kun la familio jam kvin aŭ ses jarojn nur tial, ke ŝi kuraĝis laŭte sakri kontraŭ iu ajn, kiu koleretigis ŝin, tute egale, ĉu mastro aŭ mastrinoj. La kombinaĵo de la tranĉaj Ŝanhajaj sarkasmoj de s-ro Jang, la kruelaj Tjanĝinaj blasfemoj de la unua sinjorino kaj la fluaj Suĝoŭaj insultoj de la dua sinjorino estis ĉiam nerezistebla, ĝis ili renkontis Onjon Ĝang, megeron, kiu sciis kiel repagi por tio, kion ŝi ricevis. Kiel heroo renkontas bravulon, tiel ili tre ŝatis ŝin kaj tenis ŝin ĉe si kvazaŭ sian adjutanton.

Ŝjangzi elkreskis en nordlanda vilaĝo, kie sakrado estis tabuo. Tamen li ankaŭ ne kuraĝis bati Onjon Ĝang, ĉar al virta viro ne decas bati virinon. Ne volante reciproki ŝiajn insultojn, li ŝin nur okulpafis. Onjo Ĝang silentiĝis, kvazaŭ elflarinte ian dangĝeron.

Ĝuste tiumomente la unua sinjorino kriis al li, kke li revenigu hejmen la infanojn el la lernejoj. Li tuj redonis la kotan bebon al la dua sinjorino, kiu rigardis tion kiel intencan malrespekton kaj tuj elkraĉis sur lin rozarion da insultoj. Ekaŭdinte tion, la unua sinjorino, al kiu antaŭe fakte ne plaĉis vidi, ke li braktenis la bebon de la dua sinjorino, ankaŭ levis sian oleecan voĉon por sakri, kaj ŝiaj sakraĵoj direktis sin ankaŭ kontraŭ lin. Ŝjangzi fariĝis objekto de iliaj insultoj. Li tuj prenis sian rikiŝon kaj rapidis for, forgesante eĉ koleriĝi, ĉar ion similan li neniam antaŭe spertis, kaj nun preskaŭ sentis kapturton.

Unuj post aliaj la infanoj estis portitaj hejmen. La korto fariĝis eĉ pli brua ol bazarplaco. La insultoj de tri virinoj kaj la plorkrioj de hordo da infanoj fariĝis tia tumulto bruego, kian oni aŭdas kiam la spektantoj amase eltorentas el la teatroj en la strateto Daŝalar post prezentado post prezentado. Feliĉe Ŝjangzi ankoraŭ devis iri porti s-ron Yang hejmen, do li haste kuris for. La bruego de homoj kaj veturloj en la stratoj ŝajnis al li pli tolerebla ol la tumulto en la korto.

Ŝjangzi ne povis trovi tempon por iom ripozi ĝis la meznokto. Li ne nur sentis sin elĉerpiĝinta, sed ankaŭ havis senĉesan zumadon en la oreloj. Kvankam la tuta Yang-familio jam enlitiĝis, tamen ŝajnis al li, ke li ankoraŭ aŭdas la insultojn de la mastro kaj la mastrinoj, kvazaŭ tri malsamaj gramofonoj freneze ludus en lia kapo por lin turmenti. Li ne havis tempon por pensi pri io alia ol dormo. Sed tuj kiam li eniris en sian malgrandan ĉambreton, lia koro malvarmiĝis kaj lia dormemo estis for.

Ĝi estis ĉambreto en la pordistejo, kiu estis dividita per vando en la mezo

kaj havis unu pardonon ĉe ĉiu el la du flankoj. Onjo Ĝang okupis unu flankon kaj li la alian. En la ĉambreto ne estis lampo, la sola lumo venis de ekstere tra malgranda, ĉirkaŭ du futojn larĝa fenestro, kiu donis vidon sur la straton kaj estis ĝuste sub stratlampo. La ĉambreto estis humideca kaj mucida, kun tavolo da polvo, dika je unu kupra monero, sur la planko; kaj krom ligna tabullito kontraŭ la muro, nenio estis en ĝi. Li palpis la liton kaj trovis, ke se li metos sian kapon sur la liton, li devos apogi siajn piedojn supren la la muro, aŭ ke, se li horizontale eletendos siajn piedojn, li devos dormi duonsidante. Tiel kuŝante li certe ne povos ekdormi. Post ioma pripenso li tiris la liton en oblivan direkton, ke li povu kuŝi provizore por la nokto, kun la kapo metita sur la lito ĉe unu ekstremo kaj kun la kruroj pendantaj ĉe la alia.

Li enportis sian litaĵon, fuŝe-rapide sternis ĝin kaj kuŝiĝis. Sed li ne kutimis al la kuŝmaniero kun la kruroj pendantaj kaj ne povis endormiĝi. Devigante sin fermi la okulojn, li konsole diris al si: “Dormu, morgaŭ vi devos frue ellitiĝi! Se ĉiam suferon vi jam elportis, kial tion ĉi ne? Vere la manĝaĵo estas aĉa, la laboro tro peza, sed eble ili ofte ludas maĝangon, regalas gastojn kaj invitite iras al bankedoj. Nu, por kio do vi venis ĉi tien, Ŝjangzi? Ĉu ne ĝuste por mono? Se nur vi povas ricevi pli da mono, ĉion vi devas toleri!” tiuj ĉi pensoj faris lin pli facila en la animo, kaj nun la ĉambreto ŝajne odoris malpli mucide, tiel ke iom post iom li falis en dormon. En duonkonscio li sentis, ke litcimoj mordas lin, sed li estis tro laca por ilin kapti.

Post du tagoj la koro de Ŝjangzi jam komplete malvarmiĝis. Sed en la kvara tago iuj gastinoj alvenis kaj Onjo Ĝang klopodis por primeti maĝango-tablon. Lia koro, kiu estis kvazaŭ glaciiginta lago, eksentis subitan spiron de printempo.

Kiam la sinjorinoj komencis ludi maĝangon kun gastinoj, ili konfidis ĉiujn infanojn al la servistoj. Ĉar Onjo Ĝang devis servi ĉe la tablo per cigaredoj, teo kaj varmaj mantukoj, la trupo da malgrandaj “simioj” nature venis sub la komandonj de Ŝjangzi. Li ne povis toleri la petoladon de tiuj ĉi “simioj”, sed kiam li ŝtele ĵetis rigardon en la ĉambron, la unua sinjorino, kiu ŝarĝis sin pri kolektado de trinkmono, ŝajnis esti tre serioza en sia laboro. Li diris al si: Kvankam megereca, ŝi eble estas sufiĉe prudenta kaj scias uzi tian okazon por kolekti iom pli da mono por la servistoj. Do li fariĝis aparte pacienca al la malgrandaj “simioj” – pro la trinkmono li devis trakti ilin kiel sinjoridojn kaj fraŭlinetojn.

La maĝango-ludado finiĝis. La mastrinoj ordonis lin rikiŝe porti la gastinojn hejmen. Ĉar ambaŭ gastinoj volis foriri samtempe, Ŝjangzi devis voki

alian rikiŝon. La unua sinjorino ŝajnigis, ke ŝi priserĉas ĉiujn siajn poŝojn por trovi monon por pagi la rikiŝan veturpagon de la gastino. La lasta ĝentile rifuzis du fojojn, kaj la unua sinjorino kriegis kiel eble plej laŭte:

“Kion vi diras, franjo! Vi venis al mia hejmo kaj volas mem pagi la rikiŝan veturpagon? Nu, franjo, enrikiŝigu!” Kaj nur en tiu momento ŝi sukcesis trovi unu ĝjaŭon.

Kiam ŝi transdonis ĝin, Ŝjangzi klare vidis, ke ŝia mano iom tremas.

Portinte la gastinojn hejmen, li helpis al Onjo Ĝang prilevi la tablon kaj reordigi la ĉambrom, poste li ĵetis rigardon al la unua sinjorino. Ŝi ordonis Onjon Ĝang alporti boligitan akvon, kaj kiam tiu foriris el la ĉambro, ŝi elpoŝigis unu ĝjaŭon.

“Nu, prenu tiun ĉi kaj ĉesu min fiksrigardi!”

Ŝjangzi subite purpuriĝis en la vizaĝo. Li rektigis sian talion, kvazaŭ li volus tuŝi la plafonon per la kapo, kaj ĵetis la unu-ĝjaŭan bankbileton kontraŭ ŝian grasan vizaĝon.

“Donu al mi mian kvartagan salajron!”

“Kion tio signifas?” Ĵetinte al li ankoraŭ unu rigardon, sen diri ion ajn pli, ŝi donis al li lian salajron.

Ŝjangzi kolektis sian litajon kaj, apenaŭ li eliris el la pordego, torento da insultoj eksplodis en la korto malantaŭ li.

Notoj:

1. Tjanĝin: Granda urbo en norda Ĉinio, proksime al Pekino.
2. Suĝoŭ: Mezgranda urbo en orienta Ĉinio, proksime al Ŝanhajo
3. Onjo (Ĝang): Oni kutimis tiel voki servistinon aŭ vartistinon imitante la vokmanieron de infanoj.
4. la strateto Daŝalar: Grava komerca strato kun famaj butikoj kaj teatroj proksime al la pordego Ĉjanmen

VI

Estis fruaŭtuna vespero. Ondo post ondo da venteto tremkuis foliojn, kiuj ĵetis siajn ombrojn en la stellumo. Levante la kapon, Ŝjangzi rigardis supren al la Ĉiela Rivero, tiel alta kaj malproksima, kaj suspiris. La aero estis tiel agrabla malvarmeta kaj li havis tiel larĝan bruston, kaj tamen li sentis sin sufokata. Li dezirus sidiĝi kaj forte ploregi. Kiel povia okazi, ke li, forta, obstina kaj strebema, estis traktata de aliaj kiel hundo kaj eĉ ne povis daŭre teni ian okupon? Li ne nur malamis la tutan Jang-familion, sed ankaŭ malklare sentis ian malesperon – timon, ke dum sia tuta vivo li neniam atingos sian celon. Portante la litaĵon, li paŝis pli kaj pli malrapide, kvazaŭ li jam ne plu estus tiu Ŝjangzi, kiu siatempe povis laŭvole tuj eklevi la piedojn kaj senhalte kuri ok aŭ dek liojn.

La strato jam estis preskaŭ senhoma, sed la stratlampoj estis tre helaj, kio des pli grandigis lian solecon. Kien iri? Kompreneble, al Rikiŝejo Harmonio. Sed li eksentis ian malĝojon pri tio. Tiuj, kiuj faras negocon, kaj tiuj, kiuj vendas sian forton, ordinare ne timas pri manko de klientoj; kio ilin maltrankviligas estas, ke havante klienton ili ne sukcesas fari negocon kun li – tio estas kiel iu paŝas en restoracion aŭ barbirejon kaj, ĵetinte rigardon ĉirkaŭen, denove iras for. Ŝjangzi sciis, ke trovi kaj forlasi laboron estas afero ordinara, kaj ke iu loko ne restigas lin, alia lin bezonos. Sed por aĉeti rikiŝon li ja tiel humiligis sin kaj perdis tiom da vizaĝo, kaj tamen lia laboro daŭris nur tri kaj duonan tagojn! Ĉi-rilate li ne estis diferenca de tiuj ruzuloj, kiuj kutimas ofte ŝanĝi siajn dungantaĵojn, kaj tio estis, kio dolorigis al li la koron. Li preskaŭ hontis reiri al Rikiŝejo Harmonio, kie ĉiuj kredeble ridos je li: “Jen, vidu! Ankaŭ Kamelo Ŝjangzi estas unu el tiuj tri-kaj-duon-taguloj!”

Sed se li ne iris al Rikiŝejo Harmonio, kien aliloken do li iru? Ne, li ne devis heziti, kaj li direktis sin rekte al la strato Ŝjianmendagje. La ĉestrata flanko de Rikiŝejo Harmonio konsistis el tri frontaj ĉambroj, el kiuj la meza servis kiel la kontoro. La rikiŝistoj estis permesataj eniri en ĝin nur por reguligi sian konton aŭ diskuti pri aferoj, sed ili estis malpermestaj uzi ĝin kiel enirejon al la korto, ĉar la du ĉambroj sur la orienta kaj okcidenta flankoj estis la dornoĉambroj de la mastro kaj lia filino.

Najbare al la okcidenta ĉambro estis porrikiŝa enirejo kun pordego, kies du flugiloj estis kolorigitaj verdaj. Super la pordego, de dika drato pendis brila elektra lampo senŝirmila. Sub ĝi pendis horizontala fera ŝildo kun orita

surskribo: “Rikiŝejo Harmonio”. Ĝi estis la pordego, tra kiu la rikiŝistoj en- kaj eliradis kun sia rikiŝo. La malhelverda pordego kaj la orkolora surskribo brilis en la hela lumo de la elektra lampo, dum ankaŭ la rikiŝoj en- aŭ elirantaj estis tre elegantaspektaj – nigra aŭ brunaj, ili ĉiuj brilis per farbotavolo kaj iliaj kusentegoj estis blankaj kiel neĝo. Eĉ iliaj tirantoj sentis sin iom fieraj, kvazaŭ ili estus la aristokratoj inter rikiŝistoj. Enirinte tra la pordego, se oni plu iris laŭ la okcidenta ĉambro, oni trovis sin en granda kvadrata korto kun maljuna soforo sur la mezo. La konstruaĵoj sur la orienta kaj okcidenta flankoj, kiuj estis malfermitaj al la korto, servis kiel remizo. La domo sur la suda flanko, kaj la malgrandaj ĉambroj en la malgranda korto malantaŭ ĝi, estis la dormejo de la rikiŝistoj.

Estis jam ĉirkaŭ la deknua nokte, kiam Ŝjangzi ekvidis la brilantan, tre solecan lampon ekster Rikiŝejo Harmonio. La Kontoro kaj la orienta ĉambro estis mallumaj, sed en la okcidenta ĉambro ankoraŭ lumis lampo kaj el tio li sciis, ke Huniŭ ankoraŭ ne dormas. Li intencis piedpinte enŝteliĝi, por ke ŝi lin ne vidu, ĉar li ne volis, ke si la unua vidu lian malvenkon ĝuste pro ŝia alta ŝato al li. Apenaŭ li tiris sian rikison preter sia fenestro, si eliris el la pordego.

“Ha vi, Ŝjangzi! Kio...” Ŝi englutis sian demandon, ekvidinte lian deprimitan mienon kaj la litajon en la rikiŝo.

Kion li timis, tio malgraŭe okazis! La koro de Ŝjangzi pleniĝis de honto kaj aflikto, kaj li ekhaltis. Stultmiene li staris, sen parolo, gapante al Huniŭ. Ŝi aspektis iel neordinare. Ĉu pro la hela lamplumo, ĉu pro pudriteco, ŝia vizaĝo estis multe pli blanka ol ordinare kaj tiu ĉi blankeco maskis multon el ŝia megereco. Ŝiaj lipoj estis efektive ruĝigitaj, kio faris ŝin ankaŭ iom ĉarma; ĉio ĉi ŝajnis al li tiel stranga, ke li sentis sin eĉ pli konfuzita. Ĉar li neniam antaŭe rigardis ŝin kiel virinon, la subita ekvido de ŝiaj ruĝaj lipoj faris lin iom embarasita. Ŝi portis mallongan silkan subŝtofitan jakon de helverda koloro kaj vastan nigran krepan pantalonon. La verda jako briletis pale kaj iom malgajige en la lamplumo. Plie, ĝi estis tiom mallonga, ke el ĝi elvidiĝis eĉ ŝia pantalona taliorubando de blanka koloro, kiu akre kaj bele kontrastis kun la delikata verdo. Ŝia vasta nigra pantalone susuris en la venteto, kvazaŭ ia sinistra spirito penus eskapi de la hela lamplumo kaj kunfandiĝi kun la nigra nokto.

Ne kuraĝante plu rigardi, Ŝjangzi klinis la kapon en mensokonfuzo, sed li ankoraŭ havis en la kapo bildon de tiu malgranda, briletanta verda jako. Huniŭ neniam, li sciis, surpris tian tualeton. Liŭ-familio estis sufiĉe riĉa, ke ŝi povu vesti sin ĉiutage per silko kaj veluro, sed en sia ĉiutaga traktado kun rikiŝistoj, ŝi ĉiam portis kotonajn jakon kaj pantalonon, tiel ke eĉ se sur ŝia vesto estis

desegnoj, ili ne estis okulfrapaj. Ŝjangzi havis la senton, ke li kvazaŭ rigardas ion novan, strangan, sed samtempe konatan. Kaj lia konfuzo kreskis.

Lia afliktiĝo kaj lia renkonto kun tia stranga nova vivaĵo sub la forta lamplumo ĵetis lin en senkonsilecon. Li ne volis sin movi, sed deziris nur, ke Huniŭ tuj reiru en sian ĉambron aŭ ordonu al li ion fari. Li simple ne povis elteni tian neelteneblan turmenton, kian li neniam antaŭe konis.

“Hej!” Ŝi faris paŝon antaŭen kaj diris per mallaŭta voĉo, “Ne staru ĉi tie kvazaŭ ŝtoniĝinta! Iru formeti la rikiŝon kaj tuj revenu. Mi havas ion por diri al vi. Ni nin revidu en la ĉambro.”

Kutimante helpi al ŝi, li povis fari nenionj alian ol obei. Tamen ĉi-vespere ŝi estis tiel alia ol ordinare, li bezonis iom pripensi; sed plu stari tie estis tro embarase, tial li, senkonsila, tiris la rikiŝon en la korton. La sudaj ĉambroj estis mallumaj, kio signifis, ke oni jam ĉiuj dormas kaj iuj eble ankoraŭ ne revenis el sia laboro. Formetinte la rikiŝon en la remizon, li revenis al ŝia pordo. Subite lia koro komencis forte bati.

“Envenu, mi havas ion por diri al vi,” ŝi diris duone ridante, duone koleretante, kun la kapo elŝovita el la pordo.

Malrapide li enpaŝis.

Sur la tablo estis kelkaj duonmaturaj, ankoraŭ verdecaj piroj, unu vinkruĉo, tri blankaj porcelanaj tasetoj kaj unu granda plado, en kiu estis duona koko sojkuirita, fumaĵita hepato, tripko kaj aliaj viandaĵoj.

“Rigardu.” Huniŭ montris al li seĝon kaj, post kiam li sidiĝis, daŭrigis: “Jen mi min regalas post mia pena laboro. Ankaŭ vi ion manĝu!” Parolante ŝi verŝis al li brandon en taseton. La akraodoro de la alkoholaĵo, miksitita kun laodoro de la fumaĵo kaj la sojkuiraĵoj ŝajnis aparte pikanta kaj peza. “Trinku! Manĝu la tutan kokaĵon. Estu sen ceremonioj, mi petas. Mi jam finis la manĝon. Ĵus mi mem sortodivenis per domenpecoj, kaj el tio mi sciiĝis, ke vi revenos. Vere mirakle, ĉu ne?”

“Mi ne drinkas.” Ŝjangzi fikse rigardis la taseton.

“Se vi ne trinkos, for de ĉi tie! Kio estas al vi? Ĉu vi ne scias danki por mia favoro al vi? Vi stulta kamelo! Ĝi ne venenos vin, eĉ mi povas trinki kvar lĵangojn da ĝi. Se vi ne kredas, jen rigardu!” Ŝi levis la taseton, eltrinkis ĝin preskaŭ ĝis la fundo, poste remis siajn okulojn, forte elpuŝis sian spiron kaj prezentis al li la taseton: “Nu, trinku! Alie mi pinĉos al vi la oreton kaj perforte trinkigos vin!”

Estante en malbona humoro, ĉe tia incitado Ŝjangzi tre volus verŝi sian koleron sur ŝin. Sed Huniŭ estis ĉiam favora al li kaj li sciis, ke ŝi estas

malkaŝema al ĉiu, tial li ne devis ofendi ŝin. Anstataŭe li devus kor-elverŝe diri al ŝi pri sia ĉagreno. Kvankam kutime neparolema, li tamen hodiaŭ kvazaŭ havus milojn da vortoj enfermitaj en si, kiuj sufokis lin tiel, ke li ne povis ne ellasi ilin el sia brusto. Tiel konsiderate, la tigrega knabino ŝajnis ne ŝerce mokanta lin. Sed honeste montranta sian zorgon pri li. Li transprenis la taseton kaj eltrinkis ĝin. Malrapide, klare senteble kaj potence la fajra alkoholaĵo iradis malsupren. Li streĉis sian kolon, elstarigis la bruston kaj dufoje ruktis ne sufiĉe facile.

Huniŭ ekridis. Malsuprenigi la alkoholaĵon ĝis la stomako kostis al li grandan penon, kaj ŝia rido tuj igis lin ekrigardi en la direkto de la orienta ĉambro.

“Estas neniu tie.” Ŝi ĉesigis la ridon, sed sur ŝia vizaĝo ankoraŭ vidiĝis rideto. “La maljunulo iris celebri la naskiĝtagon de mia onklino kaj devas resti ĉe ŝi du aŭ tri tagojn; ŝi loĝas malproksime, en Nanĵuan.” Parolante si denove plenigis lian taseton.

Tio pensigis lin. Li sentis ion nepravigeblan en ĉio ĉi tiol sed, samtempe, li ne volis foriri, ĉar ŝia vizaĝo estis tiom proksima al la lia, ŝiaj vestoj tiom ruĝaj, ĉio ekscitis lin en ia nova maniero. Ŝi restis same malbela kiel antaŭe, sed kun nova viveco, kiu kvazaŭ ŝanĝis ŝin en alian personon. Ŝi ankoraŭ estis ŝi mem, sed kun io aldona.

Li ne kuraĝis bone konsideri, kio estas tio ĉi nova, kaj kvankam ĉi-momente li timis ĝin akcepti. Tamen li ne povis ĝin rifuzi kun decidemo. Li ruĝiĝis kaj, por doni al si kuraĝon, trinkis ankoraŭ iom da brando.

Antaŭ momento li volis elverŝi sian ĉagrenon al ŝi, sed nun li tion forgesis. Ruĝa en la vizaĝo, li pretervole ĵetis ankoraŭ kelkaj rigardojn al ŝi. Kaj ju pli li rigardis, des pli konfuzita li sentis sin, ĉar tio io, kiun li ne povis kompreni, estis fariĝanta pli kaj pli evidenta, kaj la fajra forto eliĝanta el ŝi estis iom post iom transformanta ŝin en ion abstraktan kaj nematerian.

Li avertis sin esti singarda, sed li ankaŭ volis esti aŭdaca. Unu post alia li eltrinkis tri tasetojn kaj forgesis, kio estas singardo. En obtuza duonkonscio li ŝin rigardis, mirante, kial li sentas sin tiel ekzaltita kaj kuraĝa, kuraĝa sufiĉe por tiu kapti ian novan sperton, ian novan plezuron. Sufiĉe por tuj kapti ian novan sperton, ian novan plezuron. Ordinare li iom timis ŝin; nun ĉe ŝi estis nenio timinda. Kontaŭe, li mem fariĝis tiel impona, tiel forta, kvazaŭ li povus levi ŝin kiel katidon.

La lampo estingiĝis en la ĉambro. La ĉielo estis malluma. De tempo al tempo unu aŭ du steloj trapikis la Arĝentan Riveron aŭ tranĉis en la mallumon,

kun luma vosto ruĝa aŭ blanka, facile ŝvebanta aŭ malmole rigida. Rekte falante aŭ horizontale flugante, iafoje kun tremoj, ili donis al la ĉielo lumajn skuojn kaj al la mallumo briletantajn eksplodetojn. Jen unu-aŭ-duope, jen arope ili fluge falis, tremetigante la kvietan aŭtunan ĉielon, tiel ke la miliardaj aliaj steloj eksvarmis. Foje-foje unuopa granda stelo transverse enpikiĝis en angulon de la ĉielo, kun luma vosto treege longa, disjetante ruĝajn fajrerojn, kiuj iom post iom fariĝis flavaj. Kiam ĝia antaŭenflugado preskaŭ finiĝis, subite ĝi kvazaŭ gajege prilumis strion da ĉielo en angulo. Kvazaŭ tratanĉante la densegan mallumon, ke enfiltriĝis laktoblanka lumo. Kiam la restaĵo de la lumo estingiĝis, la mallumo kvazaŭ iom skuiĝis kaj denove sin fermis; kaj la silentaj, pigraj steloj ree estis ĉiu sur sia antaŭa loko kaj ridetis alte al la aŭtuna vento. Super la tero flugadis kelkaj paroj da lampiroj, kiuj fosforeskante faris amludon.

La sekvantan tagon Ŝjangzi ellitiĝis tre frue kaj tuj eliris kun sia rikiŝo. Liaj kapo kaj gorĝo iom doloris lin pro lia unuafoja drinkado, sed tio ne ĝenis lin. Li sidis ĉe la buŝo de malgranda strateto kaj ĝuis la frumatenan venteton, sciante, ke lia kapdoloro baldaŭ pasos. Sed aliaj problemoj obsedis kaj premis lin, kaj li povis trovi nenian tujan solvon al ili. La okazaĵoj de la nokto lin konfuzis, hontigis kaj afliktis; cetere, li sentis ankaŭ ian danĝeron.

Li ne povis kompreni la tigrecan knabinon. Ŝi antaŭe jam ne estis virgulino, kaj tion li malkovris nur antaŭ kelkaj horoj. Li ĉiam respektis ŝin kaj neniam aŭdis iun ajn paroli pri ŝia malvirta ago. Kvankam ŝi estis malkaŝema kaj facilanima, tamen neniu klaĉis pri ŝi malantaŭ ŝia dorso. Se rikiŝistoj havis plendojn, ili estis nur pri ŝia kruda karaktero, kaj nenio alia. Do, kial okazis la lastanokta sceno?

La okazaĵo de la antaŭa nokto ŝajnis absurda, ke Ŝjangzi komencis dubi pri ĝia realeco. Huniŭ ja sciis, ke li, dungita por fari laŭmonatan laboron, estas for de la rikiŝejo, do kial povis esti, ke ŝi atendadis ĝuste lin? Se iu ajn alia povus... Ŝjangzi klinis sian kapon. Li venis el la kamparo kaj, kvankam ĝis nun li neniam pensis pri edziĝo, li tamen havis sian planon. Se li sukcesos aĉeti al si propran rikiŝon, ke lia vivo fariĝos iom pli facila, kaj se li tiam volos, li nepre reiros en la kamparon kaj elektos al si fortan knabinon, kiu povos elteni vivsuferojn, povos lavi vestojn kaj plenumi dommastrumajn laborojn.

Preskaŭ ĉiuj junaj rikiŝistoj de lia aĝo, eĉ tiuj, kies agoj estis bridataj de siaj familianoj, ŝtele vizitadis la Blankan Kabanon, sed Ŝjangzi neniam volis fari la samon. Unue, li fiere rigardis sin kiel homon ambicieman kaj ne devis vane forĵeti monon sur virinaĉojn. Due, propraokule li vidis tiujn stultulojn, kiuj

fordiboiĉis sian monon – iuj el ili havis nur dek ok aŭ dek naŭ jarojn – eĉ premante sian kapon kontraŭ la muron de necesejo, ne povu urini. Laste, li devas dece konduti, por ke li povu esti inda je sia estonta edzino; ĉar, se li iam edziĝos, la knabino devos esti pura kaj senmakula, kaj tio postulos, ke li mem estu la sama. Sed nun, nun...

Kiam Huniŭ estas konsiderata kiel amiko, ŝi vere ne estas malbona; sed kiel virino, ŝi estas malbela, maljuna, akralanga kaj senhonta. Eĉ tiuj soldatoj, kiuj forrabis lian rikiŝon kaj preskaŭ mortigis lin, nun ŝajnas malpli malamindaj kaj malpli abomenaj ol ŝi. Ŝi tute detruis la simplecon, kiun li alportis kun si el la kamparo, farante lin malĉastulo!

Kaj plie, kio okazos se tio malkaŝiĝos kaj atingos la orelojn de Kvara Sinjoro Liŭ? Ĉu li nun scias, ke lia filino estas malĉasta? Se ne, ĉu li tiam ne metos la tutan kulpon sur Ŝjangzi? Se li jam scias tion kaj tamen ne volas ŝin bridi, kiaspecaj homoj do ili estas? kaj kio estas Ŝjangzi mem, miksiĝinte kun ili? Eĉ se la patro kaj lia filino ambaŭ volas, li neniel povos edziĝi al ŝi, tute egale, ĉu la maljunulo havas sesdek, sescent, aŭ ses mil rikiŝojn.

Li devas tuj forlasi Rikiŝejon Harmonio kaj komplete romkpi la rilatojn kun ili. Li havas sian kapablon, dank' al kiu li povos aĉeti al si rikiŝon kaj trovi al si edzinon. Tio estas la sola ĝusta kaj honesta vojo sekvinda. Ĉe tiu ĉi penso li levis la kapon kun la sento, ke li estas vera viro. Li havas nenion por timi, nek bezonas maltrankviliĝi pri io ajn. Se li nur diligente laboros, li certe povos atingi sukceson.

Sed post perdo de du eblaj klientoj, lia ĉagreno denove lin turmentis. Li volus forpeli de si ĉiujn premantajn pensojn, tamen ili ankoraŭ obsedis lin, ĉar la afero, kiu ŝajne diferencis de ĉiuj aliaj, ne estis forviŝebla el lia memoro, eĉ se ia sovlo estus trovita. Li havis la senton, ke lia korpo estas kun io algluita, kaj eĉ lia koro iom nigrita, tiel ke li neniam povos relavi ĝin pura. Kiel ajn li malamis ŝin, kiel ajn li abomenis ŝin, ŝi kvazaŭ ĉiam ankoraŭ alkroĉiĝis al li. Ju pli li penis forigi sin el sia animo, des pli ofte ŝi ekaperadis antaŭ li en sia nudeco, proponante al li siajn tutajn malbelon kaj belon. Tio estis kvazaŭ aĉeti amason da senvaloraĵoj: inter malnovaj feraĵoj estas ankaŭ kelkaj briletantaj bagatelaĵoj, kiujn rifuzi estas malfacile. Li neniam antaŭe spertis tian intimecon kun iu ajn, kaj kvankam li estis surprizita kaj delogita, tamen tia interilato ne estas facile forgesebla. Eĉ se li penis ĝin forigi, ĝi povis tre nature volvi sin ĉirkaŭ lia koro, kvazaŭ ĝi enradikiĝus tie. Tio estis ne nur nova sperto, sed ankaŭ ia nepriskribebla perturbo, kiu jxetis lin en konfuzon. Li ne plu sciis kiel lukti kontraŭ ŝi, kontraŭ ŝi, kontraŭ si mem, kontraŭ la estanteco kaj la

estonteco. Li estis kiel insekteto kaptita en araneaĵo; kiel ajn forte li baraktis, estis jam tro malfrue.

Li portis kelkajn klientojn, absorbita en pensoj pri la tuta afero dum la kurado. La pensoj ne sekvis ian klaran ordon, sed direktiĝis jen al ia ideo, jen al ia sensaĵo, jen al iuj sentoj; ĉiu estis malpreciza kaj tamen proksima, reala. Li forte dezirus iri sola drinki, drinki ĝis plena ebrieco, kiu povus liberigi lin de lia animturmentiĝo. Sed li ne kuraĝis drinki. Li ne devis, pro tiu ĉi afero, ruinigi sin mem. Li penis pensi pri la aĉeto de sia propra rikiŝo, sed li jam ne povis bone koncentri siajn pensojn sur ĝin – io ĉiam deturnis lian spiriton. Antaŭ ol li povus prezenti al si la rikiŝon, tiu ĉi io jam enŝteliĝis kaj ekokupis lian animon, same kiel nigra nubo mallumigas la sunon.

Tiuvespere, kiam estis jam la tempo por ĉesigis la laboron, li sentis sin eĉ pli afliktita. Li devis reveni al la rikiŝejo, tamen li timis direkti siajn paŝojn tien. Kion fari, se li vidis ŝin? Tirante sian malplenan rikiŝon, li vagadis sur la stratoj kaj plurfoje proksimiĝis al la rikiŝejo, sed ĉiufoje li denove sin turnis aliloken, kvazaŭ lerneja knabo, kiu, unuafoje forvaginte dum lecionhoroj, ne kuraĝis reveni hejmen.

Strange, ju pli li volis ŝin eviti, des pli li sopiris ŝin vidi, kaj ju pli fariĝis mallume, des pli fortiĝis tiu ĉi sopiro.

Forte puŝata de ia nedirebla dezirego, li sentis sin sufiĉe aŭdaca por fari denovan provon, kvankam li sciis, ke ĝi estas nefarenda. Tio estis same kiel li en sia infaneco prenis strangon por inciti neston de krabroj – li timis, sed kun frapanta koro li tamen deziris fari la provon, kvazaŭ iu petolema diableto instigus lin al tio. La forto pli granda ol li mem kvazaŭ knedis lin en malgrandan bulon kaj ĵetis lin en flaman fajron. Li jam ne povis ĉesigi sian antaŭeniradon.

Li denove returnis sin al Ŝjianmen-strato, ĉi-foje ne kun hezito, intencante iri rekte en ŝian ĉambron por ŝin trovi. Ŝi jam ne estas iu ajn, ŝi estas nur virino. Li sentis sian tutan korpon flamiĝi. Kiam li alproksimiĝis al la pordego, en la lamplumon venis preterpasanto pli-ol-kvardekjara, kies vizaĝo kaj paŝmaniero ŝajnis al li konataj. Sed li hezitis lin alparoli. Anstataŭe li instinkte demandis, “Ĉu rikiŝon?”

La viro haltis, rigardis lin kaj diris: “Ŝjangzi?”

“Jes.” Ŝjangzi ekridetis. “Sinjoro Caŭ?”

S-ro Caŭ balancis la kapon kun rideto. “Nu, Ŝjangzi, se vi ne estas dungita ĉe iu alia, ĉu vi volus veni al mia hejmo? Tiu, kiu servas ĉe mi, estas tro mallaborema, li neniam purigas la rikiŝon, kvankam li ja kuras tre rapide. Ĉu vi

konsentas?”

“Kiel mi povus rifuzi, sinjoro?” Ŝjangzi kvazaŭ forgesis eĉ kiel ridi. Li senĉese viŝadis al si la vizaĝon per malgranda mantuko. “Kiam mi komencos, sinjoro?”

“Nu,” S-ro Caŭ pensis momenton, “do postmorgaŭ.”

“Jes, sinjoro.” Ankaŭ Ŝjangzi pensis momenton. “Nun mi portu vin hejmen, ĉu bone?”

“Ne necesas. Ĉu vi memoras, ke mi forveturis al Ŝanhajo por kelka tempo? Reveninte de tie mi ŝanĝis la loĝejon. Nun mi loĝas en la strato Bejĉangĝje kaj vespere mi eliras por promonado. Nu, ĝis postmorgaŭ!” S-ro Caŭ diris al Ŝjangzi la pordnumeron de sia loĝejo kaj poste aldonis: “Ni prefere uzu mian propran rikiŝon.”

Ŝjangzi preskaŭ eksaltis de ĝojo. Ĉiuj liaj ĉagrenoj de la lastaj tagoj malaperis tuj kaj tute, same kiel pavimŝtonoj estas lavitaj puraj kaj blankaj de pluvego. S-ro Caŭ estis unu el liaj antaŭaj dungantoj kaj, kvankam li laboris ĉe li ne longan tempon, tamen ili akordis tre bone. S-ro Caŭ estis tre afabla; cetere, li havis malgranda familion kun nur unu edzino kaj unu fileto.

Ŝjangzi tiris sian rikiŝon rekte al Rikiŝejo Harmonio. La lampo ankoraŭ lumis en la ĉambro de Huniŭ, kaj ekvidinte la lumon, li ekhaltis kvazaŭ ŝtoniĝinta.

Li staris tie longan tempon. Poste li decidis eniri, diri al ŝi, ke li jam trovis alian laŭmonatan laboron, pagi la rikiŝan lupagon por la du tagoj kaj depostuli de ŝi sian ŝparmonon. Tio signifis, ke unu fojon por ĉiam li rompos la rilatojn kun ŝi kompreneble, estis ne necese diri multon, por ke ŝi komprenu.

Li unue enremizigis la rikiŝon, poste revenis kaj kuraĝe kriis ŝian nomon.

“Envenu!” li puŝmalfermis la pordon. Ŝi oblikve kuŝis nudpieda en la lito, portante ŝian ĉiutagan veston. Ankoraŭ kuŝante tie ŝi demandis: “Nu? Ĉu vi venas por ree gustumi la dolĉecon, he?”

Ŝjangzi ruĝiĝis kiel la karmezine kolorigitaj ovoĵoj, kiujn la gepatroj de novnaskita infano disdonacas. Li staris tie longan momenton kaj poste diris malrapide: “Mi jam trovis alian laboron kaj komencos postmorgaŭ. La mastro havas sian propran rikiŝon...”

Huniŭ interrompis lin: “Distingi bonon de malbono vi ne scias, juna sentaŭgulo” Duone ridetante, duone kolerante ŝi sidiĝis kaj motris lin per la fingro. “Ĉi tie estas nutraĵoj kaj vestoj pretaj por vi. Ĉu vi pensas, ke nur ŝvitegi ekstere povas fari al vi plezuron? La maljunulo ne povas bridigi min kaj mi ne volas ĉiam esti fraŭlino dum mia tuta vivo. Eĉ se la maljunulo fariĝos obstina

kiel mulo, mi havas ĉe mi sumon da sekrete retenita mono, sufiĉan al ni por aĉeti du aŭ tri rikiŝojn. Luigante ilin, ĉiun tagon ni ricevos ĉirkaŭ unu jŭanon; ĉu tio ne estos pli bona ol se vi kurigos viajn kruraĉojn ĉie sur la stratoj? Do, je kio mi ne indas vin? Eble mi estas iom pli aĝa ol vi, sed ne multe. Kaj mi povas zorgi pri vi kaj profunde ami vin.”

“Mi volas tiri rikiŝon.” Ŝjangzi povis trovi neniun alian argumenton.

“Perfekta ŝtipkapulo! Sidiĝu, mi ne mordos vin!” Ŝi ekridis, montrante siajn kojnodentojn. Ŝjangzi sidiĝis kun taŭzita mieno. “Kie estas mia mono?”

“En la mano de la maljunulo. Vi ne perdos ĝin, do ne timu. Prefere ne depostulu ĝin, vi konas ja lian temperamenton. Kiam vi havos jam sufiĉe da mono por aĉeti rikiŝon, vi povos repreni ĝin de li kaj tiam ĝi ne malmultiĝos eĉ je unu kupra monero. Se vi nun depostulos ĝin, li certe verŝos sur vin krudajn instulojn, ĝis vi perdos la saĝon! Li estas bona al vi, vi perdsu neniom. Se vi perdos unu kupran moneron, mi donos al vi du. Vi kun via kampula napokapo – ne lasu vin prifrapa de mi!”

Ŝjangzi denove ne havis ion por diri. Li klinis la kapon, prifosis la poŝon kaj fine elpoŝigis la rikiŝan lupagon, kiun li metis sur la tablon: “Jen por du tagoj.” Li ekmemoris kaj aldonis: “Nun mi redonis la rikiŝon. Morgaŭ mi ripozos.” En efektiveco li tute ne havis la deziron ripozi, sed li sentis, ke tiamaniere li povas rompi kun ŝi pli nete. Redoninte la rikiŝon, li jam ne devis plu loĝi en Rikiŝejo Harmonio.

La tigrecna knabino alpaŝis al li, prenis la monon kaj enŝovis al li en la poŝon. “Por la lastaj du tagoj mi kaj la rikiŝo ambaŭ estas al vi senpagaj. Bonŝanculo vi vere estas, do nur ne estu sendanka!” ĉe la lastaj vortoj ŝi abrupte deturnis sin kaj ŝlosis la pordon.

Notoj:

1. Ĉiela Rivero aŭ Arĝenta Rivero: Ĉina nomo de la Lakta Vojo.
2. Vd. noton 6 da ĉapitro 1.
3. la Blanka Kabano: Bordelo de la plej malalta klaso.

VII

Ŝjangzi iris labori ĉe s-ro Caŭ.

Li sentis sin iom kulpa kontraŭ Huniŭ. Tamen, ĉar la tuta afero komenciĝis por ŝia tento kaj, krome, li ja ne celis trompakiri ŝian monon, li do ne vidis ion tro malhonoran en sia rompo kun ŝi. Kio maltrankviligis lin estis nur lia malgranda monsumo deponita en la manoj de Kvara Sinjoro Liŭ. Se li nun iros depostuli ĝin, la maljunulo probable elflarios ion suspektindan. Sed, se li de nun ĉiam evitos la tigrecan knabinon kaj ŝian patron, ŝi eble koleriĝos kaj klaĉos pri li ĉe la maljunulo, kaj tiam li neniam povos revidi tiun monon. Kaj se li plu konfidos sian monon al la maljunulo, li certe renkontos ŝin kiam ajn li iros al Rikiŝejo Harmonio, kaj tio estos por li tre embarasa. Ne povante trovi iun ajn bonan eliron, li fariĝis pli kaj pli maltrankvila.

Li tre volus konsulti s-ron Caŭ, sed kiel diri tion al li?

Tiu peco el lia travivaĵo koncerne Huniŭ ja estas io, kion li neniel povas rakonti al iu ajn. Ĉe tiu ĉi penso, li eksentis penton kaj ekkonsciis, ke tia interrilato ja ne estas tiel facile rompebla. Tiu afero estas kvazaŭ denaska haŭtmakulo, de kiu li neniam povas lavi sin pura. Senkaŭze li perdis sian rikiŝon kaj plie pro nenio li implikiĝis en tia afero, kaj nun ŝajnas al li, ke lia tuta estonteco jam estis perdita: kiel ajn forte li penos kaj klopodos, li neniam atingos ian sukceson dum sia vivo. Post longa meditado li venis al la konkludo: en la vino probable li devos humiligi sian fierecon kaj edziĝi al la tigreca knabino – prefere pro la konsidero al tiuj kelkaj rikiŝoj ol pro ŝi mem. Li estos kokrito, manĝanta alies manĝrestaĵon. La ideo estis netolerebla, sed finfine ĝi eble fariĝos fakto. Do li devas fari sian plejebulon por labori kaj ankaŭ por prepari sin kontraŭ la plej malbona okazo. Nun li jam ne estas tiel memfida kiel antaŭe. Liaj kresko, forto, decidemo ĉiuj estas kalkulataj kiel nenio, ĉar kvankam lia vivo apartenas al li, tamen li lasas sin regi de iu alia – tiu, kiu estas plej cinika estaĵo.

Laŭ normala rezonado li devus esti kontena, ĉar el ĉiuj dungantoj, ĉe kiuj li laboris, s-ro Caŭ estis la plej bona. La pago ne estis pli granda ol aliloke, kaj flanke de la kromsalajro ĉe la tri festoj oni apenaŭ povis ricevi ekstran monon, sed gesinjoroj Caŭ ambaŭ estis tre afablaj, kaj ili dece traktis ĉiujn senescepte. Kvankam Ŝjangzi estis tiel paseie deziranta parlabori pli da mono, tamen li ankaŭ volis havi sian propran ĉambron kaj sufiĉe da nutraĵo. En la domo de s-ro Caŭ ĉie regis pureco, eĉ en la ĉambroj por la servitoj. Ilia nutraĵo estis sufiĉe

bona kaj ili neniam donis malfreŝan manĝrestaĵon al la servistoj. Kun sufiĉe vasta loĝĉambro, tri regulaj manĝoj ĉiutage, plus afabla dunganto, Ŝjangzi, eĉ Ŝjangzi, ne povis pensi nur pri mongajnado.

Cetere, ĉar la manĝado kaj loĝado estis laŭgustaj kaj la laboro nepeza, li povis profiti la okazon por fortigi sian sanon. Se li nutrus sin je sia kosto, li certe ne manĝus tiel bone. Nun, kun siaj manĝaĵoj provizitaj kaj la ebleco ilin bone digesti, kial do li ne ĝissate manĝus? Nutraĵo kostas monon kaj li bone sciis, kiom ĝi valoras. Estis ja ne facile trovi dunganton, ĉe kiu li povis bone manĝi, bone dormi, kaj ten sian eksteron pura ka dece aspektanta

Plie, kvankam Caŭ-familianoj ne ludis maĝangon kaj malofte invitis gastojn, tamen por iaj kromtaskoj li povis ricevi ekstraĵn unu aŭ du ĝjaŭojn. Ekzemple, se s-ino Caŭ sendis lin por aĉeti pilolojn por la infaneto, ŝi nepre donis al li unu plian ĝjaŭon kaj diris al li, ke li veturu tien, kvankam ŝi sciis, ke li kuras pli rapide ol iu ajn alia. Tiu mono estis ja bagatela, taen en ĝi li trovis ion, kio varmigis lian koron.

Antaŭe Ŝjangzi laboris jam ĉe ne malmultaj dungantoj. El ili preskaŭ ĉiu kutime prokrastis pagi al servistoj salajron kiel li povis, por montri, ke li preferas tute ne pagi kaj ke servistoj en liaj okuloj estas ne pli bonaj, eble eĉ pli malbonaj, ol katoj kaj hundoj. Sed Caŭ-familianoj estis malsamaj, kaj tial plaĉis al Ŝjangzi ĉi tie. Li balaadis la korton kaj akvumadis la florojn, ne atendente iliaj ordonojn, kaj ĉiufoje, kiam ili tion vidis, ili diris kelkajn laŭdajn vortojn kaj iafoje eĉ elserĉis por li iajn malnovaj objektojn por interŝanĝi kontraŭ alumetoj, kvankam la objektoj estis ankoraŭ uzeblaj, kaj li retenis ilin por sia uzo. Tiaokaze li ĉiam sentis ian homamon.

En la okuloj de Ŝjangzi, Kvara Sinjoro Liŭ povis esti komparata kun Bravulo Hŭang Tjanba, kvankam terura, tamen ankaŭ prestiĝa. Li konis nur du grandajn historiaj figurojn, unu estis Bravulo Hŭang, kaj la alia – la saĝulo Konfuceo. Li apenaŭ havis ian ideon pri kio estis la saĝulo, sed li aŭdis, ke Konfuceo estis granda legosciulo kaj estis tre predenta. El la dungantoj, ĉe kiuj li laboris, iuj estis instruituloj, aliaj estis militistoj. El la lastaj neniu estis pli brava ol Kvara Sinjoro Liŭ. Koncerne la instruitajn, kvankam inter ili estis universitataj instruistoj kaj oficistoj kun komforta okupo en registara oficejo, el kiuj kompreneble ĉiu havis konsiderindan legoscion, tamen li renkotis ankoraŭ neniun, kiu estus afabla al siaj servistoj. Eĉ se iu mastro estus sufiĉe afabla, la mastrino kaj iliaj filinoj kontraŭe estis malfacile priserveblaj. Nur s-ro Caŭ estis kaj legoscia kaj afabla, kaj lia edzino gajnis ĉies koron per sia modesta konduto. Tial por Ŝjangzi s-ro Caŭ estis la saĝulo Konfuceo kaj, kiam ajn li provis

perzenti al si tiun grandulon, li imagis lin simila al s-ro Caŭ, ne konsiderante ĉu la saĝulo volus aŭ ne.

En efektiveco s-ro Caŭ ne estis tia brila persono. Li estis nur homo de meza kapablo, kiu sin okupis iatempje je instruado kaj alitempe je alia laboro. Li titolis sin “socialisto” kaj samtempe ankaŭ estis estetikulo, konsiderinde influita de William Morris. Kvankam havante neniun profundan opinion pri politiko kaj artoj, li havis unu fortan punkton, nome la kapablon praktiki siajn nemultajn kredojn en la bagatelaj aferoj de la ĉiutaga vivo. Li ŝajne jam vidis, ke li ne havas la talenton por fari mondskuajn heroaĵojn, tial li aranĝis siajn laboron kaj familion laŭ sia idealo. Tio, kvankam alportanta al la socio nenian utilon, estis almenaŭ honesta kaj evitigis lin fariĝi hipokritulo. Tial li donis specialan atenton al la malgrandaj aferoj de la vivo, kvazaŭ dirante, ke se nur li faras sian familion feliĉa, la cetero de la socio povas esti kia ajn al ĝi plaĉas. Tiu sinteno igis lin jen honti, jen kontentiĝi, ĉar sxajnis al li klara, ke la sola signifo de lia hejmo en la socio estas servi kiel malgranda oazo en la dezerto, povanta nur liveri nutraĵon kaj akvon al tiuj, kiuj venis en ĝin.

Feliĉe, Ŝjangzi venis en tiun ĉi oazon kaj, vaginte tiom longe en la dezerto, li sentis, ke tio estas miraklo. Li antaŭe neniam renkontis iun ajn similan al s-ro Caŭ kaj tial li identigis lin kun la saĝulo Konfuceo – pro sia sensperteco aŭ pro tio, ke tiajn personojn oni malofte vidas en la mondo. Portante en sia rikiŝo ialoken s-ron Caŭ, kiu estis tiel simple sed elegante vestita kaj aspektis tiel vigla kaj dignoplena, Ŝjangzi, alta kaj forta, kun ekstero pura kaj bonorda, kuris kun aparte granda plezuro, kvazaŭ nur li sola meritis tian mastron.

En ilia hejmo ĉie regis tia pureco kaj kvieteco, ke lia koro pleniĝis de paco kaj kontenteco en sia vilaĝo li ofte vidis maljunulojn, kiuj sin banis en la vintra suno aŭ sidis sub la aŭtuna luno, suĉante bambuan pipon, silenta kaj trankvila. Kvankam li tiam estis tro juna por imiti ilin, li tamen amis rigari ilin, konjektante, ke ili certe gustumas ian specialan plezuron. Nun, kvankam li estis en la urbo, la paco kaj la kvieteco en la domo de s-ro Caŭ rememorigis onin pri lia vilaĝo kaj emigis lin ekfumi pipon kaj ĝui ian guston.

Malfeliĉe la penso pri tiu virino kaj tiu negranda monsumoi ĉiam maltrankvilige obsedis lin. Lia koro estis kiel verda folio enplektita en silkajn fadenojn fare de raŭpo preparanta sian kokonon. Li estis tiel absorbita en sia penson, ke li ofte donis eraran respondon, kiam iuj, eĉ s-ro Caŭ, direktis al li demandon. Tio multe ĉagrenis lin. Caŭ-familio kutime enlitiĝis tre frue, kaj nokte post la naŭa li jam estis libera de sia laboro. Sidante sola en sian ĉambro aŭ en la korto, li ĉiam meditis pri tiuj du aferoj. Iafaĵe li preskaŭ decidis tuj

edziĝi al iu alia knabino, por meti finon al la esperoj de Huniŭ. Sed kiel li povus vivteni sian familion per rikiŝotirado? Li sciis, kian mizeran vivon liaj kamaradoj vivas en siaj domaĉoj. La viroj tiras rikiŝon, la virinoj faras flikadon, la infanoj kolektas neplene brulintajn karbopecetojn en cindroamasoj. Somere ili mordetas akvomelonaj ŝelojn trovitajn el inter forĵetaĵoj, kaj vintre la tuta familio iras al filantropia kuirejo por ricevi porcion da kaĉo. Ŝjangzi ne povus toleri tion. Kaj cetere, se li edziĝus, li nenial povus repreni de la maljunulo Liŭ sian ŝparmonon, kaj la tigreca knabino certe ne rezigne lasu lin. Li ne povas toleri la perdon de la mono, pro kiu li riskis sian vion.

Tiun sian rikiŝon li aĉetis en la frua aŭtuno de la lasta jaro. De tiam pasis pli ol unu jaro, kaj nun restis al li nenio alia krom la iom pli ol tridek ĵuanoj, kiujn li ne povis repreni al si, kaj la ĉagreno, kiu lin turmentis! Ju pli li pensis pri tio, des pli li malĝojiĝis.

Pasis pli ol dek tagoj post la Aŭtunmeza Festo. La vetero pli kaj pli malvarmiĝis. Li pensis, ke li devas havigi al si du novajn vestojn. Denove monon! Se li elspezos por vestoj, lia ŝparaĵo ne povos kreski, kaj kiel li povos plu nutri la esperon aĉeti al si rikiŝon? Kaj eĉ se li povos ĉiam labori kiel laŭmonata dungito, kia vivo do tio estos?

Iuvespere, portante s-ron Caŭ hejmen el la orienta urbo pli malfrue ol ordinare, pro sekureca konsidero Ŝjangzi prenis la ĉefvojon antaŭ la pordego Tjan'anmen. Sur la larĝa, glata strato apenaŭ viciĝis homoj. La venteto milde blovis, kaj la stratlampoj verŝis kvietan lumon. Li vigliĝis kaj kuris per grandaj paŝoj. Dume la bruo de liaj paŝoj kaj la delikata knarado de la rikiŝrisorto forgesigis al li la tutan ĉagrenon, kiu premis lian koron dum tiom longa tempo. Li malbutonumis sian jakon kaj lasis al la malvarmeta vetno karesi lian bruston. Estis al li tiel agrable, ke li kvazaŭ volis tiamaniere kuradi al iu ajn nekonata loko, kuradi ĝis la morto, kiu povus liberigi lin de ĉiaj zorgoj.

Li kuris pli kaj pli rapide, por ke li povu devanci ĉiun antaŭan rikiŝon, kaj post momento la pordego Tjan'anmen jam estis malantaŭ li. Liaj kruroj estis kiel risortoj: apenaŭ tuŝinte la teron, la piedoj jam resaltis supren. La radoj de la rikiŝo ruliĝadis tiel rapide, ke iliaj radioj estis nevideblaj kaj la pneŭmatikoj ŝajnis leviĝi de la tero, kvazaŭ la rikiŝo kaj ĝia tiranto ambaŭ estus portataj de forta vento. S-ro Caŭ probable jam duondormiĝis, karesate de la malvarmeta vento, ĉar alia li certe malpermisus al Ŝjangzi kuri tiel rapide. Ŝjangzi kuris tiel rapide kiel li povis, kun la duonklara ideo, ke se li ŝvitegas, li povos profunde dormi tiun nokton anstataŭ sendorme mediti en la lito. Nun ili jam estis ne malproksime de la strato Bejĉangĝje. La norda flanko de la vojo kuŝis en nigra

ombro de soforoj ekster la ruĝaj muroj. Apenaŭ Ŝjangzi ekdecidis malrapidigi sian kuradon, li jam trafis ian elstaraĵon sur la vojo. Unue lia piedo kaj tuj poste la rikiŝo frapiĝis kontraŭ ĝi. Li falegis vizaĝaltere, Krak! La rikiŝtimonetoj rompiĝis. “Kio estas?” ekkriis s-ro Caŭ, kiam li estis ĵetita al la tero.

Ŝjangzi ne respondis, sed li leviĝis sur la piedojn. Ankaŭ s-ro Caŭ facilmove leviĝis kaj ree demandis: “Kio okazis?”

Antaŭ ili kuŝis amaso de nove alportitaj ŝtonpecetoj por ripari la vojon, sed oni ne metis tie ruĝan lampon kiel avertilon.

“Ĉu vi vundiĝis?” Ŝjangzi demandis.

“Ne. mi piediros hejmen, vi tiru la rikiŝon.” S-ro Caŭ, ankoraŭ trankvila, iom palpis ĉirkaŭ la ŝtonamaso por kontroli, ĉu li perdis ion ajn.

Ŝjangzi serĉpalpis kaj trovis la rompitan timonet-pecon. “Ĝi difektiĝis ne grave. Enrikiŝiĝu, sinjoro, mi ankoraŭ povas tiri ĝin.” Li tiris la rikiŝon for de la ŝtonamaso. “Volu ensidiĝi, sinjoro!”

S-ro Caŭ ne volis plu veturi per la rikiŝo, sed, aŭdinte la ploreman paroltonon de Ŝjangzi, li cedis.

Kiam ili atingis la lampon ĉe unu fino de la strato Bejĉangĝje, s-ro Caŭ rimarkis frotvundon sur sia dekstra mano. “Ŝjangzi, haltu!” Ŝjangzi turnis sian kapon. Lia vizaĝo estis kovrita de sango.

Terurita, s-ro Caŭ povis trovi nenion alian por diri ol “Rapide, rapide...”

Miskomprenante la vorton, Ŝjangzi pensis, ke s-ro Caŭ urĝas lin pli rapide kuri. Li do kliniĝis antaŭen por peli siajn piedojn, kaj tre baldaŭ ili jam atingis la hejmon.

Kiam li demetis la rikiŝon, li rimarkis la sangon sur la mano de s-ro Caŭ kanj rapidis en la korton por peti de la mastrino ian medikamenton.

“Ne zorgu pri mi,” diris s-ro Caŭ, sekvante lin en la korton. “Unue pri vi mem!”

Ŝjangzi ekrigardis la si kaj komencis senti la doloron. Liaj genuoj kaj dekstra kubuto estis tranĉvunditaj. Tio, kion li antaŭe prenis por ŝvito sur sia vizaĝo, fakte estis sango. Tro konfuzita por fari ion ajn, eĉ por pensi, li sidiĝis sur la ŝtona perono de la pordego, gapante al la rompita timonetparo de la rikiŝo. Kontraŭ la freŝa nigra farbo la du timonetoj, ĉiu kun sia nuda blanka ekstremaĵo, elstaris nesimetrie kaj malbele, kiel la sorgotigoj krude elstrantaj el la subo de bela papera homfiguro, al iu oni ankoraŭ ne algluis kruojn. Li senpense fiksrigardis la du ekstremaĵojn.

“Ŝjangzi!” Onjo Gaŭ, la servistino de Caŭ-familio, laŭte vokis lin. “Ŝjangzi, kie vi estas?”

Li senmove sidis, kun la okuloj fiksitaĵoj sur la rompita timonetparo, kvazaŭ la du blankaj ekstremaĵoj jam enpikiĝus en lian koron.

“Kio estas al vi, tiel silente vin kaŝanta ĉi tie? Vi forte terurus min! la mastro vin vokas!”

Onjo Gaŭ kutime modulis sian paroltonon laŭ sia sento, tiel ke ŝia voĉo sonis ĉiam miksasente kaj kolorriĉe. Ŝi estis vidvino en la aĝo de tridekkelkaj jaroj, purema, malkaŝema, energia kaj zorgema. Ŝiaj aliaj mastroj trovis, ke ŝi estas tro babilema kaj tro opinidonema, de tempo al tempo alprenante ian misteran mienon. Sed, ĉar la Caŭ-familanoj ŝatis homojn puremajn kaj malkaŝeajn kaj ne donis multan atenton al iliaj negravaj malfortaĵoj, tial ŝi servis ĉe ili jam du aŭ tri jarojn, kaj ili prenis ŝin kun si eĉ kiam ili vojagis.

“La mastro vokas vin!” ŝi ree diris. Kiam Ŝjangzi stariĝis, si vidis la sangon sur la vizaĝo. “Ho, mia ĉielo! Ho, vi teruras min ĝis morto! Kio do okazis? Tuj vin movu, se vi ne volas esti trafita de tetano. Rapidu! La mastro havas medikamenton!”

Ŝjangzi iris, sekvate de Onjo Gaŭ lin riproĉanta, en la kabineton de s-ro Caŭ, kie s-ino Caŭ estis bandaĝanta la manon de sia edzo. Ekvidinte Ŝjangzi, ankaŭ ŝi ekkris de konsterno.

“Ĉi-foje li ja peze falegis, sinjorino!” Onjo Gaŭ timis, ke ŝia mastrino ne rimarkos lian vundon. Ŝi rapide verŝis akvon en la lavpelson kaj diradis senĉese, eĉ pli rapide: “Jam delonge mi sciis, ke pli-malpli frue okazos al li io, tiel senbride li ĉiam kuras! Ĉu mi ne pravis, he? Nu, tuj lavu vin kaj poste prenu iom da medikamento. Ho, vere terure!”

Ŝjangzi staris senmove, tenante sian deskstran kubuton per la alia mano. Estis tute ne dece, ke en tiu pura kaj bonguste aranĝita kabineto staris tiu ĉi grandkreska viro kun vizaĝo konvrita de sango. Ŝajnis, ke ciuj jam tion konscias, ke eĉ Onjo Gaŭ ĉesigis sian parolon.

“Sinjoro!” Ŝjangzi klinis sian kapon, lia voĉo estis mallaŭta, sed energia. “Volu trovi iun alian, mi petas. Retenu la salajron de tiu ĉi monato por pagi la riparon. La timonetoj rompiĝis, kaj la vitro de la maldekstra lampo estis frakasita. Ĉiu alia parto estas en ordo.”

“Antaŭ ĉio, lavu vin kaj uzu iom da medikamento.” S-ro Caŭ rigardis sian manon, kiun lia edzino estis malrapide bandaĝanta.

“Unue vin lavu!” Onjo Gaŭ denove aŭdigis sian voĉon. “La mastro ja ne riproĉis vin, ne diru tiajn vortojn!”

Ŝjangzi ankoraŭ ne moviĝis. “Ne necesas. Mi baldaŭ resaniĝos. Kiam iu laŭmonate-dungita rikiŝisto ĵetfalis sian mastron kaj difektas la rikiŝon, li ne

plu havas la vizaĝon por...” Li ne povis bone esprimi sin per vortoj, tamen lia emocio jam plene elverŝiĝis kaj li preskaŭ eksplodis en ploron. En la okuloj de Ŝjangzi, forlasi sian laboron kaj rezigni la salajron preskaŭ egalas memmortigon. Tamen liaj devo kaj memrespekto ĉi-momente ŝajnas al li pli gravaj ol la vivo mem, ĉar tiu, kiun li ĵetfalis, estis ĝuste s-ro Caŭ, ne iu ajn alia. Se li faligus tiun s-inon Jang, tio estus por ŝi justa, ĉar ŝi tion meritis. Kontraŭ ŝi li povus krude agi kiel bruema kverelanto sur la strato, ĉar ne necesus esti ĝentila al ŝi pro tio, ke ŝi neniam traktis ilin kiel homon. Mono estas ĉio, dum memrespekto kaj deco estas sensencaĵoj – jen la ĝenerala regulo.

Sed s-ro Caŭ ne apartenas al iu kategorio, kaj tial Ŝjangzi devas rezigni la monon por konservi sian memrespekton. Li plendas en si kontraŭ neniuj, nur kontraŭ sia propra sorto kaj preskaŭ ekintencas ne plu okupiĝi pri la rikiŝotirado post sia forlaso de la domo de s-ro Caŭ. Ĉar lia propra vivo valoras neniom, li povas fari kion ajn li volas, riskante sian vivon; sed, koncerne alies vivon, li ne rajtas tiel agi. Se vere li akcidente morgigus iun, kion do fari? Antaŭe li neniam pensis pri tio, sed tiu ĉi akcidento, kiu kaŭzis vundon al s-ro Caŭ, vekis lin al tiu ĉi problemoj.

Jes, li povis rezigni la monon kaj ŝanĝi sian okupon, je kiu li devis respondi pri alies vivo. Rikiŝotirado ja estis por li la ideala okupo kaj forlasi ĝin signifus rezigni la tutan esperon. Ŝajnis al li, ke la sorto jam destinis, ke li ĉiam vivu sencele kaj mizere, do estas senutile nun plu pensi eĉ pri la deziro fariĝi bona rikiŝisto. Vane li elkreskis tiel alte!

Antaŭe, kiam li portis okazajn pasaĝerojn en la stratoj, aliaj insultis lin pro tio, ke li forrabis de ili la negocojn, tiam li povis pravigi sian senhontan agon per tio, ke li, ambicia kaj strebema, volas aĉeti al si propran rikiŝon. Sed nun, post tiu ĉi akcidento, kion li povus diri por sin pravigi? Se disvastiĝos la diro, ke li vundis sian mastron kaj difektis la rikiŝon, li fariĝos ridindaĵo – ulo, taŭga por fari nenion, kaj tiam por li estos nenia eliro! Do li nun devas foriri antaŭ ol s-ro Caŭ lin maldungos.

“Ŝjangzi.” La mano de s-ro Caŭ jam estis bandaĝita. “Lavu vin. Ne parolu pri via maldungiĝo. Tio ne estis via kulpo, la vojistoj ja devis meti ruĝan lampon apud tiu ŝtonamaso. Forgesu tion, lavu vin kaj uzu iom da medikamento.”

“Jes, sinjoro.” Onjo Gaŭ denove intermetis. “Ŝjangzi nun havas amaran honton kaj tion li meritas, tiel grave li vundis la mastron! Sed ĉar la mastro jam diris, ke tio ne estis via kulpo, vi do ne bezonas tiel ĉagreniĝi. Jen, rigardu, kun

korpo tiel granda kaj fortika, li tamen ankoraŭ sin tenas kiel infano! Bonvole diru al li, sinjorino, ke li ĉesu esti maltrankvila!” la parolmaniero de Onjo Gaŭ similis gramofondiskon, senĉese rondirantan kaj enkondukantan ĉiun kun neniam peno.

“Tuj forlavu la sangon, teruran aspekton vi havas!” jen ĉio, kion s-ino Caŭ diris.

Ŝjangzi havis grandan haŭson en la kapo, sed, ekaŭdinte, ke s-ino Caŭ timas sangon, li kvazaŭ trovis rimedon por ŝin trankviligi. Li elportis la lavpelson kaj iom lavis al si la vizaĝon ekster la kabineta pordo. Onjo Gaŭ atendis ĉe la pordo, kun boteleto da medikamento en la mano.

“Kiel pri la kubuto kaj genuoj?” ŝi demandis, ŝmirante iom da antisepsaĵo sur lian vizaĝon.

Ŝjangzi skuis sian kapon. “Ne grave!”

Gesinjoroj Caŭ iris dormi, kaj Onjo Gaŭ, ankoraŭ kun la medikamenta boteleto en la mano, sekvis Ŝjangzi el la kabineto en lian ĉambron. Demetinte la boteleton, ŝi diris ĉe la pordo: “Post kelka tempo mem ŝmiru. Kaj ne lasu vin tial afliktiĝi pri tiu ĉi malgranda akcidento. Antaŭe, kiam mia edzo vivis, ankaŭ mi ofte memvole forlasis mian okupon. Unue, ĉar tiam mia sentaŭga edzo senfare restis hejme dum mi penlaboris ekstere, kio faris min incitiĝema; dua, ĉar juna homo havas temperamenton, kaj se iu ofendetis min, mi tuj flamiĝis kaj foriris, dirante: ‘Mi laboras por mono, ne sklavino mi estas. Vi havas vian fiodoran monon, sed sciu, eĉ argila figuro havas sian teran econ. Mi ja ne volas servi ĉiun ajn!’ sed nun mi jam multe sangiĝis. De post la morto de mia edzo, mi ne plu havas zorgojn kaj ĉagrenon, kaj tial mia temperamento iom pliboniĝis.

“Koncerne ĉi tiun lokon, mi laboras ĉi tie jam preskaŭ tri jarojn – jes, tute ĝuste, mi komencis labori ĉi tie, la naŭan de la naŭa monato. Ĉi tie ja ne estas multe da trinkmono, tamen ili traktas nin bone. Ni vendas niajn muskolfortojn ja por mono kaj belaj vortoj servas al ni por nenio. Sed, aliflanke, estas pli bone direkti nian rigardon pli malproksimen. Se vi forlasis vian okupon ĉiun duan aŭ trian tagon, vi estus senlabora ĉirkaŭ ses monatojn jare, kaj tio certe estus ne malgranda perdo. Do prefere trovu afablan dunganton kaj laboru ĉe li longatempe. Kvankam vi ne ricevas multe da trinkmono, tamen post sufiĉe longa tempo vi ankaŭ povos havi ian ŝparitan monsumon.

“Pri la hodiaŭa okazintaĵo la mastro ja diris nenion riproĉan, do forgesu ĝin. Kial ne?” mi ne volus fanfaroni per mia aĝo, sed vi ja estas ancoraw juna kaj ekscitiĝema. Ne necesas esti tia. Eksploredema temperamento ne servas por

plenigi la stomakon. Honesta kaj laborema, kiel do vi ne volas trankvile resti ĉi tie kelkan tempon? Tio estos pli bona ol vagadi de loko al loko. Ne por ilia bono, sed por la via, mi tiel parolas. Ĉi tie ni kunestas tiel bone, ĉu ne?”

Ŝi haltis por ekspiro kaj poste aldonis: “Nu, ĝi morgaŭ! Kaj ne estu obstina kiel mulo. Mi estas sincera kaj ĉio, kion mi diris, ja venis rekte el mia koro.”

La dekstra kubuto de Ŝjangzi multe doloris lin, kaj li ne povis ekdormi ĝis post la noktomezo. Post multfoja pesado li venis al la konkludo, ke Onjo Gaŭ estas prava. Ĉio alia estas falsa, nur mono estas vera. Li devas ŝpari monon por sia rikiŝo, kaj eksplodema temperamento ne servas por plenigi la stomakon. Atinginte tiun ĉi decidon, li eksentis sin trankvila kaj iom dormema.

Notoj:

1. Vd. noton 4 de ĉapitro IV.
2. William Morris (1834-1896): Angla poeto, pentristo.
3. la pordego Tjan'anmen: la ĉefa pordego de la iama imperiestra palaco, situanta je la centro de Pekino.

VIII

S-ro Caŭ riparigis la rikiŝon kaj ne dekalkulis la koston el la salajro de Ŝjangzi. S-ino Caŭ donis al li du pilolojn kontraŭ ekstera vundo, kiujn li ne prenis. Li ne plu diris ion pri la forlaso de sia laboro. Dum pluraj tagoj lin obsedis honto, sed finfine la konsilo de Onjo Gaŭ gajnis la venkon. Post nelonge, kiam la vivo denove estis en ordo, li iom post iom forgesis la akcidenton kaj la espero ree ĝermis en lia koro. Ĉiufoje, kiam li sidis sola en sia ĉambro, meditante pri la maniero kiel ŝpari monon por aĉeti al si rikiŝon, liaj okuloj radiis kaj li senĉese murmuris al si kvazaŭ homo duonfreneza. Liaj kalkulmetodoj ne estis bonaj, sed li konstante ripetis, kiel en la kapo, tiel per la buŝo, “sesoble ses faras tridekses”. Fakte ĝi apenaŭ havis ian rilaton al la sumo de lia mono, sed ĝia konstanta ripetado firmigis lian memfidon, kvazaŭ li vere havus konton.

Li multe admiris Onjon Gaŭ, opiniante, ke ŝi estas eĉ pli sagaca kaj pli kapabla ol viroj ordinaraj, kaj ke ŝiaj paroloj estas plej ofte celtrafaj. Li ne kuraĝis proponi sin mem kiel ŝian kunbabilanton, sed kiam li okaze renkontis ŝin en la korto aŭ ĉe la pordego, kaj se tiam ŝi havis tempon por iom babili kun li, li tre volonte aŭskultis ŝin. Ŝiaj vortoj ĉiam indis lian longa pripensadon, kaj tial ĉiufoje, kiam li renkontis ŝin, li mirstulte ekridetis, por montri al ŝi, ke li admiras ŝiajn vortojn, kaj pro tio ŝi sentis sin iom fieraj kaj volis iom babili kun li eĉ tiam, kiam ŝi estis okupita.

Sed pri la maniero kiel disponi pri sia mono, li ne kuraĝis facilanime sekvi ŝian konsilon. Ŝia ideo, laŭ lia opinio, vere ne povis esti kalkulata kiel malbona, sed ĝi ŝajnis pli aŭ malpli riska. Li tre deziris aŭskulti ŝin, por lerni de ŝi pli da saĝo kaj igi sian koron senŝarĝiĝi. Sed en agoj li ancoraw tenis sin je sia malnova principo – ne facilanime ellasi la monon el sia mano.

Jes, Onjo Gaŭ ja estis saĝa: de kiam ŝi vidviniĝis, ŝi pruntedonadis la malmultan monon, kiun ŝi povis ŝpari ĉiumonate, po unu aŭ du ĵuanoj al servistoj, dua- aŭ triarangaj policanoj kaj etkomercistoj kun interezo de almenaŭ 30 procentoj. Tiuj homoj ofte bezonas monon tiel urgx, ke ecx se oni pruntedonus al ili monon kun interezo de 100 procentoj, ili ĝin prenis; alie la mono ne povas esti vidata de ili. La mono, kiun ili vidas, estas venena kaj, post kiam ili ĝin ricevas, povas elsuĉi ilian tutan sangon; sed malgraŭ tio ili devas ĝin preni. Ĉion, kio povas servi por prokrasti ilian morton, ili kuraĝas preni, ĉar la vivo estas por ili ĝuste la prokrasto de la morto. Onjo Gaŭ, dum ŝia edzo

vivis, iam suferis de tiu ĉi veneno. Ĉiufoje, kiam ŝi edzo ebriiĝinte venis al ŝi, ŝi ne povis foririgi lin sen doni al li unu jŭanon. Se tiam ŝi ne havis monon por doni, li duondelire bruegis ĉe la pordego de la domo, en kiu ŝi servis, tiel ke ŝi povis fari nenion alian ol tuj pruntepreni tiun unu jŭanon, kiel ajn alta estis la interezo. El sia propra sperto ŝi ĉerpis tiun ĉi rimedon, kiun ŝi uzis ne por sia venĝo, sed por racia, preskaŭ urgxa, bonfarado. Unu urĝe bezonas pruntepreni, alia estas preta pruntedoni – jen afero de volonteco.

Laŭ ŝia opinio, se la celo ne estas malbela, ŝi devas uzi rimedojn pli severajn – ŝi ne povas lasi sian monon forflosi sur akvo. Kion oni faras, pri tio oni devas esti kompetenta. Por ke ŝia ŝparaĵo ne tute perdiĝu, necesas al ŝi akravideco, artifiko, singardemo akj aŭdaco, kaj pro tio ŝi ne estas malpli zorgoŝarĝita ol bankiero, ĉar ŝi bezonas esti pli singarda. La kapitalo povas esti granda aŭ malgranda, sed la principo estas la sama, ĉar kapitalisma estas la socio, kiu similas kribrilegon kun tre malgrandaj truetoj. Kiam ĝi estas uzata por kribri monon, nur malgrandaj moneroj povas pasi tra ĝiaj truetoj; dume la principo povas facile tragliti malsupren, kiel ajn malgrandaj estas la truetoj, ĉar ĝi estas senkorpa. Oni diris, ke Onjo Gaŭ estas malfacile traktebla, kaj tion ankaŭ ŝi mem konfesis. Ŝia malfacile-traktebleco elforĝiĝis el ŝiaj mezero kaj suferitaj turmentoj. Ekpensante pri siaj antaŭaj suferoj kaj la senkompateco eĉ de sia propra edzo, ŝi kunpremis la dentojn. Ŝi povis esti kiel afabla, tiel ankaŭ kruela, kaj ŝi sciis, ke alie ŝi ne povus vivi en tiu ĉi mondo.

Tute el bona intenco ŝi konsilis ankaŭ al Ŝjangzi pruntedoni sian monon kontraŭ interezo, dirante, ke ŝi povos lin helpi, se li volos tion fari.

“Aŭskultu min, Ŝjangzi: tenate en via poŝo, unu monero restas ĉiam unu monero! Sed prunedonite ĝi ja povos naksi novan monon! KREDU al mi, miaj okuloj ja estas akraj! Certigu vin pri la fidindeco de pruntopetantoj, antaŭ ol fari prunedonadon, alie via mono estos tute poerdita. Se pruntepreninte policano ne pagos al vi la interezon je fiksita dato aŭ ne redonos la pakitalon, iru denunci lin al lia estro, kaj tiam li, unuvorte, estos eksigita! Aŭ bone informiĝu pro la dato de ilia salajr-ricevo kaj iru al la policejo por eldevigi la redonon. Malkonfesi la ŝuldon? Absolute neeble! Tute egale, ĉu la sumo estos unu aŭ dek jŭanoj, ĝi estu prunedonita al fidindulo. Se petanto estos fidinda, prunedonu; alie via mono estos ĵetita kvazaŭ en maron. Aŭskultu mian konsilon, kaj vi havos bonon.”

Ne necesis al Ŝjangzi diri ion ajn lia mieno jam sufiĉe esprimis oian admiron al la vortoj de Onjo Gaŭ. Sed post ioma konsidero li tamen venis al la opinio, ke plej sekure estas teni la monon en la propra mano. Vere, en lia mano

la mono estas morta kaj ne naskos novan monon, sed ĝi neniel povos esti perdita, — ankaŭ tio etas certa. Li delikate elprenis la kelkajn arĝentajn jŭanojn, kiujn li ŝparis en la lastaj monatoj, kaj sensone palpadis ĉiun el ili. La arĝentaj moneroj estis tiel brileblankaj, dikaj kaj okulplaĉaj, ke li des pli ne volis lasi ilin for el siaj manoj, krom se per ĝi li aĉetus rikiŝon. Ĉiu havas sian apartan maniero de mondisponado, do ne necesis al li sekvi tiun ŝian konsilon.

Iam antaŭe li dungiĝis ĉe iu sinjoro, kies familinomo estis Fang. Ĉiuj familianoj de la sinjoro kaj eĉ liaj servistoj havis kurantan konton ĉe la poŝto. S-ino Fang iam konsilis Ŝjangzi: “Per ne malpli ol unu jŭano ŝparlokita oni povas malfermi konton. Kial vi ne tion faris? Proverbo diras: ŝparu kiam bone, vi havos kiam bezone. Estante juna kaj forta, vi devas ŝpari kelkan monon, ĉar el la tuta jaro ne ĉiu tago estas bela. La ŝparlokado estas simpla, sekura kaj krome ankaŭ interezdona. En okazo de urĝa bezono vi ankaŭ povos libervole repreni iom el la mono ŝparlokita por via uzo. Kio alia do povus esti pli oportuna, he? Iru kaj havigu al vi formujlon de kont-malferma peto. Se vi ne scias skribi, mi plenigos ĝin anstataŭ vi. Mi ja estas tute por via bono!”

Sciante, ke ŝi diris ĉion ĉi tute el bona intenco, kaj ke ankaŭ la kuiristo Sesa Ŭang kaj la nutristino Onjo Ĉin ambaŭ havas kurantan konton ĉe la poŝto, Ŝjangzi tre volus tion provi. Sed kiam iun tagon fraŭlino Fang sendis lin deponi por ŝi dek jŭanojn, li ŝanĝis sian intencon. Tiam li detale pririgardis la deponlibreton, kiu estis tiel malpeza kiel peco da neceseja papero pluroble faldita, kaj la vortojn kaj malgrandajn ruĝajn stampojn en ĝi. Li donis la monon al kasisto, kaj tiu skribis kelkajn vortojn kaj metis malgrandan stampon en la deponlibreton, ĉion ĉi li trovis nepra trompo. Fordoni brileblankajn arĝentajn monerojn, por ricevi kalkajn skribitajn vortojn – tiel trompiĝi li ne voli. Li suspektis, ke Fang-familio havas iajn rilatojn kun tiu ĉi negoco de la poŝto, kiu, laŭ lia opinio, havas ĉie filiojn jam longe ekzistantajn, kaj ĝuste pro tio s-ro Fang kaj lia edzino tiel fervore varbas klientojn por ĝi. Eĉ se en efektiveco tio ne estas trompo, la kontanta mono en la mono ja estas multe pli certa ol en la malgranda deponlibreto! La mono en la deponlibreto estas nur kelkaj vortoj

Koncerne bankojn, li sciis nur ke ili estas lokoj, kie li povas trovi por sia rikiŝo klientojn. Se plicanoj ne malhelpas rikiŝparkadon proksime de bankoj, li certe povas tie havigi al si klientojn. Pri tio, kion oni faras en la bankoj, li havis nenian ideon. Jes, tie certe estas multtego da mono, sed kial oni venas nur tien por manipuladi la monon, li ne sciis. Kiel ajn estis, li mem tamen ne povis facile ekhavi rilatojn kun ili, kaj tial ne necesis al li cerbumi pri tio. En la urbo ja estis multaj aferoj por li nekompreneblaj, kaj ju pli li aŭdis siajn amikojn

babiladei pri ili en tetrinkejoj, des pli lia kapo konfuziĝis, ĉar iliaj diroj estis inter si diferencaj kaj, cetere, ne konvinkoplenaj. Li ne plu volis aŭdi ilin, nek pensi pri tiuj aferoj. Li sciis nur, ke se oni irus fari rabon, plej bone estus pirabi bankon. Sed en efektiveco li ne volis esti rabisto, li do prefere bone tenu sian monon en la mano kaj zorgu pri nenio alia. Li opiniis, ke plej bona estas tia agmaniero.

“Mi scias, Ŝjangzi, ke vi ne volas pruntedoni vian monon kontraŭ interezo, ĉar vi deziras pli frue aĉeti al vi rikiŝon. Ankaŭ tio estas bona ideo. Se mi estus viro kaj ankaŭ rikiŝisto, mi prefere tiru mian propran rikiŝon. Se kantanto povas mem akompani sin per muzikilo, al li ne necesas peti alies helpon ĉe kantado tiaokaze mi ne volus esti eĉ guberniestro, se oni nomumus min tia! Vere la rikiŝotirado estas peniga okupo, sed se mi estus viro forta, mi preferus fari rikiŝotiradon, ol esti policano. Kiel en vintro, tiel en somero policanoj devas ĉiam stari surstrate, tamen ili estas tiom malmulte salajrataj, sen kroma enspezo kaj plena aglibereco; apenaŭ ili maljuniĝas, ili estas eksigitaj: unuvorte, prosperi al ili tute ne eblas. Nu, mi revenu al la afero! Se vi volas kiel eble plej frue aĉti rikiŝon, mi donas al vi bonan konsilon: fondu interhelpan societeton el ĉirkaŭ dek, maksimume dudek, personoj. Se ĉiu persono kontribuos du jŭanojn monate kaj vi la unua prenos el la komuna kaso, ĉu tiam vi ne tuj havos ĉirkaŭ kvardek jŭanojn? Kredeble vi jam havas kelkan ŝparaĵon; kunigante la du sumojn, vi jam povos aĉeti al vi rikiŝon por tiri, jen kia simpla afero! Ekhavinte la rikiŝon, vi bezonos nur plu fari regule vian kontribuadon ĝis la fino de la interhelpa societo. Tiu ĉi afero, kiu estas honesta kaj postulas nenian interezon, certe plaĉos al vi. Se vi vere incicias interhelpan societeton, mi nepre partoprenos en ĝi, tute senhezite! Ĉu bone?”

Tio vere igis la koron de Ŝjangzi bati iom pli rapide! Se li vere povos sukcese havigi al si tridek aŭ kvardek jŭanojn, kunigante ilin kun la pli ol tridek jŭanoj tenataj en la mano de Kvara Sinjoro Liŭ kaj la kalkaj en sia mon, ĉu tiam li ne jam havos ĉirkaŭ okdek jŭanojn? Kvankam la sumo ne sufiĉos por aĉeti rikiŝon centprocente novan, tamen por okdek-procente nova ĝi ja sufiĉos. Cetere, tio ankaŭ ebligas al li repreni de Kvara Sinjoro Liŭ la monon, ke ĝi ne plu tiel restu en ties mano. “Nu, bone,” Ŝjangzi pensis en si, “mi do unue prenu okdek-procente novan por provizora uzo kaj poste, kiam mi havos sufiĉe da mono, mi ŝanĝos ĝin por pli nova.”

Sed kien do li sin turnos, por inviti tiom da personoj bezonotaj, eĉ se li sukcesos en tio, ĝuste pro amikeco oni aliĝos al la interhelpa societo. Nun li havas urgan bezonon de mono kaj incicias interhelpan societeton, sed poste se iu

iniciatos alian tian societeton kaj invitos lin al ĝi, kion do li faros? En la nunaj malfacilaj tempoj ja ofte okazas antaŭtempa disiĝo de interhelpa societo! Ne, brava vrito ne devas peti alies helpon. se la sorto permesas al li aĉeti rikiŝon, li aĉetu kun nenies helpo!

Vidante, ke Ŝjangzi restas silenta, Onjo Gaŭ volus iom moki lin, sed ekpensante pri liaj simpleco kaj honesteco, ŝi sin detenis kaj diris: “Brave, vi nekonvinkebla peco! Nu, bone, agu laŭ via bontrovo.”

Ŝjangzi diris ankoraŭ nenion. nur post kiam Onjo Gaŭ foriris, li balancis la kapon al si, kvazaŭ esprimante admiron al sia nekonvinkebla obstineco, kaj lia koro estis ĝojplena.

Estis jam frua vintro. Nokte, en la stratetoj, inter la krioj de “Dolĉajn rostitajn kaŝtanojn!” kaj “Ternuksojn!” nun aŭdiĝis ankaŭ la malalta malgaja voko “Noktova-a-azon!” en siaj korboj la noktovazo-vendanta kolportiso ankaŭ havis fajencajn ŝparmonuojn en formo de globo, kaj Ŝjangzi elektis por si unu el la plej grandaj. Ĉar li estis la unua aĉetanto, la kolportisto ne povis trovi monerojn por doni la restaĵon. Kaj Ŝjangzi, ekvidinte kuriozan noktovazeton brile helverdan, kun paŭtanta buŝeto, ne povis sin deteni de ekdeziro ĝin aĉeti kaj diris: “Ne necesas doni la restmonon. Donu al mi unu el tiuj!”

Demetinte la ŝparmonujon Ŝjangzi enportis la verdan noktovazeton en la internan ĉambron. “la sinjorido ankoraŭ ne enlitiĝis, ĉu ne? jen estas malgranda ludilo!”

Tiam ĉiuj estis rigardantaj Ŝjaŭŭen, la fileton de gesinjoroj Caŭ, kiu estis sin bananta. Ekvidinte la donacon de Ŝjangzi, ili ĉiuj ne povis sin deteni de ekrido. Gesinjoroj Caŭ ne diris ion. Ili probable sentis, ke, kvankam la donaco estas kruda, tamen lia bonvolemo estas akceptenda kaj tial ili ambaŭ ridetis kun dankemo. Kompreneble, Onjo Gaŭ ne povis lasi sian buŝon ripozi.

“Rigardu, kion vi aĉetis, Ŝjangzi! Ĉu vi, homo grandkreska, povus elhavi tian ideon? Fi, kia malbela aĵo!”

Al Ŝjangzi tre plaĉis la ludilo kaj li tuj enigis iom da banakvo en ĝin. “tiu ĉi malgranda tekruĉo havas grandan buŝon!” li ĝoje kriis.

Ĉiuj ridis eĉ pli forte. Ŝjangzi ordigis siajn vestojn – ĉar li, tute ekster si de ĝojo, ne sciis kion fari – kaj eliris. Li ĝojis, ĉar tio estis la unua fojo, ke ĉiuj turnis sian ridantan vizaĝon al li, kvazaŭ li estus ia tre grava persono. Ridetante, refoje li eligis siajn kelkajn arĝentajn monerojn kaj delikate, unu post alia, enmietis ilin en sian fajencan ŝparmonujon. Li diris en si: “Tio ĉi ja estas la plej fidinda metodo! Kiam mi ŝparos al mi sufiĉe, mi ĵetos tiun ĉi ŝparmonujon kontraŭ la muron kaj krak’, tiam estos pli da moneroj ol rompopecoj!”

Li decidis neniam plu peti ies helpon. eĉ Kvara Sinjoro Liŭ, kiu estis tiom fidinda, iafoje ŝajnis al li ne inda, ke li sin turnu al li kun peto. Mono en la manoj de tiu maljunulo vere estis sufiĉe sekura, sed malgraŭe li sentis sin iom maltrankvila. Mono estas kiel ringo, kiun oni prefere ĉiam portas sur sia propra fingro. Farinte tiun ĉi decidon, li sentis sian koron faciliĝinta, kvazaŭ li jam estus iom plistreĉinta sian zonon, ke lia brusto fariĝus pli elstaranta kaj pli firma ol iam ajn.

Estis pli kaj pli malvarme, sed tion Ŝjangzi kvazaŭ ne sentis. Nun ke li havis difinitan celon, ŝajnis al li, ke ĉirkaŭe fariĝis multe pli lume, kaj sekve li ne plu povis senti malvarmon. La unua glacio vidiĝis sur la tero, ecs la trotuaroj glacie krustiĝis. Ĉio estis seka kaj solida. La nitra tero montriĝis iom flava, kvazaŭ jam foriĝus la tuta humido. Precipe en la frumateno la vojsulkaj plugitaj de ĉaroj iĝis inkrustitaj per prujno, kaj penetrantaj blovoj de frosta venteto dispelis la ĉielruĝon por malkaŝi la ekstreme serenajn ĉielon. Eĉ tiam Ŝjangzi volis eliri kaj kurante tiri la rikiŝon, ke la frosta vento penetru en liajn manojn, ekstremigante lin, kvazaŭ li prenis malvarman banon. Iafaje leviĝis furioza ventego, kiu batis lin preskaŭ ĝis perdo de la spiro; sed li, kun klinita kapo kaj kunpremita dentoj, penege kuris antaŭen, kvazaŭ granda fiŝo naĝanta kontraŭ la fluo. Ju pli forta la vento, des pli firma estis lia rezisto, kvazaŭ tio estus vivo-morta batalo. Kiam subita ekblovo de forta kontraŭvento premis lin tiel, ke li ne povis spiri, li tenis sian buŝon fermita dum kelkaj minutoj, poste ellasis rukton, kvazaŭ li estus jam plonĝinta en profundan akvon. Post la rukto li plu kuris antaŭen, borante al si vojon, kun ĉiu muskolo streĉita; kaj nenio povis halltigi tiun ĉi giganton. Li estis kvazaŭ verda insekto, kiu, atakita de formikoj, tremis per la tuta korpo en sia rezisto

Kaj kian ŝviton li ŝvitis! Post kiam li demetis la timonetojn kaj rektigis sian talion, li tiris profundan spiron kaj forviŝis la polvon de ĉirkaŭ la buŝo kaj li havis la senton, ke li estas vere nevenkebla. Vidante, ke la vento balaas la polvon preter li, li kontente balancis la kapon, la vento fliksis la arbojn, la vojon borderantajn, disŝiris la tolajn butikŝildojn, fortiris ĉiujn afiŝojn de sur la muroj. Ĝi vualis la sunon, ĝi kantis, kriis, hurlis, resonis. Iafaje ĝi furioze kuregis antaŭen kvazaŭ terurita spirito, deŝirante la ĉielon de la tero; kaj subite, kvazaŭ en paniko, ĝi kirliĝis ĉie en ĉiuj direktoj kiel feroca demono frenezanta; poste ĝi abrupte transverse ekbalais, kvazaŭ ĝi volus surprize ataki ĉion, rompante branĉojn, forportante tegolojn kaj deŝirante elektrajn dratojn. Tamen Ŝjangzi staris tie rigardante; li ĵus venis el la vento, kiu estis senpova kontraŭ li. Venko apartenis al li! Kaj en la okazoj, kiam la vento lin favoris, li bezonis nur firme

teni la timonetojn kaj lasis sin gliti antaŭen. La vento, kvazaŭ bona amiko, ruladis la radojn por li.

Ŝjangzi ne estis blinda, kaj nature li jam vidis tiujn maljunajn, kadukajn rikiŝistojn. Iliaj vestoj esti tiel ĉifonaj, ke ilin venteto povis trapanetri kaj forta ventoblovo povis disŝiri; kaj iliaj piedoj estis vinditaj per oni ne scias kiaj tukaĉoj. Ili atendis, tremante de malvarmo, ĉe rikiŝoparkadejoj, kun okuloj ŝtele turnitaj tien kaj ĉi tien, kaj tuj kiam iu aperis, ili vete alrapidis kaj demandis: “Ĉu kaj tuj kiam iu aperis, ili vete alrapidis kaj demandis: “Ĉu rikiŝon?” Kaj, ekhavinte klienton, ili varmiĝis de kurado kaj iliaj ĉifonaj vestoj ŝvite tramalsekiĝis. Tuj kiam ili haltis, la ŝvito glaciĝis sur ilia dorso. En kontraŭblovanta vento, ili ne povis levi la piedojn kaj trenis la rikiŝon kun granda peno. Kiam la vento frapis ilin de supre, ili devis klini sian kapon al la brusto, dum suprenblovanta vento povis preskaŭ levi ilin de sur la tero. Kiam ili renkontis frontan venton, ili ne kuraĝis levi la manon, timante, ke la rikiŝo renversiĝus, dum se la vento venis de malantaŭe, ili perdis la regadon de la rikiŝo kaj de si mem. Tamen ili ĉiel penadis, streĉante ĉiun sian muskolon, por treni la rikiŝon al la celo, preskaŭ mortiĝante por kelkaj kupraj moneroj.

Post ĉiu rikiŝotira kuro, polvo kaj ŝvito miksite malpurigis ilian vizaĝon, lasante vidiĝi nur tri froste ruĝiĝintaj cirklojn – la okulojn kaj la buson. en tiel mallongaj, malvarmaj tagoj estis malmultaj homoj sur la stratoj, tial eĉ post tuttaga pena kurado ili ankoraŭ ne povis perlabori sufiĉe por sia satmanĝo; sed la maljunaj havis ankaŭ edzinon kaj infanojn en la hejmo, la junaj gepatrojn kaj pli junajn gefratojn. La longa vintro estis por ili infero, kaj estis nur la vivspiro, kiu distingis ilin de fantomoj, kiuj estis liberaj de la zorgoj kaj suferoj, kiujn ili havis. Morti kiel hundo sur la strato estis ilia sola espero pri paco. Laŭdire la fantomo de frostomortinto ja ĉiam havis rideton sur sia vizaĝo!

Kiel Ŝjangzi ne povus vidi ĉion ĉi tion? Sed li ne havis tempon por maltrankviliĝi pro aliuloj. Ilia sorto estis ankaŭ la lia, sed li, estante ankoraŭ juna kaj forta, povis elteni penegojn kaj ne timis malvarmon, nek venton. Kaj kun pura ĉambro por la nokto kaj bonordaj vestoj por la tago, li havis la senton, ke li apartenas al alia kategorio. Kavnkam li nun suferis same kiel ili, tamen liaj suferoj diferencis de iliaj en grado. Li nun suferis malpli ol ili kaj poste ankaŭ povos eskapi de ilia sorto, ĉar li estis konvinkita, ke en sia maljuneco li certe ne plu tiros kadukan rikiŝon kaj ne plu suferos malvarmon kaj malsaton. Li kredis, ke lia nuna supereco garantias lian estontan venkon.

La sintenado de Ŝjangzi kontraŭ siaj maljunaj kadukaj kamaradoj estis simila al tiu de ŝoforoj, kiam tiuj lastaj renkontis rikiŝistojn ekster la restoracioj

aŭ privataj loĝejoj. Ili neniam kune babilis, ĉar la ŝoforoj sentis, ke havi kontaktojn kun rikiŝistoj perdigus al ili la dignon. Ili ĉiuj estis en la sama infero, sed sur malsamaj niveloj. Al ili neniam venis en la kapon la ideo, ke ili staru kune, kaj tial ĉiu el ili iris sian propran vojon, blindigita de siaj propraj espero kaj strebo. Ĉiu kredis, ke kun siaj malplenaj manoj li povas fondi al si propran familion kaj sola plu palpi sian vojon antaŭen en la mallumo. Ŝjangzi neniam pensis, ken aorgis pri aliaj, kaj ĉio, kio gravis por li, estis lia mono kaj estonta sukceso.

La stratoj iom post iom havis festan aspekton kiam la Novjaro proksimiĝis. En sunaj, senventaj tagoj la aero estis krevige malvarma, tamen ambaŭ flankoj de la stratoj fariĝis pli kolorriĉaj pro la apero de novjaraj bildoj, gazlanternoj, ruĝaj kaj blankaj kandeloj, silkaj floroj por knabinaj kapoj kaj sukeraĵoj en diversaj grandecoj. Tio estis spektaklo ĝojiga, sed ankaŭ iom maltrankviliga, ĉar, kvankam ĉiu esperis pasigi en ĝojo kelkajn tagojn eum la novjaro, tamen ĉiu ja havis siajn zorgojn grandajn aŭ malgrandajn.

La okuloj de Ŝjangzi heliĝis, kiam li vidis la festan spektaklon, sciante, ke Caŭ-familio certe sendos al siaj amikoj donacojn kaj por ĉiu donac-alporto farita li ricevos kelkajn ĝiaŭojn kiel trinkmonon. La regula novjara kromsalajro estos du jŭanoj, tiu sumo ja ne estos kalkulata kiel granda; sed, kiam gastoj venos por fari novjaran viziton, li devos rikiŝe porti ilin hejmen, kaj de ĉiu el ili li ricevos du aŭ tri ĝiaŭojn. Se ĉio ĉi adiciiĝos, li havos konsiderindan sumon. Kvankam la sumo ne estos sufiĉe granda, tamen, se li nur konstante ricevos iom, lia ŝparmonujo ne trompos lin. En la vesperoj, kiam li estis senokupa, li ofte fisrigardis sian fajencan amikon, kiuj povis nur engluti monon, sed ne elvomi ĝin. Mallaŭte li admonis ĝin: “Manĝu pli multe, amiko, manĝu pli multe! Kiam vi satiĝos, ankaŭ mi kontentiĝos!”

La novjaro fariĝis pli kaj pli proksima kaj tre baldaŭ jam estis la oka ke la dekdua monato lunkalendaro. Ĝojo kaj zorgoj devigis la homojn fari planon kaj preparon. Estis same dudek kvar horoj en ĉiu tago, sed tiuj ĉi tagoj estis malsamaj ol la ordinaraj kaj oni ne povis ilin pasigi kiel kutime, sed devis ion fari kun okulo al Novjaro, kvazaŭ la tempo subite ekhavis konscion kaj sentojn, kiuj devigis la homojn pensi kaj klopodi laŭ ĝiaj deziroj.

Ŝjangzi apartenis al tiuj, kiuj sentis ĝojon. La strata movado, la kolportistaj krioj, la espero pri kromsalajro ka trinkmonoj, la novjaraj ferioj kaj la vizio pri bonaj manĝaĵoj plenigis lin kvazaŭ infanon per ĝojo kaj atendo. Li decidis elspezi ok ĝiaŭojn aŭ unu jŭanon por aĉeti donacon al Kvara Sinjoro Liŭ. La donaco eble estos malgranda, tamen ĝi montros lian respekton. Li devos porti

ion al li, kiam li lin vizitos, unuflanke por peti lian pardonon pri tio, ke li estis tro okupita por lin viziti lastatempe; aliflanke por ebligi al si repreni tiujn tridekelkajn jŭanojn. Elspezi unu jŭanon por reakiri la tridek estis multe inda afero.

Kontenta li iom skuis la ŝparmonujon kaj imagis, kiel bele sonos la peza tintado post kiam li aldone enmetos tiujn tridek jŭanojn. Jes, kun la reprenita mono en siaj manoj, li havos nenion pli por maltrankviliĝi.

Iuvespere, apenaŭ li intencis ree skui sian trezorujon, Onjo Gaŭ kriis al li: “Ŝjangzi! Ĉe la pordego estas fraŭlino, kiu volas vin vidi. Ŝi demandis min pri vi, kiam mi revenis el la strato.” Kiam Ŝjangzi eliris, ŝi aldonis mallaŭte: “Ŝi estas kiel granda nigra turo, vera teruraĵo!”

Ŝjangzi tuj ruĝiĝis tiel, ke lia vizaĝo kvazaŭ estis brulanta. Li sciis, ke lin atendas io malbona.

Notoj:

1. interhelpa societo: Provizora kuniĝo de personoj, kiuj regule kontribuas al komuna kaso kaj prenas el ĝi por sia uzo laŭvice.
2. la oka de la dekdua monato: Budaisma festo. Laŭ legendo en tiu ĉi tago Ŝkjamunio budaiĝis. Pro tio en la datreveno en budaismaj temploj oni recitis ŝutrojn kaj kuiris kaĉon el diversaj grenoj kaj fruktoj por kulti la Budaon. Poste tio fariĝis ankaŭ popola moro. En tiu tago oni manĝas tian kaĉon por celebri riĉan rikolton.

IX

Ŝjangzi apenaŭ havis la forton por transpaŝi al la sojlon de la pordego. Ankoraŭ starante interne de la pordego li konfuzita rigardis eksteren kaj ĉe la lumo de la stratlampo vidis f-inon Liŭ. Ŝia vizaĝo verŝajne estis pudrita kaj la lamplumo donis al ĝi grizverdan nuancon, kvazaŭ nigra velkinta folio estus kovrita de prujno. Ŝjangzi ne kuraĝis rigardi ŝin en la okulon.

La esprimoj sur la vizaĝo de Huniŭ estis miksitaj. Ŝiaj okuoj malkaŝis ian soprion lin vidi, tamen ŝiaj iom malfermitaj lipoj montris palan malvarman rideton kaj la sulketoj ĉe ŝia nazo sugestis malŝaton kaj malpaciencon. Ŝiaj arkaj brovoj sur la groteske pudrita vizaĝo estis samtempe allogaj kaj minace arogantaj.

Vidante Sjangzi elveni, ŝi paŭtigis kelkfoje la lipojn kaj ŝiaj miksitaj sentoj kvazaŭ ne povis trovi konvenan esprimon sur la vizaĝo. Ŝi englutis la salivon, kvazaŭ por regi siajn komplikajn emociojn. Kun iom da societa maniero de sia patro, duone kolerante, duone ridetante, ŝi faris ŝercon, kvazaŭ ŝi estus senzorga:

“Kiel bona vi estas?! Hundaĉo, kiu unu fojon ricevinte oston jam neniam revenas!” Ŝia voĉo estis tiel laŭta kiel tiam, kiam ŝi kverelis kun la rikiŝistoj en la rikiŝejo. Post kiam ŝi diris tion, la rideto malaperis de ŝia vizaĝo kaj subite ŝi kvazaŭ eksentis ian honton kaj malhonoron. Ŝi ekmordis siajn lipojn.

“Ne krii!” Ŝjangzi streĉis ĉiujn siajn fortojn por eligi tiujn du vortojn tra inter siaj lipoj, mallaŭtvoĉe, sed energie.

“Hm! Ĉu vi pensas, ke mi timas?” Ŝi malice ekridis, sed ŝi kvazaŭ pretervole iom mallaŭtigis sian voĉon. “Jen kial vi evitas min! Ĉi tie vi ja havas vrinaĉon diablinosimilan. Jam delonge mi scias, ke vi estas sendankulo. Vi grandkreska nigra krudulo, ŝajniganta vin stulta!” ŝia voĉo denove laŭtiĝis.

“Ne krii!” Ŝjangzi timis, ke Onjo Gaŭ subaŭskultus ilin post la pordo. “Ne krii! Kaj venu ĉi tien!” Parolante li komencis transiri la straton.

“Mi ne timas, egale kien ajn. Mia voĉo nature estas tiel laŭta!” kvankam ŝi protestis, tamen ŝi sekvis lin.

Transirinte la straton, ili venis al orienta trotuaro kaj haltis ĉe la ruĝa muro de la parko. Tie Ŝjangzi, kiu ne forgesis sian kampula tutimon, kaŭriĝis.

“Pro ko vi venas ci tien?” Li demandis.

“Mi? Hm, pro multaj kaŭzoj!” sia maldekstra mano estis sur ŝia kokso, ŝia ventro iom elstaris. Ŝi ĵetis al li rigardon kaj kun klinita kapo pensis momenton,

kvazaŭ tuŝita de kompato al li. “Ŝjanĉjo, mi venis pro iu grava afero.”

La sono de tiu mallaŭta, mola “Ŝjanĉjo” forfandis iom el lia kolero. Li levis la kapon kaj rigardis ŝin. Li trovis en ŝi ankoraŭ nenion amindan, tamen tiu “Ŝjanĉjo”, plena de dolĉeco kaj intimeco, mole resonis en lia koro, revokinte en lian memoron ilian iaman ligon de korsento, kiu estis neniel neaŭdebla, ne rompebla. Per mallaŭta, sed pli milda voĉo li demandis: “Pro kio?”

“Ŝjanĉjo!” Ŝi iom proksimiĝis al li: “Mi jam havas!”

“Kion?” Li surpriziĝis.

“Tion ĉi!” Ŝi montris per la fingro sian ventron. “Kion do vi faru kun ĝi?”

“Ah?!” Li pretervole ekkriis, kvazaŭ li estus frapita sur la kapo, kaj ĉio subite fariĝis klara al li. Miloj kaj miloj da pensoj, kiuj neniam antaŭe venis al li en la kapon, nun ĉiuj inundis lian cerbon, kaj ili estis tiel grandnombraj, tiel urĝaj, tiel konfuzaj, ke subite lia menso kontraŭe fariĝis vaka, kvazaŭ ekrano subite blankiĝus ĉe neatendita ekrompiĝo de la filmo.

La strato estis tre kvietaj. La luno kaŝiĝis en grizaj nuboj. Ondo kaj ondo da venteto movis la nudajn branĉojn kaj susurigis la sekiĝintajn foliojn. El malproksimo aŭdiĝis akra ululado de kato. Sed ĉar la konfuzeco en lia menso turniĝis en absolutan vakecon, li ne aŭdis tiujn sonojn. Kun mentono en la mano, li stultmiene fiksrigardis la teron ĝis ĝi kvazaŭ moviĝus antaŭ liaj okuloj. Li ne povis, nek volis pensei pri io ajn. Li havis tian senton, kvazaŭ li fariĝus pli kaj pli malgranda, sed ankoraŭ ne ĝis tia grado, ke li povus malaperi en la teron. Lia tuta vivo kvazaŭ fokuŝiĝis sur tiu ĉi dolorplena momento, ĉio alia neniĝis! Nur ĉi-momente li eksentis la malvarmon – eĉ liaj lipoj estis iom tremantaj.

“Ne ĉiam nur kaŭru tie! Diru ion, stariĝu!” Kredeble ankaŭ ŝi eksentis la malvarmon kaj volis iom moviĝi.

Li rigide stariĝis kaj senparole sekvis ŝin norden, kaj lia tuta korpo sentiĝis, kvazaŭ li ĵus frostiĝus en sia dormo.

“Ĉu vi jam senkonsiliĝis?” Ŝi ĵetis krigardon al li, kaj ŝiaj okuloj estis amoplenaj.

Li havis ankoraŭ nenion por diri.

“La dudeksepa estas la naskiĝtago de la maljunulo. Do vi devos veni tiam.”

“Jam estas la jarfino, tro okupita!” Malgraŭ sia konfuziteco Ŝjangzi ne forĝesis siajn aferojn.

“Nur krudan traktadon vi meritas, mi scias. Afable paroli al vi signifas perdi la tempon!” Ŝia voĉo denove laŭtiĝis kaj en la kvietaj strato ĝi sonis aparte

akre, kio multe embarasis lin. “Ĉu vi opinias min timulino? Nu, kion do vi intencas fari? Se vi ne aŭskultas min, mi ja ne havas tempon por perdi, ludante per la lango kun vi. Se ni atingos nenian konsenton, mi povos stari ekster la pordo de via dunganto kaj insulti vin tri sinsekvajn tagnoktojn! Kiel ajn vi iros, mi vin povos trovi! Do ne pensu pri forkuro!”

“Ĉu vi povas ĉesi kun via kriado, he?” Ŝjangzi flankeniĝis unu paŝon.

“Se vi timas mian bruadon, vi siatempe ne devis gustumi la plezuron! Vi ĝuis, kion vi deziris, kaj nun vi lasas al mi sola porti la tutan sekvon. Nu, malfermu viajn okuaĉojn kaj vidu, kiu mi estas!”

“Diru malrapide, trankvile, mi aŭskultas!” antaŭ momento Ŝjangzi sentis sin malvarme, sed nun pro ŝiaj insultoj li subite varmiĝis; la varmo kvazaŭ volis trarompi la frostiĝintan haŭton, tiel ke varmojukis lia tuta korpo, precipe lia kapo.

“Nu, tiel ja devas esti! Ne faru al vi malagrablaĵon!” Ŝiaj lipoj disiĝis kaj vidiĝis ŝiaj du elstaraj kojnodentoj. “Verdire, mi ja kore amas vin, do estu saĝa kaj sciu distingi bonon de malbono. Se vi fariĝos obstina kontraŭ mi kiel mulo, el io vi ricevos nenion bonan!”

“Ne...” Ŝjangzi volus diri “ne frapu min unu fojon kun trifojaĵ karesoj”, sed li ne bone memoris la tutan esprimon. Da Bejpingaj humoraj esprimoj li jam konis sufiĉe, sed li ankoraŭ ne povis uzi ilin flue, kvankam li komprenis, kiam aliaj ilin uzis.

“Ne? kion do?”

“Daŭrigu, kion vi volas diri!”

“Mi havas bonan ideon.” Huniŭ haltis, staris vizaĝe al li? “Pensu nur: se vi petos svatiston svati min por vi ĉe la maljunulo, li certe rifuzos. Li estas rikiŝejomastro, dum vi rikiŝotiranto; li kompreneble ne volas akcepti bofilon kia vi. Sed, koncerne min, tio estas por mi indiferenta. Vi plaĉas al mi kaj tio sufiĉas. – Al la diablo kun la cetero!”

“Neniu svatisto povos trakti pri ĉi tio, ĉar ĉe ekmencio pri la afero la maljunulo certe pensos, ke via okulo direktiĝas nur al liaj dekoj da rikiŝoj. Eĉ al tiuj, kiuj estas multe pli bonstataj ol vi, li turnos la dorson. Tio ĉi do estas io, kion mi devas mem solvi. Mi elektis vin al mi kaj ni jam faris, kion ni deziris fari, sen demando pri lia opinio. Kaj kiel ajn estas mi jam estas graveda kaj neniu el ni povas forkuri!”

“Sed ni ja ne povas mem diri tion rekte al li. Li maljunulo fariĝas pli kaj pli senprudenta. Se li ekaŭdos iom pri nia intenco, li ekaŭdos iom pri nia intenco, li prenos al si junan edzinon kaj pelos min for. La maljunulo, mi diras

al vi nun ankoraŭ ĝuas fortikan sanon, kvankam li jam estas preskaŭ sepdekjara. Se li vere denove edziĝos, li povos, mi garantias al vi, havigi al si per ŝi almenaŭ ankoraŭ du aŭ tri infanojn. Ĉu vi tion kredas aŭ ne?

“Ni plu promenu iom.” Ŝjangzi rimarkis, ke la deĵoranta policano jam iras kaj reiras preter ili du fojojn, kaj pro tio li sentis sin iom ĝenata.

“Ni parolu ĝuste ĉi tie. Kiu rajtus haltigi nian parolon?” Sekvante lian rigardon, ankaŭ Huniŭ vidis la policanon. “Ni tirante la rikiŝon, kion do vi timas? Ĉu li povos pro nenio demordi al iu ajn la hontan parton? Tio vere estus nekredeblaĵo! Lasu lin zorgi pri sia afero kaj ni daŭrigu nian parolon!

“Nu aŭdu, jen estas mia plano. Je la dudeksepa, la naskiĝtago de la maljunulo, vi venu kaj trifoje koŭto-u al li. Poste, en la novjara tago, vi denove venu por fari al li novjaran saluton. Tio bonhumorigos lin, kaj mi aĉetos iom da brando kaj frandaĵo kaj lasos lin satdrinki. Kiam li estos ebriiĝonta, tiam vi forĝu la varmegan feron, petu lin esti via adopta patro.

“Kaj poste, iom post iom, mi lasos lin rimarki mian peziĝantan korpon. Li certe pridemandos min, sed mi ŝlosos mian langon en silento. Kiam li vere forte ekscitiĝos, mi diros, ke tio estis tiu Ĉjaŭ Er, kiu mortis antaŭ nelonge – la vicienanto de la funebraĵistejo, kiu troviĝas oriente, najbare de nia loko. Li ne havis familion, nek parencojn, kaj jam estas enterigita en la tombejo de mizeruloj ekster la pordego Dongĝimen, kien do la maljunulo povos sin turni, por eltrovi la veron? Kiam li fariĝos jam senkonsila, mi klopodos sugestii al li, ke plej bone estus, ke li edzinigu min al vi. Tiam vi, estante jam lia adopta filo, povos facile fariĝi lia bofilo, ĉar ne granda estas la diferenco inter adopta filo kaj bofilo. Tiamaniere, sen ia ajn peno, ni povos eviti skandalon. Nu, kion do vi pensas pri mia plano?”

Ŝjangzi restis silenta.

Kvazaŭ sentante, ke ŝi jam diris sufiĉon portempe, Huniŭ komencis moviĝi en la norda direkto. Ŝi tenis la kapon klinita, kvazaŭ por aprezi sian parolon kaj ankaŭ por doni al li okazon por pripensi.

Ĝuste tiam la vento fendis la grizajn nubojn, kaj en la arĝenta lunlumo ili atingis la nordan finon de la strato. La Ĉirkaŭpalaca Rivero, kiu jam antaŭ longe glaciigis, etendiĝis silenta, arĝente-griza, glata kaj solida, ĉirkaŭ la muregoj de la Malpermesita Urbo, kvazaŭ la glacio subportus ilin. Interne de la Malpermesita Urbo estis nenia sono. La belformaj gardoturoj, la vermiljonaj pordegoj kaj la pavilonoj sur la monto Ĝingŝan, ĉiuj kvazaŭ estis aŭskultantaj kun retenita spiro ion, kion ili neniam povis reaŭdi. La venteto, kvazaŭ vea suspiro, delikate iradis tra inter la haloj kaj pavilonoj, kvazaŭ rakontante iom el

la pasinteco.

Huniŭ promenis okcidenten. Sekvate de Ŝjangzi, kaj ili venis al la portalo ĉe unu fino de Bejhaj-ponto. La ponto estis preskaŭ dezerta. La luno verŝis malvarman, palan lumon sur la vastan glaciebenaĵon ambaŭflanke de la ponto. La malproksimaj povilonoj, malhele konturiĝantaj en la duonmallumo, staris kvietaj kaj senmovaj, kvazaŭ kunglaciigintaj kun la lago, nur iliaj flavaj tegoloj briletis per milda lumo. La arboj delikate sin movetis, la lunlumo ŝajnis pli nebuleca ol iam ajn. La blanka pagodo alte leviĝis inter nubojn. Ĝia monotona blankeco disŝutis malvarmon kaj malgajon al la ĉirkaŭaĵo, tiel ke la tri lagoj, malgraŭ siaj artefaritaj ornamaĵoj, elmontris sian nordlandan sovaĝecon. Kiam ili atingis la ponton, la malvarma spiro el la glaciiginta lago frostotremigis Ŝjangzi. Li ne volis iri plu.

Ordinare, kiam li tiris sian rikiŝon sur tiu ĉi ponto, li koncentris sian atenton sur siajn piedojn por eviti stumbon kaj ne havis tempon rigardi ĉirkaŭen. Nun li estis libera ĵeti rigardojn ĉirkaŭen, sed li trovis la vidaĵon iom terura. La frosta glacio, la siluetoj de tiuj movetiĝantaj arboj kaj la mortpale blanka pagodo estis tiel solecaj kaj forlasitaj, ke li kvazaŭ ekhavis la deziron subite ellasi fortan krion kaj freneze kuregi. Eĉ la blanka ŝtonponto sub liaj piedoj ŝajnis eksterordinare dezerta kaj aparte blanka, tiel ke la lumo de la pontlampoj impresis eĉ iom malgaja. Li ne volis plu iri, nek plu rigardi, tiom malpli akompani ŝin. Tio, kion li volis en efektiveco, estis sin ĵeti de la ponto al la lago, kun la kapo malsupren, kaj, trarompinte la glacieron kaj malleviĝinte sur la fundon, kuŝi tie frostrigida kvazaŭ mortinta fiŝo.

“Nu, ĝis morgaŭ!” Li subite deturnis sin kaj ekiris returne.

“Ŝjangzi, do nepre faru tiel, kiel mi diris. Ĝis la dudeksepa!” ŝi kriis kun okuloj direktitaj al lia larĝa, rekta dorso. Poste, ĵetinte rigardon al la pagodo, ŝi eksuspiris kaj foriris okcidenten.

Ne kuraĝante returni la kapon, kvazaŭ diablo sekvus lin. Ŝjangzi rapidis antaŭen tiel haste, ke li preskaŭ frapiĝis kontraŭ la ĉirkaŭmuro de la Ronda Kastelo. Li apogis sin per unu brako al la muro, kun apenaŭ retenebla ploremo. Senmove li staris tie kelkan tempon, ĝis li aŭdis de la ponto ies voĉon.

“Ŝjangzi, Ŝjangzi, venu ĉi tien, Ŝjangzi!” tio estis la voĉo de Huniŭ.

Tre malrapide li faris du paŝojn al la ponto. Huniŭ sin movis malsupren al li, kun korpo iom malanstauĝinta.

“Nu, Ŝjangzi, venu ĉi tien, jen mi havas ion por doni al vi!” Antaŭ ol li povus fari pluajn paŝojn, ŝi jam aperis antaŭ li: “Jen, viaj deponitaj tridek-kelkaj ĵuanoj. Origine la sumo ne estis ronda, sed, aldoninte kelkajn

ĝjaŭojn, mi jam kompletigix ĝin ĝis ronda. Prenu ĝin! Tio ĉi servas nur por montri al vi mian korsenton. Mi ja sopiras al vi, ame zorgas pri vi kaj ĉiam havas viajn interesojn en mia koro. Se vi nur ne fariĝos sendanka, ĉio alia estos al mi indiferenta. Jen, prenu ĝin, kaj ne kulpigu min, se vi estos ĝin perdinta!”

Ŝjangzi prenis la bankbiletojn kaj staris tie senpense. Li povis trovi nenion por diri.

“Do, ĝis la dudeksepa! Ne foriru antaŭ ol min vidi!” ŝi ekridetis. “Tio estas vi, kiu plej multe profitos el tiu ĉi afero, pripensu nur kaj vi ekscios.” Tion dirinte, ŝi deturnis sin kaj ekiris returne.

Tenante la bankbiletojn en la mano, li stultmiene gapis al ŝi, ĝis la pontarko kaŝis ŝian kapon for de lia vido. Nuboj denove vualis la lunon, la stratlampoj fariĝis pli lumaj, kaj la ponto ŝajnis eksterordinare blanka, malvarma kaj dezerta. Li turnis sin kaj ekpaŝegis returne kun furioza rapideco; kaj kiam li atingis la pordegon de la domo de s-ro Caŭ, li ankoraŭ havis en la animo la bildon de la malvarma, blanka ponto en forlasiteco, kvazaŭ tio okazus antaŭ nur unu palpebrumo.

Reveninte en sian ĉambron, li unue kalkulis la bankbiletojn. Li kalkulis ilin du aŭ tri fojojn kaj liaj ŝvitaj manplatoj faris ilin gluecaj. Ĉiufoje la suma nombro estis malsama. Fine li enŝovis ilin en sian ŝparmonujon kaj eksidis sur la litrando, kun gapaj okuloj fiksitaj sur la argila ujo, volante pensi pri nenio pli. Havante monon, li povos trovi eliron. Li forte kredis ke tiu ĉi ŝparmonujo povos solvi ĉiujn liajn problemojn. Estis ne necese pensi pri io ajn pli. La Ĉirkaŭpalaca Rivero, la monto Ĝingŝan, la blanka pagodo, la ponto, Huniŭ, ŝia ventro... ĉio estis sonĝo; kaj kiam li vekigis, en lia ŝparmonujo tamen jam estis pliaj tridek-kelkaj jŭanoj! Kaj tio estis reala.

Sate rigardinte la ŝparmonujon, li forkaŝis ĝin kaj decidis dormi. Kiel ajn grandaj estis liaj ĉagrenoj, li povos forgesi ilin portempe en dormo kaj prokrasti ilin ĝis morgaŭ.

Enlitiĝinte li ne povis ekdormi. La okazintaĵoj de la tago en lia spirito similis svarmon da vespoj flugantaj, ĉiu kun pikilo en sia vosto.

Li ne volis pripensi, ĉar en efektiveco pripensado estis senutila. Huniŭ jam fermis ĉiun lian elirejon, ke li neniel povu eskapi.

Estus plej bone tuj forlasi la urbon, sed Ŝjangzi ne povis tion fari. Li pli volus fariĝi eĉ gardostaristo de la blanka pagodo den Parko Bejhaj, ol reiri al la kamparo. Ĉu forveturi al alia urbo? Nenie estas pli bone ol en Bejping. Ne, li ne povas foriri, li prefere mortu ĉi tie.

Do al li estas ne necese plu cerbumi pri tio. Huniŭ ja estas kapabla

efektivigi siajn minacojn. Se li ne sekvos la vojon, kiun ŝi trudis al li, ŝi certe turmentos lin per ofta vizitado al li. Se li nur restos en la urbo, ŝi ĉiam povos trovi lin. Do, por diris la veron, estos senutile, se li manovros kiun ŝi per artifiko. Unu fojon tro incitite, ŝi povos peti la helpon de sia patro, kiu tiam eble dungos unu aŭ du homojn – pli da personoj ne necesos – por rabi al li la vivon en iu kvietaj, senhoma loko.

Ree pripensinte ĉion, kion ŝi diris, li ekhavis la senton, ke li enfalis en foskaptilon kaj liaj manoj kaj piedoj estas ligitaj, tiel ke li neniel povas ekkapi. Ne kapabla prijuĝi ĉiun punkton de ŝia plano, li povis trovi neniun fendeton, tra kiu eĉ fiŝeto cololonga ne povus forgliti. Ne povante detale analizi la aferon, li akceptis ĝin kiel tuton, kiu pezis sur li kvazaŭ tuna metalbloko. Kaj tiu ĉi subprema pezo konvinkis lin pri tio, ke la sorto de rikiŝisto dum la tuta vivo povas formuliĝi je unu vorto: fatalo!

Ĉar li jam estas rikiŝisto, li devas alkroĉigxi al sia rikiŝo kaj eviti virinojn – ĉia kontakto kun virino povus ĵeti lin en grandan malfeliĉon. Kiel Kvara Sinjoro Liŭ, kiu posedas dekojn da rikiŝoj, tiel ankaŭ Huniŭ, kiu havas fiodoran seksilon, same prifriponas lin kaj traktas lin kiel argilbulon laŭvole knedeblan. Al li jam ne necesas pensi pri tio; se li volonte submetos sin al sia sorto, li devos iri koŭtoi al Kvara Sinjoro Liŭ, peti lin fariĝi lia adopta patro kaj prepariĝi por edziĝi al tiu virinaĉo. Se ne, lia vivo estos en danĝero.

Ĉe tiu ĉi penso li flankenmetis Huniŭ kaj ĉion, kion ŝi diris. Tiu ĉi malagrablaĵo lia estiĝis ja ne pro tio, ke ŝi estas malica kaj kruela; sed nur tial, ke tia devas esti lia sorto de rikiŝisto, same kiel tiu de hundo, kiu devas esti batala kaj turmentata eĉ de infanoj pro nenia kaŭzo. Do, kial teni ankoraŭ tian vivaĉon? Ĝin prenu diablo!

Dormemo forlasis lin kaj abrupte li piede forpuŝis de si la litkovrilon kaj sidiĝis. Li decidis aĉeti iom da brando kaj drinki ĝis plena ebriiĝo. Kial plu zorgi pri la okupo kaj observi la tiel nomatajn kondutregulojn? For ilin ĉiujn! Nur drinki, dormi! La dudeksepa? Eĉ en la dudekoka li ne iros koŭtoi al iu ajn, kaj kiu kuraĝos tuŝi lin? Ĵetinte sur siajn ŝultrojn la dikan vatitan ĵakon kaj preninte la malgrandan bovlon, kiun li kutime uzis tetason, li eliris el la ĉambro.

La vento blovis pli forte kaj la grizaj nuboj jam dispeliĝis. La luno, tre malgranda, verŝis malvarman lumon. La malvarmo igis Ŝjangzi, kiu ĵus leviĝis el sia varma litkovrilon, senĉese tiradi fajrantajn spirojn. Sur la strato jam ne vidiĝis piediranto, nur du rikiŝoj restis ĉe la vojrandoj. La rikiŝistoj staris apud ili, kovrante al si per la manoj la orelojn kaj piedbatante la teron por sin

varmigi.

Per unu spiro Ŝjangzi kuris ĝis la malgranda butiko en la sudo. Por konservi la varmon, la butiko jam fermis sian pordon, sed oni povis pagi monon kaj ricevi aĉetaĵon tra giĉeto. Ŝjangzi aĉetis kvar ljangojn da brando kaj ternuksojn tri kuprajn monerojn valorantajn. Tenante la bovlon en la mano, li ne kuraĝis kuri, sed nur trotis per palankenista paŝmaniero. Reveninte en sian ĉambron, li tuj enŝoviĝis en sian litkovrilon kaj, kun forte klakantaj dentoj, ne volis residiĝi. La brando sur la tablo eligis akran pikantan odoron, kiu iom malplaĉis al li, kaj eĉ la ternuksoj ne ekscitis lian apetiton. La glacia aero, kvazaŭ pelvo da malvarma akvo verŝita sur lin, plene vekis lin, tamen li sentis sin tro malagema eĉ por eletendi la brakon, kaj lia koro jam ne estis tiel varma.

Post kiam li kuŝi tie kelkan tempon, liaj okuloj ree direktis sin de la rando de la litkovrilo al la bovlo da brando sur la tablo. Ne, li ne devas detrui sin pro tia bagatela afero, nek povas rompi sian decidon neniam tuŝi alkoholaĵon. Li vere troviĝas en granda embaraso, sed ie devas esti fendeto, tra kiu li povos elŝoviĝi. Eĉ se ekzistus nenia elirejo, li ja ne devas mem enmarĉiĝi. Li devas teni siajn okulojn en streĉo por vidi, kiel aliaj puŝas lin malsupren en la ŝlimon.

Estinginte la lampon, li enŝovis la kapon en la litkovrilon, esperante tiel endormiĝi. Sed li ankoraŭ ne povis ekdormi, kaj li puŝis la litkovrilon flanken kaj rigardis ĉirkaŭen.

La lunlumo en la korto donis al lia fenestropapero bluetan koloron, kvazaŭ baldaŭ tagiĝus. La pinto de lia nazo sentis, kiel malvarme estas en la ĉambro, kaj malforta alkoholaĵa odoro, kiu ŝvebis en la glacia aero, tiklis lian nazon. Li abrupte sidiĝis, prenis la bovlon kaj trinkis longan gluton.

Notoj:

1. la pordego Dongĝimen: Unu el la orienta urbopordegoj.
2. la monto Ĝingŝan: Artefarita monteto, kun malnova nomo Karba Monto, en la mezo de Pekino, norde de la iama imperiestra palaco. Ĝi havas kvin montpintojn en la vico de oriento ĝis okcidento kaj sur ĉiu pinto staras pavilono.
3. la blanka pagodo kaj la tri lagoj: Ambaŭflanke ĉe la ponto estas tri interligiĝiantaj lagoj nomataj Bejhaj, Ĝonghai, Nanhaj (Norda Maro, Meza Maro, Suda Maro). En la lago Bejhaj troviĝas insulo kun monteto, sur kies

pinto staras blanka pagodo. La lago kun sia ĉirkaŭaĵo nun estas la fama Parko Bejhai.

4. Ronda Kastelo: Tuj ĉe la orienta fino de la ponto troviĝas malnova Kastelo kun ronda ĉirkaŭmurego. Nun ĝi estas parto de Parko Bejhaj.

X

Ŝjangzi ne estis sufiĉe kapabla solvi siajn problemojn unu post alia, nek sufiĉe kuraĝa likvidi ilin ĉiujn per unu fojo, kaj tial, tute senhelpa, li ĉiam sentis sian animon dolorplena. Ĉiu viva estaĵo, post sia vundiĝo, ja penas en malespero fari ĉion eblan por ripari sian malbonan situacion. La batalanta grilo, kiu perdis siajn grandajn krurojn, ankoraŭ penas rampi nur per siaj malfortaj kruretoj. Kaj tiel estis kun Ŝjangzi. Havante nenian difinitan planon, li esperis nur vegetadi de tago al tago, tolerante ĉion malbonan, kio okazis al li, kvazaŭ la vundita grilo, kiu estas kontenta nur rampi ĝis tie, kien ĝi povas, tute ne pensante pri eksalto supren.

Restis ankoraŭ dekelkaj tagoj ĝis la dudeksepa, la tago, sur kiu lia tuta atento estis koncentrita. Ĝi estis ĉiam en liaj pensoj kaj songoj, kaj li konstante murmuradis “la dudeksepa”, kvazaŭ tuj post la paso de tiu tago ĉiuj liaj problemoj povus esti solvitaj, kvankam li sciis tre bone, ke tio ĉi estas nur lia deziro neniel plenumbla.

Iafoje liaj pensoj vagis iom pli malproksimen. Interalie li intencis preni kun si la dekojn da ĵuanoj, kiujn li havis, kaj forveturi al Tjanĝin. Tie, li pensis, se la sorto favoros lin, li eble sukcesos trovi iun alian laboron kaj ne plu tiros rikiŝon. Ĉu Huniŭ povos persekuti lin al Tjanĝin? En liaj okuloj ĉiu loko, por kien atingi oni bezonas veturi per vagonaro, devas esti tre malproksima, kaj tial laŭ li ŝi neniel povos postkuri lin tien. Tio ĉi ŝajnis bona ideo, tamen lia interno diris al li, ke ĝi estas la lasta rimedo, ĉar, se li povas resti en Bejping, li devas laŭeble resti tie. Kaj tiel li denove venis al la penso pri la tago dudeksepa – afero, kiu estis pli proksima kaj pli facile plenumbla. Se li povos transpasi tiun malfacilan tagon, li eble povos solvi la aferon ne ŝanĝante la tutan situacion. Kaj eĉ se per tio li ne povos devitive tiri sin al la senlira situacio, almenaŭ malgrandiĝos la embaraso lin katenanta.

Sed kiel transpasi ĝin? Li havis du rimedojn: unu estis ignori la tutan aferon kaj fari nenian gratulan viziton; la alia, sekvi la konsilon de Huniŭ. Tiuj ĉi rimedoj estis inter si diferencaj, tamen la sekvoj estos la samaj. Se li ne iros tien, ŝi certe ne forlasos rezigne la aferon; se jes, ŝi ankaŭ ne lasos lin sen ĉagrenoj. Li ankoraŭ memoris, kiel li, en la komenco de sia rikiŝista kariero, imitante alies ekzemplon, provis preni mallongajn vojliniojn tra stratetoj. Foje li erare eniris en tordan strateton; li rondiris en cirklo kaj revenis ĝuste tien, de kie li komencis iri. Nun li kvazaŭ denove eniris en tian strateton: en kiu ajn direkto

li sin turnu, a rezulto estos la sama.

En sia senkonsileco li provis konsideri la aferon el la plej bona flanko. Kial do ne decas, ke li prenu ŝin al si kiel edzinon? Tamen, kiel ajn li konsideris la aferon, la ideo lin naŭzis. La sola ekpenso pri ŝia aspekto skuigis al li la kapon. Do forgesu ŝian aspekton kaj pensu nur pri ŝia konduto – ha fi! Kiel li, kiu estas tiel strebema kaj tiel bonmorala, povus edziĝi al tia aĉulino? Tiam li hontus aperi antaŭ iu ajn, eĉ antaŭ la ombroj de siaj gepatroj post sia morto!

Kaj tamen, kiu povas garantii, ke la ido en ŝia ventro estas lia? Aŭ ke ŝi povos alporti al li kelkajn rikiŝojn? Kvara Sinjoro Liŭ ja ne estas homo facile traktebla! Kaj eĉ se ĉio irus glate, li ankaŭ ne povus elteni tion, ĉar ĉu li povus superruzi Huniŭ?

Ŝi bezonas nur montri malgrandan fingron, por igi lin rondkuradi laŭ ŝia volo ĝis kapturigo, ke li tute perdu la orientigon. Li scias, kia terura megero ŝi estas! eĉ se li volus fondi al si familion, li ne devus edziĝi al ŝi. Tio estas senduba. Se li prenis ŝin, tio signifus lian finon; cetere, li ja ne apartenas al tiuj personoj, kiuj ne havas la senton de sia digno. Vere ekzistas nenia elirejo!

Ne povante trovi ian rimedon kontraŭ ŝi, li turnis la malamon al si mem kaj tre volus doni al si vangofrapojn. Sed fakte li ja estas senkulpa. La kazo estis, ke ŝi aranĝis la tutan insidon kaj atendas, ke li falu en la kaptilon. Lia malfeliĉo ŝajne kuŝas en tio, ke li estas tro honesta, - honestuloj ĉiam devas suferi malagrablajn kaj maljustajn.

Kaj kio des pli afliktis lin estis, ke li ne povas turni sin al iu ajn por senŝarĝigi sian koron. Li ne havis gepatrojn kaj gefratojn, nek amikojn. Ordinare li sentis sin fiera pri tio, ke li, viro fortika kun siaj piedoj sur la tero, kapablas subteni la ĉielon kaj estas libera kiel la vento kun nenia ligo al iu ajn. Nur nun li ekkomprenis kun konsterno, ke neni povas vivi en izoleco.

Precipe al siaj kolegoj li nun ekhavis korinklinon. Se li amikiĝus kun kelkaj el ili en la pasinteco, li pensis, kiel viro grandkreska, eĉ duoblon da Huniŭ li ne timus, ĉar liaj amikoj povus doni al li konsilojn kaj lin subtenus. Sed li ĉiam izolis ŝin for de siaj kolegoj, oni ja ne povas improvize amikiĝi kun iu ajn en okazo de bezono! – sekve li eksentis timon, kian li neniam antaŭe konis. Se plu tiel estos, ĉiu ajn povos lin prifriponi kaj ofendi. Unu sola homo ja ne povus subteni la ĉielon!

Tiu ĉi timo igis lin ekdubi pri si mem. En la vintro, ĉiufoje, kiam lia dunganto festenis ĉe alies domo aŭ spektis operon, li kutime prenis la akvoskatolon el sub la etina lampo kaj almetis ĝin al sia brusto por ĝin varmigi, ĉar, se ĝi restus sur la rikiŝo, la akvo glaciĝus. Tiam li, kovrita de ŝvito pro

kurado, tuj ektemis ĉe la almeto de la malgranda glacie malvarma skatolo al sia karno, kaj nur post sufiĉe da tempo la skatolo povis iom varmiĝi. Sed li neniam antaŭe trovis tion malagraba kaj iafoje eĉ havis ian senton de supereco, ĉar tiuj, kiuj tiras kadukajn rikiŝojn, ne havas la rimedojn por havigi al si etinan lampon. Nun venis al li en la kapon la ideo, ke lia larĝa brusto ŝajne estas malpli valora ol malgranda skatolo, ĉar li, perlaborante nur sumeton da mono ĉiumonate, devas elporti ĉiaspecajn suferojn kaj eĉ alpremi la akvoskatolon al sia brusto, por ke la akvo ne glaciigu. Antaŭe li pensis, ke la rikiŝotirado estas ideala okupo por li, kaj ke per tio li iam povos fondi al si propran familion, sed nun en li jam naskiĝis dubo. Estas do ne strange, ke Huniŭ ofendas lin – li valoras eĉ malpli ol skatolo!

En la tria tago post la vizito de Huniŭ al li, s-ro Caŭ kaj kelkaj amikoj veturis al Kinejo por spekti noktan vilm prezenton. Ŝjangzi atendis en malgranda tetrinkejo, kun la akvoskatolo en la sino. Estis malvarmege ekstere, kaj la pordo kaj fenestroj de la tetrinkejo estis hermetike fermatalaero odoraĉis je karba gaso, ŝvito kaj la fumo de malmultekostaj cigaredoj. Sed malgraŭe la fenestrovitroj estis kovritaj de tavolo da glacifloroj. La klientoj plejparte estis rikiŝistoj, kiuj estis laŭmonate dungitaj. Iuj sidante kun la kapo apogita kontraŭ la muro, dormetis en la varmo de la domo. Aliaj tenis bovlon da brando kaj, invitinte siajn najbarojn al kunĝuado, malrapide trinkadis, ŝmacante per la lipoj post ĉiu suĉo kaj samtempe brue furzante. Estis ankoraŭ aliaj, kiuj manĝis kunrilitan dabingon, demordante kaj englutante duonon de ĝi per unu fojo, tiel ke iliaj koloj fariĝis streĉitaj kaj ruĝaj.

Iu kun malgaje agordita vizaĝo plende rakontis al ĉiuj aliaj, kiel li senhalte kuradis tuj de la frumateno kaj kiel li malsekiĝis de ŝvito kaj denove sekiĝis je li ne scias kiom da fojoj. La aliaj plejparte babiladis inter si, sed tiuj ĉi lastaj vortoj subite reduktis ilin ĉiujn al silento. Poste, kvazaŭ birdoj, kies nestoj estis subite detruitaj, ili eksplodis per plendoj pri siaj suferoj kaj doloro. Eĉ tiu, kiu estis manĝanta dabingon, trovis lokon en sia buŝo por movadi la langon. Englutante la maĉitaĵon, li parolis kun vejnoj elstariĝantaj sur la frunto.

“Ĉu vi pensas, ke la laŭmonata dungito ne havas sian amarecon? Eĉ de la dua horo – rukt! – ĝis nun mi ankoraŭ nenion manĝis kaj trinkis. Jam tri fojojn mi – ventron de lia patrino! – tiradis tien kaj reen inter la pordegoj Ĉjanmen kaj Pingzemen. La malvarmege frostvundis eĉ mian anuson ĝis ĝia fendigo, tiel ke ĝi senĉese ellasas gason.”

Li ĵetis flugrigardon al ĉiuj aliaj, balancante la kapon, kaj demordis alian pecon el la dabingo.

Tio turnis la konversacion al la vetero kaj donis al ĉiuj okazon paroli pri la suferoj kaŭzitaĵ de la malvarmo.

Ŝjangzi ĉiam silentis, sed li atente aŭskultis. Kvankam la faktoj, kiujn la aliaj rakontis, iliaj paroltonoj kaj iliaj parolmanieroj estis malsamaj, tamen ĉiu same malbenis kaj plendis pri la maljusteco. La kordoloro de Ŝjangzi igis lin ensorbi tiajn parolojn, kiel sekega tero ensorbas pluvgustojn. Li ne povis, nek sciis kiel rakonti sian propran historion de la komenco ĝis la fino. Li povis nur sorbi iom da vivamareco el la vortoj, kiujn ili diris. Ĉiuj estis mizeruloj kaj li ne estis escepto. Li konsciis sian malfeliĉon kaj sekve volis simpatii kun ili ĉiuj. Ĉe la malgajaj partoj de iliaj rakontoj li kuntiris siajn brovojn, kaj ĉe la ridindaj li kurbigis la lipojn. Kvankam li ĉiam silentis, tamen tion farante li sentis, ke li estas unu el ili kaj ili ĉiuj estas kunsuferantoj. Antaŭe li rigardis ilin kiel babilemulojn abomenajn – tuttage babilaĉante ili neniam povis riĉiĝi. Nun la unuan fojon li eksentis, ke iliaj babiloj ne estas sensencaĵ, kaj ili estas parolantaj anstataŭ li kaj esprimantaj la komunajn suferojn de ĉiuj rikiŝistoj.

Kiam la konversacio estis en bolo, la pordo subite larĝe malfermiĝis kaj enfluis ondo da malvarma aero. Ĉiuj kolere rigardis al la pordo por vidi, kiu estas tiel antipatia. Jun pli malpaciendaj ili estis, des pli malrapide la envenanto sin movis, kvazaŭ li intence malrapidus. Unu el la kelneroj kriis, duone ridetante, duone urĝante: “He, onklo, rapidu! En sllasu la tutan varman aeron for!”

Antaŭ ol ili finis la parolon, la homo jam envenis. Ankaŭ li estis rikiŝisto, kiu aspektis pli-ol-kvindekjara. Lia vatita jako, nek longa nek mallonga, estis tiel truoplena kiel korbo, kun tufoj da vataĵo elŝoviĝintaj ĉe la brusto kaj la kubutoj. Lia vizaĝo ŝajnis ne lavita jam plurajn tagojn, tiel ke neniu ovis vidi la koloron de lia karno krom sur liaj oreloj, kiuj fariĝis brilruĝaj de frosto, kvazaŭ maturiĝintaj fruktoj falpretaj. liaj malordaj blankaj haroj elmontriĝis el sub ĉifona ĉapo, kaj sur liaj brovoj kaj mallonga barbo estis akvogutoĵi glaciĝintaj. Enirinte, li tuj palpe serĉis kaj trovis benkon, sur kiu li sidiĝis.

“Kruĉon da teo!” li diris kun granda peno, kvazaŭ baraktante.

Tiu ĉi tetrinkejo estis loko, kiun vizitadis nur rikiŝistoj kun laŭmonata laboro. En la ordinara tempo tiu ĉi maljuna rikiŝisto certe ne venis ĉtien.

Ĉiuj rigardis lin, profunde emociitaj de pli ol kion ili diris antaŭ momento. Neniu parolis. En la ordinara tempo certe unu aŭ du impertinentaj junuloj farus ŝercojn por fidindigi tian klienton, sed nun neniu el ili diris unu vorton.

Antaŭ ol la teo estis preta, la kapo de la maljunulo malrapide kliniĝis pli kaj pli malalten, ĝis fine li glitis sur la plankon.

Ĉiuj tuj saltleviĝis. “Kio okazis? Kio estas al li?” Ĉiu volis ŝovi sin antaŭen.

“Ne moviĝu!” La mastro de la tetinkejo, homo spertoriĉa, haltigis ĉiujn. Proksimiĝinte sola al la maljunulo, li malstreĉis al li la kolumon, apogis lin kontraŭ seĝo kaj tenis liajn ŝultrojn. “Alportu sukeritan akvon, rapide!” Poste li almetis sian oreton al la gorĝo de la maljunulo kaj aŭskultis, murmurante: “Ne estas sufokita de kraĉaĵo.”

Neniu moviĝis, nek residiĝis. Ili staris tie palpebrumante en la fumoplena ĉambro kaj rigardante la du figurojn apud la pordo. Ĉiuj kvazaŭ diris al si en la koro: “Jen estas kio okazos al ni. Kiam niaj haro blankiĝos, venos iam tago, en kiu ni falos kaj mortos sur la strato!”

Apenaŭ la bovlo da sukerakvo almetiĝis al la buŝo de la maljunulo, li ekĝemis. Kun okuloj ankoraŭ fermitaj li levis la desktran manon – ĝi estis nigra kaj brilis kvazaŭ lakita – kaj viŝis la buŝon per la mandorso.

“Trinku iom da akvo!” La mastro diris en lian oreton.

“Aĥ?” La maljunulo malfermis la okulojn. Vidante, ke li sidas sur la planko, li retiris la kruojn kun la intenco stariĝi.

“Unue trinku! Ne hastu!” dirante la mastro demetis la manojn for de la maljunulo.

Preskaŭ ĉiuj rapidis al li.

“Aj, aj!” La maljuna rikiŝisto rigardis ĉirkaŭen kaj poste, tenante la bovlon ambaŭmane, trinketis la sukerakvon gluton post gluto.

Li malrapide trinkis kaj, fininte la trinkadon, li denove turnis sian rigardon al ĉiuj: “Aj, pardonu, ke mi vin ĝenas!” Lia voĉo estis tre milda kaj afabla, kaj estis apenaŭ kredeble, ke ĝi eliĝis el la guŝo sub tiu hirta barbo. Li denove provis stariĝi kaj tri aŭ kvar homoj tuj helpis al li sin levi. Li delikate ekridetis kaj diris: “Bone, bone, mi jam povas helpi al mi. Pro malsato kaj malvarmo mi ricevis kapturton. Ne grave.” Kvankam lia vizaĝo estis kovrita de malpuraĵo, tamen la pala rideto igis ĝin impresi pura kaj afabla.

Ĉiuj kortuŝiĝis. La mezaĝulo, kiu trinkis brandon antaŭ momento, jam malplenigis sian bovlon. En liaj okuloj sangostriaj aperis larmoj. “Nu,” li vokis, “alportu ankoraŭ du ljangojn!” Kiam oni alportis la brandon, la maljunulo jam sidiĝis sur seĝo ĉe la muro. La mezaĝulo estis iom ebria, sed li ĝentile metis la brandon antaŭ la maljunulo. “Tiu ĉi brando estas je mia konto, volu trinki ĝin!” li diris. “Mi mem estas pli-ol-kvardekjara kaj, por diri la veron, jam apenaŭ taŭgas por laŭmonata dungiĝo. Pasas jaro post jaro, kaj miaj kruoj diras al mi, ke mi ne plu estas tiel forta. Post du aŭ tri jaroj mi estos simila al vi.

Vi devas esti preskaŭ sesdekjara, ĉu ne?”

“Ankoraŭ ne, nur kvindekkvin-jara!” La maljunulo trinkis gluton. “En tia frosta vetero mi ne trovis klienton. Kaj mi, aj! Mia stomako estas malplena. Miajn lastajn kuprajn monerojn mi jam elspezis por aĉeti brandon, por min iomk varmigi. Antaŭ momento, kiam mi atingis ĉi tien, mi ne povis pli teni min sur la piedoj, kaj mi envenis por iomk varmiĝi. Ĉar en la ĉambro estas tiom varme kaj mankas nutraĵo en mia stomako, mi svenis. Nun al mi jam ne estas grave. Mi bedaŭras, ke mi tiom multe vin ĝenis.”

Tiam la fojnosimila griza hararo de la maljunulo, lia kota vizaĝo, liaj karbonigraj manoj, ĉifonaj ĉapo kaj vatita jako, ĉiuj kvazaŭ radiis ian puran lumeton, similan al la nombo ĉirkaŭ difektita, tamen ankoraŭ dignoplana, idolo en kaduka templo.

Ĉiuj rigardis lin, kvazaŭ timante, ke li povos foriri. Ŝjangzi, ĉiam silenta, staris tie senmove. Aŭdinte la maljunujlon diri, ke lia stomako estas malplena, li tuj pafis sin eksteren kaj flugrapide revenis kun granda brasika folio. En ĝi estis envolvitaj dek vaporumitaj ŝafaĵaj pasteĉoj. Li prezentis ilin al la maljunulo kaj diris: “Manĝu tion ĉi!” Poste li revenis al sia sidloko kaj klinis la kapon, kvazaŭ tute elĉerpita.

“Aj!” La maljunulo ŝajne ĝojiĝis, sed ankaŭ preskaŭ eklarmis. Li balancis la kapon al ĉiuj. “Vere ni estas fratoj-kamaradoj! Per la tuta forto ni tiras klientojn, sed kiel malfacile estas ricevi por tio eĉ unu plian groŝon de ili!” Li stariĝis kaj moviĝis eksteren.

“Manĝu!” Ĉiuj preskaŭ samtempe ekkriis.

“Mi devas envenigi Ŝaŭmar (ĉevaleto), mian nepon. Li estas ekstere, gardante la rikiŝon.” “Lasu min iri. Vi sidiĝu!” diris la mezaĝa rikiŝisto. “Estu trankvila kaj ne timu, ke vi perdos vian rikiŝon ĉi tie; ĝuste trans la strato troviĝas policana budo.” Li malvaste malfermis la pordon kaj kriis: “Ŝjaŭmar, Ŝjaŭmar, via avo vin vokas. Tiru la rikiŝon ĉi tien!”

La maljunulo palpis la pasteĉojn kelkajn fojojn, sed li prenis neniun. Tuj kiam la knabo envenis, li prenis unu kaj diris: “Ŝjaŭmar, jen por vi, mia knabo!”

Ŝjaŭmar estis apenaŭ dektrijara. Lia vizaĝo estis malgrasa, sed lia vesto estis plumpe kida. De lia nazo, ruĝa de frosto, pendis du blankaj strioj da fluanta mukaĵo, sur la oreloj li portis paron da orelmufoj. Li staris antaŭ la maljunulo, prenis la proponitan pasteĉon per la dekstra mano kaj aŭtomate etendis la maldekstran por preni ankoraŭ unu. Li rapide aris po unu mordon al ĉiu el la du.

“He, malrapide!” La maljunulo metis unu manon sur la kapon de sia nepo, per la alia li prenis unu pasteĉon kaj levis ĝin al sia buŝo. “Ĉu sufiĉos por mi, la ceteraj estas viaj. Post kiam vi finos la manĝon, ni iru returne hejmen. Se morgaŭ ne estos tro malvarme, ni komencos labori iom pli frue. Ĉu bone, Ŝjaŭmar?”

La knabo jese balancis la kapon vizaĝe al la pasteĉoj kaj snufe retiris la mukaĵon en la nazon. “Avo, vi manĝu tri kaj mi la ceterajn. Poste mi rikiŝe portos vin hejmen.”

“Ne necese.” La maljunulo rigardis ĉiujn kun kontenta rideto. “Ni piediros hejmen. Estus tro malvarme sidi en la rikiŝo.”

La maljunulo finmanĝis sian porcion kaj eltrinkis la brandon. Atendante, ke Ŝjaŭmar finmanĝu la sian, li elpoŝigis tukaĉon, viŝi per ĝi siajn lipojn kaj ree balancis la kapon al ĉiuj aliaj. “Mia filo iris soldatiĝi kaj neniam revenis. Lia edzino...”

“Ne parolu pri tio!” interrompis lin Ŝjaŭmar. Lia buŝo pleniĝis de tiom da maĉataĵo, ke liaj vangoj pufiĝis kvazaŭ persikoj.

“Ne grave!” Ni ĉiuj ne estas fremduloj!” Per mallaŭtigita voĉo li daŭrigis, “La knabo prenas tion tre serioze, tiel dignoama li estas. Ankaŭ lia patino forlasis lin. Por ni du, avo kaj nepo, tiu rikiŝo estas la sola vivopano. Kavnkam tre kaduka, ĝi tamen apartenas al ni, kaj dank’ al tio ni ne bezonas esti maltrankvilaj pri la ĉiutaga rikiŝa lupago. Perlaborante ĉu pli, ĉu malpli, ni trenas nian malfacilan vivon. Ho, kie estas nia elirejo?”

“Avĉjo.” Komenconte manĝi la lastan pasteĉon, Ŝjaŭmar ektiris la manikon de la maljunulo. “Ni devas preni ankoraŭ unu klienton. Ni ankoraŭ ne havas monon por aĉeti karbon morgaŭ matene. Tio estas tute via kulpo. Antaŭ momento ni ja povus akiri dudek kuprajn monerojn, se ni portus tiun homon al la pordego Hoŭmen. Mi tion volis, sed vi ne. Nu, kiel do vi helpos al vi morgaŭ, havante neiom da karbo?”

“Rimedo ĉiam ekzistas. Mi aĉetos kvin ĝinojn da karbobuletoj je kredito.”

“Ankaŭ iom da brulligno?”

“Kompreneble! Nu, tuj finu vian manĝon, bona knabo. Nun ni jam devas iri.” Parolante la maljunulo stariĝis kaj, turnante sian rigardon al ĉiuj, diris: “Dankon, fratoj, pro viaj helpoj!” Li prenis la manon de Ŝjaŭmar, kaj la knabo enŝovis la tutan restan parton de la lasta pasteĉo en sian buŝon.

Iuj el la homoj en la tetrinkejo senmove sidis kie ili estis, dum aliaj sekvis ilin eksteren. Ŝjangzi estis la unua kiu ilin sekvis. Li volis vidi tiun rikiŝon.

Ĝi estis ekstreme kaduka rikiŝo. La farbo jam deskvamiĝis, tiel ke vidiĝis

la lignovejnoj de la timonetoj. La lampo klakis en la vento, kaj la apogstangetoj de la kapuĉo estis ligitaj per ŝnuro. Ŝjaŭmar elprenise alumeton el unu el siaj orelmujoj, ekbruligis ĝin per froto sur sia plandumo, post tenis ĝin per siaj nigraj manetoj kavigitaj, por eklumigi la lampon. La maljunulo kraĉis sur siajn manplatojn, ekĝemis, levis la timonetojn kaj diris: “Ĝis morgaŭ, fratoj!”

Ŝjaŭmar staris kvazaŭ ŝtoniĝinta ekster la pordo, rigardante la du homojn, maljunan kaj junan, kaj ilian rikiŝaĉon. Forirante la maljunulo estis parolanta jen per laŭta, jen per mallaŭta voĉo, dume la lumo de la stratlampoj flagretis kaj la ombroj jen densiĝis, jen apenaŭ vidiĝis. Ŝjangzi aŭskultis kaj rigardis, kaj lia koro estis tiel malgaja. Kiel ĝi neniam antaŭe estis. En Ŝjaŭmar li kvazaŭ vidis sian propran pasintecon kaj en la maljunulo sian estontecon. Antaŭe li neniam lasis sian kupreron vane forgliti el liaj manoj, sed nun, aĉetinte al la maljunulo kaj knabo tiujn dek pasteĉojn, li tamen sentis sin tiel ĝoja. Li sekvis ilin per siaj okuloj ĝis ili perdiĝis el lia vido, kaj nur tiam li revenis en la tetrinkejon, kie ili ĉiuj rekomencis babili kaj ridi. Li sentis sin tiel konjuzita, ke li, paginte sian teon, eliris kaj tiris la rikiŝon al la kinejo, por atendi tie s-ron Caŭ.

Estis akre malvarme. La aero estis plena de subtila sablo, kaj la vento ŝajne galopis supre. El la steloj nur kelkaj pli grandaj estis videblaj, trembriletantaj en la ĉielvasteco. Estis nenia vento sur la tero, tamen ĉie regis forta malvarmo. En la frostiĝintaj radsulkoj jam vidiĝis longaj fendetoj, kaj la tero, cindre blaka, estis malvarma kaj malmola kiel glacio.

Starinte ekster la kinejo kelkan tempon, Ŝjangzi komencis senti sin malvarma, sed li ne volis reiri en la tetrinkejon. Li preferis stari ĉi tie kaj mediti. La renkonto kun la maljunulo kaj ties nepo jam detruis lian plej belan esperon, ĉar la rikiŝo de la maljunulo ja estis lia propraĵo. En la tago, kiam li komencis la rikiŝotiradon, li jam decidis aĉeti al si propran rikiŝon, kaj nun li ankoraŭ strebis al tiu ĉi celo. Li kredis, ke posedante jam propran rikiŝon, li havos ĉion. – sed, nu, rigardu nur tiun maljunulon!

Ĉu ne ĝuste pro tiu ĉi sama kialo li ne volis edziĝi al Huniŭ? Li pensis, ke per sia propra rikiŝo li povos ŝpari monon kaj preni edzinon kun pura konscienco. Sed rigardu nur Ŝjaŭmar! Se li mem havos filon, la infano ne povos ne esti tia, kia Ŝjaŭmar.

Tiel rigardante la aferon, li vidis nenan motinon por rezisti al la manaĉoj de Huniŭ. Ĉar li jam enfalis en tiun ĉi kaptilon, estas tute egale, kian ajn edzinon li prenis. Cetere, ŝi eble alportos al li kelkajn rikiŝojn post ilia geedziĝo, kial do ne ĝuu komfortan vivon je ŝia kosto dum kelka tempo? Unu fojon travidinte sin mem, oni ne plu devas malestimi aliajn. Prenu do Huniŭ.

Jen ĉio!

La filmprezentado finiĝis. Rapide li fiksas la malgrandan akvoskatolon en la lampon kaj eklumigas ĝin. Li demetis eĉ sian internan vatitan jakon kaj staris tie en sia ĉemizo. Li volis kuri tiel rapide kiel li povis, por ke li forgesu ĉion. Eĉ se li falos kaj pro tio mortos, estos ne grave!

Notoj:

1. la pordego Hoŭmen: T.e. la pordego Dianmen, la posta pordego de la iama Malpermesita Urbo.
2. karbobuletoj: Faritaj el karbopolvo miksitaj kun akvo kaj argilo, tiama ĉefa brulaĵo de la popolanoj en Bejping.

XI

Pensante pri la maljunulo kaj Ŝjaŭmar, Ŝjangzi forlasis ĉian esperon kaj decidis ĝui la vivon dum li povis. Kial tuttage kunpremi la dentojn kaj tiom multe suferigi sin? Ŝajnas al li, ke la sorto de la malriĉulo similas jujubokernon, pinta ĉe ambaŭ ekstretoj kaj ronda en la mezo; se vi estis sufiĉe sortfavora, ke vi ne mortis de malsato en la infaneco, vi apenaŭ povos eviti la malsatmorton en la maljuneco. Nur dum la meza periodo, kim vi estas juna kaj forta, kapabla elporti malsaton kaj penlaboron, vi povas vivi kiel homo. Vi estus vera malsaĝulo, se vi ne uzus tiun tempon por ĝui vian vivon, ĉar tio estas kvazaŭ la lasta gastejo en la lasta vilaĝo: preterpasinte ĝin oni povas trovi neniun alian okazon! Ĉe tia konsidero, eĉ Huniŭ kaj tiu ŝia afero koncerne lin ne indas lian maltrankviliĝon.

Kaj tamen, kiam li ekvidis sian fajncan ŝparmonujon, li denove ŝanĝis sian opinion. Ne, li ne povas agi laŭ sia kaprico. Se li nur ŝparos pliajn dekojn da ĵuanoj, li povos havi sufiĉan sumon por aĉeti rikiŝon. Li ne devas lasi vaniĝi siajn antaŭajn klopodojn kaj penojn, nek devas, almenaŭ, facilanime forĵeti tiun sian ŝparaĵon, kiun li tiel malfacile perlaboris! Li devas pluri la ĝustan vojon kaj nepre neniun alian! Sed Huniŭ? Tiu malbeninda “dudeksepa” ankoraŭ mordis lian animon.

Kiam li sentis sin tute senespera, li premadis la ŝparmonujon al sia brusto kaj murmuris: “Kio ajn okazus, tiu ĉi mono estas mia! Neniu povas ĝin forpreni! Kun mono, mi timas nenion. se mi estos tro incitita, mi forkuros por ĉiam. Kun mono mi ja povas iri kien ajn mi volas.”

La stratoj fariĝis ĉiam pli kaj pli vivoplenaj. Ĉie vidiĝis vendostandoj de maltozaĵoj por honoro la Kuirejan Dion, kaj en ĉiu angulo aŭdiĝis vedovokoj de “Maltozaĵon!” Ŝjangzi antaŭe tre deziris, ke la Novjaro venu kiel eble plej baldaŭ, sed nun lia deziro jam malvarmiĝis. Ju pli movoplenaj estis la stratoj, des pli streĉita fariĝis lia koro. Tiu terura “dudeksepa” jam estis tuj venonta! Liaj okuloj fariĝis enfalintaj kaj eĉ la cikatro sur lia vizaĝo iom bruniĝis.

Tirante la rikiŝon, li devis esti aparte singarda, dum tiel homplenaj kaj glitigaj estis la stratoj. Samtempe lia propra problemo obsedis lin tiel, ke li ĉiam sentis sin distriĝema. Ekpensinte pri unu afero, li tuj forgesis la alian, kaj ofte kun subita tremo li eksentis jukon, kiel infaneto suferanta je varmobutonoj dum somero.

En la posttagmezo de la tago de oferado al la Kuireja Dio, blovoj de

orienta vento alportis malhelajn nubojn, kiuj drapiris la ĉielon, kaj subite fariĝi iom pli varme. Ĉirkaŭ la vesperiĝo la vento kvietiĝis kaj komencis flugadi maldensaj neĝeroj. La vendistoj de maltozaĵoj tre maltrankviliĝis, timante, ke la varmo kaj la neĝo igos iliajn varojn kungluiĝi. Ili energis ŝutis blankan pulvoron sur la maltozaĵojn. Falis ne multaj neĝeroj; baldaŭ ili turniĝis en grajnetojn, kiuj susure faladis ĝis blankiĝis la tero.

Post la sepa horo oni komencis, en butikoj kaj hejmoj, fari oferadon al la Kuireja Dio. La subtila neĝo dauxre falis meze inter la incensaj lumetoj kaj la intermitaj fulmoj de Krakfajraĵoj, aldonante sombran tonon al la festa atmosfero.

La homoj, piedirantaj aŭ veturantaj sur la stratoj, ĉiuj havis mienon maltrankvilan kaj malpacienca, ĉar ili deziris alveni hejmen kiel eble plej baldaŭ por fari sian oferadon, tamen sur la glitigaj vojoj ili ne kuraĝis iri per rapidaj paŝoj. La maltozaĵovendistoj, esperante forvendi sian stokon antaŭ la paso de tiu ĉi festotago, estis kriegantaj por oferti siajn varojn, el la tuta gorĝo kaj kun apenaŭa paŭzo por spiri, kaj iliaj voĉoj sonis tre animskue.

Ĉirkaŭ la naŭa horo Ŝjangzi estis tiranta s-ron Caŭ hejmen de la okcidenta urbo. Trapasinte la trafikoplenan vojparton ĉe Ŝjidan-portalo, ili turnis sin en la straton Ĉang'anĝe kaj la vojo iom post iom fariĝis malpli homplena. Sur la larĝa, ebena asfaltita vojsurfaco sterniĝis maldika tavolo da neĝo, kiu estis blindige brila sub la stratlampoj. Jen kaj jen aŭtomobilo preterpasis, ĝiaj reflektoroj ĵetis lumon antaŭen al la foro kaj faris la falantajn neĝerojn flavaj, simile al disŝutitaj oraj sableroj. Proksime de la pordego Ŝinhŭamen la larĝa strato, maldike kovrita de neĝo, etendiĝis foren kvazaŭ al senlimeco, kaj ĉio ĉirkaŭe alprenis pli solenan aspekton. Ĉang'anĝj-portalo, la turo de la pordego Ŝinhŭamen kaj la ruĝaj muroj ĉe la lago Nanhaj, ĉiuj portis blankajn ĉapojn, kiuj bele kontrastis kun iliaj vermilionruĝaj kolonoj kaj muroj. Silente kaj kviete, en la lumo de la stratlampoj ili elmontris la majestecon de la antikva ĉefurbo. La tempo kaj la loko igis Bejping ŝajni kvazaŭ senhomejo, konsistanta nur el luksaj haloj kaj palacoj kun kelkaj maljunaj pinoj, kiu silente ricevis la falantan neĝon.

Ŝjangzi ne havis la emon ĝui la belan pejzaĝon; ekvidinte la jadblankan vojon, li pensis pri nenio alia ol kiel eble plej rapide reveni hejmen. En lia anima okulo li povis vidi la pordegon de la domo de s-ro Caŭ ĉe la alia fino de la rekta, blanka, kvieta strato. Sed li ne povis pliigi sian rapidecon, ĉar la neĝo, kvankam ne profunda, algluiĝis al liaj ŝuoj kaj baldaŭ formis dikan tavolon sub liaj plandumoj. Li piedfrape forigis ĝin, sed baldaŭ ĝi ree aperis. La

neĝgrajnetoj, kvankam tre malgrandaj, estis sufiĉe pezaj. Ili konfuzis lian vidon, tiel ke li ne povis rapide kuri. Liaj ŝultroj blankiĝis de nedegelinta neĝo kaj, kvankam tio nje multe gxis lin, tamen li sentis sin iom malagrabla pro la malseketeco. Estis preskaŭ neniu butikoj en la proksimo, tamen fajrajkrakoj ankoraŭ de tempo al tempo aŭdiĝis el malproksimo, kaj la mallumo estis jen kaj jen heligata de alten ĵetiĝinta duoble-eksploda raketo aŭ unu el tiuj fajraĵoj konataj kiel “Kvin-demonoj-kontraŭ-inferjuĝisto”. Kiam la fajreroj malaperis, la ĉielo ŝajnis pli malluma ol iam ajn, eĉ timige nigra. Aŭskultante la fajrajkrakojn kaj rigardante la fajrerojn kaj la mallumon, Ŝjangzi forte deziris tuj veni en la hejmon. Sed li ne povis libere peli siajn kruojn, kaj tio ĉagrenis lin.

Kio des pli ĝenis lin estis, ke dum la tuta vojo ekde la okcidento li sentis, ke iu biciklanto lin sekvas. Sur la strato Okcidenta Ĉang’anĝe, kie estis pli kviete, li povis eĉ aŭdi la pneŭmatikojn de la biciklo knareti sur la neĝo; kvankam la sono estis malforta, tamen ĝi estis aŭdebla. Samke kiel ĉiuj aliaj rikiŝistoj, Ŝjangzi forte abomenis biciklojn. Aŭtomobiloj ja estas sufiĉe abomenindaj, tamen ili tiel bruas, ke oni povas cedi al ili la vojon kiam ankoraŭ estas sufiĉe longa distanco. Sed bicikloj sviniĝadas jen orienten, jen okcidenten, zigzagante tra la trafiko en tia maniero, ke rigardante ilin oni povas ricevi kapturnon. Cetere, oni ja devas eviti kunpuŝiĝon kun iu el ili, ĉar, se okazas io malfeliĉa, la kulpo ĉiam troviĝas ĉe la rikiŝisto: la policano senescepte riproĉas lin opiniante, ke rikiŝistoj estas pli facile trakteblaj ol biciklantoj.

Plurajn fojojn Ŝjangzi intencis subite haltigi sin kaj igi tiun biciklanton ĵetiĝi teren, sed li ne kuraĝis. La rikiŝistoj devas toleri ĉiajn ofendojn. Tial ĉiufoje, kiam li volis halti por forigi la neĝon de sur siaj piedoj, li ĉiam kriis: “Halton!” La strato antaŭ la pordego de Nanhaj estis tre larĝa, tamen la biciklo ankoraŭ strikte sekvis lin. Plikoleriĝinte, Ŝjangzi intence ekhaltis por frapforigi la neĝon de siaj ŝultroj. Kiam li staris tie, la biciklo preterfrotis la rikiŝon kaj la biciklanto eĉ turnis la kapon por rigardi lin. Ŝjangzi intence lantis, ĝis la biciklanto estis jam sufiĉe malproksime, kaj poste li denove prenis la timonetojn.

“Fi!” li blasfemis.

La “humanismo” de s-ro Caŭ igis lin ne voli ekipi sian rikiŝon per kontraŭventa vatita kapuĉo, kaj li permesis starigi la tolan kapuĉon nur tiam, kiam pluvegis, por ŝpari al la rikiŝisto fortojn. En tiu ĉi maldensa neĝfalo li trovis nenian neceson malfaldi la tolkapuĉon kaj, cetere li ankaŭ volis lasi al siaj okuloj ĝui la vesperan neĝpejzaĝon. Ankaŭ li rimarkis la biciklon, kaj post

la blasfemo de Ŝjangzi kontraŭ la biciklanto li mallaŭte diris; “se li ĉiam sekvos nin, ne haltu ĉe mia domo, sed iru al la loko de s-ro Zuo apud la pordego Hŭanghŭamen. Ne konfuzigu pro timo!”

Ŝjangzi efektive iom timkonfuziĝis. Li antaŭe ĉiam abomenis biciklantojn, sed li neniam rigardis ilin kiel ion timindan. Se s-ro Caŭ ne kuraĝas reveni hejmen, tiu ĉi ulo devas esti io tre minaca! Apenaŭ li kuris kelkajn paŝojn, li jam atingis la biciklanton, kiu estis atendanta ilin. Preterpasante lin, Ŝjangzi ĵetis rigardon al li kaj vidis, ke li estas sekreta policisto. Li ofte renkontis tiajn homoj en tetrinkejoj kaj kvankam li neniam antaŭe parolis kun iu ajn el ili, tamen li povis ekkoni ilin laŭ ties sinteno kaj kostumo. La kostumo de tiu ĉi ulo estis sufiĉe konata al li: nigra vatita robo kaj felta ĉapelo kun randaĵo malalten tiritita.

Kiam ili atingis la kruciĝejon ĉe la strato Nanĉangĝje, profitante la okazon de sinturno tie, Ŝjangzi ĵetis rapidan rigardon malantaŭen. La homo ankoraŭ ilin sekvis. Li preskaŭ forgesis la neĝon sur la tero kaj pli forte pelis siajn piedojn. La longa, rekta strato etendiĝis blanka antaŭ li, prolumata jen kaj jen de malvarmaj stratlampoj kaj malantaŭ li estis detektivo lin sekvanta! Tian situacion Ŝjangzi neniam antaŭe spertis, kaj li ekŝvitis. Ĉe la posta pordego de la parko li ree ĵetis rigardon malantaŭen: ankoraŭ tie!

Kiam ili venis al la hejmo, li ne kuraĝis halti, kvankam li tre volus ĉesigi la kuradon; ĉar s-ro Caŭ estis silenta, li devis nur plu kuri norden. Per unu spiro li atingis la nordan finon de la strato: la biciklo ankoraŭ lin sekvis! Li turnis sin en strateton, ankoraŭ tie! Elirinte el la strateto, ankoraŭ tie! Nur kiam li atingis la nordan finon de la strateto, li trovis, ke ili ne estas sur la ĝusta vojo al Hŭanghuzamen, kaj li devis konfesi, ke lia kapo ja iom konfuziĝis, kio eĉ pli kolerigis lin.

Kiam ili atingis la malantaŭan flankon de la monto Ĝingŝan, la biciklo turnis sian norden la la pordego Hoŭmen. Ŝjangzi deviŝis la ŝviton de la frunto. La neĝo falis malpli dense kaj inter la neĝgrajnetoj aperis kelkaj neĝeroj. Li amis neĝerojn, kiuj gaje flirtis en la aero, malsame ol tiuj incitantaj neĝgrajnetoj. Li rigardis malantaŭen kaj demandis: “Kien do, sinjoro?”

“Ankoraŭ al la domo de s-ro Zuxo. Se iu demandos vin pri mi, diru, ke vi ne konas min.”

“Jes, sinjoro.” La koro de Ŝjangzi komencis tambure bati, kaj li ne faris nedecajn pluajn demandojn.

Kiam ili atingis la domon de s-ro Zŭo, s-ro Caŭ diris al Ŝjangzi, ke li tiru la rikiŝon en la korton kaj rapide fermu la pordegon. Li ŝajnis ankoraŭ trankvila,

tamen lia vizaĝo perdis la koloron. Dirinte tion, li eniris en la domon. Apenaŭ Ŝjangzi tiris la rikiŝon en la tegmentitan enirejon kaj restigis ĝin tie, s-ro Caŭ denove eliris kun s-ro Zŭo, bona amiko de Caŭ-familio.

“Ŝjangzi,” la lipoj de s-ro Caŭ moviĝis tre rapide, “veturu hejmen per taksio. Diru al la mastrino, ke mi estas ĉi tie kaj per vi sciigas ŝin, ke ankaŭ ili venu ĉi tien, per taksio. Sed voku alian taksion kaj ne igu la de vi prenitatan atendi ilin. Ĉu vi komprenas? Bone! Kaj diru al la mastrino, ke ŝi kunprenu kun si la ĉiutagajn necesajojn kaj tiujn rulpenetraĵojn en mia kabineto. Ĉu vi plene komprenas? Tuj baldaŭ mi telefonos al ŝi, sed mi diras ankaŭ al vi, por ke vi povu rememorigi ŝin, se ŝi forgesos miajn vortojn en hasto.”

“Lasu min iri, ĉu bone?” demandis s-ro Zŭo.

“Ne necese. Estas ne certe, ke tiu persono estas detektivo, sed kun tiu ĉi afero en mia koro mi devas esti antaŭgardema. Ĉu vi povus telefone alvoki taksion?”

S-ro Zŭo iris telefoni, dume s-ro Caŭ donis al Ŝjangzi plian instrukcion. “Kiam la taksio venos, mi pagos la ŝoforon. Diru al la mastrino, ke ŝi sin preparu rapide. La aliaj objektoj ne gravas, sed ŝi nepre devas kunpreni la objektojn de la infano kaj tiujn penetraĵojn en la kabineto, tiujn rulpenetraĵojn! Kiam ŝi estos jam preta, diru al Onjo Gaŭ, ke ŝi telefone alvoku taksion kaj venu rekte ĉi tien. Ĉu vi jam komprenas ĉion, kion mi diris? Post kiam ili foriros, vi ŝlosu la pordegon kaj transloĝiĝu en la kabineton, kie estas telefono. Ĉu vi scias uzi telefonon?”

“Mi ne scias fari vokojn, sed nur povas ricevi ilin.” Fakte al Ŝjangzi ne plaĉis ankaŭ ricevi telefonvokojn, sed li ne volis pli multe maltrankviligi s-ron Caŭ.

“Nu, bone!” S-ro Caŭ daŭrigis tre rapide. “Se okazos io ajn, ne malfermu la pordegon! Ne trovinte nin, ili certe ne lasos vin sen puno. Se vere la danĝero vin minacos, estingu la lampon kaj transsaltu la malantaŭan muron en la korton de s-ro Ŭang. Vi konas la familianojn de s-ro Ŭang, ĉu ne? Nu, bone! Kaŝu vin tie kelkan tempon kaj poste foiru. Ne zorgu pri miaj objektoj, nek pri la viaj, nur transsaltu la muron kaj forkuru, antaŭ ol ili vin kaptos. Se vi perdos ion ajn, poste mi ĝin kompensas. Jen estas kvin jŭanoj por nun. Nu, mi nun iros telefoni al la mastrino, kaj kiam vi atingos tien, vi povos ripeti kion mi diris – sed ne menciu pri aresto. Tiu homo, kiun ni ĵus vidis, eble estas detektivo, eble ne. do ne perdu la saĝon.”

La pensoj de Ŝjangzi estis en granda konfuzo. Li havis multajn demandojn, sed li ne kuraĝis ilin meti, tiel forte li deziris enkapigi al si ĉion, kion s-ro Caŭ

diris.

La taksio venis kaj Ŝjangzi mallertmove eniris en ĝin. La nego ankoraŭ falis, nek dense, nek maldense, kaj ĉio ekster la taksio estis ne klare videbla. Li sidis rigide kaj rekte, kun la kapo preskaŭ tuŝanta ĝian supron. Li volus pensi, sed liaj okuloj estis direktitaj al la ruĝa sago antaŭe de li, tiel helkolora kaj plaĉa ĝi estis. Ankaŭ la glacoviŝilo antaŭ la ŝoforo, svingiĝanta aŭtomate, dekstren-maldekstren kaj forviŝanta la vaporon sur la vitro, estis tre amuza. Ĝuste kiam li komencis tediĝi de la rigardado al ĝi, la taksio haltis antaŭ la pordego de la domo de s-ro Caŭ. Malvolonte li eliris el ĝi.

Apenaŭ li ekintencis sonigi la sonorilon, iu viro aperis kvazaŭ el la muro kaj kaptis Ŝjangzi je la pojno. Lia unua instinkto estis provi liberigi sin, sed li ne moviĝis, ĉar li jam rekonis la viron. Tio estis la detektivo sur la biciklo.

“Ŝjangzi, ĉu vi min ne rekonas?” Kun ridetaĉo la viro liberigis lian manon.

Ŝjangzi faris ekgluton, ne sciante, kion diri.

“Ĉu vi forgesis, kiel ni kondukis vin al la Okcidentaj Montoj? Mi estas plotonestro Sun, ĉu vi ekmemoris?”

“Aĥ, plotonestro Sun?” Ŝjangzi ne memoris lin. Kiam la soldatoj fortrenis lin al la montoj, li donis nenian atenton al kiu estas plotonestro aŭ kompaniestro.

“Vi ne memoras min, sed mi memoras vin. Tiu cikatro sur via vizaĝo estas bona rekonilo. Antaŭ momento, dum mi sekvas vin sur la vojo, mi komence ne povis vin plene rekonu, sed, rigardinte vin de ĉiu flanko, mi certigis, ke la cikatro estas ĝuste la via!”

“Ĉu vi havas aferon kun mi?” Denove Ŝjangzi ekintencis sonigi la sonorilon.

“Mi estas okupita!” Ŝvito perlis sur lia frunto, kaj kolero fumis en lia interno. “Dum mi devas provi forkuri de li, kiel mi povas enlasi lin en la domon?” li pensis en si.

“Ne maltrankviliĝu. Mi venis por via bono,” sur lia vizaĝo aperis ruza rideto. Kiam Onjo Gaŭ malfdrmis la pordon, li tuj enpaŝi preter ŝi, murmurante: “Pardonon, pardonon!” kaj ne donante al Ŝjangzi okazon por diri al ŝi ion ajn, li tiris lin internen kaj, montrante la apudpordegan ĉambron, diris: “Ĉu ĉi tie vi loĝas?” Li eniris kaj turnis sian rigardon ĉirkaŭen. “Sufiĉe pura kaj komforta! Ne malbonan okupon vi havas!”

“Kio estas via afero? Mi estas multe okupita!” Ŝjangzi ne povis plu aŭskulti tian babilaĉon.

“Ĉu mi ne diris al vi, ke ĝi estas grava?” Detektivo Sun ankoraŭ ridetis,

sed lia voĉo estas severa. “Mi do diru al vi sen ĉirkaŭfrazo. Tiu ulo, kies familinomo estas Caŭ, estas ano de la ribela partio. Post kiam li estos kaptita, li devos esti pafmortigita, kaj li ne povas forsavi sin! Nu, ĉar ni havis traktadon inter ni tiam, kiam vi servis min en la barako, kaj ĉar ni ambaŭ same estas pavimbatantoj, tial je risko de peza puno mi venis vin averti. Se vi ne forirus unu momenton pli frue, vi estos kaptita, ĉar ni tuj baldaŭ blokos ĉiujn elirejojn de la nesto por ilin kapti, kaj neniu el ili povos forkuri. Kial do homoj kiel ni, kiuj vendas la forton por vivrimedoj, devus involvi nin en tian kompromitan proceson? Ĉu mi pravas, he?”

“Tamen mi kulpus kontraŭ la mastro!” Ŝjangzi ankoraŭ memoris la taskon, kiun s-ro Caŭ ordonis al li.

“Kontraŭ kiu?” La lipoj de detektivo Sun kurbiĝis je ridetaĉo, kaj liaj okuloj strabis al li. “Estas ili mem, kiuj kaŭzis al si tian malfeliĉon; pri kio vi kulpas? Kion ili aŭdacis fari, ties sekvojn ili devas porti; estus ne juste, se ankaŭ ni bruligus niajn fingrojn en ilia afero. Por paroli pri nenio alia, ĉu vi, kutimanta vivi kiel sovaĝa birdo, povus elteni trimonatan sidadon en malluma karcerero?”

“Kaj korme, se ili iras en malliberejon, ili havas monon por subaĉeto kaj ne tiom multe suferos. Sed vi, frato mia, vi ne havas pagilon, sekve ili certe kruele traktos vin. Kaj tio estas nenio kompare kun la fakto ke, se okaze ili per mono ŝmiros ies manon, ili ricevos nur kelkjaran malliberecon, dum vi fariĝo la propeka kapro, se la oficistoj ne povos likvidi la proceson. Vi kaj mi, ni neniun ŝokas kaj ofendas, do kiom maljuste estus, se ni finus la vivon per ricevo de plumbaj jujuboj en la brustonj ĉe Tjanĉjaŭ! Nu, vi estas homo prudenta, kaj prudenta homo ne faras ion, pro kio li scias, ke li suferos. Kulpi kontraŭ ili? Ba! Permesu al mi diri al vi, frato, ja oni faras ankoraŭ nenion, pri kio oni povus esti senkulpaj kontraŭ ni mizeruloj!”

Ŝjangzi ektimiĝis. Rememorante, kion li suferis en la manoj de tiuj soldatoj, li povis bone prezenti al si la bildojn de la malliberejo. “Do mi foriru kaj ne plu zorgu pri ili, ĉu?”

“Se vi zorgas pri ili, kiu zorgos pri vi?”

Ŝjangzi havis nenion por respondi. Li staris senmove, ĝis fine eĉ lia konscienco jesis. “Nu, bone, mi foriros.”

“Ĉu nur tiel, he?” Detektivo Sun malice kekridetis.

Ŝjangzi ankoraŭfoje konfuziĝis.

“Ŝjangzi, amiko mia, kiel stulta vi fariĝis! Mi estas detektivo, ĉu vi pensas, ke mi volas permesi al vi forkuri?”

“Do...” Ŝjangzi tiel konfuziĝis, ke li ne sciis, kion diri.

“Ne ŝajnu vin malsaĝa.” Detektivo Sun fikse rigardis Ŝjangzi rekte en la okulojn. “Vi probable havas iom da ŝparaĵo, elportu ĝin kaj pagu per ĝi vian vojimposton. Ĉiumonte mi perlaboras eĉ malpli ol vi, kaj mi devas min nutri kaj vesti kaj vivteni mian familion. Por pagi ĉiujn ĉi elspezojn, mi ne povas ne akiri iom da mono ekster mia regula salajro. Mi ja diras al vi malkaŝeme. Ĉu vi vere pensas, ke mi povas lasi vin forkuri el mia mano? Amikeco estas amikeco, kaj se mi ne estus via amiko, mi ne venus konsili vin. Sed afero estas afero. Ĉu vi volas, ke mi eliru el ĉi tie kun malplenaj manoj ka mi familio manĝu la nordokcidentan venton? Ni ambaŭ estas homoj mondospartaj kaj ne devas malŝpari vortojn, ĉu ne vere?”

“Kiom vi postulas?”

“Tiom, kiom vi havas. Ne fiksa estas la prezo.”

“Mi prefere iru en malliberejon.”

“Tion vi ja mem diris, ne bedaŭru pro ĝi!” Detektivo Sun enŝovis sian manon en la vatitan robon. “Rigardu tion ĉi, Ŝjangzi! Eĉ nun mi povas aresti vin kaj, se vi rezisto, mi pafos! Se mi nun arestos vin, ĵetite en malliberejon vi estos tuj senigita eĉ ja viaj vestoj, por ne paroli pri via mono. Vi estas homo prudenta, mem bone konsideru la sekvojn.”

“Se vi havas la tempon min premi, kial vi ne premas s-ron Caŭ?” Kun granda peno Ŝjangzi eldiris ĉi tiujn vortojn.

“Li estas la ĉefkrimulo. Se mi kaptos lin, mi ricevos iom da rekompenco; se ne, mi portos la sekvojn de mia fuŝo. Koncerne vin, mia stulta amiko. Lasi vin forkuri estis por mi tiel facile kiel furzi, pafmortigi vin kiel mortigi liteimon. Donu la monon kaj vi povos iri vian vojon; se ne, ni nin intervidos ĉe Tjancxjaŭ! Nu, ĉesu heziti kaj estu prudenta – jam vi ne estas plu juna. Cetere, tiu ĉi sumeto da mono ja ne tute apartenos al mi sola, ĉiuj miaj kamaradoj devas dividi ĝin kun mi, kaj mi ne scias, kiom da kupraj moneroj eniros en mian poŝon. Tia malalta prezo por via vivo kaj tamen vi eĉ hezitas! Vi vere faras min senkonsila! Nu, kiom da mono vi havas?”

Ŝjangzi stariĝis. Liaj vejnoj sur la frunto elstariĝis kaj liaj manoj forte pugniĝis.

“Levi pugnon, mi vin avertas, signifas vian finon. Mi havas grandan aron da homoj ekstere. Tuj elportu la monon! Rapide! Mi ja donas al vi vizaĝon, do sciu esti danka al mi!” La okuloj de detektivo Sun radiis minacan brilon.

“Kiun mi ŝokis? Kaj kiun mi ofendis?” Estis plortona vibro en la voĉo de Ŝjangzi. Poste li denove sidiĝis sur la litrando.

“Neniun. Vi nur trafis en malfeliĉon. La homo sorto estas decidita jam en la utero de lia patrino, kaj ni devas esti ĉe la plejmal-supro de la socio, jen la fakto neŝanĝebla.” Detektivo Sun skuis la kapon, kvazaŭ li profunde emociiĝus. “Sufiĉe jam! Do rigardu min prefere kiel ĉantaĝiston kaj estu prudenta tuj meti finon al via hezito!”

Ŝjangzi denove pensis momenton, sed li ne povis trovi elirejon. Per tremanta mano li elprenis sian fajncan ŝparmonujon el sub la litkovrilo.

“Lasu min rigardi!” Detektivo Sun ekridetis kaj, kaptinte la ŝparmonujon, frakasis ĝin je la muro.

Rigardante la monerojn disĵetitajn sur la planko, Ŝjangzi sentis sian koron preskaŭ disŝiriĝi.

“Ĉu tio estas ĉio?”

Ŝjangzi diris nenion. al li resti nenio alia por fari, ol tremedi.

“Nu, bone! Mi ne volas peli homon tro kruele, amiko estas amiko! Sed sciu, vi ja faras bonan negocon, aĉetante vian vivon per tia malgranda monsumo.”

Ankoraŭ Ŝjangzi diris nenion. tremante li komencis kunruli sian litaĵon.

“Ne tuŝu ĝin!”

“Estas tiom malvarme...” La okuloj de Ŝjangzi flamiĝis.

“Mi jam diris al vi, ke vi ne tuŝu ĝin!”

Ŝjangzi faris ekgluton, kunpremis siajn lipojn, poste puŝmalfermis la pordon kaj eliris el la ĉambro.

Estis jam pli ol unu colo da neĝo sur la tero. Ŝjangzi marŝis kun klinita kapo. Ĉio estis pura kaj blanka, escepte de la grandaj nigraj piedsignoj, kiujn li postlasis post si.

Notoj:

1. honori la Kuirejan Dion: Laŭ legendo, en la 23-a de la dekdua monato laŭ la luna kalendaro, la Kuireja Dio, kiu rolas ankaŭ kiel Hejma Dio, ascendus al la ĉielo por renkontiĝi kun siaj senmortaj parencoj kaj samtempe raportu al la Ĉiela Imperiestro, la plej supera Dio, pri la familio sub sia regado. Tial en la malnova Ĉinio multaj familioj oferis al li antaŭ lia foriro paperan ĉevlon kaj dolĉajn maltozaĵojn, por ke li raportu pri ili kiel eble plej favore.
2. la pordego Ŝinhŭamen: Sudokcidenta pordego de la iama Malpermesita Urbo, ĉe la lago Nanhaj.
3. Tjanĉjaŭ: Fama loko en la sudo de la ekstera urbo de Bejping, populara

amuzejo en la malnova tempo, kie folkloraj artistoj prezentis lokajn operoj, humorajn dialogojn, akrobataĵojn, pubteatraĵojn, luktoj k.a. Tie estis ankaŭ foiro kaj ekzekutejo.

XII

Sjangzi volis trovi lokon por sidiĝi kaj mediti pri la okazintaĵo de la komenco ĝis la fino. Eĉ se la medito finiĝus nur per ploro, almenaŭ li povus per tio scii, kial plori. La eventoj okazis tro rapide, ke lia menso povus ilin sekvi. Sed estis neniu loko por sidi, ĉie estis nur neĝo. Ĉiuj malgrandaj tetrinkejoj estis fermitaj, ĉar jam estis post la deka horo, kaj eĉ se unu el ili estus nefermita, li neniel volus eniri. Li deziris trovi iun lokon senhoman, ĉar li sciis, ke la larmoj, kiuj staras en liaj okuloj, povas fali en ĉiu minuto.

Trovinte neniun lokon por sidi, li povis nur marŝi plu; sed kien li direktu la paŝojn? En tiu ĉi arĝente blanka mondo estis neniu loko, kie li povus sidi, nek loko, kien li povus iri. Ĉie estis blankaĵo, vidiĝis nur malsataj birdoj kaj unu homo, kiu perdis sian ŝirmon kaj vespiris en malespero.

Kien iri? Jen staras la problemo, kiun li antaŭ ĉio devas solvi. Al malgranda gastejo? Ne! Portante tiajn vestojn, li eĉ povus esti prirabita nokte, por ne paroli pri tieaj netolereblaj pedikoj. Do al pli granda gastejo? Li ne havas sufiĉe da mono por pagi al ĝi. Al li restas nur kvin jŭanoj, kaj tio estas lia tuta havaĵo. Al banejo? Ĉiu banejo malfermiĝis ĉe la noktomezo, kaj oni ne povas tranokti tie. Nenien li povas iri. Ne povante trovi por si ŝirmejon, li dronis en pli granda embaraso. Post tiom da jaroj en la urbo, nun li posedas nur la vestojn, kiujn li surhavas, kaj kvin jŭanojn en sia poŝo. Li perdis eĉ sian litaĵon! Tiu ĉi fakto devigas lin direkti siajn pensojn al la morgaŭo: kion do li faru morgaŭ? Ankoraŭ tiri rikiŝon? Hm, tio reduktus lin denove al senhejmeco kaj farus lin prirabita je sia lasta ŝparaĵo!

Ĉu fariĝi kolportisto? Kun nur kvinjŭana kapitalo, el kiu li devus elspezi por portvekto, kiel li povus esti certa perlabori siajn vivrimedojn? La rikiŝisto, komencante per nenio, povas ĉiun tagon perlabori tri aŭ kvar ĝjaŭojn; sed la kolportisto bezonas kapitalon, kaj ne estas garantio, ke li povu perlabori sufiĉe da mono por pagi la tri manĝojn de ĉiu tago. Se li tute perdus sian kapitalon en kolportado kaj poste denove sin okupus je rikiŝotirado, ĉu tio ne signifus demeti sian pantalonon por ellasi furzon – vana perdo de kvin jŭanoj? Ne, li ne povas facilanime lasi forgliti el lia mano ĉiun fenomenon el tiuj ĉi kvin juxanoj, ĉar ili estas lia lasta espero.

Ĉu dungiĝi kiel servisto? Por tio li ne taŭgas. Servi aliajn? Tion li ne kapablas fari. Lavi kaj kuiri? Ambaŭ li ne scias fari. Por nenio li estas ekzercita, ne estas lerta, li estas nur grandkreska, pezmova, kruda sentaŭgulo!

Absorbata en sia penso, li jam venis sur la ponton ĉe la lago Ĝonghaj. Ambaŭflanke de ĝi estis vasta spaco kaj vidiĝis nenio krom la kirliĝantaj neĝeroj. Nur nun li eksciis, ke ankoraŭ neĝadas, kaj, ekpalpinte sian kapon, li trovis sian lanan ĉapon malseka. La ponto estis senhoma, eĉ la policano deĵoranta sin kasis oni ne scias kie. La falantaj neĝeroj faris la nemultajn lampojn kvazaŭ senĉese palpebruantaj. Ŝjangzi jetis rigardon ĉirkaŭen kaj sentis sian menson tute vaka.

Longan tempon li staris sur la ponto, kaj la mondo ŝajnis mortinta. Estis nenia sono, nek moviĝo. La grizeblankaj neĝeroj kvazaŭ profitis la okazon flirtadi malsupren leĝere, persiste, povis nerimarkeble entombigi la tutan mondon.

En tia kvieteco Ŝjangzi aŭdis sian konsciencon flustri: “Ne zorgu pri vi mem, antaŭ ĉio iru returne por vidi, kiel statas Caŭ-familio.” S-ino Caŭ kaj Onjo Gaŭ estas solaj tie, senb viro en la domo. Ĉu tio ne estas s-ro Caŭ, kiu donis al li tiujn ĉi lastajn kvin jŭanojn? Ne kuraĝante plu pensi, li abrupte ekmarŝis returne, paŝante tre rapide.

Ekster la pordego estis piedsinoj kaj sur la vojo vidiĝis du freŝaj radsulkoj de aŭtomobilo. Ĉu s-ino jam foriris? Kial tiu Sun ne arestis ilin?

Li ne kuraĝis puŝmalfermi la pordegon, timante, ke oni refoje kaptos lin. Li rigardis ĉirkaŭen, estis neniun homon. Kun koro forte batanta, li prenis la kuraĝon prove malfermi la pordegon. Nun por li jam estas neniun loko, kien li povus iri, do estus eble ne tro malbone, se oni arestus lin. Delikate li ekpuŝis la pordon, kiu estis neŝlosita. Laŭlonge de la muro li iris antaŭen kelkajn paŝojn kaj ekvidis lumon en sia ĉambro. Lia propra ĉambro! Li eksentis plorem. Kliniĝinte, li ŝtelpaŝis al la fenestro kaj aŭskultis. Aŭdiĝis tuso interne – estis voĉo de Onjo Gaŭ. Li tirmalfermis la pordon.

“Kiu tie? Ho Ĉielo, estas vi! Vi teruris min ĝis morto!” Onjo Gaŭ premis siajn manojn al la brusto, poste iom trankviligis sin kaj sidiĝis sur la lito. “Ŝjangzi, kio okazis al vi?”

Ŝjangzi ne povis respondi. Li havis la senton, kvazaŭ pluraj jaroj jam pasus de tiam, kiam li lastfoje ŝin vidis, kaj en li kvazaw leviĝis fajroglobo, kiu blokis lian bruston.

“Kio okazis” Ankaŭ en la voĉo de Onjo Gaŭ estis plremo. “Antaŭ ol vi revenis, la mastro telefonis al ni kaj diris, ke ni veturu al la domo de s-ro Zŭo. Li diris ankaŭ, ke vi tuj revenos. Vi ja revenis, ĉu mi ne malfermis la pordon por vi? Ekvidinte, ke vi havas fremdulon kun vi, mi diris neniun vorton kaj tuj returne al la mastrino por helpi al ŝi ĉe la pakado, dume vi neniufoje envenis. Vi

lasis min kaj la mastrinon senhelpaj en la malluma nokto. La sinjorido jam dolĉe dormis kaj ni devis ŝiri lin el sub lia varma litkovrilo. Pretiginte la pakojn mi iris al la kabineto por preni la pentraĵojn, kaj vi ankoraŭ ne vin montris. Kie vi estis? Kiam ni estis haste finpreparitaj, mi eliris por vidi vin, sed ho ve, vi jam malapiris! La mastrino estis tiel kolera – ankaŭ tiel maltrankvila – ke ŝi senĉese tremadis. Do mi telefone vokis taksion. Sed ni ne povis ĉiuj foriri, lasante la domon tute senhoma. Tial mi ĵuris al la mastrino, ke mi restos, kaj petis ŝin foriri unue. Mi diris, ke kiam vi revenos, mi tuj iros al la domo de s-ro Zŭo; se vi ne revenos, tiam mi submetos min al mia sorto. Nu, kion vi diru pri tio ĉi? Kio okazis al vi? Parolu do!”

Ŝjangzi havis nenion por diri.

“Diru tuj! Ĉu silento povus klarigi ion ajn? Kio do okazis al vi efektive?”

“Vi do foriru!” Ŝjangzi finfine ekparolis. “Iru!”

“Vi restos ĉi tie por gardi la domon, ĉu?” La kolero de Onjo Gaŭ iom kvietiĝis.

“Kiam vi vidos la mastron, diru al li, ke la detektivo kaptis min, sed – mi ankaŭ ne estis kaptita en la fino!”

“Kion tio signifas?” Onjo Gaŭ preskaŭ ekridis en sia kolero/

“Aŭskultu!” Ŝjangzi eĉ ekhavis iom da kolero. “Diru al la mastro, ke li forsavu sin kiel eble plej rapide. La detektivo diris, ke li havas la certecon lin kapti. Ankŭ la domo de s-ro Zŭo ne estas sekura loko. Li tuj forkuru. Kaj nun, post via foriro mi transsaltos en la korton de Ŭang-familio kaj tranoktos tie. Mi ŝlosos la ĉi-tiean pordegon. Morgaŭ mi iros aliloken por serĉi novan laboron. Mi sentas min ne inda je la konfido de la mastro.”

“Ju pli vi parolas, des pli konfuziĝas mia kapo.” Onjo Gaŭ eksuspiris. “Nu, mi devas foriri. La sinjorido eble jam malvarmumis; mi devas tuj iri kaj lin vidi. Kiam mi vidos la mastron, mi diros al li, ke vi diris, ke li devas forkuri kiel eble plej rapide. Ĉi-nokte vi ŝlosos la pordegon, transsaltos en la korton de s-ro Ŭang kaj tranoktos tie. Morgaŭ vi serĉos alian laboron. Jen ĉio, kion vi volas diri al la mastro, ĉu?”

En granda honto Ŝjangzi jese balancis la kapon.

Post kiam Onjo Gaŭ foriris, li ŝlosis la pordegon kaj revenis en sian ĉambron. La frakasita fajenca ŝparmonujo ankoraŭ kuŝis sur la planko. Li levis rompopecon kaj rigardis ĝin, poste reĵetis ĝin sur la plankon. Sur la lito, lia litaĵo estis netuŝita. Strange, kion tio signifas? Ĉu la detektivo Sun povus esti falsa? Neeble! Se s-ro Caŭ ne elflaris ian dangĉeron, kial li forlasis sian hejmon kaj tiel fuĝis? Tian aferon li tute ne komprenas.

Tre konfuzita, li sidiĝis sur la litrando, sed, apenaŭ li tuŝis la liton, li saltleviĝis kvazaŭ ektimigite. Li ne devas resti ĉi tie longan tempon! Kon fari, se tiu Sun revenos? Liaj pensoj kirligis en la kapo. Li sentis, ke li trompis la konfidon de s-ro Caŭ, sed li iom konsoliĝis per tio, ke li jam petis Onjon Gaŭ tuj iri al li kun la mesaĝo, ke li forkuru kiel ebla plej rapide. Lia konscienco estas pura. Li neniam intence faris malbonon al iu ajn, kaj li eĉ mem suferis ofendojn. Perdante sian monon, li tiam ja neniel povis plu zorgi pri la afero de s-ro Caŭ. Murmurante ĉion ĉi al si, li kunligis sian litaĵon.

Surŝultriginte sian litaĵon, li estingis la lampon kaj rapidis al la postkorto. Demetinte la litaĵon, li suprenstreĉiĝis sur la piedfingroj, por sin kroĉi al la mursupro per la manoj.

“Laŭ-Ĉeng!” li mallaŭte vokis. “Laŭ-Ĉeng!” Laŭ-Ĉeng estis la rikiŝisto de s-ro Ŭang.

Neniu respondis. Ŝjangzi do decidis transsalti la muron por vidi, kiel statas tie. Li ĵetis la litaĵon trans la muron kaj ĝi senbrue falis sur la neĝon. Lia koro forte batis. Li rapide grimpis sur la muron kaj saltis malsupren sur la alian flankon. Levinte la litaĵon, li senbrue direktis sin al la ĉambro de Laŭ-Ĉeng. Li sciis, kie li loĝas. Ĉiuj kvazaŭ jam endormiĝis. Aŭdiĝis nenia sono en la korto. Subite venis al li en la kapon la ideo, ke fari ŝteladon ja ne estas malfacile. Li prenis al si kuraĝon kaj memfide paŝi sur la firma neĝo, kiu kraketis sub liaj piedoj. Starante ekster la ĉambro de a Laŭ-Ĉeng, li ektusis.

“Kiu tie?” Laŭ-Ĉeng demandis, evidente li ĵus enlitiĝis.

“Estas mi, Ŝjangzi. Malfermu la pordon!”

Ŝjangzi parolis tiel nature kaj intime, kvazaŭ en la voĉo de Laŭ-Ĉeng li aŭdis kuraĝigon de iu intimo.

Laŭ-Ĉeng eklumigis la lampon, ĵetis ĉifonan peltojakon sur la ŝultrojn, kaj malfermis la pordon.

“Kio venigis vin ĉi tien, Ŝjangzi, je tiu ĉi horo nokte?”

Ŝjangzi eniris, metis sian litaĵon sur la plankon kaj falsidiĝis sur ĝin, dirante neniun vorton.

Laŭ-Ĉeng estis en sia tridekkelk-jara aĝo kaj liaj muskoloj estis tiel fortikaj, ke ili elstariĝis en tuberoj sur lia tuta korpo, eĉ sur lia vizaĝo. Ordinare Ŝjangzi ne havis intimajn interrilatojn kun li, ili nur salutis unu la alian kaj iom babilis, kiam ili renkontiĝis. Ifoje s-ino Ŭang iris fari aĉetojn kun s-ino Caŭ, tiam la du rikiŝistoj povis havi okazon kune ripozi kaj trinki teon. Ŝjangzi ne aparte admiris Laŭ-Ĉeng, ĉar, kvankam li kuris tre rapide, tamen li balancadis la rikiŝon anstataŭ firme teni ĝiajn timonetojn. Kiel persono li ja estis

bonkonduta, tamen ĝuste pro tiu ĉi lia malforteco Ŝjangzi ne povis respekti lin el la tuta koro.

Sed ĉivespere Ŝjangzi trovis Laŭ-Ĉeng treege kara. Kvankam li sidis tie senparole, tamen lia koro estis plena de varmo kaj dankemo. Ĵustempe li staris sur la ponto ĉe Ĝonghaj, nun li estas en tiu ĉi ĉambro kun sia kolego. La abrupteco de tiu ĉi ŝanĝo igis lin senti animvakecon kaj samtempe ankaŭ donis al lia koro iom da varmo.

Laŭ-Ĉeng denove enlitiĝis kaj ŝovis sin sub la litkovrilon. Montrante sian ĉifonan peltojakon, ili diris, “ĉu vi deziras cigaredon, Ŝjangzi? Estas kelkaj en mia poŝo.”

Ŝjangzi kutime ne fumis, sed ĉi-foje li sentis, ke li ne povas rifuzi. Li prenis cigaredon kaj komencis suĉi.

“Kio okazis al vi?” Laŭ-Ĉeng demandis. “Ĉu vi jam forlasis vian laboron?”

“Ne.” Ŝjangzi ankoraŭ sidis sur sia litaĵo. “Okazis malfeliĉo neatendita! La tuta Caŭ-familio forkuris kaj mi ne kuraĝas tute sola gardi la domon.”

“Kia malfeliĉo?” Laŭ-Ĉeng denove sidiĝis.

“Mi ne povas diri precize, sed ĝi estas sufiĉe granda. Eĉ Onjo Gaŭ foriris.”

“Ĉu ĉiuj pordoj estas vaste malfermitaj, eĉ sen gardanto?”

“Mi jam ŝlosis la ĉefan pordegon.”

“Hm.” Laŭ-Ĉeng pensis momenton. “Mi do iros diri tion al s-ro Ŭang, ĉu bone?” Dirante li jam volis sin vesti.

“Atendu ĝis morgaŭ. Mi ja tute ne povas klarigi la aferon.” Ŝjangzi timis, ke s-ro Ŭang pridemandos lin.

Tio, kion Ŝjangzi ne povis klarigi, estis jena: s-ro Caŭ donis kelkajn lekciojn ĉiusemajne en iu universitato. Tie estis studento nomata Ĵŭan Ming, kiu havis proksimajn rilatojn kun s-ro Caŭ kaj ofte vizitis lin por intima interparolado. S-ro Caŭ estis socialisto kaj Ĵŭan Ming estis eĉ pli radikalema, kaj tial ili havis komunaj paroltemojn. Tamen pro la diferenco inter siaj aĝoj kaj situacioj ili ne ĉiam trovis sin en perfekta akordo. El la vidpunkto de instruisto s-ro Caŭ opiniis, ke li devas dediĉi sin ĉefe al instruado, dum la studentoj devas antaŭ ĉio diligente lerni kaj ne povas ricevi siajn notojn laŭ la personaj rilatoj. Sed Ĵŭan Ming insistis, ke en tia ĥaosa mondo junulo kun altaj idealoj devas klopodi por kontribui al la revolucia afero kaj povas portempe ne multe zorgi pri sia studado. Li tenis rilatojn kun s-ro Caŭ tial, ĉar, unuflanke, ili havis komunajn paroltemojn, kaj, aliflanke, li esperis ricevi dank’ al iliaj proksimaj rilatoj sufiĉe bonan noton por trapasi la ekzamenon, malgraŭ ke li maldiligentis

en sia studado. En tumultaj tempoj personoj kun altaj idealoj ofte agas malnoble. La historio konas ne malmultajn tiajn pardoneblajn ekzemplojn.

Venis la ekzamena tempo kaj s-ro Caŭ tamen ne donis al li la noton “sufiĉa”. En efektiveco, eĉ se s-ro Caŭ donus al li tian noton, li ne povis daŭrigi sian studadon, tiel malaltaj estis ĉiuj aliaj notoj de li ricevitaj. Sed li treege malamis s-ron Caŭ, opiniante, ke tiu tute ne konsideris iliajn personajn rilatojn – en Ĉinio la personaj rilatoj estas samvaloraj kiel revoluci. Pro la forta deziro fari ion eksterordinaran, Ĵŭan Ming malzorgis sian studadon, kaj pro la malzorgado li iom post iom kutimiĝis al maldiligenteco, esperante, ke li povos gajni sen peno ĉies admiron kaj protekton. Kiel ajn estas,” li pensis, “mi ja estas ideologie progresema! La fakto, ke s-ro Caŭ ne donis al mi sufiĉe bonan noton, klare montras, ke li tute ne komprenas la junulon kiun altaj idealoj. Se tiel estas, kial do li intimiĝis kun mi? Estante intima al mi, li tamen hontige embarasis min ĉe la ekzameno, el kio vidiĝas, kiel insidema li estas.” Nun kiam la ricevitaj malaltaj notoj estis neripareblaj kaj la ĉeso de la studado estis neevtebla, li volis verŝi sian koleron sur s-ron Caŭ. Ne povante plu studi en la universitato, li devis venĝi sin kontraŭ la instruisto tiel, ke ankaŭ tiu forlasu la universitaton kiel li. Tiamaniere li povis havi ion por fari en sia senokupeco kaj samtempe per tio montri, ke li ja estas tute neofendebla. Cetere, se dank’ al tiu ĉi afero li povos enbatiĝi en iun novan organizaĵon, estos pli bone.

Li do resume skribis ĉion, kion s-ro Caŭ prilekciis kaj babilis pri demandoj politikaj kaj sociaj, kaj denunciis lin al la sidejo de la partia organizaĵo: s-ro Caŭ propagandis ekstremismajn ideojn inter la junuloj.

S-ro Caŭ jam antaŭe iom aŭdis pri tio, sed li trovis tion ridinda. Li sciis, kiel ne ĝisfunda estas lia progresemo, kaj ke lia ŝatokupo – kolektado de tradiciaj pentraĵoj – malhelpas al li fari iajn impetegan agon. Kiel ridinde malhelpas al li fari ian ajn impetegan agon. Kiel ridinde estas, ke li estas etiketita kiel revolucia instruanto! Tial li ne donis atenton al la afero, kvankam liaj studentoj kaj kolegoj avertis lin esti iom singarda. Kaj tamen, ken ĥaosaj jaroj, konservi animan trankvilecon ja ne estas garantio de sekureco.

La vintraj ferioj donis bonan okazon por purigi la universitaton. Detektivoj komencis fari esplorojn kaj arestojn. S-ro Caŭ plurfoje sentis, ke li estas gvatsekvata kaj la ombro post li turnis lian ridon en timon. Li devis pripensi: por akiri al si renomon, nun li havas bonan okazon. Esti ĵetita en malliberejon por kelkaj tagoj estas io pli simpla kaj pli senriska, ol meti inferan maŝinon, sed havanta la saman valoron, kiel la lasta. Enkarceriĝo estas unu el la kondiĉoj necesaj, por ke oni fariĝu gravulo. Sed li tion ne volis. Li ne volis per tio akri al

si falsan renomon. Lia konscienco bedaŭrigis lin, ke li ne povas fariĝi ĉampiono de sia doktrino, kaj lia konscienco ankaŭ ne permesis al li, ke li fariĝu batalanto ne vera. Li do iris vidi s-ron Zŭo.

S-ro Zŭo proponis: “Se montriĝos neceseco, transloĝiĝu al mi. Almenaŭ nun ili ne aŭdacas priserĉi mian loĝejon!” S-ro Zŭo havis gravajn sociajn rilatojn, kiuj valoris pli ol la leĝoj. “Venu al mi kaj kaŝu vin ĉi tie kalkajn tagojn por montri, ke ni timas ilin. Poste ni komencos klopoti por glatigi la aferon. Vi eble devos iom ŝmiri iliajn manojn. Montrinte al ili suŝican respekton kaj ilin subaĉetinte, vi povos reveni hejmen, kaj ili certe lasos vin en paco.

Detekvitvo Sun sciis, ke s-ro Caŭ ofte vizitas s-ron Zŭo, kaj ke li certe iros tien, se li estos preme persekutata. La kaŝpolicistoj ne kuragis ofendi s-ron Zŭo, ili celis nur timigi s-ron Caŭ. Nur tiam, kiam ili pelos lin en la domon de s-ro Zŭo, ili povos havi la esperon melki monon el li, kaj sentos, ke ili havas vizaĝon. Ĉantagxi Ŝjangzi ne estis parto de ilia planom sed ĉar li mem trafis en iliajn manojn, kiel do unue ne eldevigi el li ok aŭ dek ĵanojn?

Tia estis la vivo: ĉiu havas sian eliron kaj povas trovi ie truon por elturniĝi escepte de Ŝjangzi. Li ne povas eskapi, ĉar li estas rikiŝisto. La rikiŝisto englutas grajnoŝelojn, sed sputas sian vivosangon; li pleje streĉas ĉiu siajn fortojn por la plej malalta pago. Li staras sur la plej malalta ŝtupo de la socio, suferante la batojn de ĉiuj homoj, ĉiuj leĝoj, ĉiu malfeliĉoj.

La cigaredo jam forbrulis, tamen Ŝjangzi ankoraŭ sidis tie kun kapo konfuzita. Li similis kokon tenatan en la mano de kuiristo, dezirantan nenion alian ol vivi unu plian minuton. Li volus paroli pri la afero kun Laŭ-Ĉeng, sed li trovis nenion por diri, ĉar liaj vortoj ne povis suŝice bone esprimi liajn sentojn. Tial, malgraŭ ke li spertis ĉiajn suferojn, sed ne povis ilin eldiri, li do restis muta. Li aĉetis rikiŝon kaj perdis ĝin, ŝparis monon kaj perdis ĝin. Ĉiuj liaj penoj kaj klopotoj finiĝis per lia ofendiĝo kaj humiliĝo. Li kuraĝis inciti neniun, eĉ faris vojon al sovaĝa hundo. Kaj tamen, jen li estis tiel krule ofendita, ke li apenaŭ povis spiri.

Estis ne necese plu pensi pri la pasinteco, sed kion li faru morgaŭ? Li ne povis reveni al la domo de s-ro Caŭ, do kien li iru? Ĉu mi povus pasigi la nokton ĉi tie?” li demandis kiel hundo vaganta, kiu trovinte ventoŝirman angulon esperas resti tie portempe. Sed eĉ en tia bagatelo li devis certiĝi, ĉu li ĝenos iun ajn.

“Restu ĉi tie, al kiu alia loko vi povus iri en tia neĝo? Ĉu estos al vi elteneble kuŝi sur la planko? Ni do kunpremu nin sur la lito, se plaĉos al vi.”

Ŝjangzi ne volis ĝeni lin sur la lito. Li diris, ke sur la planko estos bone.

Laŭ-Ĉeng endormiĝis, sed Ŝjangzi turniĝadis en sendormeco. La malvarmo sur la planko rapide frostigis lian matracon tiel, ke ĝi kvazaŭ fariĝis ferplato, kaj en la suroj de siaj fleksitaj kruroj li kvazaŭ sentis venon de kramfo. La malvarma vento, kiu eniris tra la fendetoj de la pordo, pikis lian kapon kvazaŭ sennombraj pingloj. Li perforte fermis la okulojn kaj kovris la kapon per la litkovrilo, sed li ankoraŭ ne povis endormiĝi. La ronkoj de Laŭ-Ĉeng incitis lin tiel, ke li eĉ volus saltleviĝi kaj pugnobati lin, por kvietigi siajn sentojn. Fariĝis pli kaj pli malvarme, ke la gorĝo jukis al li, tamen li timis, ke lia tusado vekos Laŭ-Ĉeng el lia dormo.

Ne povanta ekdormi, li tre dezirus leviĝi kaj ŝtele reiri al la domo de s-ro Caŭ por ĝin refoje pririgardi. Li jam maldungiĝis, la loko estas senhoma; kial li ne iru tien kaj prenu al si kelkajn objektojn? Ĝuste pro Caŭ-familio li estis prirabita je sia malfacile ŝparita mono; ĉu ne estus tre juste, ke Caŭ-familio kompensu ĝin al li? Ĉe tiu ĉi penso liaj okuloj ekbrilis; li forgesis la malvarmon, li devus tuj agi! Tiel facile li povus reakiri sian perditan monon malfacile ŝparita, kial do heziti?

Li jam sidiĝis, sed li denove tuj kuŝiĝis, kvazaŭ Laŭ-Ĉeng lin rigardus. Lia koro forte batis. Ne, li ne povas fariĝi ŝtelisto! Absolute ne! Antaŭ momento li jam sentis sin kulpa pri tio, ke li ne plenumis la taskon, kiun konfidis al li s-ro Caŭ, kiel do li povus permesi al si eĉ ŝteli ion el lia domo? Ne, ne, li preferus malsati ĝis morto ol fariĝi ŝtelisto.

Sed kiel li povus esti certa, ke aliaj ne priŝtelos la domon? Se tiu Sun jam forprenis ion, kiu povus scii? Li ree sidiĝis. El la malproksimo aŭdiĝis hundaj bojoj. Li denove kuŝiĝis. Ne, li neniel povas iri. Se aliaj ŝtelus, nu, ili ŝtelu; lia konscienco devas esti pura. Malriĉa en tia grado, li ne devas malpurigi siajn manojn per ŝtelo.

Cetere, Onjo Gaŭ sciis, ke li venos en la domon de s-ro Ŭang. Se io perdiĝos dum la nokto, li certe estos kupigita pri tio, tute egale ĉu li ĝin ŝtelis aŭ ne. Ĉe tiu ĉi penso li ne sole ne volis mem fari ŝtelon, sed eĉ timis, ke iu alia povos enŝteliĝi en la domon. Se efektive io perdiĝos, li neniel povos senkulpigi sin, eĉ se li ensalutis en la Flavan Riveron, por sin purigi.

Li ne plu sentis sin malvarma, fakte liaj polmoj eĉ iom ŝvitis. Kion li devas fari? Transsalti la muron kaj fari prigardon tie? Li ne kuraĝas. Li jam pagis monon por sia vivo, li ne povas ĵeti sin en alian kaptilon. Sed kion fari, se io vere perdiĝos?

En dilemo li denove sidiĝis, fleksis la krurojn supren kaj klinis la kapon tiel, ke lia vizaĝo preskaŭ tuis la genuojn. La kapo estis peza kaj la palpebroj

restis mallevitaj, sed li ne kuraĝis dormi. Longa estis la nokto, tamen por li estis neniu minuto por ripozi.

Li ne sciis, kiom longe li sidis, ŝpinante en la kapo unu planon post alia. Subite ekpenso trakuris lian menson kiel fulmo kaj li ekpuŝis Laŭ-Ĉeng per la mano. “Laŭ-Ĉeng! Laŭ-Ĉeng! Vekiĝu!”

“Kio estas al vi?” Tre dormema Laŭ-Ĉeng malfermis la okulojn. “Ĉu vi volas pisi? La noktovazo estas sub la lito.”

“Vekiĝu! Eklumigu la lampon!”

“Ŝtelisto?” Laŭ-Ĉeng sidiĝis, elŝirinte sin el la dormo.

“Ĉu vi jam plene vekigis?”

“Jes.”

“Laŭ-Ĉeng”, rigardu! Jen estas mia litaĵo, jen miaj vestoj kaj jen la kvin ĵuanoj, kiujn s-ro Caŭ donis al mi. estas nenio alia, ĉu ne?”

“Ne. Kio estas al vi?” Laŭ-Ĉeng oscedis.

“Ĉu vi plene vekigis? Jen estas ĉio, kion mi havas. Mi ne prenis eĉ unu kudrilon el la domo de s-ro Caŭ!”

“Kompreneble, vi ne prenis. Kiel ni, kiuj longatempe laboras kiel laŭmonataj dungitoj ĉe bonaj familioj, povus priŝteli ilin? Se ni kapablas labori, ni laboru; se ne, ni ekŝiĝu. Kiel ni povus ŝteli iliajn objektojn? Ĉu tio estas kion vi volas diri?”

“Ĉu vi bone vidas?”

Laŭ-Ĉeng ekridetis. “Jes, senerare. Nu, ĉu vi ne sentas vin malvarma?”

“Ne.”

Notoj:

1. Laŭ: “Laŭ” estas prefikse aldonata ĝenerale al familia nomo, iatempe ankaŭ al persona nomo, por signi intimecon al kunuloj aŭ subuloj.
2. sidejo de la partia organizaĵo: Tiam Bejping estis sub la regado de Kuomintango, la partio estrata de Ĉjang Kajŝek. La lokaj sidejoj de la partia organizaĵo de Kuomintango estis samtempe ankaŭ sidejoj de sekreta servo, kiu konstanta givatis kaj persekutis komunistojn kaj progresemojn.
3. Tiujn vortojn oni ofte diras, kiam oni ne povas senkulpiĝi sin. La flava Rivero estas la plej granda rivero en norda Ĉinio, en kiu la akvo ĉiam estas flava pro abundeco de sablo.

XIII

Pro la neĝbrilo la ĉielo ŝajnis lumiĝi pli frue ol ordinare. Kaj ĉar multaj familioj jam aĉetis al si kokojn kaj ilin bredis por la Novjaro, la kokokrioj pluroble pli multiĝis ol ordinar. La ĉie aŭdiĝanta kokeriko kaj la freŝe falinta neĝo kvazaŭ aoncis la alvenon de jaro de abundeco.

Ŝjangzi apenaŭ dormis tutnokte. Nur en la fruaj horoj de la mateno li sukcesis dormeti kelkan tempon; tio estis tia malkvieta duondormo, kvazaŭ li balanciĝus supren kaj malsupren sur ondoj. Ju pli longe li kuŝis, des pli malvarma li sin sentis kaj, kiam la kokoj komencis krii, li simple ne povis plu tion elteni. Ne volante ĝeni Laŭ-Ĉeng, li kuntiris la krurojn kaj kovris sian buŝon per la litkovrilo, por malpli aŭdebligi sian tusadon, sed li ankoraŭ ne kuraĝis leviĝi. Li kuŝis plu, atendente malpacience. Finfine eklumis la ĉielo kaj de la stratoj aŭdiĝis radknarado de ĉaroj kaj diroj de iliaj veturigisj li sidiĝis.

Ĉar sidante li ankoraŭ sentis in malvarma, li do leviĝis, butonumis sian jakon kaj malfermis tre mallarĝe la pordon por elrigardi eksteren. La neĝo estis ankoraŭ ne dika – probable ĉesis neĝi jam ĉe la noktomezo. La vetero ŝajne jam sereniĝis, sed la ĉielo estis grizeca kaj neklara, kaj eĉ sur la neĝo vidiĝis pala grizeca ombro. Liajn unuajn rigardojn kaptis la grandaj piedsignoj, kiujn li faris en la lasta nokto. Kvankam ili estis kovritaj de freŝa neĝo, tamen la kavoj estis ankoraŭ klare videblaj.

Parte por trovi ion por fari, parte por forigi la piedsignojn, li silente prenis balailon el angulo de la ĉambro kaj eliris por forbalai la neĝon. La neĝo estis peza, kaj estis ne facile ĝin forbalai. Ne povante trovi grandan bambuan balailon, li devis kliniĝi tre malsupren kaj pene batalis. Li forbalais la supran tavolon, sed restis ankoraŭ kelkaj neĝgrajnegoj, kiuj kvazaŭ algluiĝis al la tero. Li rektigis sin por ripozo du fojojn dum la balaado de la tuta korto kaj fine amasigis la neĝon ĉe la bazo de du malgrandaj salikoj. Li ŝvitetis, iom varmiĝis kaj sentis sin iom vigliĝinta. Li fari piedfrapojn por forigi la neĝerojn de la ŝuoj kaj elblovis longan, blankan spirafjon.

Revenite en la ĉambron, li remetis la balailon en ĝian lokon kaj decidis kunruli sian ligafjon. Laŭ-Ĉeng, kiu jam vekiĝis, estis oscedanta. Apenaŭ li refermis sian buŝon. li jam murmuris: “Ĉu jam malfrue?” poste li frotis al si la okulojn por forpeli la dormemon kaj elprenis cigaredon el la poŝo de sia pelta jako. Farinte du suĉojn, li plene vekiĝis. “Ne foriru ankoraŭ, Ŝjangzi. Atendu ĝis mi alportos iom da bolinta akvo kaj ni trinku kruĉon da varma teo. Dum la

nokto certe vi multe suferis.!”

“Lasu min iri alporti la akvon.” Ŝjangzi afable sin proponis. Sed, apenaŭ li tion eldiris, la teruro de la pasinta nokto ree kaptis lin kaj subite lia koro konvulsie kunpremiĝis.

“Ne, lasu min iri. Vi ja estas mia gasto!” Tion dirinte, Laŭ-Ĉeng rapide metis sur sin la veston sen butonumado; poste li ligis sian ĉifonan peltjakon per tolzono kaj eliris kun cigaredo inter siaj lipoj. “Ha, vi jam balais la korton! Brave! Vi nepre devas resti ĉi tie por tetrinkado!”

Ŝjangzi eksentis sin iom pli facila.

Post kelka tempo Laŭ-Ĉeng revenis kun du grandaj bovloj da dolĉa kaĉo kaj kun oni ne scias kiom da malgrandaj “ĉeval-hufaj” kuketoj kaj ringformaj pastofritaĵoj. “Mi ne pretigis teon, ni unue prenu iom da kaĉo. Venu do, manĝu. Se ne sufiĉe, mi aĉetos iom pli aŭ prenos iom ja kredito. Tiuj, kiuj faras pezan laboron, ne devas limigi sian nutraĵon. Manĝu do!”

Nun jam plene tagiĝis kaj la ĉambro fariĝis luma. Tenante ĉiu sian bovlon ambaŭmane ili ŝmace sorbis la dolĉan kaĉon. Neniu diris ion ajn kaj, tuj kaj tute, la kuketoj kaj fritajoj jam estis formanĝitaj.

“Nu, kiel al vi?” Laŭ-Ĉeng penis eligi per dentpinglo sezaman grajnon el inter siaj dentoj.

“Mi devas tuj foriri.” Ŝjangzi rigardis sian litaĵon sur la planko.

“Rakontu al mi, kio okazis. Ĝis nun mi ankoraŭ tute ne komprenas, kio efektive okazis al vi.” Laŭ-Ĉeng proponis al li cigaredon, sed Ŝjangzi skuis sian kapon.

Prinpensinte momenton, li eksentis la honton kaŝi ion nediritan antaŭ Laŭ-Ĉeng. Kaj tial, heziteme kaj babute, li rakontis la tutan okazintaĵon de la pasinta nokto. Kvamkam tio kostis al li grandan penon, tamen efektive li rakontis sufiĉe detale kaj preterlasis neniun gravan fakton.

Dum kelka tempo kun buŝo tordita Laŭ-Ĉeng digestis lian rakonton en silento. “Laŭ mi vi prefere iru trovi s-ron Caŭ. Vi ne povas lasi la aferon tiel pasi, nek lasi vian monon resti tiel perditita. Ĉu vi ne menciis, ke s-ro Caŭ diris al vi, ke vi tuj forkuru, se la afero montriĝos danĝera? Tio ja ne estis via kulpo, ke la detektivo kaptis vin tuj kiam vi eltaksiiĝis. La kaŭzo ne estis, ke vi perfidis vian mastron, sed ke la damna detektivo venis tiel rapide; tiam vi ne povis ne antaŭ ĉio savi vian vivon. Laŭ mi vi en tio neniel kulpas kontraŭ li. Iru trovi s-ron Caŭ kaj rakontu al li la tutan okazintaĵon de la komenco ĝis la fino. Mi pensias, ke li kredeble ne riproĉos vin, kaj, se bonŝance, li eble kompensos al vi la perditan monon! Iru, restigu vian litaĵon ĉi tie kaj serĉu lin pli frue. La

tago estas mallona, la suno leviĝas nur je la oka. Rapidu kaj tuj ekiru!”

En la koro de Ŝjangzi ekmoviĝis la pensoj. Kvankam li ankoraŭ iom sentis sin kulpa kontraŭ s-ro Caŭ, tamen li trovis en la parolo de Laŭ-Ĉeng ian pravecon – kiam la detektivo minacis lin per la pafilo, kiel li povus zorgi pri la afero de s-ro Caŭ?

“Iru tuj!” Laŭ-Ĉeng denove uriĝis lin. “La lastan nokton mi vidis, ke vi perdis iom da saĝo. Neniu povas garantii havi klaran kaponj en cirkonstancoj neordinaraj. La konsilo, kiun mi nun donas al vi, certe pruviĝos bona. Mi estas iom pli aĝa ol vi, kaj estas pli sperta pri la mondo. Iru tuj! Jen jam aperas la suno!”

La matena sunbrilo, reflektita de la neĝo, banis la tutan urbon en lumo. Inter la hela blua ĉielo supre kaj la glima blanka neĝo sube, ĉio radiis oran brilon tiel blindigan, ke oni preskaŭ ne povis malfermi la okulojn. Apenaŭ Ŝjangzi ekintencis foriri, iu frapis je la pordego.

Laŭ-Ĉeng eliris por vidi, kiu tio estas, kaj kriis de tie: “Ŝjangzi, iu serĉas vin.”

Tio estis Ŭang Er el la domo de s-ro Zŭo. Li estis faranta piedfrapojn por forigi la neĝon de siaj ŝuoj kaj el lia nazo, ruĝa de malvarmo, fluaĵo estis gutanta. Vidante, ke Ŝjangzi elvenis, Laŭ-Ĉeng proponis al ili ambaŭ: “Ni iru en la ĉambron kaj sidiĝu.” La tri viroj kune eniris en lian ĉambron.

“Nu, estas tiel.” Ŭang Er frotis al si la manojn. “Mi venas por gardi la domon. Kiel mi povas eniri en ĝin? La pordego estas ŝlosita. Brr! Estas vere malvarme post la neĝo! Hodiaŭ frumatene gesinjoroj Caŭ jam forveturis al Tjanĝin, aŭ eble al Ŝanhajo – tion mi scias ne certe. S-ro Zŭo sendis min ĉi tien por gardi la domon. Brr, kia malvarmo!”

Ŝjangzi subite ekhavis ploremon. Ĝuste kiam li ekvolis sekvi la konsilon de Laŭ-Ĉeng, s-ro Caŭ forveturis. Kvazaŭ ŝtoniĝinta li staris senmove kelkan tempon. Poste li demandis: “Ĉu s-ro Caŭ ne diris ion pri mi?”

“Nu, ne. jam antaŭ la mateniĝo ili leviĝis en tia granda hasteco, ke ili simple ne povis diri ion ajn. La trajno, nu, forveturis je la sepa kaj kvardek. Nu, kiel do mi povas eniri en tiun najbaran korton?” Ŭang Er estis en hastemo.

“Transsaltu la muron!” Ŝjangzi ĵetis rigardon al Laŭ-Ĉeng, kvazaŭ per tio signante, ke li transdonas Ŭang Er al tiu, kaj li levis sian kunrulitan litajon.

“Kien vi iros?” demandis Laŭ-Ĉeng.

“Al Rikiŝejo Harmonio. Mi havas neniun alian lokon por aliri.” Tiu ĉi frazo plene esprimis la amarecon, honton kaj malesperon en la koro de Ŝjangzi. Al li jam restis nenio alia por fari, ol kapitulaci. Ĉiuj vojoj estis al li fermitaj, li

povis nur travadi la blankan neĝon al la nigra turo – Huniŭ. Liaj memrespekto kaj superemo, liaj lojaleco kaj honesteco, ĉiuj estis tute senutilaj, ĉar la sorto destinis al li vivi nur la hundan vivon.

Laŭ-Ĉeng sekvis lian parolon: “Iru vian vojon. Jen estas Ŭang Er, kiu estu atestanto, ke vi tuŝis neniun objekton apartenantan al Caŭ-familio. Iru do, kaj kiam ajn vi preterpasos ĉi tie, eniru en mian ĉambrojn por iomk babili. Se mi estos aŭdinta pri iu bona laboro, mi rekomendos vin por ĝi. Post kiam vi foriros, mi helpos Ŭang Er eniri en la najbaran domon. Ĉu tie estas karbo?”

“Karbo kaj brulligno estas en budo en la postkorto.” Ŝjangzi surŝultrigis sian litaĵo.

La neĝo sur la stratoj ne estis plu tiel blanka. Kompaktigite sur la pavimo de la ĉarradoj, ĝi aspektis pli malpli kiel glacio. Sur la kotaj vojoj, ĉevalhufoj postlasis tie kaj tie nigrajn signojn sur la blankaĵo – kiel domaĝe! Kun vaka koro Ŝjangzi marŝis antaŭen portante sian litaĵon surŝultre. Per unu spiro li venis rekte al Rikiŝejo Harmonio. Li ne kuraĝis halti ĉe la pordego, ĉar li sciis, ke se li haltus, li ne plu havus la kuraĝon iri internen. Tial li paŝis rekte internen kun vizaĝo flamanta.

Li jam elpensis, kion li diros al Huniŭ: “Jen mi estas. Volu agi kun mi, kiel al vi plaĉas. Estos por mi egale, kion ajn vi faros – mi estas en senelirejo!” Sed kiam li ekvidis ŝin, li tamen neniel povis eldiri la vortojn, kvankam li jam plurfoje ripetis ilin en la koro. Lia lango ne obeis lin.

Huniŭ ĵus ellitiĝis. Ŝiaj haroj estis distaŭzitaj, ŝiaj palpebroj estis iom ŝvelintaj. Kaj ŝia nigra vizaĝo estis kovrita de blankaj frostaknoj, ĝuste kiel frostiĝinta senplumigita kokino.

“Ha, vi revenas!” ŝi kriis ameme, kaj ŝiaj okuloj briliĝis.

“Luigu al mi rikiŝon!” Ŝjangzi tenis la kapon klinita, kaj liaj okuloj estis fiksitaj sur la nedegelinta neĝo sur siaj ŝuantaŭoj.

“Diru al la maljunulo,” ŝi respondis en mallaŭta voĉo kaj buŝosignis en la direkto de la orienta ĉambro.

Kvara sinjoro Liŭ estis trinkanta teon. Antaŭ li staris granda blanka forno, el kiu flamoj gaje saltis alten je pluraj koloroj, vidante Ŝjangzi enveni, li diris duone kolere, duone ŝerce: “Ĉu vi ankoraŭ vivas, he?” vi jam forgesis min, mi supozas! Nu, kiom da tempo pasis de kiam vi forlasis min? Kiel prosperas via laboro? Ĉu vi jam aĉetis al vi rikiŝon?”

Ŝjangzi skuis la kapon. Doloro akre ektranĉis lian koron. “Mi ankoraŭ bezonas lui rikiŝon, Kvara Sinjoro.”

“Hm, denove vi perdis la laboron! Nu, bone, iru kaj mem elektu al vi iun.”

Li verŝis teon en tason. “Sed unue trinku tason da teo.”

Ŝjangzi levis la tason kaj trinkis glutonj post gluto. Li staris antaŭ la forno, kaj ĝia fajra varmo kaj la broge varma teo igis lin eksenti ioman dormemon. Apenaŭ li demetis la tason kaj estis preta eliri, la maljunulo haltigis lin.

“Atendu momenton. Kial esti tiel hastema? Vi ja venis en la ĝusta tempo. La dudeksepa estas mia naskiĝtago. Mi intencas starigi provizoran celebrejon en la korto kaj aranĝi festbankedon. Vi do halpu al mi kelkajn tagojn kaj dume ne tiru rikiŝon. Tiuj uloj,” Kvara Sinjoro Liŭ montris al la korto, “ĉiuj ne estas fidindaj. Mi ne volas, ke ili faru fuŝadon, do mi petas vin helpi al mi. Ne atendu, ke mi ion tasku al vi, sed faru, kion ajn vi trovos farenda. Nun unue vi forbalau la neĝon. Por la tagmanĝo, mi regalos vin per viandsupo.”

“Mi tuj faros, Kvara Sinjoro!” Ŝjangzi decidis flankenmeti siajn zorgojn kaj ĉagrenon. Reveninte ĉi tien, li devas doni sin al la dispono de la maljunulo kaj lia filino. Estas tute egale, kion ajn ili farigu per li, ĉar li jam rezignaciis pri sia sorto.

“Ĉu mi ne diris al vi,” trovinte la okazon oportuna, Huniŭ envenis en la ĉambron, “ke Ŝjangzi estas la plej bona, dum la aliaj estas pli-malpli sentaŭgaj?”

Kvara Sinjoro Liŭ ekridetis, kaj Ŝjangzi klinis la kapon pli malalten.

“Venu ĉi tien, Ŝjangzi!” Huniŭ elvokis lin el la ĉambro. “Unue mi donos al vi monon por aĉeti balailojn. Aĉetu bambuajn, pli taŭgajn por balai la neĝon. Rapiĉu, hodiaŭ oni venos por starigi markezon kiel la naskiĝtagan celebrejon.” Ŝi kondukis lin en sian ĉambron, kie ŝi, kalkulante monon, flustris al li: “Mienu pli vigle kam penu plaĉi al la maljunulo! Nia afero nun havos ŝancon.”

Ŝjangzi diris nenion, nek koleriĝis. Li sentis, ke li jam fariĝis apatia por ĉio en la mondo, kaj lia menso ne plu funkcias. Li deziris nur treni sian vivon de tago al tago. Se estos manĝaĵo kaj trinkaĵo, li manĝu kaj trinku: se estos laboro, li ĝin faru. Se li sin senĉese okupos per io, la tago pasos rapide. Estus eĉ pli bone, se li sekvus la ekzemplon de azeno, kiu por turni muelŝtonon ĉiam pene rondiras ĉirkaŭ la muelilo, sciante nenion pri la mondo. Li konsciis ankaŭ, ke kiel ajn estos, li neniam povos esti feliĉa. Kvankam li rifuzis pensi, paroli kaj koleriĝi, tamen li ĉiam sentis sin korprenmata. Laborante li povis forgesi tion portempe, sed, kiam ajn li havis senokupan tempeton, li sentis, ke io mola kaj sengusta, sed granda kaj sufoka, kvazaŭ spongo, blokadas lian koron. Kun tio ĉi lin sufokanta, li devigis sin labori, esperante fariĝi tute elĉerpita, tiel ke li povu fali en lacan dormon. Siajn noktojn li donis al sonĝoj, kaj siajn tagojn al laboro, kvazaŭ li estus mortinto laborkapabla. Li balais negon, faris aĉetojn, mendis

gaslampojn, lavis rikiŝojn, movis tablojn kaj seĝojn, manĝis la manĝaĵon donitan de Kvara Sinjoro Liŭ kaj dormis, tute ne sciante, pro kio li laboras, nenion dirante, nek pensante, sed nur malklare sentante la premon de tio sponga.

La neĝo sur la tero estis forbalaita kaj tiu sur la tegmentoj iom post iom fordegelis. Kun krioj “supren ni iru!” la homoj, kiuj venis por starigi la markezon, grimpis sur la tegmenton por fari la framon. Laŭ la mendo la varma markezo devos esti tiel granda, kiel la areo de la tuta korto, kun tegmentorandoj, balustradoj kaj vitraj fenestroj triflanke. Interne de ĝi devos esti vitraj vandoj kaj pentritaj ekranoj, kaj la stangoj devos esti kovritaj per ruĝaj tukoj. La ĉefpordo kaj flankaj pordoj devos esti dekoraciitaj per ruĝaj silkaĵgloboj; la kuirejo devos esti starigita en la postkorto. Kvara Sinjoro Liŭ decidis fari al si vere grandan celebradon, ĉar tio estis la sesdeknaŭa datreveno de lia naskiĝo. La unua paŝo estis, kompreneble, konstruigi belan celeberron. Ĉar la vintraj tagoj estas mallongaj, la konstruistoj havis tempon nur por starigi la framon kaj la balustradojn kaj surmeti la tolon. La internaj dekoracioj kaj la ruĝaj silkaĵgloboj sur la pordoj devis esti prokrastitaj por la sekvanta mateno. Tio ĉi furiozigis Kvaran Sinjoron Liŭ, kiu tiel forte koleris kontraŭ la markezoj, ke li eĉ ruĝiĝis ĝis la tempioj. Kaj pro tio li sendis Ŝjangzi por certigi la ĝustatempan venon de la gaslampoj kaj la kuiristoj. En efektiveco al la du aferoj estis neeble okazi io ajn neatendita, sed la maljunulo estis maltrankvila kaj timis pri tio.

Apenaŭ Ŝjangzi revenis post la plenumo de la komisiono, Kvara Sinjoro Liŭ denove ordonis lin iri prunti tri aŭ kvar kompletojn da maĝangoj, ĉar en la grandioza tago oni nepre devos bone hazardludi kun siaj amikoj. Poste li estis sendita por prunti gramofonon, ĉar naskiĝtaga festo postulas gajan bruadon. La kruroj de Ŝjangzi senhalte laboradis ĝis deknua tiunokte. Kutimante je rikiŝotirado, li trovis paŝado kun malplenaj manoj eĉ pli laciga, ol kurado. Dum la revena vojo post la lasta komisiono li, eĉ li, jam apenaŭ povis levi siajn piedojn.

“Brava knabo estas vi! Vere bona! Se mi havus filon kiel vi, mi preferus vivi pli mallonge je kelkaj jaroj. Ripozu. Morgaŭ estos okupopluna tago.”

Huniŭ, kiu staris apude, multesignifa palpebrumis al Ŝjangzi.

La sekvantan matenon la markezoj venis por daŭrigi la laboron. La pentritaj ekranoj estis pendigitaj. La bildoj sur ili prezentas “Tre Herooj Batalas kun Lju Bu”, “La Batalo ĉe Ĉangbanpo”, “Bruligo de la Tendaro” kaj aliajn scenojn el Romano pri la Tri Regnoj.

La figuroj estas pentritaj kiel sur la scenejo kaj rajdas sur ĉevalo kaj svingas glavon aŭ lancon. Maljunulo Liŭ, streĉante sian kolon, trarigardis ilin ĉiujn, kaj estis tre kontenta.

Tuj poste la meblistoj venis kaj meblis la celebrejon per ok tabloj kaj ok kompletoj da seĝoj kaj taburetoj. La seĝtegaĝoj kaj la taburet-kusenoj ĉiuj estis helruĝaj kaj broditaj per floroj. La altaro al la Dio de Longviveco estus starigita en la halo, kun klozoneaj incensiloj kaj kandelingoj. Antaŭ ĝi oni metis kvar ruĝajn tapiŝetojn. Maljunulo Liŭ sendis Ŝjangzi aĉeti pomojn. Kaj Huniŭ ŝovis al li en la manon du jŭanojn por aĉeti longvivecajn persikojn kaj longvivecajn vermiĉelojn. Ŝi diris al li, ke ĉiu persiko devas havi sur si unu el la figuroj de la Ok Senmortuloj, kaj ke tiuj ĉi estu lia persona donaco.

Ŝjangzi aĉetis la pomojn kaj metis ilin sur la altaron. Baldaŭ alvenis ankaŭ la longvivecaj persikoj kaj vermiĉeloj, kiujn li metis malantaŭ la pomoj. La persikoj, ruĝe kolorigitaj ĉe la pintoj, ĉiu surhavis unu el la figuroj de la Ok Senmortuloj sur sia supro kaj estis treege okulplaĉa.

“Tiuj ĉi estas de Ŝjangzi. Vidu, kiel zorgema li estas!” Huniŭ kantis laŭdon pri li en la orelojn de sia patro, kaj la maljunulo ekridetis al Ŝjangzi.

En la mezo de la malantaŭa muro ankoraŭ mankis la granda ideografiaĵo “longviveco”. Laŭkutime, ĝi devas esti donacita de amikoj kaj la gastiganto ne bezonas zorgi pri ĝi. Donacita de amikoj kaj la gastiganto ne bezonas zorgi pri ĝi. Tamen ĝis nun ankoraŭ neniu sendis tion kaj Kvara Sinjoro Liŭ, kiu estis kolerema, estis preta refoje furioziĝi. “Mi ĉiam la unua pensis kaj zorgis pri alies festaĵoj kaj funebraĵoj,” li kolere diris. “Nun, kiam venas mia vico, ili eĉ ne sin montris kaj lasis min en senhelpeco, malhonoron al iliaj patrinoj!”

“Morgaŭ estos nur la dudeksesa, kial do tiel malpacientiĝi?” Huniŭ laŭte diris, por lin trankviligi.

“Mi preferas fari ĉion preta per unu fojo. Vidante, ke oni tiel iom-post-iome faras aferojn, mi sentas agaĉon! He, Ŝjangzi, la gaslampoj nepre estu pendigitaj hodiaŭ. Se ili ne sendos ilin ĉi tien ĝis la kvara horo, mi senhaŭtigos ilin vivaj!”

“Ŝjangzi, vi do iru ilin urĝi!” Huniŭ intence montris sian konfidon al li kaj ĉiam taskis ion al li ĉe la alesto de sia patro. Aŭdinte la ordonon, Ŝjangzi diris nenion kaj tuj foriris por ĝin plenumi.

“Eble ne decas por mi tiel diri, paĉjo,” rimarkis Huniŭ, tordante sian buŝon. “Se vi havus filon, li devus simili al mi aŭ al Ŝjangzi. Sed bedaŭrinde mi naskiĝis knabino, kaj kontraŭ tio nun ekzistas nenia helpo. Fakte ne estus malbone, se vi alprenus Ŝjangzi kiel vian adoptan filon. Rigardu lin, tuttage li

ellasis eĉ ne unu furzon, sed ĉion li bone plenumas!”

Kvara Sinjoro Liŭ ne respondis, io okupis liajn pensojn. “Kie estas la gramofono?” li demandis poste. “Kantigu ĝin!”

Ĉiu sono el tiu eluzita gramofono, pruntita oni ne scias de kie, estis tiel oreŝira, kiel akra krio de kato, kiam oni piedpremas ĝian voston. Sed en tio Kvara Sinjoro Liŭ ne trovis ion malplaĉan – li volis nur ian bruon.

Posttagmeze ĉio jam estis preta kaj ili atendis nur la kuiriston, kiu promesis veni la sekvantan tagon. Kvara sinjoro Liŭ pririgardis ĉiun objekton kaj, vidante ĉie ruĝon kaj verdon en gaja heleco, li kontente balancis la kapon.

Tiuvespere li invitis la kontiston de Karbobutiko Tjanŝun teni la kontojn por li. Tiu sinjoro el Ŝanŝji-provinco, kies familia nomo estis Feng, estis bona librotenanto. S-ro Feng tuj venis sl li por iom pririgardi la aferon, kaj diris al Ŝjangzi, ke li aĉetu al li du ruĝajn kontolibrojn kaj rulon da ruĝa papero. Li tranĉis la paperon en pecojn kaj skribis kelkajn grandaj ideografiaĵojn “longviveco”, kiujn li algluis tie kaj tie. La granda skrupluemo de s-ro Feng tre plaĉis al Kvara Sinjoro Liŭ, kaj tiu tuj proponis inviti du aliajn por ludi maĝangon. Sed s-ro Feng, kiu sciis, kia timinda manĝang-ludanto estas la maljunulo, ne kuraĝis eĥi.

Iom kolera, ke s-ro Feng ne akceptis lian proponon, Kvara Sinjoro Liŭ vokis kelkajn rikiŝistojn en la ĉambron. “Monludon! Ĉu vi havas kuraĝon al tio?” Li demandis.

Ili ĉiuj volus ludi, sed ludi kun li neniu kuraĝis, ĉar ĉiuj sciis, ke li antaŭe iam tenis monludejon.

“Vi sentaŭguloj! Vane vi vivas ĝis nun!” li eksplodis de kolero. “Kiam mi estis en via aĝo, mi kuraĝis ludi eĉ sen unu kupra monero en mia poŝo. Mi neniam hezitis ĝis mi perdis la ludon. Nu, komencu!”

“Ĉu ni povus ludi por kupraj moneroj?” iu rikiŝisto prove demandis.

“Tenu viajn kuprajn monerojn en la poŝo. Kvara Liŭ ne volas sin okupi je infanaĵoj!” La maljunulo malplenigis la tetason per unu longa gluto kaj palpis sian kalvanĵ kapon. “Ba! Lasu tion. Eĉ se vi invitos min, mi ne ludos. Nun foriru kaj diru al la aliaj, ke morgaŭ posttagmeze venos gastoj, do ĉiuj rikiŝoj devos reveni antaŭ la kvara. Mi ne toleros, ke post tiu horo vi kun viaj rikiŝoj en- kaj elŝoviĝu inter la homoj. Morgaŭ mi ne postulos rikiŝan lupagon, sed ĉiuj rikiŝoj devos reveni antaŭ la kvara. Vi ĝuos senpagan tagon de rikiŝotirado, do estu dankemaj kaj havu bondeziron al mi en via koro!”

“Postmorgaŭ, en mia naskiĝtago, neniu tiru rikiŝon. Je la oka kaj duono matene, mi unue vin regalos per ses grandaj bovloj, du sepcolaj pladoj, kvar

malgrandaj pladoj kaj unu viandsupa samovarpoto. Neniu povos diri, ke mi ne dece traktas vin. Vi ĉiuj portu longan robon, kaj kiu sin montros en mallonga jako, mi piedbate pelos lin for! Post kim vi finos vian manĝon, tuj for el mia celebrejo, por ke mi povu regali miajn parencojn kaj amikojn. Ili havos tri grandegajn bovlojn, ses malvarm-viandajn pladojn, ses varmajn pladojn, kvar grandajn pladojn kaj unu viandsupan samovarpoton. Nun mi anticipu diras tion ĉi al vi, por ke vi tiama ne avide direktu viajn okulojn al ili. Parencoj kaj amikoj ja estas parencoj kaj amikoj.

“Mi ne postulos de vi ion ajn. Tiuj kun homa koro donos al mi dek kuprajn monerojn kiel donacon kaj mi ne trovos tion tro malmulta. Se iu el vi nur koŭtoos al mi tri fojojn sen doni al mi eĉ unu kupran moneron, mi ankaŭ tion akceptos. Sed vi devos dece konduki. Ĉu vi komprenas? Tiuj, kiuj volos vespermanĝi ĉi tie, devos reveni post la sesa. La manĝrestaĵoj estos tute viaj. Sed vi nepre ne frue revenu. Ĉu komprenite?”

“Morgaŭ iuj el ni laboros je la nokta skipo, Kvara Sinjoro,” rimarkis iu mezaĝa rikiŝisto. “Kiel ili povus reveni kun siaj rikiŝoj antaŭ la kvara?”

“Tiuj je la nokta skipo povos reveni post la deknua. Estas grave, ke vi vin ne ŝovu tien kaj reen inter miaj gastoj. Vi estas rikiŝisto, kaj Kvara Sinjoro Liŭ ja ne estas via kolego. Ĉu komprenite?”

Neniu havis ion ajn por diri, tamen, ne povante trovi ian pretekston por digne foriri, ili staris tie embarasite. La patro de Kvara Sinjoro Liŭ vekis iom da indigno en ĉies koro. Kvankam unu senlupaga tago estos por ili profitodona, tamen, ne volante ricevi senpagan manĝon, ĉiu devos fordoni almenaŭ kvardek kuprajn monerojn kiel donacon. Cetere, la maljunulo parolis tiel ofende, kvazaŭ dum lia naskiĝtago ili ĉiuj devus sin kaŝi kiel musoj.

Kaj krome, li malpermesis ili tiri rikiŝojn en la tago dudeksepa, nome en la tempo laborplena ĝuste antaŭ la Novjaro. Kvara Sinjoro Liŭ povos volonte fordoni unutagan enspezon, sed senfare sidadi kun li ili ne volos – tio estos por ili tro granda perdo! Ili staris tie, ne kuraĝante esprimi la koleron kaj, certe, ne bondezirante al li en la koro.

Huniŭ ektiris Ŝjangzi, kaj li sekvis ŝin eksteren.

Tiam ili ĉiuj kvazaŭ trovis objekton, sur kiun ili povus verŝi sian koleron, kaj fikse rigardis lian dorson forigantan. Dum la lastaj du tagoj ili sentis, ke Ŝjangzi fariĝis fidele hundo de Liŭ-familio, al kiu li ĉiamaniere flataĉas, diligente kaj peneme laborante kiel ilia lakeo.

Ŝjangzi persone ja tute ne havis inklinon al tio. Li helpis Liŭ-familion en iliaj aferoj nur por malpliigi sian doloron en la koro. En la vesperoj li ĉiam estis

silenta, ĉar, estis nenio por diri. La aliaj, ne sciante pri tio, pensis, ke por ricevi favoron de Kvara Sinjoro Liŭ li intence apartigas sin de ili.

Kaj tio, kio plej agacis ilin, estis la aparta favoro kaj prizorgo de Huniŭ al Ŝjangzi. La maljunulo ne permesos ilin eniri en lian naskiĝtagan celebregon, dum Ŝjangzi povos festi la tutan tagon. Estante samaj rikiŝistoj, kial do ili estas dividitaj en rangojn altan kaj malaltan? Jen rigardu, f-ino Liŭ denove vokis Ŝjangzi eksteren. Ĉies okuloj sekvis lin kaj, pelate de scivolemo, ili ankaŭ eliris. F-ino Liŭ estis parolanta kun Ŝjangzi sub la gaslampo. Ili ĉiuj komprene balancis la kapon unu al alia.

Notoj:

1. sesdeknaŭa: En la malnova Ĉinio oni opiniis la ciferon naŭ la plej grava, tial oni faris pli grandan celebradon al tiuj naskiĝaj datrevenoj kun la cifero naŭ.
2. Romano pri la Tri Regnoj: Fama ĉina historia romano pri la periodo de la Tri Regnoj (220-280), verkita de Lŭo Gŭanĝong (ĉ.1330-ĉ. 1400).
3. longvivecaj persikoj: Vaporumitaj persikformaj pastaĵoj faritaj speciale por celebri naskiĝan datrevenon.
4. longvivecaj vermiĉeloj: Ĉinoj ŝatas manĝi vermiĉelojn en naskiĝtagon de familiano opiniante, ke la longaj vermiĉeloj simbolas longan vivon.
5. Ok Senmortuloj: Legendaj figuroj, ĉiu el kiuj havis siajn magiajn rimedojn. Inter la ĉina popolo cirkulas la diro “la Ok Senmortuloj montras ĉiu sian lertaĵon transirante la maro”.
6. Tio aludas la malparolemecon.

XIV

La festocelebrado de Liŭ-familio estis tre brila. Kvara Sinjoro Liŭ estis tre kontenta vidi tiom multe da homoj, kiuj venis koŭtoi kaj gratuli lin, kaj lia ekzaltiĝo kreskis kun la alveno de pli kaj pli da malnovaj amikoj por esprimi siajn bondezirojn al lia naskiĝtago. Ilia alveno konvinkis lin ne nur pri tio, ke lia naskiĝtaga celebrado atingas sukceson, sed ankaŭ pri tio, ke li jam “rangaltiĝis.”, ĉar ili restis malfreŝe vestitaj, dum liaj peltorobo kaj superjako estis tute novaj. Pluraj el tiuj amikoj siatempe prosperis en sia negoco pli ol li, sed en la daŭro de dudek aŭ tridek jaroj ili malleviĝis pli kaj pli malaltaen, kaj nun iuj eĉ apenaŭ povis havi sufiĉajn vivrimedojn por plenigi sian stomakon. Li rigardis ilin kaj poste sian naskiĝtagan celebrejon, la longvivecan altaron, la pentraĵon de “La Batalo ĉe Ĉangbanpo” sur la pendigita ekrano, la tri grandegajn bovlojn de lia festeno, kaj sentis, ke li efektive estas tre alte super ili – li vere “rangaltiĝis”. Eĉ por monludo li jam preparis kompletojn da manĝangoj – tiu ludo estis multe pli rafinita ol vulgaraj hazardludaj manieroj.

Tamen en tia gaja atmosfero li sentis ankaŭ ian malgajon. Kutimanta je vidva vivo, li supozis, ke liaj gastoj estos nur iuj butikistoj kaj vidvoj-amikoj, kun kiuj li antaŭe konatiĝis. Li ne atendis, ke venos ankaŭ virinoj. Kaj kvankam Huniŭ nun akceptas ilin anstataŭ li, tamen li subite eksentas sin tre soleca – ne kun edzino, sed nur kun tia filino, kiu aspektas kiel viro. Se Huniŭ estus filon, nun probable li jam havus nepon; kaj tial, eĉ kiel maljuna vidvo, li ne estus tiel soleca. Jes, en lia vivo mankas nenio, krom filo. Kaj ju pli li maljuniĝas, des malpli li povas ricevi filon. La naskiĝtaga celabrado devas esti ĝojiga okazo, sed nun li tamen sentas sin iom plorema; ĉar, kiel ajn li “rangaltiĝis”, havante neniun filon por daŭrigi lian aferon, kian utilon do li povus ahvi de tio?

Antaŭtagmeze li estis en gaja humoro, gravmiene akceptante kies gratulojn, kiel meritoplena heroo. Sed en la posttagmezo li tamen malvigliĝis. Vidante la infanojn, kiujn la gastinoj havas kun si, li sentis admiron kaj envion. Li satus ludi kun infanoj, tamen li ne kuraĝis tion fari, kaj pro tio li ĉagreniĝis kaj eĉ koleriĝis; sed li ne volis lasi sin flamiĝi antaŭ ĉiuj siaj amikoj kaj parencoj. Li sciis, ke li kiel viro brava ne povas malhonoru sin tiamanier. Kaj tial li deziris nur, ke la tago rapide forpasu, por ke pli frue finiĝu tiu lia netolerebla situacio.

Ankoraŭ unu malagrablajo dum la ĝojiga celebrado estis, ke Ŝjangzi preskaŭ faris pugnobatalon kun aliaj en la mateno, kiam la rikiŝistoj havis sian festenon.

Tuj porst la oka jam komenciĝis la manĝado, kaj pro tio la rikiŝitoj iom malbonhumoriĝis. Kvankam hieraŭ ili rajtis ne doni sian rikiŝan lupagon, tamen hodiaŭ neniu venis kun malplenaĵoj. Iuj alportis unu ĝjaŭnon, aliaj kvardek kuprajn monerojn, sed, pli aŭ malpli multe, ĉiu ja faris mondonacon. En la ordinaraj tempoj ili estis la malriĉaj rikiŝitoj kaj Kvara Sinjoro Liŭ estis la rikiŝejo-mastro. Sed hodiaŭ ili ja estas liaj gastoj, kial do ili devas ricevi tian traktadon? Kaj plie, tuj post la manĝado ili eĉ devas foriri el la celebrejo, kaj al ili ankaŭ estas malpermesite tiri la rikiŝon ĝuste ĉe la jarfino, kiu estas ora tempo por la rikiŝitistoj!

Ŝjangzi sciis, ke li certe ne apartenas al tiuj, kiuj devos foriri tuj post la manĝado, sed li preferis manĝi kun la aliaj rikiŝitoj. Li pensis, ke tiel li povos pli frue komenci labori kaj ankaŭ povos montri sin pli akmika al ili. Sed, tuj kiam li sidiĝis, ili komencis verŝi sur lin sian koleron kontraŭ Kvara Sinjoro Liŭ. Iu diris: “He, vi estas honora gasto, kial vi sidas ĉi tie kun ni?”

Ŝjangzi stultmiene ekridetis, ne kaptante la sencon kaŝitan en ties parolo. Dum la lastaj tagoj li parolis kun neniu, kaj tial lia menso ŝajne funkciis malrapide.

Ĉar neiu kuraĝis provoki Kvaran Sinjoron Liŭ, do la ili restis nenio alia por fari, ol manĝi pli multe liajn manĝaĵojn. Estis nenio aldoni al la manĝaĵoj, sed la brando ne estis limigita, ĉar estis naskiĝtago. Kvazaŭ kun silenta interkonsento ili samtempe sin turnis al la brando por dispeli per ĝi sian malkontentecon kaj ĉagrenon. Iuj malgaje trinkis en silento, aliaj komencis ludi fingrodivenon. Maljunulo Liŭ ne povis haltigi ilian ludadon. Ŝjangzi vidis ĉiun trinki kaj, por akordigi sin kun ili, ankaŭ trinkis du tasetojn. La trinkado ruĝe flamiĝis iliajn okuojn kaj plivigliĝis iliajn langojn. Iu el ili diris: “He vi, Ŝjangzi, Kamelo, vi ricevis belan laboron! Ĝissate manĝi la tutan tagon nur por servi la maljunulon kaj la fraŭlinon! Poste vi ne plu bezonos tiri rikiŝon. Do prefere fariĝu ilia lakeo!” Ŝjangzi elflaris ion malbonan el la parolo, sed malgraŭe li ne prenis ĝin en la koron. Tuj kiam li revenis en Rikiŝejon Harmonio, li jam decidis forlasi sian suprermon kaj ĉiam rezignaci pri sia sorto. Do lasu ilin diri, kion al ili plaĉas. Li retenis sian koleron.

Alia diris: “Ŝjangzi estas diferenca de ni: por gajni la vivrimedojn ni ŝvitas ekstere, dum li estas interne-funkcianto!”

Ili ĉiuj eksplodis per laŭta rido. Ŝjangzi sciis, ke ili pikmokas lin, sed malgraŭe li tion toleris. Se li jam toleris tiom da maljustaĵoj, kial do ekscitiĝi ĉe tiaj vortoj? Kaj li restis silenta.

Ankaŭ iu ĉe la najbara tablo decidis piki lin per mokserco. Li kriis kun

streĉita kolo: “Ŝjangzi, kiam vi fariĝos la mastro de la rikiŝejo, ne forgesu viajn malnovaj kolegojn!”

Ŝjangzi ankoraŭ silentis.

Iu ĉe lia tablo provokis: “Nu, diru ion, Kamelo!”

Ŝjangzi ruĝiĝis kaj diris per mallaŭta voĉo: “Kiel mi povus fariĝi mastro?”

“Hm, kial ne? Baldaŭ oni jam cimbalos kaj tamburos!”

Ŝjangzi ne komprenis la aludon de “cimbali kaj tamburi”, sed li konjektis, ke tio estas ligita kun liaj rilatoj kun Huniŭ. Lia vizaĝo perdis la ruĝon kaj paliĝis. Lia subpremata kolero tuj leviĝis kaj preskaŭ lin sufokis. Li ne povis plu ĝin reteni, kiel oni ne povas plu bari la akvon, kiu minacas elŝprucegi tra la unua breĉo.

Ĝuste tiam ankoraŭ unu rikiŝito montris lin kaj diris: “Mi diras al vi, Ŝjangzi, vi estas kiel mutulo manĝanta nombbron da jaŭzioj: vi mem estas tute klara en la kapo! Ĉu estas tiel, Ŝjangzi? He vi parolu, Ŝjangzi!”

Subite Ŝjangzi saltleviĝis sur la piedojn, kun vizaĝo pala, kaj defiis sian mokanton: “Iru eksteren kaj ripetu tion! Ĉu vi kuraĝas?”

Ĉiuj aliaj konsterniĝis. Ili intence pikmokus lin nur por sin amuzi, sed neniu intencis pugnobatali.

La subita silento estis kiel tiu en la arbaro kiam papantaj birdoj ekvidas aglon. Ŝjangzi staris tie sola, kun kapo kaj ŝultro super la aliaj. Li eksentis sia izolitecon, sed lia kolero leviĝis kaj ŝajnis al li, ke eĉ se ili ĉiuj kune batalos kontraŭ li, li povos ilin venki. Kaj ili aldonis:

“Nu, kiu havas la kuraĝon?”

La aliaj tuj reakiris la memregadon kaj ĥore diris: “Lasu tion, Ŝjangzi, ni nur ŝercis!”

Kvara Sinjoro Liŭ vidis ĉion tio kaj diris: “Sidiĝu, Ŝjangzi!” poste li turnis sin al la aliaj: “Ne mistifiku iun pro tio, ke li estas senartifika. Se vi malhelpus mian aferon, mi per piedbatoj forpelos vin ĉiujn! Nu, manĝu rapide!”

Ŝjangzi forlasis la tablon. La aliaj ĵetis ekrigardon al Kvara Sinjoro Liŭ kaj ĉiu levis sian bovlon. Baldaŭ ili denove ekbabilis, kiel pepantaj birdoj en la arbaro post forpaso de la danĝero.

Ŝjangzi kaŭris sufiĉe longan tempon ekster la pordo, atendante ilin. Se iu ajn plu diros malicajn vortojn, li lin forte batos. Li jam forperdis ĉion, do kian skrupulon li havus?

Sed la aliaj, elirante tri- aŭ kvinope, ne plu lin incitis. Kvankaum ne okazis pugnobatalo, tamen ŝajnis al li, ke almenaŭ li jam venĝis sin kaj iom elverŝis sian subprematan senton. Sed post plua penso li ekkonsciis, ke per tio li ofendis

multajn homojn. Al li jam mankas intimaj amikoj, kiuj povus aŭskulti liajn plendojn; kiel do li povus ofendi aliajn? Li komencis penti pri sia ago. La manĝaĵo, kiun li ĵus manĝis, kvazaŭbloke kuŝis en lia stomako, tiel ke li sentis sin iom malbone. Li stariĝis. Ba! For la skrupulojn! Ĉu tiuj, kiuj pubnobatalas ĉiun dunan aŭ trian tagon kaj ĉiam dronas en ŝuldoj, ne same ĝuas la vivon? Ĉu decaj agoj vere estas afero utila?

Ĉe tiu ĉi penso lia menso lumiĝis kaj li ekkomprenis, ke li povus preni alian vojon, tute diferencon de lia antaŭa. Li povus esti tre societema kaj profitavida, trinki alies teon, fumi alies cigaredojn, prunti al si monon sen redono, neniam cedi vojon al aŭtomobiloj, pisi kie ajn al li plaĉas, ĉiam petoli kun policanoj, kalkulante kelktagan karcerpunon kiel nenion. certe ankaŭ tiaj rikiŝitoj vivas, kaj ili ĝuas la vivon pli plezure almenaŭ ol Ŝjangzi iam antaŭe.

Tiam s-ro Feng, la librotaranto, jam finis la liston de la donacoj: dudek kvin longvivecaj silkukoj, tri kompletoj da longvivecaj persikoj kun vermiĉeloj, unu poto da longviveca brando, du paroj da longvivecaj kandeloj kaj dudekelkaj ĵuanoj kiel mondonaco. La listo de la donacintoj estis tre longa, sed la plejmulto el ili donis nur po kvardek kuprajn monerojn aŭ unu arĝentan ĝjaŭon.

Aŭdinte tion, Kvara Sinjoro Liŭ eĉ pli bolis de kolero. Se li tion antaŭe sciis, li preparus por ili nur vermiĉelojn kun frititaj legomoj! Manĝi festenon el tri grandegaj bovloj kaj donaci nur unu ĝjaŭon? Tio simple egalas ekspluaton al la maljunulo! De nun li neniam plu festu la naskiĝtagon, ke lia mono ne vane perdiĝu! Evidente, ĉiu venis kun siaj familianoj aŭ amikoj nur kun la celo manĝi frandaĵojn je lia kosto. Sed li, homo jam sesdeknaŭ-jara kaj tiel monosperta, estis prifriponita eĉ de tiu bando da ruzaj bastardoj! Ju pli li pensis, des pli kolera li fariĝis! Eĉ la kontento, kiun li havis dum la tago, nun ŝajnis al li stulteco, kaj liaj sentoj esprimis sin per blasfemoj eksmodaj.

En la domo restis ankoraŭ kelkaj gastoj, kaj Huniŭ, por ke la gastoj ne estu ofenditaj, intencus reteni sian patron de la krudaj vortoj. Sed, ĉar ili ĉiuj koncentris sian atenton sur la maĝang-ludon kaj verŝajne ne aŭdis la plendojn de la maljunulo, ŝi prefere restis silenta ol diri ion ajn, kio povus estigi malagrablaĵon, kiaj lasi lin grumbli. Se ili ĉiuj plu ŝajnigos sin surdaj, la incidento forpasos.

Sed, neatendite, liaj plendoj kaj riproĉoj iom pos iom turnis sin al ŝi. Tio estas multe tro kaj ŝi decidis ne silenti plu. Plurajn tagojn ŝi klopodis por prepari lian naskiĝtagon feston kaj kian rekompencan ŝi nun rikoltas! Tio estas netolerebla! Sesdeknaŭ-jara! Eĉ sepdeknaŭ-jara li devus agi kaj paroli

prudente!

“Vi mem volis elspezi la monon, kian rilaton tio havas al mi?” ŝi tuj rebatis.

Rebatite, la maljunulo sentis ekskuon en la animo. “Kian rilaton? Ĉian! Ĉu vi pensas, ke mi estas blinda pri la aferoj ĉirkaŭ mi?”

“Kion vi vidis? Mi tuttage laboris ĝis elĉerpiĝo kaj fine vi tamen elverŝis vian koleron sur min! Nu, diru, kion vi vidis!” Huniŭ tuj mallaciĝis, kaj ŝia lango moviĝis tre vigle.

“Ne estu envia pri mia celebrado. Kon vidi? Hm, jam antaŭ longe mi vidis la tuton!”

“Kial do mi devus envii?” Parolante Huniŭ svingis la kapon. “Diru, kion vi vidis!”

“Tion!” Kvara Sinjoro Liŭ montris la markezon, en kiu Ŝjangzi kun klinita korpo estis balaanta la plankon.

“Lin?” La koro de Huniŭ konvulsie kunpremiĝis. Kiu atendus, ke la okuloj de la maljunulo povos esti tiom akraj. “Do, kion pri li?”

“Ne ŝajnu vin stulta, dum vi estas saĝa!” La maljunulo stariĝis. “Aŭ lin, aŭ min, faru vian elekton – jen solvo simpla! Mi estas via patro, mi havas la rajton!”

Huniŭ neniam atendis, ke la afero malkaŝiĝos tiel baldaŭ, kun ŝia plano apenaŭ duone efektivigita. Kion fari? Ŝi ruĝiĝis. Ĉe la verdecia lamplumo ŝia nigreruĝa vizaĝo kun pudrorestaĵo aspektis kiel malmole kuirita porka hepato, malbelkolora kaj naŭze impresanta., laca kaj provokita, ŝi bolis de kolero, sed ŝi ne sciis kion fari kaj sentis sin tre konfuzita. Ŝi ne povas cedi. Kiel ajn konfuzita ŝi estas, ŝi devas tuj elpensi ian rimedon, por helpi al si. Eĉ malbona ideo estus pli bona ol nenia; cetere, ŝi ja neniam antaŭe submetiĝis al iu ajn. Nu, tre bone. Lasu lin diri rekte, kion li volas. Kia ajn povas esti la rezulto, ŝi nun devas fari decidan “martelbaton”.

“Nu, bone, hodiaŭ ni publike ĝin priparolu. Eĉ se vere tiel, kion do vi intencas? Diru, kaj mi volus aŭdi. Ne kulpigu min, ke intence mi vin incitas, ja vi mem kaŭzis tion ĉi al vi!”

La maĝang-ludantoj ŝajne jam aŭdis la kverelon de la patro kaj filino, sed ili ne volis esti distritaj de ĝi; tial, por rezisti la ĝenon, ili pli forte klakjetis siajn maĝang-pecojn sur la tablon kaj pli laŭte kriis “Ruĝan”, “Trafon...”

Ŝjangzi jam aŭdis, pri kio ili kverelas, sed li daŭrigis la balaadon kun klinita kapo. Li jam faris sian decidon: se la kverelo finiĝos malbonrezulte, li uzu la pugnon!

“Vi intencas frenezigi min, ĉu ne?” La maljunulo rondigis siajn okulojn. “Ĉu vi pensas, ke se mi mortos de kolero, vi povos aĉeti al vi viron, he? Vane vi esperas! Sciu, mi havas ankoraŭ multajn jarojn por vivi!”

“For la sensencaĵon! Diru rekte, kion vi intencas!” La koro de Huniŭ forte batis, sed ŝia voĉo estis malmola.

Ĉu mi ne diris: aŭ min, aŭ lin” Mi ne permesos al firikiŝisto akiri ion ajn el mia poŝo!”

Ŝjangzi ĵetis sian balailon flanken, rektigis sin kaj fiksitis siajn okulojn sur Kvaran Sinjoron Liŭ. “Pri kiu vi parolas?”

Kavara Sinjoro Liŭ sovaĝe ekridegis. “Ha, ha, ĉu vi intencas ribeli, he? Pri kiu mi parolas? Pri vi, kompreneble! Fi, tuj for de mi! Mi poensis, ke vi ne estas malbona, kaj dece traktis vin, sed vi forgesis, kiu mi estas ! Kial ne ree informiĝi? For de mi! Mi neniam volos vin revidi. For, for kun via malbenita deziro ĉasi ĉe mi profiton!”

La voĉo de la maljunulo fariĝis tiel laŭtega, ke pluraj rikiŝistoj estis altiritaj ĉi tien por vidi la spektaklon. La maĝang-ludantoj ankoraŭ ne volis levi la kapon por ekrigardo, pensante, ke Kvara Sinjoro Liŭ denove kverelas kun iu rikiŝisto.

Nu, se la deco, la sincereco kaj la superemo donas nenian utilon, kial do ne fariĝi unu el tiuj senhontaj friponoj? Tio ne sole ne estus malbona afero, li pensis, sed kontaŭe tio farus lin iom heroeca: tiam li timus nek la ĉielon, nek la teron, neniam humiligite klinus la kapon, nek suferadus en muteco. Jes, ĝuste tia li devus fariĝi. Aĉulo ja estas knedita el bonulo.

Nun li eĉ eksentis bedaŭron, ke ne okazis la pugnobatalo. Feliĉe, li havis por tio multan tempon, kaj li dicitis, ke de tiu ĉi tago li al neniuj plu klinos sian kapon.

Neniu povis ĵeti sableron en la okulon de Kvara Sinjoro Liŭ. Kunmetinte ĉion, kion li aŭdis kaj vidis, li jam havis sufiĉe klaran ideon pri kio baldaŭ okazos. Dum la lastaj tagoj lia filino estis parte obeema. Tia ŝi fariĝis, ĉar Ŝjangzi ĉio ĉi en la koro, li sentis sin eĉ pli soleca kaj malgaja. Pensu nur, ke li, havante neniun filon, ja ne povas grandigi sian familion en brila estonteco kaj, se lia filino iam foriros edziniĝinta, vaniĝos tiam liaj penoj kaj klopodoj dum la tuta vivo! Verdire, Ŝjangzi ne estas malbona, sed, konsiderate kiel filo aŭ bofilo, tamen tute ne taŭgas tiu firikiŝisto! Ĉu estus eble, ke li, kiu batalis la tutan vivon, partoprenis bandobatalojn kaj spertis torturojn, permesu, ke iu kruda kampulo forprenu de li lian solan filinon kun lia tuta posedaĵo? Ne, absolute ne! neniuj povus havi tian profiton de Kvara Liŭ! De sia infanaĝo Kvara Liŭ ja estas

tia homo, eĉ kies furzo povus estigi kavaon en la tero!

Je la tria aŭ kvara posttagmeze ankoraŭ kelkaj gastoj venis por lin gratuli, sed la maljunulo jam tediĝis de tio. Ju pli ili komplimentis lin pri liaj bona sano kaj fortuno, des pli sensenca tio fariĝis por li.

Vespere, post la tempo lampo-eklumiga, la plejmulto de la gastoj jam foriris, nur dekkelkaj, kiuj loĝis proksime aŭ kiuj estis plej intimaj al li, ankoraŭ restis. Ili komencis ludi maĝangon. Rigardante la malplenan markezon, verdecan eĉ la lumo de la gaslampoj, kaj la tablojn, senigitajn je la tukoj, la maljunulo eksentis forlasitecon kaj malgajon. Ŝajnis al li ke eĉ lia morto la sceno estos ĝuste tia, nur la naskiĝtaga celebrejo ŝanĝiĝos en funebran. Estos nek filoj, nek nepoj, kiuj portus funebron pro li kaj genuus antaŭ lia ĉerko dum la nokto, sed nur kalkaj personoj, pli-malpli konataj, ludantaj maĝangon dum la nokta ĉerkogardado. Li tre volus forpeli siajn restantajn gastojn. Dum li nun ankoraŭ povas spiri, li devas montri, kio li estas. sed li trovis tro malĝentila elverŝi sian koleron sur siajn gastojn. Tial li turnis sian koleron al sia filino, kiu fariĝis pli kaj pli abomena en liaj okuloj. Ŝjangzi estis sidanta en la markezo. Kia malbelaspekta ulaĉo li estas, kun tiu cikatro sur la vizaĝo, cikatro, kiu jad-verdas en la lamplumo! Ju pli la maljunulo ilin rigardas, des pli naŭze aspektas tiu ĉi paro!

Huniŭ kutime estis tre kruda kaj senbrida. Tamen hodiaŭ, ornamita de la kapo ĝis la piedoj, ŝi afekte sin tenis kiel gastigantino; ŝi tiel agis ne nur por rikolti laŭdojn, sed ankaŭ por plaĉi al Ŝjangzi. Antaŭtagmeze ŝi trovis tion tre amuza, sed posttagmeze pro laciĝo ŝi malbonhumoriĝis kaj fariĝis incitiĝema. Kaj post la vesperiĝo ŝi preskaŭ plene perdis sian paciencon, kaj ŝiaj brovoj ĉiam estis severe kuntiritaj.

Iom post la sepa, Kvara Sinjoro Liŭ sentis iom dormema, sed malgraŭe li rifuzis enlitiĝi. La monludantoj invitis lin aliĝi al ili por kelkaj ludoj, sed anstataŭ diri, ke li jam ne havas la energion, li asertis, ke maĝangludo estas por li tro enuiga kaj ke nur vetludo kaj aliaj vulgarej monludoj estas laŭ lia gusto. Ĉar neniu volis ŝanŝi la ludmanieron, li devis nur flanke sidi observante. Por forpeli la dormemon li trinkis ankoraŭ kelkajn tasetojn da brando, plendante foje kaj refoje, ke li ne sate manĝis, kaj ke la kuiristo priplukis lin, tiel ke la manĝaĵoj ne estis abundaj. El tio li konkludis, ke ĉion, pri kio li estis kontenta antaŭtagmeze, nun li trovis ne perfekta: la markezo, la kompletoj da mebloj kaj manĝiloj, la kuiristo kaj tiel plu, ĉio efektive kostas ne tiom, kiom oni postulis. Li trompiĝis kaj vane perdis tiom da mono!

Ŝjangzi ne havis lertan langon. Li havis multon por diri, sed eĉ unu vorton

li ne povis elbuŝigi. Li staris tie stultmiene, englutante salivon kun streĉita kolo.

“For, for de ĉi tie! Vi esperas ĉasi profiton ĉe mi? Sciu, antaŭ ol vi naskiĝis, mi jam bone konis ĉian ruzaĵon kaj artifikon!” nun la maljunulo minace kriis nu por ŝajniĝo, ĉar li koleris kontraŭ sia filino multe pli ol kontraŭ Ŝjangzi. Eĉ en sia furiozo li ankoraŭ sciis, ke Ŝjangzi estas honestulo.

“Nu, mi foriros!” Ŝjangzi havis nenion pli por diri. Estas plej bone, ke li foriru kiel eble plej rapide, ĉar li sciis, ke li ne estas ilia egalulo en kverelo.

La aliaj rikiŝistoj venis vidi la spektaklon pro scivolemo. Ankoraŭ tenante en la memoro tion, kio okazis en la mateno, ili tre ĝojis, kiam ili vidis, ke Kvara Sinjoro Liŭ insultas Ŝjangzi. Tamen, kiam ili aŭdis, ke la maljunulo forpelas lin, ili ekhavis simpation al Ŝjangzi. Li tiom multe laboregis dum la lastaj tagoj por la maljunulo kaj nun tiu ĉi fariĝis tiel sendanka al li! Ĉiu ekindignis pro la maljustaĵo farita al Ŝjangzi. Kelkaj el ili alpaŝis kaj demandis: “Kio okazis al vi?” Li nur skuis la kapon.

“Atendu momenton, Ŝjangzi!” en la menso de Huniŭ kvazaŭ ekbrilis fulmo ŝi klare vidis, ke ŝia antaŭa plano jam ne estas efektivebla. Ŝi devas rapide agi por teni Ŝjangzi en sia mano, alie ŝi “ne nur perdos la kokionon, sed ankaŭ rompos la ovon”. “Ni estas kvazaŭ du akridoj ligitaj al unu sama ŝnuro: neni el ni povas forkuri sola! Atendu ĝis mi plene eldiros, kion mi devas diri por klarigi la aferon!” Ŝi turnis sin al sia patro kaj jetis al li en la vizaĝon: “Mi do diru malkaŝe: mi jam fariĝis rondventra kaj tio estas de Ŝjangzi! Kien ajn li iros, mi lin sekvos! Aŭ edzinigi min al li aŭ forpeli nin ambaŭ – tio dependas de vi!”

Ŝi tute ne atendis, ke la afero tiom rapide atingos sian kulminon, kaj tio devigis ŝin ludi sian lastan karton. Kvara Sinjoro Liŭ estis eĉ pli konsternita. Sed, ĉar la afero jam stariĝis, li ne povis cedi, precipe antaŭ tiom da personoj.

“Vi eĉ havas la vizaĝon por tion diri! Mi hontruĝiĝas pro vi!” li frapis al si la vangon. “Fi, vi senhotulino!”

La maĝang-ludantoj haltigis siajn manojn, ekkonsciante, ke io estas malbona. Sed, ne precize sciante pri tio, ili povis diri nenion. Iuj stariĝis, dum la aliaj stultiene sidis, fiksante siajn okulojn sur siaj maĝang-pecoj.

Nun kiam Huniŭ jam eldiris ĉion, kion ŝi volis, ŝi eksentis sian koron pli facila. “Mi, senhotulino? Ĉu vi pensas, ke mi ne scias pri viaj malvirtaĵoj? Mi eĉ hontas ilin eldiri! Mi faris tian paŝon nur unufoje, kaj eĉ la kulpo estas ĝuste la via! Plenaĝa viro prenas al si edzinon kaj plenaĝa knabino volas edzon – tio ja estas afero tute natura. Vi kun via sesdeknaŭ-jara aĝo ne scias eĉ pri tio! Vane vi vivas ĝis nun! Nu, ĉe ĉies alesto,” ŝi montris ĉiujn spektantojn, “mi diru

malkaŝe: uzu do tiun ĉi celebran markezon por mia edziniĝa festo.”

“Mi?” La vizaĝo de la maljunulo ŝanĝiĝis de koloro ruĝa al blanka. Li furiozis. “Mi preferas forbruligi ĝin ol permesi, ke vi ĝin uzu!”

“Laŭ via bontrovo!” La lipoj de Huniŭ tremis, kaj ŝia voĉo fariĝis terure malbela. “Nu, se mi foriros kun mia litaĵo, kiom da mono do mi ricevos?”

“La mono estas mia kaj mi donos ĝin nur al tiu, kiu al mi plaĉas!” Aŭdinte, ke la filino intencas foriri, la maljunulo efektive malĝojiĝis, sed li ne povis cedi. Li malmoligis sian koron.

“Via mono? Jen kian penson vi havas post tiom da jaroj, dum kiuj mi helpis vin! Sen mi, pensu nur, vi certe jam tute fordiboĉus ĝin sur stratulinaĉoj. Nu, ni estu justaj!”

Ŝjangzi staris tie, rekta kiel stango. Kiel ordinare, li eldiris nenion.

Notoj:

1. tio aludas la kruelecon kaj terurecon de Kvara Liŭ.

XV

Ŝjangzi ne volis pugnobati maljunulon, nek virinon, kaj tial lia forto estis nenie uzebla. Fari kanajlajon? Por tio li ne estis taŭga peco. Konsiderante la personecon de Huniŭ li devus tuj forlasi ŝin kaj kuri malproksimen. Sed, ĉar ŝi kverelis kun sia patro por lin sekvi, kaj ĉar neniu sciis la internan kaŭzon, ŝi per tio faris la impreson, ke ŝi sin ofertas por li; kaj tial, antaŭ ĉiuj ĉi tiuj homoj li ne povis ne sin teni iom heroece. Li staris tie senparole kaj atendis la sekvon de la kverelo, sciante, ke por montri sin vera viro, li devas fari almenaŭ tion. La patro kaj la filino estis reduktitaj al silenla reciproka rigardado. Ŝjangzi restis muta. Koncerne la aliajn rikiŝistojn, estis al ili malfacile interveni en la aferon, tute egale, al kiu ili estis partiecaj. La maĝang-ludantoj, embarasitaj de la silento, estis devigitaj ekparoli. Ili diris nur supraĵajn pacigajn vortojn, konsilante, ke ambaŭ partioj kviete diskutu, ĉar nenia problemo ne estas solvebla. Ili bone sciis, ke ili povas diri nenion alian, ke ili ja ne povas nek volas solvi ion ajn. Vidante, ke ambaŭ partioj ne volas cedi, ili kaptis oportunan okazon kaj forŝteliĝis, ĉar proverbo diras: “eĉ justa ŝtatoficisto neniam intevenu en familiajn disputojn.”

Antuŭ ol ili ĉiuj foriris, Huniŭ retenis s-ron Feng, la kontiston de Karbobutiko Tjanŝun. “S-ro Feng, vi havas ĉambron neokupitan en via butiko, ĉu ne? Lasu Ŝjangzi resti tie kalkajn tagojn. Ni aranĝos nian aferon kiel eble plej baldaŭ, do li restos en via loko ne longe. Nu, Ŝjangzi, iru kun s-ro Feng, kaj morgaŭ ni revidiĝu por interkonsiliĝi pri nia afero. Kredu, se oni ne portos min al vi per novedzina palankeno, mi ne forlasos tiun ĉi domon. S-ro Feng, nun mi konfidas lin al vi kaj morgaŭ mi reprenos lin de vi!”

S-ro Feng peze spiradis, ne volante preni sur sin la respondecon. Kaj Ŝjangzi, por rapide forlasi la lokon, tuj diris: “Mi ne forkuros!”

Huniŭ okulpafis sian patron, iris en sian ĉambron kaj, ŝlosinte la pordonj de interne, eksplodis en akra voĉan ploron.

S-ro Feng kaj aliaj penis persvadi ankaŭ Kvaran Sinjoron Liŭ eniri en sian ĉambron, sed, sinj tenante kiel viro mondosperta, li insistis, ke ili restu por trinki pliajn tasetojn da brando. “Estu certaj, sinjoroj, ke de nun ŝi iros sian vojon kaj mi la mian, mi neniam plu kverelos. Post kiam ŝi foriros, mi ne plu rigardos ŝin kiel mian filinon. Mi faris mian vojon en la mondo dum tiom da jaroj, kaj nun pro ŝi mi jam perdis la tutan vizaĝon. Se estus antaŭ dudek jaroj, mi dishakus ilin ambaŭ en pecojn. Sed nun mi lasas ŝin havi sian vojon. Deziri

havi de mi iom da mono? Eĉ unu kupran moneron mi ne donos! Eĉ ne unu! Ni vidos, kiel ŝi vivas! Lasu al ŝi gustumi la vivamaraon kaj ŝi scios, kiu estas pli bona, ĉu la patro aŭ la viraĉo! Ne foriru, trunku ankoraŭ unu taseton!”

La gastoj prenis iajn pretekstojn kaj rapidis for por eviti implikiĝon en la aferon.

Ŝjangzi foriris en Karbotutikon Tjanŝun.

La afero efektive aranĝiĝis tre rapide. Huniŭ luis du malgrandajn ĉambrojn rigardantajn al sudo en iu granda miksloĝata korto en la strateto Maŭĝjaŭan. Ŝi dungis tapetiston tapeti ilin per blankaj paperoj de la planko ĝis la plafono kaj petis s-ron Feng skribi kelkajn ideografiaĵojn “Nupto” kaj gluis ilin sur la murojn. Poste ŝi iris mendi palankenon ornamitan per arĝentaj steloj kun dek ses muzikistoj, sed sen oraj lanternoj kaj eskorto. Tion aranĝinte, ŝi faris al si ruĝajn satenajn nuptovestojn: ŝi devis fini ilin antaŭ la Novjaro, por observi la regulon de neuzo de kudrilo dum la tempo inter la unua kaj la kvina tago de la Novjaro. La tago de la geedziĝo estis fiksita por la sesa – tago kun favora aŭspicio laŭ astrologio, kaj tago, en kiu forlasi hejmon ne estis tabuo. Post kiam ĉio ĉi tio estis aranĝita, ŝi diris al Ŝjangzi, ke li aĉetu al si kompletan da novaj vestoj. “Oni geedziĝas nur unu fojon dum la vivo!”

Ŝjangzi diris, ke li havas nur kvin jŭanojn en sia poŝo.

Huniŭ okulpafis lin. “Kio? Kaj kie tiuj tridek jŭanoj, kiujn mi donis al vi?”

Ŝjangzi ne povis ne diri la veron. Li rakontis al ŝi ĉion, kio okazis en la domo de s-ro Caŭ. Ŝi palpebrumis, duone kredante, duone dubante.

“Nu, bone, mi ne havas la tempon por disputi kun vi. Ĉiu el ni devas agi laŭ sia konscienco. Jen dek kvin jŭanoj. Se tiutage vi ne vestos vin kiel novedzo, gardu vin!”

La sesan tagon de la Novjaro Huniŭ eniris en la nuptopalankenon. Ŝi forlasis la hejmon sen iu ajn vorto al sia patro, sen iu ajn frato kiel eskortanto, sen la bondeziroj de geamikoj kaj parencoj, akompanata nur de cimbaloj kaj tamburoj, kiuj faris festan bruegon sur la stratoj, kie regis ankoraŭ la viveco de la Novjaro. La procesio bonorde marŝis preter la pordego Ŝji’anmen kaj tra Ŝjisi-portalaro, vekante envion kaj emociojn de la spektantoj en novaj vestoj, precipe de la butikaj komizoj.

Ŝjangzi portis la novajn vestojn, kiujn li aĉetis en la foiro de Tjanĉjaŭ. Kun ruĝiĝinta vizaĝo li surhavis satenan ĉapon, kiu kostis tri ĝjaŭojn. Li kvazaŭ forgesis, kiu li estas, stultmiene rigardante kaj aŭskultante ĉion ĉirkaŭ si. Transloĝiĝinte el la karbobutiko en freŝe tapetitan nuptoĉambron, blankan kiel neĝo, li sentis sin komplete konfuzita. La pasinteco estis nigra kiel la

karboamasoj en la butikoj, sed nun li staris en nova blindige blanka ĉambro kun sangruĝaj ideografiaĵoj “nupto” sur la muroj. Li sentis, ke tio estas ia moko, blanka, nebuleca, prema.

La ĉambro estis meblita per la malnovaj segoj, tablo kaj lito de Huniŭ. La forno kaj haktabulo estis novaj, kaj en unu agulo staris kolorpluma polvoviŝilo. Li rekonis nur tiujn tablon kaj seĝojn, sed la forno, haktabulo kaj polvoviŝilo estis fremdaj al li. Tio ĉi nova kaj malnova kombino rememorigis lin pri la pasinteco kaj plenigis lian animon per antaŭtimo pri la estonteco. Manipulate de aliulo en ĉio, li mem similas ian ornamaĵon malnovan kaj samtempe novan, objekton stranga, nerezonebla. Li povas nek plori, nek ridi, kaj moviĝas mallerte en tiu ĉi malgranda komforta ĉambro, kiel granda kuniklo en malgranda ligna kaĝo, sopire rigardanta eksteren, sed ne povanta eskapi, kvankam tiel rapidkura.

Huniŭ, vestita en ruĝa jako, kun vizaĝo pudrita kaj ŝminkita, sekvis lin per la okuloj. Li ne kuraĝis rigardi ŝin rekte en la vizaĝon. Ankaŭ ŝi estas ia strangaĵo, malnova kaj samtempe nova. Ŝi estas fraŭlino kaj samtempe nefraŭlino; femalo kaj samtempe kvazaŭ makslo; homo kaj samtempe kvazaŭ fera besto! Tiu ĉi besto en ruĝa jako jam kaptis lin kaj estas preta turmente mordadi lin. Ĉiu povas lin turmenti; sed tiu ĉi besto estas aparte fera kaj ĉiumomente gardas lin de forkuro, fiksante siajn okulojn sur li kaj ridante al li; kaj ĝi estas kapabla forte brakumi lin kaj elsuĉi lian tutan forton. Li ne povas eskapi. Li demetis sian malgrandan satenan ĉapon kaj fikse rigardadis la ruĝan nodon sur la pinto, ĝis liaj okuloj nebuliĝis, tiel ke kiam li deturnis de ĝi sian rigardon, la muro ŝajne fariĝis kovrita de saltantaj kirliĝantaj ruĝaj punktoj. En la mezo estas la plej granda el ili ĉiuj: la tigreca knabino kun ridaĉo sur la vizaĝo.

Nur en la nuptonokto Ŝjangzi finfine sciiĝis: Huniŭ ja ne gravediĝis. Kiel magiisto klarigis sian artifikon, ŝi diris al li: “Se mi ne trompus vin, vi neniel povus definitive doni vian konsenton. Mi ŝovis al mi kapkusenon interne de la pantalono! Ha ha, ha ha!” Ŝi ĝislarne ridegis. “Vi ŝtipkapulo! Forgesu tion! Kiel ajn estas, mi faris al vi nenion malbonan. Kia vi estas kaj kia mi, ni bone scias. Mi kverelis kun mia patro ĝuste por sekvi vin. Ĉu vi ne devas danki la ĉielon kaj la teron?”

La sekvantan tagon Ŝjangzi eliris tre frue. La pli multaj el la butikoj jam estis denove malfermitaj en la nova jaro, kvankam iuj ankoraŭ restis fermitaj. La novjaraj surskriboj estis ankoraŭ helruĝaj sur la pordoj, tamen iuj el la algluita paperoj “jŭanbaŭoj” jam estis disŝiritaj de la vento. La stratoj estis

kvietaj, tamen sur ili estis ne malmultaj rikiŝoj. La rikiŝistoj ŝajnis pli viglaj ol kutime, kaj preskaŭ ĉiu el ili portis novajn ŝuojn; iliaj rikiŝoj eĉ havis ruĝan paperpecon gluitan sur la malantaŭo.

Ŝjangzi tre enviis tiujn rikiŝistojn, kiuj, li pensis, havis festan aspekton, dum li estis enfermita en la ĉambro kvazaŭ en botelkukurbo tiujn ĉi lastajn tagojn. Ili kontente faras sian laboron, dum ili senfare vagadas sur la stratoj. Jam tedas al li ĉiam pasumi, sed, se li intencas fari ian projekton por la estonteco, li devas diskuti kun Huniŭ, sia edzino. Li devas almozpeti al tiu ĉi edzino por nutraĵo, kaj kia edzino ŝi estas! Lia alta kresko kaj granda forto estas senutilaj. Li devas antaŭ ĉio servi al sia edzino, tiu ruĝjaka, tigrodenta estaĵo, kiu suĉas sangon kaj energion de homo. Li jam estas ne homo, sed peco da karno. Li ne plu ekzistas, li baraktas inter ŝiaj dentoj kvazaŭ muso kaptita de kato. Li ne volas diskuti kun ŝi, li devas liberigi sin de ŝi kaj, ekhavinte ian planon de agado, tuj forkuri sen diri adiaŭ al ŝi. En tio estas nenio riproĉenda, ĉar ŝi estas sorĉistino, kiu iam trompis lin per kapkuseno! Li sentas, ke interna kolero ardas en lia koro. Li volus disŝiri siajn novajn vestojn kaj bani sin en klara akvo por forlavi tiun naŭzan tavolo da malpuraĵo gluiĝinta al lia tuta korpo. Li volas neniam plu revidi ŝin.

Kaj kien iri? Li ne sciis. Ordinare liaj kruroj sekvis direktojn ordonitajn de aliaj; hodiaŭ ili estis liberaj, sed lia menso estis vaka. Li marŝis de Ŝjisi-portalaro suden tra la pordego Ŝjŭan'umen, la vojo etendiĝis rekte antaŭ li kaj li sentis sin eĉ pli mensvaka. Trapasinte la pordegon li plu iris suden kaj vidis banejon. Li decidis eniri en ĝin.

Kiam li ĝisnude senvestigis sin, rigardante sian korpon, li sentis grandan honton. En la baseno la akvo estis tiel varma, ke ĝi preskaŭ sensentigis lin. Li fermis siajn okulojn kaj la tuta kolektita malpuraĵo kvazaŭ eliĝis el lia korpo malstreĉiĝinta. Ne kuraĝante palpi sin, li kuŝis tie kun vaka koro, kaj grandaj ŝvitguloj fluadis de lia frunto. Nur kiam lia spirado rapidiĝis, li malvigle elrampis el la baseno, tutkorpe hele ruĝa kiel ĵusnaskita bebo. Kvazaŭ timante eliri tiel nuda, li involvis sin en grandan bantukon, sed li ankoraŭ sentis sin malbela. Kvankam la ŝvito gutadis malsupren, lia sento pri la malpuraĵo ankoraŭ ne cedis, kvazaŭ la nigra makulo sur lia koro neniam povus forlaviĝi. Ŝajnis, ke en la okulo de Kvara Sinjoro Liŭ, en la okulo de ĉiu lia konato, li estas ĉiam virin-deloganto.

Antaŭ ol ĉesis la ŝvitado, li jam haste vestiĝis kaj rapidis eksteren, por ke oni ne povu vidi lian nudan korpon. Ekstere la malvarma vento donis al li senton de faciliĝo. La stratoj nun estis multe pli homplenaj kaj la serena ĉielo

aldonis iom da brilo al ĉies vizaĝo. Sed la koro de Ŝjangzi estis ankoraŭ premata de malĝojo. Li ankoraŭ ne decidis kien iri. Li sin direktis suden, orienten kaj poste denove suden kaj fine troviĝis ĉe Tjanĉjaŭ. Post paso de la novjaro, komizoj jam kolektiĝis tie ĉiakaŭ la naŭa horo post sia matenmanĝo, ankaŭ kolportistoj kaj prezentantoj de diversspecaj spektakloj tre frue starigis siajn standojn. Kiam Ŝjangzi alvenis, la sonoj de cimbaloj kaj tamburoj tie kaj tie jam altiris multajn amasojn da spektantoj. Sed Ŝjangzi ne havis la emon ĝui tiujn amuzojn, ĉar li jam forgesis kiel ridi!

En la ordinaraj tagoj la numoraj dialogoj, ursoludado, prestidigitado, ritmita deklamado, popolkanto-prezentado, legendrakontado kun akompano de tambureto, kaj akrobataĵoj ĉiuj povis doni al li veran plezuron kaj igi lin malfermi la buŝon en ridado. La fakto, ke li ne volis forlasi Bejping, ŝuldis sian duonan kaŭzon al tiu ĉi loko. Ĉiufoje, kiam li vidis la matajn budojn kaj amasojn da homoj tie, li tuj ekpensis pri multaj amuzaj kaj interesaj aferoj. Sed hodiaŭ li ne emas puŝi sian vojon en la homamasojn, por dividi kun ili la ridadon. Li intencas iri al iu kvietaj loko, sed li ne povas deŝiri sin de la svarmantaj homoj. Ne, li ne povas forlasi tiun karan vivoplenan lokon, ne povas forlasi Tjanĉjaŭ, ne povas forlasi Bejping. Foriri? Nenien li povas foriri. Li ankoraŭ devas hejmeniri kaj konsiliĝi kun ŝi – tiu virino! Li ne povas eskapi, nek resti senfare. Li devas esti rezignema, ĝuste kiel ĉiu, kiu troviĝas en malespera situacio. Suferinte jam ĉiajn maljustaĵojn, kial li nun devas sin teni kontraŭ tio ĉi pli serioze ol la aliaj? La pasintecon li ne povas ŝanĝi, do la sola, kion li povas fari, estas daŭrigi sian vojon.

Li ankoraŭ staris, aŭksultante la voĉbruon de la homamasoj kaj la sonojn de cimbaloj kaj tamburoj, rigardante la cirkulantajn homojn kaj veturilojn. Subite li ekpensis pri tiuj du malgrandaj ĉambroj. La tumulto ne plu aŭdiĝis al liaj oreloj, la homamasoj malaperis for de liaj okuloj, kaj ĉio, kion li povis vidi, estis tiuj du blankaj varmaj ĉambroj kun la kvadrataj ideografiaĵoj de “nupto”, kiuj frontas kontraŭ li. Kvankam li pasigis nur unu nokton tie, tamen ili estas tiel konataj kaj intimaj. Ŝajnas, ke eĉ tiu ruĝjaka virino ne estas facile forlasebla. Ĉi tie en Tjanĉjaŭ li havas nenion, li estis senvalorulo. En tiuj malgrandaj ĉambroj li havas ĉion. Li devas reiri tien, tio estas la sola vojo. Lia tuta estonteco estas tie. Honto, timo, malĝojo estas senutilaj. Se li volas plu vivi, li devas iri tien, kie estas espero.

Per unu spiro li revenis kaj eniris en la ĉambrom ĉirkaŭ la dekunua horo. Huniŭ jam pretigis la tagmanĝon: mantoj, kuirita brasiko kun viandbuletoj, telero da porkhaŭta gelatenaĵo kaj peklitaj rafanoj. Ĉio jam estis sur la tablo

krom la brasiko, kiu estis kuirata sur la forno kaj eligis tre agrablan bonodoron. Ŝi jam demetis sian ruĝan jakon kaj portis siajn ordinarajn vatitajn pantalonon kaj jakon, sed en ŝia hararo ankoraŭ sidis ruĝa velura floreto. Kun malgranda orkolora papera ĵuanbaŭo gluita sur ĝi.

Ŝjangzi ĵetis rigardon al ŝi. Ŝi ne aspektis kiel novedzino. Ĉiuj ŝiaj movoj montris, ke ŝi estis edzinigita, kvazaŭ jam plurajn jarojn, tiel manlerta, spertoriĉa kaj memkontenta ŝi estis sed ŝajnis al li, ke estas ankaŭ io nova ĉe ŝi ŝia kuirado, la maniero kiel ŝi aranĝis la ĉambrojn, la delikata aromo en la aero, la varmo en la ĉambroj – ĉio ĉi estas aferoj, kian li neniam antaŭe spertis. Kia ajn ŝi estas, li sentas, ke li havas hejmon ĉi tie, kaj hejmo ĉiam estas aminda. Kaj li ne scias kion fari kun si mem.

“Kie vi estis?” ŝi demandis, kiam ŝi servis al li la brasikon. “Preni banon.” Li demetis sian longan robon.”

“Ĉu? Nu, poste kiam vi eliros, diru ion. Ne foriru tiel senvorte!”

Li diris nenion.

“Ĉu vi ne scipovas eligi eĉ unu vorton? Se ne, mi instruos vin!”

Li responde diris hm. Kion alian li povus fari? Li sciis, ke li jam edziĝis al demonino, kiu povas kuiri kaj ordaranĝi, lin insulti kaj ankaŭ helpi, kio multe malagrabiligis lin. Li komencis manĝi la mantoojn. La manĝaĵo estis varma kaj vere pli bongusta ol kion li ordinare manĝis; sed, ĝi tamen ne povis vekti ĉe li apetiton. Maĉante ĝin, li ne sentis tian plezuron, kian li kutime havis dum bonapetita manĝado.

Post la manĝo li kuŝiĝis sur la briklito, kun siaj brakoj sub la kapo kaj okuloj fiksitaj al la plafono.

“He! Venu kaj helpu lavi la manĝilaron. Mi estas nenies servistino!” ŝi vokis el la ekstera ĉambro.

Malvigla li stariĝis, ĵetis al ŝi rigardon kaj alpaŝis ŝin helpi. Ordinare li estis tre laborema. Sed nun li faris la lavadon tre ne volonte. En la rikiŝejo li ofte helpis ŝin, sed nun uj pli li rigardis ŝin, des pli fortan naŭzon li sentis. Li neniam abomenis iun ajn tiel forte, kvankam li ne povis diri kial. Li havis nigran humuron, sed li ne povis esprimi siajn sentojn, kiuj restis enŝlositaj en lia koro. Ĉar li ne povis rompi la rilatojn kun ŝi, estis ne necese kvereli kun ŝi. Paŝante tien kaj reen en la malgranda ĉambro, li sentis, ke lia tuta vivo estas plenplena de plendindaĵoj.

Fininte la laboron, ŝi ĵetis rigardon ĉirkaŭen kaj faris ekspironj de faciliĝo. Poste ŝi ekridetis: “Nu, kiel do?”

“Kio?” Ŝjangzi kaŭris apud la forno por varmigi siajn manojn. Fakte ili ne

estis malvarmaj, sed alia li ne havus konvenan lokon por ilin meti. La du ĉambroj vere aspektis kiel hejmo, tamen li ne sciis, kien meti siajn manojn kaj piedojn.

“Nu, konduku min ien por ia amuzo. Al la monaĥejo Bajjungŭan, ĉu bone? Ne, jam estas iom malfrue por tio. Do ni promenu sur stratoj.” Ŝi volis kiel eble plej ĝui la novedzinecon. Kvankam la geedziĝa ceremonio mem estis mizera, tamen tiu ĉi nova libereco ja estis bona kaj nun ŝi devis profiti la okazon por ĝui la vivon kun sia edzo kelkajn tagojn. Kiam ŝi siatempe estis en la domo de sia patro, al ŝi mankis ne nutraĵo, nek vestoj, nek poŝmono, nur viro, kun kiu ŝi povus esti intima. Por kovri la perdon, nun ŝi volis parade iri sur stratoj kaj bazaroj, sin amuzante kun Ŝjangzi.

Ŝjangzi ne volis eliri. Unue, li trovis hontinda promeni publike tie kaj tie kun sia edzino; due, li sentis, ke edzino tiamaniere prenita devus esti tenata kaŝe en la hejmo. Ŝi ne estas io prifierinda, kaj ju malpli da homoj ŝin vidas, des pli bone. Cetere, li certe renkontus iaajn konatojn. Ĉiuj rikiŝistoj de la okcidenta urbo konas Ŝjangzi kaj Huniŭ. Li ne volas, ke oni mokridu lin post lia dorso.

“Ni iom konsiliĝu, ĉu bone?” Li ankoraŭ kaŭris.

“Kio indas konsiliĝon?” Ŝi alpaŝis kaj haltis apud la forno.

Li ĉesis varmigi siajn manojn kaj lasis ilin ripozi sur siaj genuoj, fikse rigardante la flamojn. Post longa momento li elbuŝigis nur unu frazon: “Mi ne povas resti tiel senfare!”

“Missorta mizerulo!” ŝi ekridis. “Mi supozas, ke vi sentas jam jukon sur via korpon, ne tirante rikiŝon eĉ unu tagon, ĉu ne? Vidu la maljunulon. Li sin amuzis dum la tuta vivo kaj eĉ starigis rikiŝejon en sia maljunaĝo. Li ne tiras rikiŝon, nek vendas sian forton, sed vivas dank’ al sia ruzeco. Vi devas iom lerni de li. Kian bonon alportus la ĉiama rikiŝotirado ni unue amuzu nin kelkajn tagojn. Estas ne necese tuj fari ian decidon. Kial tiom hasteme? Mi ne volas kvereli kun vi ĉi tiujn tagojn, do ne intence kolerigu min!”

“Ni unue interkonsiliĝu!” Ŝjangzi decidis ne cedi. Ĉar li ne povas forlasi ŝin, li devas labori. Kaj la unua afero estas, ke li klopodu trovi al si firman starejon, por ke li ne plu ŝanceliĝu.

“Nu, parolu do.” Ŝi portis benketon apud la fornon kaj sidiĝis tie.

“Kiom da mono vi havas” li demandis.

“Jen kion vi diris! Jam antaŭe mi sciis, ke vi pri tio demandos. Vi edziĝis al mi ja pro mia mono, ĉu ne?”

Ŝjangzi eksentis sin kvazaŭ eksufokita de subita ventoblovo, kaj li plurfoje

faris glutojn. Kvara Sinjoro Liŭ kaj la rikiŝistoj de la rikiŝejo ĉiuj pensis, ke pro monavido li prenis ŝin al si, kaj nun eĉ ŝi mem kulpigis lin pri la samo. Pro nenia kaŭzo li perdis siajn proprajn rikiŝon kaj monon, kaj nun la kelkaj jŭanoj de lia edzino metis lin sub ŝian regadon, ke eĉ por ricevi nutraĵon li devas peni plaĉi al ŝi. ho, kiel li dezirus meti siajn manojn ĉirkaŭ ŝian kolon kaj sufokpremi ĝin! Li permu kaj premu, ĝis ŝiaj okuloj montrus la blankon. Ĝismorte sufokinte ŝin, li poste tranĉus al si la gorgŝon. Ili ambaŭ estus malhomoj kaj meritus la morton. Neniu el ili meritus vivi plu!

Li stariĝis por reiri eksteren, ekpentante pri sia jŭsa reveno.

Huniŭ povis legi ion nebonan en lia mieno kaj diris iom pli afable: “Nu, bone, mi diru al vi. Komence mi havis kvincent jŭanojn. La elspezoj por la palankeno, la domlupago por tri monatoj, la tapetado kaj la vestoj, kune kun aliaj elspezoj kaj la sumo, kiun mi donis al vi, sumiĝis je preskaŭ cent jŭanoj, do mi nun havas ĉirkaŭ kvarcent. Mi diras al vi, estas ne necese maltrankviliĝi. Ni do ĝuu vivplezuron kiam ni povas. Vi ĉiam tiris rikiŝon dum tiuj ĉi jaroj kaj odoraĉe ŝvitegis, nun vi devas elegante vin vesti kaj bone vin amuzi. Kaj mi, mi estis tromataura fraŭlino dum tiom da jaroj kaj nun ankaŭ devas iom min plezurigi. Kiam mia mono komencso elĉerpiĝi, ni iros peti la maljunulon pri helpo. Se tiun tagon mi ne estus malpacigiĝinta kun li, mi neniel povus forlasi la hejmon. Nun mia kolero jam kvietiĝis kaj, malgraŭ ĉio, patro estas patro. Mi estas lia sola filino kaj vi estas, kiu al li ĉiam plaĉis; tial, se ni cedos kaj pardonpetos, li probable forgesos ĉion malagrablan. Tio estas, kion ni havas sur la pinto de la fingro. Li havas la monon kaj ni heredos ĝin, jen afero tute racia kaj laŭleĝa. Tio estas multe pli bona ol ke vi plu sklavus por aliaj kiel ŝarĝobroto. Post kelkaj aliaj tagoj vi unue iru lin viziti. Se li rifuzos vin vidi, vi povos iri duafoje. Se ni donos al li la tutan vizaĝon, li certe ŝanĝo sian decidon. Tiam mi iros al li kaj diros flatajn vortojn, eble ni povos transloĝiĝi ĉe lin. Poste ni povos levi la kapon kaj ni neniu kuraĝos nin malestimi. Se ni ĉiam restos ĉi tie kun rezignemo, ni ĉiam havos malbonan nomon. Ĉu mi pravas?”

Tio ĉi neniam venis al Ŝjangzi en la kapon. De kiam ŝi vizitis lin ĉe la domo de s-ro Caŭ, li pensis, ke li, edziĝinte la ŝi, povos uzi ŝian monon por aĉeti rikiŝon, kiun li mem tiros. Kvankam uzi la monon de la edzino estas ago ne honora, tamen tio ne gravas, car iliaj rilatoj ĵiam estas iel nedireble hontindaj. Al li tute ne venis en la kapon ankaŭ la ideo, ke Huniŭ havas tiun ĉi karton en sia miniko. Por homo sufiĉe dikhaŭta tio certe povus esti elirejo. Sed Ŝjangzi ne estas tia homo!

Pripensinte ĉion ĉi, li ekkomprenis kaj diris al si en penso: se vi havas

monon, oni povas ĝin forrabi senkaŭze kaj vi povos vin turni al neniuj loko por plendi. Se iu donas al vi monon, vi estos devigita ĝin akcepti, kaj de tiam vi ne plu estos via propra mastro. Viaj fortoj kaj ambicio estas senutilaj. Vi estas servatno, ludilo de via edzino, sklavo de via bopatro. La homo estas kiel birdo: Se vi serĉas por vi nutraĵon, vi pli-malpli frue enfalos en la reton. Nutrante vin per alies greno, vi devas kun kontenteco resi en via kaĝo, kantante por alia, kaj povos esti vendita en iu ajn momento.

Li ne volas iri vidi Kvaran Sinjoron Liŭ. Lia rilato kun Huniŭ estas tiu de karno en karno, t.e. de la plej intima speco, sed kun la maljunulo li havas nenan ligan. Ŝi jam trompis lin, kiel do li nun povus iri peti helpon de ŝia patro?

“Mi ne volas resti senfare!” li diris nur unu frazon, por eviti malŝparon de sia spiro kaj kverelon.

“Ve estas denaska sklavo, ĉu?” Ŝi moke diris: “Se vi volas vin okupi per io, faru do komercadon!”

“Mi ne scias kiel komerci! Mi ne kapablas gajni monon! Mi scias tiri rikiŝon, mi amas tiri rikiŝon!” La vejnoj elstariĝis sur lia frunto.

“Nu do, mi diras al vi, tio estas ĝuste kion mi ne permesas al vi fari! Mi ne permesas, ke vi odoraĉu pro ŝvitego sur mia lito. Vi havas viajn ideojn kaj mi la miajn, mi do vidu, kiu venkos kiun. Vi edziĝis, sed estis mi, kiu pagis por tio, kaj vi elspazis neniun kupran moneron. Pensu nur, kiu el ni devas aŭskulti la alian?”

Ankoraŭfoje Ŝjangzi ne povis doni respondon.

Notoj:

1. Ŝjisi-portalaro: T.e. la Okcidentaj Kvar Partaloj. En la malnova Pekino troviĝis kvar gravaj vojkruciĝoj. En la okcidento estis du: ĉe la norda ĉiuflanke staris portalo, entute kvar, kaj la irantoj kaj veturiloj trapasis tra la portaloj; kaj ĉe la suda staris nur unu portalo en la orienta flanko kaj tial ĝi nomiĝis Ŝijidan-portalo (la Okcidenta Sola Portalo). La aliaj du, Dongsi-portalaro kaj Dongda-portalo estis en la oriento de la urbo tute simetrie.

2. Vid. Noton 3 de ĉapitro XI.

3. briklito: Granda Lito de norda Ĉinio, masonita el brikoj aŭ adoboj, supre kovrita de mato kaj malsupre kun fajrujo, kiun oni hajtias vintre.

XVI

Ŝjangzi restis senfare ĝis la Lanterna Festo, kaj tiam li ne plu toleris.

Nuniŭ estis en gaja humoro. Ŝi okupiĝis pri kuirado de ĵuanŝjaŭojn kaj ĝjaŭziojn, vizitadis la templan foiron dum la tago kaj rigardadis kun plezuro la koloraj lanternojn sur la stratoj en la nokto. Ŝi ne permesis al li esprimi sian opinion pri io ajn, sed ĉiam igis lian buŝon gustumi ĉiaspecajn frandaĵojn, aĉetitajn kaj hejmfaritajn de ŝi.

En ilia granda korto miksloĝis sep aŭ ok familioj, kiuj plejparte konsistis el po sep aŭ ok personoj, maljunaj kaj junaj, kiuj kunpremiĝe vivis en unu ĉambro. Inter ili troviĝis rikiŝisto, kolportisto, policano, servisto k.a. ciu zorgis pri sia okupo, neniam havante liberan tempon. Eĉ la infanoj eliris kun malgranda korbo por peti de la filantropia kuirejo rizkaĉon en la mateno kaj kolekti skorion. Nur la plej junaj restis en la korto, ludante kaj petolante, kun malgranda postaĵo ruĝiĝinta de frsosto en sia disfendita pantalono. Cindro, polvo kaj malpura akvo estis forĵetitaj en la korton, kiun neniu purigis. En ĝia mezo kuŝis tavolo da glacio, kiun la pli aĝaj knaboj uzis kiel glitejon post kiam ili revenis el skorio- kolektado; glitante sur ĝi, ili laŭte, ĝoje kriadis. La plej malfeliĉaj estis la maljunuloj kuŝis sur glacie malvarmaj briklitaj, atendante senpacience la sumeton da mono, kiun la laborkapablaj perlaboris, por havigi al si bovlon da kaĉo. Iafoje la junaj gajnis iom da mono, iafoje ili revenis kun malplenaj manoj; kaj ili estis en kolera humoro kaj volis trovi pretekstojn por kvereli. La malsataj maljunuloj povis nur engluti siajn larmojn. Koncerne la virinojn, ili devis ne nur prizorgi la maljunaj kaj junajn, sed ankaŭ peni kontentigi siajn virojn monperlaborantajn. Eĉ gravedaj ili laboris kiel kutime, manĝante nur maizpastaĵon kaj batatan kaĉon. Krome, ili ankaŭ devis peni akiri kaĉon de la filantropia kuirejo kaj klopodaj por ricevi aliajn bagatelajn laborojn por fari. Post kiam fine la maljunaj kaj junaj estis nutritaj kaj enlitiĝis, ili devis lavi, ripari kaj flicki kion ili prenis de aliaj kiel laboron, sub malforte lumanta kerosena lampo. En la malgranda ĉambro estis glacie malvarme, ĉar la malvarma vento, kiu fajfis tra la murfendoj internen, forportis la tutan malmulton da varmo, kiu povis resti en la ĉambro. Vestitaj en ĉifonoj, kun nur unu aŭ duona bovlo da kaĉo en la stomako, aŭ eĉ gravedaj de ses aŭ sep monatoj, ili devis penlaboradi, kaj unue lasi la maljunaj kaj junajn manĝi ĝissate. Suferantaj malsanojn, ili komencis kalviĝi jam antaŭ la aĝo de tridek jaroj, tamen ili neniam povis ripozeti; kaj kiam malsano rabis al ili la vivon,

iliaj familioj devis peti “filantropojn” pri ĉerko. La knabinoj, eĉ deksex- aŭ deksepjaraj, ne surhavis pantalonon kaj, envolvitaj en ĉifonoj, nur restis en la ĉambro – ilia natura malliberejo – helpante al sia patrino ĉe laboroj. Por iri en la necesejon, ili devis unue certiĝi, ke la korto estas senhoma, kaj poste kure elŝteliĝis. Dum la tuta vintro ili neniam vidis la sunon, nek bluan ĉielon. La malbelaj poste okupos la lokon de sia patrino, la pli belaj — eĉ ili mem sciis pri tio — pli-malpli frue estos venditaj de siaj gepatroj, por “vivi feliĉan vivon”.

En tia miksa korto Huniŭ sentis sin tre memkontenta. Ŝi estis la sola, kiu ne bezonis fari al si zorgojn pri nutraĵo kaj vestoj, havis tempon por pasumi kaj sin amuzi. Kiam ŝi iris en kaj el la korto, ŝi ĉiam tenis la kapon alte levita, konsciante sian propran superecon kaj donante nenian atenton al siaj malriĉaj najbaroj pro timo, ke ŝi estus makulita de ili. La kolportistoj, kiuj venadis en la korton, preskaŭ ĉiuj vendis plej malkarajn varojn: viandopecetojn deŝiritajn for de ostoj, frostodifektitajn brasikojn, neboligitan fabosukon, azen- kaj ĉevalviandojn. Post kiam Huniŭ transloĝiĝis ĉi tien, ankaŭ tiuj, kiuj vendis pli multekostajn varojn, kiel ekzemple ŝafan kapaĵo, fumaĵitajn fiŝojn, kukojn kaj frititan toŭfuon en spicita saŭco, venadis kaj vendovokis ekster ŝia pordo. Kiam ŝi tenante la nazon supren, revenis al sia ĉambro kun iaj frandaĵoj, la malgrandaj infanoj ĉiuj enŝovis siajn maldikajn, malpurajn fingrojn en sian buŝon kaj gapis al ŝi, kvazaŭ ŝi estus princino. Ŝi venis por ĝui plezuron kaj ne povis, nek volis vidi la suferojn de aliaj.

Ŝjangzi malaprobis ŝian konduton. Estante malriĉa de sia infanaĝo, li sciis, kio estas mizero, kaj li ne volis manĝi tiujn diversajn frandaĵojn – li domagis la monon. Kaj plie, li jam venis al la doloriga konkludo, ke ŝi ne permesas al li tiri rikiŝon kaj penas nutri lin per bonaj manĝaĵoj, same kiel oni grasigas bovinon por ricevi pli da lakto. Li jam fariĝis ŝia ludilo. Li abomenis tian vivon kaj estis maltrankvila pri si. Li sciis, ke tiu, kiu vendas sian forton, devas prizorgi sian korpon, ĉar sano estas ĉio. Se li plu vivos tiamaniere, li certe iam fariĝos malplena ŝelo. Ĉe la penso li ekstremis de timo. Se li volas plu vivi, li devas tuj komenci tiri rikiŝon. Tuttage kurinte, li povos profunde dormi en la nokto kaj ne manĝos ŝiajn frandaĵojn. Tiamaniere li ne plu servos kiel ŝia ludilo. Li do decidis tiel agi kaj ne plu cedi. Se ŝi bonvolos doni monon por aĉeti rikiŝon, estos bone; se ne, li luos unu. Dirite, farite. Kaj li tuj iris lui rikiŝon, ne dirante eĉ unu vorton.

La deksepan de la monato, li denove komencis tiri rikiŝon dum la tago. Post tirado de du longdistancaj pasaĝeroj li komencis havi novan sensaĵon: moliĝon en siaj suroj kaj doloron en siaj koksoj. Li sciis la kialon, sed por

konsoli sin li atribuis tion al sia nelaboro dum pli ol dudek tagoj; kaj li pensis, ke kiam liaj kruroj ree kutimiĝos al la kurado, post portado de kelkaj pasaĝeroj, ĉio estos en ordo.

Ŝjangzi akiris ankoraŭ unu klienton. Ĉi-foje estis kvaropo da rikiŝistoj, kiuj estis dungitaj por kuna kurado. En konsento la tri petis la tri petis la altkreskan, kiu havis pli ol kvardek jarojn, esti la unua en la vico. Ekridetinte, li komencis kuri, bone sciante, ke la tri aliaj ĉiuj estas pli rapidaj ol li. Tamen li ne volis preteksti la aĝon por kuri malrapide kaj kuris per ĉiuj siaj fortoj.

Post unu lio, unu el la junaj rikiŝistoj laŭdis lin: “Kiel vi vin sentas? Ĉu laca? Sufiĉe forta vi estas ankoraŭ!”

Anhelante li respondis: “Kiel mi povus malrapide, kurante kun vi?”

Kaj efektive li kuris ne malrapide, eĉ Ŝjangzi devis uzi sep aŭ ok dekonoj de sia forto por lin sekvi. La altkreskulo havis malbelan teniĝon dum la kurado. Li ne povis sin fleksi ĉe la talio, kvazaŭ lia tuta dorso estus solida lignopeco, tiel ke li devis klini sian tutan korpon antaŭen, kun brakoj etenditaj malantaŭen. Tio signifis, ke li devas pli forte movi siajn koksojn, por peli antaŭen siajn piedojn, kiuj kvazaŭ balais la teron. Li kuris vere rapide, sed evidente tre pene. Li turniĝis ĉe anguloj tiel abrupte, ke la aliaj eĉ pro timo retenis la spiron, ĉar ŝajnis, ke li donas atentonj nur al sia antaŭenkurado, tute ne konsiderante sian rikiŝon.

Kiam ili atingis sian celon, ŝvito gutadis de lia nazo kaj la orel-loboj. Li lasis la rikiŝajn timontojn, rapide rektigis la talion kaj lipgrimacis; kaj kiam li ricevis sian pagon, liaj manoj tiel forte tremis, ke li apenaŭ povis teni la monon.

La kuna rikiŝotirado faris ilin amikoj, kaj ili ĉiuj parkis siajn rikiŝojn samloke. Ŝjangzi kaj la aliaj junaj rikiŝistoj forviŝis la ŝviton kaj komencis ŝerci kiel kutime. La mezaĝa altkreskulo plu paŝadis sola kelkan tempon, atakata de seka tusado. Nur post kiam li kraĉis multe da blanka ŝaŭmo, li povis iom post iom rekolekti siajn fortojn kaj komencis aliĝi al la konversacio.

“Ho ve, jam pasis miaj tagoj! Mi estas ankoraŭ superema en la koro, sed la dorso kaj kruroj jam tro malfortiĝis! Kiel ajn mi penas rektigi min, mi ne povas pli alten levi miajn krurojn. Tio vere afliktas min!”

“Vi ĵus kuris ja ne malbone, ĉu vi opinias la kuradon malrapida?” diris la malalta dudekjarulo. “Por diri la veron, ni tri estas sufiĉe fortaj sed kiu el ni ne ŝvitis?”

La altkreskulo faris iom memkontentan mienon, sed li ankaŭ hontis kaj eksuspiris.

“Per via nuna kurmaniero vi certe ankoraŭ povas superi pli-malpli fortajn,

ĉu vi kredas?”

La altkreskulo ridetis kaj skuis la kapon. “Ne tute temas pri la aĝo, fratoj. Mi diras al vi, havante nian okupon, vi neniam devas fondi al vi familion, kaj tio estas la vero!” Vidante, ke la aliaj klinas la orelon al li, li daŭrigis per mallaŭtigita voĉo. “Post kiam vi edziĝos, vi havos neniun momenton da ripozo tage kaj nokte, kaj ĉio pereos! Jen, rigardu miajn koksojn! Rigidaj kiel tabulo, ili havas neniom da elasteco. Se mi kun fortostreĉo kuras rapide, mi komencas tusi kaj sentas premsufokiĝon en la brusto. Por ni estas nur unu vojo: restu soluloj, se ni volas daŭrigi tiun ĉi okupon! Eĉ la paseraĉoj vivas en paroj, sed ni devas resti soluloj! Plie, post kiam vi edziĝos, naskiĝos al vi po unu infano jare. Nun mi jam havas kvin, kiuj ĉiuj atendas nutriĝon! La rikiŝa lupago estas alta, la greno estas kara, la laboro estas peniga, kion do vi povas fari? Pli bone estus ne edziĝi la tutan vivon kaj iri en malĉastejon kiam ajn vi tion bezonas. Se vi ricevos sifilison, tiam submetu vin al via sorto! Kiam vi iam mortos, mortu prefere kiel solulo! Havante familion kun pluraj membroj, junaj kaj maljunaj, kiuj manĝi bezonas, post la morto vi eĉ ne povos fermi viajn okulojn, turmentate de la maltrankvilo pro viaj familianoj. Nu, diru, ĉu mi pravas?” li demandis al Ŝjangzi.

Ŝjangzi balancis la kapon kaj diris nenion.

Tiumomente alvenis kliento kaj la malalta juna rikiŝisto post marcando kun li venis al interkonsento pri la prezo. Sed li diris al la altkreska mezaĝulo: “Nu, frato, vi portu lin. Kvin infanoj en la hejmo atendas vin!”

La altkreskulo ekridetis: “Bone, mi do kuru ankoraŭ unu fojon, kvankam ne decas tiel agi! Post tio mi povos alporti hejmen iom pli da kukoj. Ĝis revido, fratoj!”

Vidante lin foriri, la malaltulo diris al si mem: “Kia damninda vivo: ni ŝvitegas la tutan vivon kaj tamen ne povas eĉ kuŝi kun edzino! Sed tiuj uloj en grandaj domoj povas ĉirkaŭpremi po kvar aŭ kvin virinojn!”

“Unue ne pri ili parolu,” diris alia juna rikiŝisto. “Li estas prava: praktikante tiun ĉi okupon, vi devas esti singarda. Por kio do vi prenu edzinon? Ĉu ŝi estas ornamaĵo por rigardado? Ne, jen la kaŭzo de la malagrablo. Manĝante nur maizpanon ĉiutage kaj konsumate kvazaŭ kandelo brulanta ĉe ambaŭ ekstretoj, eĉ la plej forta junulo iam falos!”

Finaŭdinte tion, Ŝjangzi levis la rikiŝoajn timonetojn kaj diris murmure: “Mi moviĝos suden. Neniu kliento ĉi tie.”

“Ĝis revido!” la aliaj du respondis.

Ŝajnis, ke Ŝjangzi ne aŭdis tion. Li paŝadis antaŭen, de tempo al tempo

svingante alten la piedojn; liaj lumboj vere iom doloris lin. Li volus tuj iri returne hejmen, sed li ne havis la kuraĝon. Tie lin atendas ne edzino, sed vampiro sangosuĉanta!

La tagoj fariĝis pli kaj pli longaj. Li paŝadis kelkan tempon kaj ankoraŭ estis nur la kvina horo. Li redonis la rikiŝon al la rikiŝejo kaj pasigis iom da tempo ankaŭ en tetrinkejo. Trinkinte du kruĉojn da teo, li eksentis sin malsata kaj decidis manĝi ion antaŭ ol iri hejmen. Li formanĝis dek du ljangojn da viandfarĉitaj kukoj kaj unu bovlon da ruĝfazeola kaĉo, poste malrapide iris al al hejmo, brue ruktante. Li sciis, ke lin atendas forta tondro en la hejmo, sed li sentis sin trankvila. Li decidis nek disputi, nek kvereli kun ŝi, sed tuj enlitiĝi kaj dormi. Kaj morgaŭ li denove tiros rikiŝon, tute egale, ĉu tio al ŝi plaĉos aŭ ne.

Enirinte en la domon, li trovis Huniŭ sidanta en la ekstera ĉambro. Ŝi ĵetis rigardon al li kaj ŝia viazaĝo longiĝis. Por malstreĉi la atmosferon Ŝjangzi intencis saluti ŝin, sed li trovis, ke efektive li tion ne kutimas fari. Kun klinita kapo li eniris en la internan ĉambron. Huniŭ estis silenta kaj la du malgrandaj ĉambroj estis kvietaj kiel kaverno profunde en monto. La tusoj kaj konversacio de najbaroj, la krioj de infanoj estis tre klaraj, sed ŝajne ankaŭ tre malproksimaj, kvazaŭ sonoj aŭditaj de sur montosupro.

Ambaŭ restis silentaj kaj enlitiĝis unu post la alia, kvazaŭ ili estus paro da mutaj grandaj testudoj. Post mallonga dormo, Huniŭ demandis, duone kolere, duone ŝerce: “Kie vi estis la tutan tagon?”

“Tiri rikiŝon!” li murmuris en duondormo, kvazaŭ lia gorĝo estus ŝtopita de ia objekto.

“Tion mi sciis! Se vi ne ŝvitas, vi sentas jukon, vi mizerulaĉo! Vi ne manĝis la manĝaĵon, kiun mi kuiris por vi, sed kuradis ĉie en la urbo por senbride ŝtopi la stomakon, ĉu tio estas pli komforta por vi? Ne tro kolerigu min. mia patro komencis sian karieron kiel granda ĉioriskemulo, kaj mi aŭdacas ĉion fari! Se morgaŭ vi denove eliros, mi pendigso min por montri al vi, kio mi estas. Kion mi diras, mi plenumos!”

“Mi ne volas resti senfare!”

“Ĉu vi ne povas viziti la maljunulon?”

“Ne!”

“Brave! Vera obstinulo!”

Forte incitiĝinte, Ŝjangzi ne povis plu sin deteni kaj eksplodis eldirante, kion li havis en la koro. “Mi deziras nur tiri rikiŝon, aĉeti al mi propran rikiŝon. Se iu ajn baros al mi la vojon, mi foriros kaj neniam revenos.”

“Hm—” tiu ĉi sono daŭre resonis en ŝia nazo. Ĝi esprimis ŝian fieron kaj

malestimon al li, sed samtempe ŝi ankaŭ pripensis en si. Ŝi sciis, ke Ŝjangzi, kvankam honesta kaj simple, estas viro nefleksebla. Kiel tia viro li neniam ŝercas: kion ajn li diras, li plenumas. Kapti lin estas por ŝi ne facile, kaj tial ŝi ne povas lasi lin forgliti el ŝiaj manoj. Li ja estas ideala edzo: honesta, laborema, forta. En ŝi aĝo kaj kun ŝia aspekto, al ŝi estus malfacile trovi alian trezoron kia li. Fera mano en velura ganto estas necesa. Kaj ŝi provis lin kaĵoli.

“Mi scias, ke vi estas ambicia, sed ankaŭ vi devas scii, ke mi ja vere amas vin. Se vi ne volas viziti la maljunulon, mi iros lin vidi. Mi estas lia filino, do estos al mi nenio, se mi perdos la vizaĝon pro tio.”

“Eĉ se la maljunulo akceptos min en sian hejmon, mi ankoraŭ tiros rikiŝon,” diris Ŝjangzi kategorie.

Huniŭ silentis dum longa momento. Ŝi ne atendis, ke li povas estis tiel saĝa. Tiuj malmalmultaj vortoj klare montris, ke li ne plu lasas sin trompi de ŝi kaj ke li ne estas malsaĝa kiel azeno. Al ŝi estas necese kaj interese uzi pli da ruzeco por bridi tiun ĉi grandan mulecan estaĵon, kiu kolerigite povus kalcitri. Ŝi ne devas tro krude inciti lin, ĉar kapti lin ja ne estas afero facila! Streĉi kaj poste malstreĉi la bridon estas la rimedo taŭga por teni lin en la manoj.

“Nu, bone, se vi nepre volas tiri rikiŝon, mi ne povas vin haltigi. Sed vi devas promesi al mi ne labori kiel laŭmonata dungito kaj reveni hejmen ĉiuvespere. Unu tagon sen vi mi frenezigu. Promesu al mi, ke vi revenos frue ĉiuvespere”

Ŝjangzi ekmemoris la vortojn de la altkreskulo. Streĉe rigardante en la mallumon, li kvazaŭ vidas amason da rikiŝistoj, kolportistoj, kulioj, ĉiu kun rigida dorso kaj treniĝantaj piedoj. Ankaŭ li iam estos tia. Sed nun estas al li ne necese plu malobei ŝin, sia permeso, ke li povu tiri rikiŝon, jam estas lia venko ne malgranda. Tial li diris: “Mi do nur tiros okazajn klientojn!”

Fakte Huniŭ ne tiel forte deziris viziti sian patron, kiel ŝi diris. Kvankam antaŭe ili ofte kverelis inter si, tamen nun la cirkonstancoj ŝanĝiĝi: ŝi jam ne estas ano de Liŭ-familio, kaj ĉi-foje la problemo ne estos tiel facile solvebla. Edziniĝinta filino ne plu estas tiel proksima al siaj gepatroj kiel antaŭe, tial ŝi ne kuraĝas marŝi rekte en la domon de sia patro. Se li efektive malkonfesos ŝin kaj rifuzos doni al ŝi eĉ unu kupran moneron, tiam ŝi povos fari nenion kontraŭ tio, kiel ajn megera ŝi sin montros. Kaj eĉ paciganto ne povos doni al ŝi helpon, se estiĝos inter ili nekvietigebla kverelo, kaj ĉio, kion li povos fari, estos konsili ŝin reiri hejmen – ĉar sian propran hejmon ŝi jam havas.

Ŝjangzi plu tiris rikiŝon kiel antaŭe, dum ŝi, estante sola en la domo, paŝadis tien kaj reen. Plurfoje ŝi intencis surmeti sian superveston por viziti la

patron, tamen ŝiaj manoj ne sin movis. Ŝi estis en dilema embaraso. Por sia propra komforto kaj feliĉo ŝi devas iri al li, sed, se ŝi tion faros, ŝi perdos sian memrespekton. Se la kolero de la maljunulo jam kvietiĝis kaj, se ŝi nur sukcesos treni Ŝjangzi returne al Rikiŝejo Harmonio, tie li nature ricevos ian laboron por fari. Li ne bezonos plu tiri rikiŝon kaj certe povos transpreni la aferon de ŝia patro. Ŝia koro eklumas.

Sed kio fariĝos, se la maljunulo rifuzos cedi? Ŝi ne nur perdos la vizaĝon, sed ankaŭ estos kondamnita ĉiam esti edzino de rikiŝisto. Ha fi! Tiam ŝi, Huniŭ, estos tute ne diferenca de tiuj virinoj en tiu ĉi korto! La penso subite plenigis ŝin per nigra malespero. Ŝi preskaŭ ekpensis, ke ŝi edziniĝis al Ŝjangzi. Kiel ajn ambicia li estas, se ŝia patro rifuzos rekoni lin kiel sian bofilon. Li restos ĉiam rikiŝisto. Ĉe tiu ĉi penso ŝi eĉ decidis reveni sola al al patra domo kaj rompi la rilatojn kun Ŝjangzi. Ŝi ne devas perdi ĉion pro li. Sed tuj poste ŝi ekpensis pri la nedirebla plezuro, kiun ŝi konis kun li. Sidante sur la rando de la briklito, ŝi stultmiene profundiĝis en dolĉajn pensojn pri sia postedziniĝa feliĉo, kaj ŝi havis la senton, ke ŝi kvazaŭ granda ruĝa floro floras en la suno. Ne, ŝi ne povas forlasi Ŝjangzi. Li do estu plu rikiŝisto, kaj eĉ se li fariĝus almozulo, ŝi devus ĉiam resti kun li. Kion la virinoj en tiu ĉi korto povas elteni, tion ankaŭ ŝi. Ba, lasu tion! Ŝi ne plu intencas vidi sian patron.

De kiam Ŝjangzi forlasis Rikiŝejon Harmonio, li ĉiam evitis iri al Ŝji'anmendaĝje. Dum la lastaj du tagoj, li konstante direktis sin al la orienta urbo por eviti embarason kaŭzitan de renkontiĝo kun siaj malnovaj kolegoj en la okcidenta urbo. Tamen hodiaŭ, redoninte sian rikiŝon, li intence preteriris antaŭ Rikiŝejo Harmonio kun la celo ĝin iom rigardi. La vortoj de Huniŭ ankoraŭ resonis en liaj oreloj, kaj li volis vidi, ĉu li havos la kuraĝon reiri tien, se ŝi paciĝos kun la maljunulo. La plej bona provo estas, antaŭ ĉio, ĉu li kuraĝos aŭ ne marŝi sur tiu ĉi strato.

Kun ĉapelo ŝovita malsupren li sendis sian singardan rigardon al Rikiŝejo Harmonio de kelka distanco, timante renkontiĝi kun iu konato. Kiam li vidis la lumantan lampon super la pordego, li eksentis ian strangan malĝojon. Li revolvis en sian memoron la tempon, kiam li unuafoje venis ĉi tien, la tenton de Huniŭ al li kaj la scenon en la nokto de la naskiĝfestoj.

Ĉio ĉi tio klare aperis en lia animo kvazaŭ bildoj, kaj kun tiuj ĉi bildoj estis intermiksitaj ankaŭ aliaj bildoj egale klaraj, sed mallonge-daŭrantaj: la Okcidentaj Montoj, la kameloj, la domo de s-ro Caŭ, la detektivo... Ĉio ĉi tio kombiniinta formis klaran, teruran tuton, tiel klaran, ke li eĉ havis la impreson, ke li forgesis sian rolon en ĉio ĉi tio kaj estas rigardanta efektivaĵajn bildojn.

Kiam li ekkonsciis siajn rilatojn kun ili, liaj pensoj tuj konfuziĝis kaj li ricevis kapturnon. Nebulkapa, li ankoraŭfoje demandis sin, kial li devis suferi tiom da maljustaĵoj kaj turmentoj. Tiuj ĉi scenoj ŝajnis okupi tempon jen tre longan, jen tre mallongan, tiel ke li ne povis scii, kian aĝon li nun havas. Li sentis nur, ke li multege pliaĝiĝis de tiam, kiam li unuafoje venis al tiu ĉi rikiŝejo. Tiam lia koro estis plena de espero, sed nun li estas turmentata de maltrankvilo kaj ĉagreno. Li ne scias la kialon, tamen tiuj ĉi bildoj ja estas veraj.

Proksimiĝinte al la rikiŝejo, li haltis sur la kontraŭa flanko de la strato kaj fikse rigardis la tre brilajn elektran lampon super la pordego. Subite li ekrimarkis ion. La oraj ideografiaĵoj “Harmonio” sub la lampo jam ŝanĝiĝis! Kvankam nelegoscia, li tamen tre bone memoris, kiel aspektis la ideografiaĵoj – la strangaj sed simplaj ideografiaĵoj 人和. Laŭ la sono li konjektis, ke ili signifas “Harmonio”. Nun ili jam ŝanĝiĝis en strangajn ideografiaĵojn 仁和. Kial do? La du ĉambroj ambaŭflanke de la pordego – ĉambroj, kiujn li neniam forgesos – ambaŭ dronis en mallumo.

Nur kiam lia pacienco estis elĉerpita pro longa starado tie, li komencis iri hejmen, meditante kun klinita kapo. Ĉu eble Rikiŝejo Harmonio jam transiris en la manojn de iu alia? Li devas malkovri la veran staton, sed estas ne necese nun diri ion ajn al la edzino. Kiam li atingis la hejmon, Huniŭ estis manganta lemonsemojn por si distri.

“Denove tiel malfrue!” ŝi kolere agordis la vizaĝon. “Mi diras al vi: se estos plu tiel, mi ne povos tion toleri. Vi estas for el la hejmo tuttage, dume mi ne kuraĝas eĉ movi min el tiu ĉi korto plena de fimalriĉuloj, timante perdi ion ajn. Al neniu mi povas paroli la tutan tagon! Ne, tion mi ne plu toleros, mi ja ne estas el ligno. Penu trovi por mi ian elirejon, terure mi enuas!”

Ŝjangzi diris nenion.

“Ekparulu! Intence vi kolerigas min, ĉu ne? Kiel do estas via buŝo?” ŝiaj vortoj elbuŝiĝis pli kaj pli rapide kaj sonis pli kaj pli laŭte, kiel sinsekvo da krakantaj petardoj.

Kaj Ŝjangzi ankoraŭ diris nenion.

“Nu, jen kion mi proponas.” Ŝi vere malpacientiĝis, sed, ĉar ŝi ne sciis kiel helpi al si kontraŭ li, ŝi ekhavis urĝeman kaj senpovan mienon, kun esprimo nek ĝoja, nek malĝoja. “Ni aĉetu du rikiŝojn kaj luigu ilin, kaj vi restu hejme kaj vivu el la rikiŝa lupago. Ĉu bone?”

“Du rikiŝoj kune enspezigus nur tri ĝjaŭojn ĉiutage, ne sufiĉe por nia vivteno. Ni do luigos unu kaj mi tiros la alian. Tio ŝajnas pli-malpli bone.” Ŝjangzi parolis tre malrapide, sed naturtone. Paroli pri rikiŝo-aĉeto igis lin

forgesu ĉion alian.

“Sed tio estus la sama afero! Tiam vi same forestus el la hejmo la tutan tagon!”

“Aŭ aranĝu la aferon jene maniere.” Parolante pri rikiŝoj, Ŝjangzi kvazaŭ pleniĝis de ideoj. “Luigu unu por la tuta tago. La alian mi tiros dum duontago kaj luigos por la cetera tempoparto. Se mi tiros ĝin je la matena skipo, mi eliros frue en la mateno kaj revenos je la tria horo posttagmeze. Por la vespera skipo, mi forlasos la hejmon je la tria kaj revenos en la nokto. Laŭ mi tio estos tre bona solvo.”

Huniŭ balancis la kapon. “Lasu min iom pripensi. Se ni ne elpensos pli bonan, do estu tiel.”

Ŝjangzi tre ĝojiĝis. Se tio efektiviĝos, li povas denove tiri sian propran rikiŝon. Kvankam ĝi estos aĉetita de lia edzino, tamen dank’ al impostioma ŝparo li povos aĉeti al si ankoraŭ unu. Nur nun li eksentis, ke en Huniŭ troviĝas ankaŭ io bona, kaj li ekridetis al ŝi. Tio estis simplanima, elkora rideto, kvazaŭ ĉiuj antaŭaj suferoj estus tute forgesitaj, kaj tiumomente la mondo kvazaŭ subite ŝanĝiĝis – tiel facile kaj tiel ĝojige, kiel oni ŝanĝas sian veston por nova.

Notoj:

1. Lanterna Festo: La 15-a de la unua monato lunkalendara. En tiu vespero oni lumigas multe da diversformaj lanternoj sur stratoj por ke ĉiuj ĝuu. Oni kutimas ankaŭ manĝi jŭanŝjaŭojn.

XVII

Ŝjangzi iom post iom malkovris, kio okazis al Rikiŝejo Harmonio. Kvara Sinjoro Liŭ jam forvenis iujn el siaj rikiŝoj, kaj la ceterajn li cedis al alia fame konata rikiŝoposedanto en la okcidenta urboparo. Ŝjangzi konjetis, ke en sia alta aĝo la maljunulo trovis la negocadon tro peza por si sen la helpo de sia filino, kaj decidis forcedi la rikiŝejon. Kun la mono li foriris ien por ĝui la vivon, sed kien, Ŝjangzi ne povis eltrovi.

Li ne sciis, ĉu li devas ĝoji aŭ ne pro tiu ĉi novaĵo. Nun kiam la patro de Huniŭ jam forlasis ŝin, ŝia plano vaniĝis, kaj tial li povas konservi sian peronan dignon kaj vivi honestan vivon sin apogante sur neniuj alia. Aliflanke, estas tre domaĝe pri la posedaĵo de Kvara Sinjoro Liŭ. Neniu scias, kiel li fordibočas sian monon, Ŝjangzi kaj Huniŭ ja tuŝis neniun kupran moneron el ĝi.

Kaj tamen, kio okazis jam okazis; li ne dediĉis al tio multe da pensoj, por ne paroli pri kordoloro pro tio. Li pensis, ke liaj muskoloj estas al lia dispono kaj, se nur li volas labori, nutraĵo ne mankos al li. Li do diris la novaĵon al Huniŭ senemocie kaj simple.

Sed ŝi ja terure ekscitiĝis, ĉar ŝi tuj ekkomprenis, kion tio signifas – ŝi estas perdita! Ĉio estas perdita! Dum sia tuta vivo ŝi estos nur edzino de rikiŝisto! Neniam ŝi povos eskapi el tiu ĉi granda miksa korto! Antaŭe ŝi pensis, ke sia patro eble refoje edziĝos, sed ŝi tute ne atendis, ke li povos forĵeti ŝin tiamaniere. Se li refoje edziĝos, pensis ŝi, ŝi batalos kontraŭ li por akiri parton el lia riĉaĵo kaj, se eble, ŝi interligiĝos kun sia duonpatrino por akiri iom pli da bono... Kaj rimedojn ŝi povos trovi, se nur la maljunulo plu tenos la rikiŝejon. Estas nekredeble, ke li faris tiel firman kaj malican decidon ŝanĝi la posedaĵon en kontantan monon kaj poste kaŝiĝi. Antaŭe, kiam ŝi kverelis kun li, ŝi pensis, ke baldaŭ ŝi povos repaciĝi kun li, ĉar ŝi opiniis, ke ŝi estas nemankigebla por la rikiŝejo. Kaj tamen, kontraŭ ĉia atendo, la maljunulo jam definitive fermis la rikiŝejon!

La printempo jam komencis pulsi en la naturo. La burĝonoj sur la arboj jam ŝveliĝis en roza koloro. Sed en tiu ĉi granda korto estis neniuj arbo, nek floro. Unue la printempa vento desegnis multajn punktojn sur la glacio en la korto, elblovante odoraĉon el la malpura tero kaj kirkle pelis la diversajn forĵetaĵojn en murangulojn. Al la homoj ĉi-tieaj ĉiu sezono alportis ĉagrenojn. Nur nun la maljunuloj kuraĝis eliri por ĝui la sunan kareson; nur nun la junaj knabinoj forviŝis iom el la fulgo de sur sia nazo kaj tiel malkovriĝis iom da

ruĝflava haŭto; nur nun la virinoj kuraĝis lasi la infanojn ludi en la korto per kajtoj faritaj el ŝirita papero, kun siaj malpuraj manoj liberaj de frostfendetoj. Sed la kaĉodona stacio jam fermiĝis, oni ne plu vendis grenon je kredito, kaj la filantropoj ĉesis doni almozojn, kvazaŭ ili ĉiuj jam lasus la malriĉulojn al la printempa vento kaj la suno!

Nun la juna tritiko estis ankoraŭ verda kiel herbo, la grenprovizo jam estis en nesufiĉeco kaj kiel kutime la prezoj de grenoj altiĝis. Ĉar la tago pli longiĝis, eĉ la maljunuloj ne povis frue enlitiĝi por trompi sian malplenan stomakon per sonĝoj. La reveno de la printempo nur plimultigis la malfacilaĵojn en tiu ĉi korto. La pedikoj, kiuj travivis la vintron, estis tiel aŭdacaj, ke iafoje ili eĉ rampis el la vatitaj vestoj de la infanoj kaj maljunuloj por ĝui la printempan sunon.

Huniŭ rigardis la glacieron degelantan en la korto, vidis la ĉifonajn vestojn, floris la mikksajn varmetajn odoraĉojn, aŭdis la veojn de la maljunuloj kaj la plorojn de la infanoj, kaj la koro al ŝi premiĝis. En la vintro ĉiu kaŝis sin dome, la malpuraĵoj englaciĝis; sed nun oni eliris el la domoj kaj aĵoj montris sian originan formon; eĉ de la muroj el rompitaĵoj defalis la tero, kvazaŭ la muroj atendus disfalon en la unua pluva tago. La korto, kiu estis plenplena de la mikskoloraj floroj de mizero, aspektis pluroble pli malbela ol en la vintro. Fi! Nur nun ŝi ekkonsciis, ke ĝuste ĉi tie ŝi devas ĉiam vivi dum sia resta vivdaŭro. Ŝia kelka sumo da mono estas baldaŭ elĉerpiĝonta kaj Ŝjangzi estas nenio alia ol rikiŝotiristo!

Restiginte Ŝjangzi hejme por gardi la domon, ŝi vizitis sian onklinon loĝantan en Nanjŭan, por informiĝi pri sia patro. La onklino diris, ke la maljunulo ja vizitis ŝin ĉirkaŭ la dekdua de la unua monato. Li venis por esprimi al ŝi sian dankon kaj diris al ŝi, ke li intencas vojaĝi al Tjanĝin aŭ Ŝanhajo por turisma celo. Se li neniam forveturas el Pekino aliloken en sia vivo, li diris, li ne povas esti kalkulata kiel vera viro. Dum li havas ankoraŭ spiron en si, li devas fari turisman vojaĝon al diversaj lokoj. Cetere, li ja hontas plu resti en la urbo, ĉar lia filino jam perdigis al li la vizaĝon. Tio estis ĉio, kion la onklino povis diri, kaj ŝia konkludo estis eĉ pli simpla: eble li efektive forlasis la rubon, eble tio estis nur mensogo kaj nun li kaŝas sin ie en la urbo – kaj kie, neniu scias!

Reveninte hejmen, ŝi ĵetis sin sur la brikliton kaj ploris fortan ploron – sen ia ajn hipokriteco aŭ trompemo. Ŝi plorsi ĝis ŝiaj okuloj ŝvelis.

Ĉesinte plori, ŝi viŝis al si la larmojn kaj diris al Ŝjangzi: “Nu, brava

obstinulo, ĉio estu laŭ via volo! Mi faris la eraran veton. Nun mi alkroĉiĝas al vi, kaj mi havas nenion pli por diri. Jen cent jŭanoj, iru aĉeti al vi rikiŝon!”

Fakte ŝi ankoraŭ sekrete retenis kelkan sumon ĉe si. Ŝia origina plano estis aĉeti du rikiŝojn, unu al Ŝjangzi por tirado, la alia por luigo. Sed ŝi ŝanĝis sian decidon. Ŝi aĉetis nur unu al Ŝjangzi por tiri kaj retenis ĉe si la restan sumon. Havante monon en sia mano, ŝi konservis sian povo super li. Ŝi ne volis elspezi la tutan sumon pro timo, ke li forlasos ŝin post la aĉeto de la rikiŝoj. Cetere, la tiamaniera foriro de la maljunulo sentigis al ŝi, ke neniu estas fidinda. Kiu povus scii, kion alportos la morgaŭa tago. Estas preferinde, ke ŝi ĝuu la vivplezuron dum ŝi povas, kaj pro tio ŝi bezonas monon por aĉeti ĉion, kion ŝi deziras, precipe frandaĵojn kiujn ŝi manĝas inter la regulaj manĝoj. Ili povas vivi el la laborenspezoj de Ŝjangzi – li ja estas unuaranga rikiŝisto – kaj kun ŝia sumeto da mono kiel aldona poŝmono ili povas vivi sufiĉe bone dum kelka tempo. Mono ne daŭras por ĉiam, nek la homo estas nemorta! Edziniĝi al rikiŝisto – krom tio ŝi havas nenian alternativon – ja estas por ŝi humiliĝo, kaj ŝi ne povas plijunuligi sin petante de li monon ĉiutage. Tiu ĉi decido iom ĝojigis ŝin, ĉar, kvankam ŝi sciis, ke la estonteco estos malhela, tamen almenaŭ portempe ŝi povas teni rekte sian kapon. Tio estas kiel vojirado ĉe sunsubiro: la malproksima ĉielo jam malheliĝis, tamen estas ankoraŭ lumo sufiĉa al ŝi por fari kelkajn pluajn paŝojn.

Ŝjangzi ne disputis kun ŝi. li kontentiĝis per aĉeto de propra rikiŝo, per kiu ĉiun tagon li povs perlabori ses aŭ sep ĝjaŭojn – enspezo sufiĉa por ilia vivteno, kaj pro tio li eĉ iom ĝojigis. Ĉiuj suferoj, kiujn li elportis en la pasinteco, ja estis ekskluzive por aĉeti rikiŝon. Nun kiam li jam povas denove aĉeti rikiŝon, kion alian do li povus deziri? Kompreneble, vivteni du personojn per unu rikiŝo signifas neniom da mono restanta, kaj kiam la rikiŝo eluziĝos, ili havos neniom da ŝparaĵo por aĉeti novan. Tio estas afero riska. Sed kial direkti la pensojn al tiom malproksima estonteco? Aĉeti rikiŝon vere estas sufiĉe malfacile, do li nun devas esti kontenta.

Ĝuste tiam unu el iliaj najbaroj, Erĉjangzi, volis forvendi sian rikiŝon. En la pasinta somero li vendis sian deknauĵaran filinon Ŝjaŭfuzi (Eta Feliĉo) al iu oficiro por du cent jŭanoj. Dum kelka tempo li sin montris riĉa kaj reaĉetis ĉion, kion li lombardis, kaj farigis kelkajn novajn vestojn, tiel ke la tuta familio vestiĝis sufiĉe bone. Lia edzino estis la plej malalta virino en la korto, kaj ankaŭ la plej malbela kun konvekso frunto, altaj vangostoj, kalva kapo, lentugoplana vizaĝo kaj elstarantaj dentoj; vidante ŝin, oni sentis naŭzon. Kvankam ŝiaj okuloj estis ruĝaj de plorado pro ŝia filino, tamen ankaŭ ŝi portis

sian novan bluan robon.

Li havis eksplodeman temperamenton. Vendinte sian filinon, li ofte iris drinki; kaj post drinkado, kun larmoj en la okuloj, li estis aparte koleriĝema kaj kverelema. Kaj tial, por lia edzino, nova vesto kaj sufiĉe bonaj manĝaĵoj tute ne estis kompenso, ĉar ŝi ricevis pli multajn batojn ol iam ajn antaŭe. Erĉjangzi, kiu estis pli-ol-kvardekjara, decidis ne plu tiri rikiŝon. Li aĉetis paron da korboj kaj havigis al si portovekton, por kolporti melonojn, fruktojn, ternuksojn kaj cigardojn. Post du-monata kolportado li faris proksimuman kalkulon kaj trovis, ke li ne nur suferis perdon, sed eĉ perdis multon. Kutimante al rikiŝotirado, li ne sciis fari negocojn. Rikiŝotirado estis simpla afero porti aŭ ne porti klientojn, dum kolportado postulis artifiĉecon kaj li nje estis lerta en ĝi. Ĉiuj rikiŝistoj kutime faris aĉetojn je kredito, kaj li trovis nedeca rifuzi kredite vendi varojn al siaj malnovaj kamaradoj; sed estis ne facile repreni sian monon. Li ne povs trovi bonan aĉetantojn, kaj ĉiuj liaj klientoj ĉiel eviti pagi sian ŝuldon, kaj pro tio neeviteble li perdis monon. Tio afliktis lin tiom forte, ke li drinkis eĉ pli multe. Ebriiĝinte li ofte malpaciĝis kiun policanoj aŭ, reveninte hejmen, elverŝis sian koleron sur siajn edzinon kaj infanojn. Alkoholaĵo estis ĝuste la kaŭzo, ke li ofendis policanojn kaj batis sian edzinon. Malebriiĝinte li amare bedaŭris sian monon, kiun li akiris per vendo de sia filino, kaj ke ebriiĝinte li batis homojn, treege hontigis lin. En tiaj tempoj li do kuŝis en la lito tutan tagon, penante forgesi sian ĉagrenon en sonĝoj.

Li decidis ne plu fari kolportadon kaj reveni al la rikiŝotirado. Li ne povis tiel fordiboĉi sian monon. Do li aĉetis rikiŝon. Ebriiĝinte li agis tute malprudente; kiam li estis sobramensa, li amis alpreni gravan mienon kaj fari aferojn en granda maniero. Kun nova rikiŝo kaj en elegantaj vestoj, li rigardis sin kiel altklasa rikiŝisto, kiu devas trinki bonan teon kaj tiri elegantajn klientojn. Ĉe rikiŝoparkadejo, por paradi per siaj rikiŝo kaj blankaj vestoj. Li staradis babilante kun aliaj, sed neniam konkuris kun aliaj por akiri klienton. Li jen per sia nova blutola polvoforigilo frapetis la rikiŝon, jen piedbatis la teron per siaj novaj nigratolaj ŝuoj kun blankaj plandumoj, jen rigardis la pinton de sia nazo kaj staris tie kun rideto, atendante, ke iu venu kaj laŭdu lian rikiŝon, kaj poste komencis senfinan konversacion. Li povis tiel senfare pasigi unu aŭ du tutajn tagojn. Eĉ kiam li havis bonan klienton, liaj kruroj perfidis lian aspekton – li ne povis rapide kuri! – kaj tio treege deprimis lin. En sia afliktiĝo li nature ekpensis pri sia filino, kaj tiam restis al li nenio alia por fari, ol iri drinki. Tiamaniere li elspezis sian tutan monon kaj ĉio, kio restis al li, estis la rikiŝo.

Ĉirkaŭ la vintrokomenco li denove ebriiĝis. Tuj kiam li revenis hejmen, liaj filoj – unu estis dektrijara, la alia dekunuajara – tuj provis forkuri de li. Furioziĝinte li donis al ili po unu piedbaton. Kiam lia edzino diris ion, li alkuris al ŝi kaj piedbatis ŝin en la ventron. Longan tempon ŝi kuŝis sur la planko, tute ne kapabla paroli. Freneze la du knaboj ekprenis la pastoplatigan rulbastonon kaj la karboŝovelilon kaj atakis sian patron. En la miksbatalo la virino estis piedpremita ankoraŭ kelkajn fojojn. Najbaroj enkuris kaj perforte kuŝigis kaj senmovigis Erĉjangzi sur la briklito, dume la du knaboj ploris super sia patrino.

Ŝi revenis al la vivo, sed neniam plu povis stari surpiede. La trian de la dekdua monato lunkalendaro ŝi ĉesis spiri, ankoraŭ portante la bluan robon, aĉetitan per la mono, kiun ŝi ricevis por la vendo de sia filino. Ŝia gepatra familio, koleriĝinte, minacis akuzi Erĉjangzi ĉe la juĝejo kaj nur post interveno de amikoj la du partioj venis al kompromiso. Erĉjangzi promesis dece enterigi ŝin kaj doni al ŝiaj gepatroj dek kvin jŭanojn. Tial li lombardis sian rikiŝon por sesdek jŭanoj. Post la novjara tago li intencis forvendi ĝin, ĉar li ne havis la esperon ĝin reaĉeti. Foje en ebrio li ekpensis pri vendo de unu el siaj filoj, sed neniu volis aĉeti. Li eĉ iris al la edzo de sia filino Ŝjaŭfuzi, por peti helpon, sed tiu rifuzis rekonigi tian “bopatron” kaj, kompreneble, volis diri nenion al li.

Ŝjangzi sciis la historion de tiu ĉi rikiŝo kaj ne havis la inklinon ĝin aĉeti. Estas multaj rikiŝoj por vendo, kial elekti nepre tiun ĉi, kiu, aĉetita je la kosto de filino kaj lombardita pro la mortigo de edzino, ja havas malbenon sur si?

Huniŭ vidis tion ne tiamaniere. Ŝi pensis, ke ŝi povos aĉeti ĝin por nur iom pli ol okdek jŭanoj kaj tio estos bona negoco. Ĝi estas uzita nur ses monatojn kaj eĉ la pneŭmatikoj ankoraŭ ne ŝanĝis la koloron. Kaj plie, ĝi estas bona fabrikaĵo, vera produkto de la fabriko Deceng en la okcidenta urbo. Ĝi efektive estas malkara, ĉar eĉ duone nova rikiŝo kostus kvindek ĝis sesdek jŭanojn! Ŝi ja ne povas lasi tian negocon forgliti el ŝiaj manoj. Cetere, ŝi sciis ankaŭ, ke nun, kiam ĵus forpasis la Novjaro, mono estas nesufiĉa al ĉiu kaj Erĉjangzi ne povos altigi la prezon, ĉar li tiom urĝe bezonas kontanton. Ŝi persone iris pririgardi la rikiŝon, marĉandis kun Erĉjangzi kaj donis al li la monon. Ĉio, kion Ŝjangzi povis fari, estis atendi tiri la rikiŝon; li ne povis diri ion ajn kontraŭ tio, ĉar la mono ne estis lia.

Li detale ekzamenis la rikiŝon kaj konfesis, ke ĝi estas vere bona, fortika. Kaj tamen, malgraŭ tio, li sentis sin iom maltrankvila. Kio plej malplaĉis al li, estis la nigre farbita kaleŝaĵo kaj la blankaj ornamaĵoj el kupronikela alojo. Erĉjangzi siatempe opiniis eleganta la kombinon de la du koloroj, sed Ŝjangzi trovis ĝin malgajiga, tiel funebreca. Li intencis ŝanĝi la blankajn

metalornamaĵojn je bronzkoloraj aŭ laktokoloraj, por iom gajigi la kolortanon; sed li ne proponis tion ĉi al Huniŭ, ne volante aŭskulti ŝian malaprobbon. Kiam li tiris tiun ĉi rikiŝon eksteren, ĝi altiris ĉies atenton kaj iuj eĉ nomis ĝin “juna vidvino”. Tio ĉagrenis Ŝjangzi, kaj li penis ne pensi pri ĝi, sed ĝi, tuttage sekvante lin ĉie, nervozigis lin tiel, ke li ĉiam havis la antaŭsenton, ke plimalpli baldaŭ povos okazi io malbona. Iafoje la subita ekpenso pri la mizera sorto de Erĉjangzi naskis en li la senton, ke li kvazaŭ tiras ne rikiŝon, sed ĉerkon. Kaj de tempo al tempo ŝajnis al li, ke li eĉ vidas ombrojn de fantomoj ĉirkaŭ ĝi.

Kaj tamen okazis nenio malbona de kiam li komencis tiri tiun ĉi rikiŝon, kvankam timo ĉiam regis lian koron. La vetero fariĝis pli kaj pli varma. Demetinte la vatitajn vestojn oni jam preskaŭ ne bezonis substofitajn vestojn – sufiĉis sensubstofaj ĉemizo kaj pantalono, ĉar Bejping havas tiel malongan printempon. La tagoj estis tede kaj lacige longaj por ĉiu homo. Frumatene Ŝjangzi eliris kaj nur je la kvara aŭ kvina posttagmeze li jam sentis sin laca. Tamen la suno ankoraŭ staris alte sur la ĉielo. Li ne volis plu tiri, ne reveni hejmen. Li vagis kun sendecidaj paŝoj, de tempo al tempo farante longan oscedon.

Se Ŝjangzi sentis sin laca kaj tedita de la longaj tagoj, Huniŭ estis eĉ pli soleca en la hejmo. Vintre ŝi povis sidi sin varmigante apud la forno kaj aŭskultante la ventfajfadon kaj, kvankam tedita, ŝi tamen povis sin konsoli per la penso, ke estas pli bone resti hejme. Nun la forno estis translokita eksteren sub la tegmentorando, kaj estis nenio por fari endome. La korto estis malpurega kaj spiris odoraĉon, eĉ sen unu herbo kreskanta en ĝi. Ŝi ne konfidis siajn najbarojn, tiel ke, kiam ŝi eliris por aĉeti ion, ŝi devis tuj reveni rekte hejmen, ne kuraĝante pasumi eĉ unu momenton. Ŝi estis kvazaŭ abelo enfermita en ĉambro, vidanta la sunlumon eksteran, sed ne povanta elflugi por ĝin ĝui.

Ŝi havis nenion komunan kun la aliaj virinoj tieaj. Ĉiuj ties babiloj temis pri vivbagateloj de la najbaroj kaj elvokis nenan intereson ĉe ŝi, kiu kutimis al senbridaj, krudaj paroloj. Ilia malfeliĉo orginis el ilia mizera vivo, ĉiu malgranda afero povis ilin larmigi; la ŝia devenis de ŝia malkontento kontraŭ sia sorto kaj, havante nenion da larmoj por verŝi, ŝi preferus liberigi sin de sia ĉagreno per kverelo kun iu. Ĉar ili kaj ŝi ne povis sin reciproke kompreni, plej bone estis, ke ĉiu zorgu pri sia afero kaj ne parolu unu kun la alia.

Nur ĉirkaŭ la mezo de la kvara monato ŝi finfine povis trovi kunulinon. La filino de Erĉjangzi revenis. Ŝia “viro” estis oficiro, kiu starigis al si simplan hejmon kie ajn li restadis, elspezante nur cent aŭ ducent ĵuanojn por aĉeti junan knabinon, grandan littabulon kaj du seĝojn, kiuj ebligis al li plezure vivi

portempe. Kiam lia trupo transmoviĝis aliloken, li tuj foriris, lasante la knabinon kaj littabulon post si.

Tiu ĉi elspezo ja ne povis esti kalkulata kiel granda por unu aŭ du jaroj, ĉar dungi servistinojn por fari la lavadon, flikadon, kuiradon ktp eĉ kostus al li proksimume dek jŭanojn monate. “Edziĝi” al knabino signifis, ke li havas ne nur servistinojn, sed ankaŭ virinojn por kundormi, kaj li povis esti certa, ke ŝi havas nenian venerean malsanon. Se ŝi plaĉis al li, li aĉetis al ŝi robon el flordeseĝna ŝtofo, elspezante ĉirkaŭ unu jŭanon; se ne, li lasis ŝin resti hejme tute nuda kaj tiam ŝi estis senhelpa kontraŭ tio. Kiam li foriris aliloken kun la trupo, li postlasis la littabulon kaj seĝojn, tute ne domaĝante ilin, ĉar ŝi tiam devis trovi rimedojn por pagi la domlupagon de la lastaj du monatoj, kiun eble ne kovros la mono, ricevita por la vendo de la mebloj.

Ŝjaŭfuzi vendis la littabulon, pagis la domlupagon kaj revenis hejmen kun nenio alia krom la robo el flordeseĝna ŝtofo kaj paro da arĝentaj orelingoj.

Post kiam Erĉjangzi forvendis la rikiŝon kaj repagis la sumon, kontraŭ kiu li antaŭe lombardis ĝin, kune kun la interezo, al li restis nur ĉirkaŭ dudek jŭanoj. Ifoje li sentis, ke li, kiu perdis la edzinon en sia meza aĝo, estis tre kompatinda; kaj ĉar neniu alia montris kompaton al li, li do drinkis sola por ŝin konsoli. En tiaj tempoj li kvazaŭ havis malamon kontraŭ la mono kaj senbride elspezis ĝin. En aliaj tempoj li sentis, ke li devas perlabori kiel eble plej multe kaj bone prizorgi siajn filojn, por ke ili povu havi ian estontecon. Tiam li aĉetis grandan amason da manĝaĵoj por ili. Kun larmoj en la okuloj li rigardadis ilin lupe manĝegi kaj murmuradis al si: “Malfeliĉaj senpatrinaj infanoj! Mizersortaj infanoj! Via patro ŝvitas sangan ŝviton ja por vi! Mi ne estas patro malbona. Ne gravas, ĉu mi satiĝas aŭ ne; antaŭ ĉio vi devas havi sufiĉon por vin nutri. Manĝu! Nur ne forgesu min, kiam vi plenkreskos, kaj tio estas ĉio!” Ankaŭ en tiaj tempoj li elspezis multon, kaj tiel la dudek jŭanoj iom post iom elĉerpiĝis.

Kiam li estis senmona, precipe post kiam li drinkis kaj malbonhumoriĝis, li malzorgis la knabojn eĉ dum pluraj tagoj. Tiam ili estis devigitaj iel perlabori kelkajn kuprajn monerojn por plenigi sian stomakon. Ili laboris kiel servoknaboj ĉe geedziĝaj kaj funebraj solenoj, vendis eluzitajn metal- kaj paperpecojn, kolektitajn el rubĉaroj kaj ifoje perlaboris sufiĉe da mono por aĉeti kelkajn platkukojn, ifoje nur unu ĝinon da malgrandaj batatoj, kiujn ili englutis kun iliaj ŝelo kaj radikoj. Ifoje, havante nur unu kupran moneron inter si, ili povis aĉeti nenion alian ol kelkajn ternuksojn aŭ rostitajn fazeolojn, kiuj, kvankam ne satigaj, tamen povis esti maĉatataj pli longe.

Kiam Ŝjaŭfuzi revenis, ili ĉirkaŭprenis po unu el ŝiaj kruroj kaj nur ridetis

al ŝi senparole, larme. La patrino jam mortis, la pliaĝa fratino nun devis ilin patrini!

Erĉjangzi montris sin indiferenta pri la reveno de sia filino. Tio signifis ankoraŭ unu buŝon atendantan manĝi. Sed, vidante la ĝojon de siaj filoj, li cedis, pensante, ke lia familio ja bezonas virinon por fari kuiradon kaj lavadon. Li do decidis lasi la aferon iri libere sian vojon.

Ŝjaŭfuzi estis ne malbela. Kvankam antaŭe ŝi estis malgrasa kaj malaltkreska, sed dum ŝi vivis kun la oficiro, ŝi fariĝis pli peza kaj eĉ kreskis iom pli alten. Ŝi ne havis aparte okulfrapajn belaĵojn, sed ŝiaj ronda vizaĝo kaj regulformaj brovoj kaj okuloj donis al ŝi sanecan aspekton. Ŝi havis mallongan supren lipon, kiu, antaŭ ol ŝi ekridetis aŭ kolergrimacis, ĉiam unue leviĝis, tiel ke montriĝis ŝiaj blankaj dentoj. Tiuj ĉi dentoj aparte plaĉis al la oficiro. Kiam ili montriĝis, ŝia iom stulta, senhelpa mieno donis al ŝi infanecan, iom amindan aspekton. Kiel ĉiuj aliaj beletaj knabinoj el malriĉaj familioj, per tia aspekto ŝi similis al floro, kiu, ekhavinte ian ajn koloron aŭ aromon, estis tuj deŝirita kaj sendita al la bazar.

Generale Huniŭ ne volis paroli kun siaj najbaroj, sed ŝi rigardis Ŝjaŭfuzi kiel sian amikino. Unue, Ŝjaŭfuzi estis beleta; due, ŝi havis tiun robon el importita flordeseĝna ŝtofo; trie, edziniĝinte al oficiro, ŝi vidis multon de la mondo kaj sekve meritis fariĝi ŝia amikino. Virinoj ne estas amikiĝemaj unu kun alia, sed, unu fojon decidinte interamikiĝi, ili baldaŭ intimiĝis unu al la alia; en kelkaj tagoj Huniŭ kaj Ŝjaŭfuzi jam fariĝis proksimaj amikinoj.

Huniŭ amis de tempo al tempo manĝeti ion frandan, kaj ĉiufoje, kiam ŝi havis akvomelonajn semojn aŭ ion alia por manĝeti, ŝi vokis Ŝjaŭfuzi al si. Dum ili kune manĝetis, ili babilis kaj ridis. Kun gajaj ridoj Ŝjaŭfuzi montris siajn blankajn dentojn en tiu sia simpla maniero kaj rakontis al Huniŭ diversajn aferojn, kiajn ŝi neniam antaŭe aŭdis. Kvankam ĉe la oficiro Ŝjaŭfuzi vivis ne en lukso, tamen kiam li estis en bona humoro, li ankaŭ iris kun ŝi al restoracio aŭ teatro, kaj tial ŝi havis multon por rakonti, kio vekis envion kaj admiron en Huniŭ.

Estis ankoraŭ multaj aliaj aferoj, pri kiuj Ŝjaŭfuzi hontis paroli, ĉar por ŝi ili estis korpaj suferoj; sed por Huniŭ aŭdi ilin estis plezuro. Kaj kiam Huniŭ insiste petegis ŝin rakonti, ŝi embarasiĝis kaj tamen ne povis rifuzi. Huniŭ rigardis ŝin kiel la plej amindan kaj enviidan el ĉiuj virinoj. Aŭdinte tiujn ĉi rakontojn, Huniŭ ekpensis pri si – sia aspekto, sia aĝo kaj sia edzo – kaj sentis, ke ŝia tuta vivo estis pasigita en maljusteco. Ŝi ne havis junecon en la vera senco de la vorto, nun nek estontecon; kaj plie, Ŝjangzi estas tiom obstina kiel

mulo. Ju pli ŝi malkontentiĝis pri li, des pli enviinda por ŝi fariĝis Ŝjaŭfuzi. Kvankam la knabino estis tiom mizera kaj kompatinda, tamen Huniŭ opiniis, ke ŝi, kiu jam ĝuis la plezuron de la vivo kaj multe vidis la mondon, devas havi nenian bedaŭron, eĉ se ŝi mortus jam nun. En la okulo de Huniŭ, Ŝjaŭfuzi simbolas la plej bonan, kion la virino devus esperi de la vivo.

Ŝajnis, ke Huniŭ ne rimarkas la malfacilaĵojn kaj mizeron de Ŝjaŭfuzi. Ŝi revenis kun malplenaj manoj, tamen ŝi devis provizi siajn du fratojn je porvivaĵo, ĉar ŝia patro estis nekapabla tion fari. Kie ŝi povis akiri la monon por ilin nutri?

Kiam Erĉjangzi ebriiĝis, ideo venis al li en la kapon. “Se vi vere kompatas viajn fratojn, vi devas trovi ian rimedon ilin nutri. Kaj mi, se mi estas ŝarĝobroto laboranta la tutan tagon, mi devas la unua satmanĝi! Ĉu vi opinias, ke mi povas kuradi kun malplena stomako? Mi supozas, ke vi trovos amuzan tion, ke mi falis morta sur la strato! Vi restadis senfare, dum vi havas ion pretan por vendi. Kion vi atendas, he?” Ŝjaŭfuzi direktis la rigardon al sia ebriiĝinta patro, al siaj skeletaj fratoj malsataj kaj poste al si mem. Ŝi povis nur plori. Sed larmoj ne povis kortuŝi sian patron, nek nutri ŝiajn fratojn, ŝi devis fari ion pli praktikan. Por nutri la knabojn ŝi devis vendi sian propran karnon. Ĉirkaŭpremante la plej junan, ŝi verŝis larmojn sur liajn harojn, dume li diris: “franjo, mi estas malsata!” Ho franjo! Franjo ja estas peco da karno, destinita esti nutraĵo por ŝiaj fratoj. Huniŭ, anstataŭ ŝin konsoli, proponis al ŝi prunton, por ke ŝi povu iom sin ornami, kondiĉe ke ĝi estu repagita tiam, kiam ŝi ricevos enspezojn. La ĉambro de Ŝjaŭfuzi estis tro malpura, do Huniŭ konsentis ankaŭ liveri al ŝi unu el siaj ĉambroj, kiuj ja estis en pli-malpli bona ordo. Huniŭ havis du ĉambrojn, tiel ke estis sufiĉe da spaco por ili ambaŭ. Ĉar Ŝjangzi tuttage forestis el la hejmo, ŝi povis senskrupule helpi sian amikinojn kaj samtempe sciigi pli multe pri tio, kion ŝi antaŭe ne havis okazon sperti kaj nun, kvankam tre dezirante, ne povas mem fari. Ŝi metis unu kondiĉon: Ŝjaŭfuzi devas pagi po du ĝjaŭojn ĉiufoje, kiam ŝi uzas la ĉambron. Amikeco aparte, afero aparte. Pro Ŝjaŭfuzi ŝi devas purigi la ĉambrojn, kio signifas ne nur laboron, sed ankaŭ elspezojn. Ĉu balailo kaj polvoŝovelilo ne kostas monon? Du ĝjaŭoj estas prezo modera, kaj ŝi donas al ŝi tiun ĉi favoron nur tial, ke ili estas amikinoj.

La lipoj de Ŝjaŭfuzi ekdisiĝis kaj montriĝis ŝiaj dentoj, dume ŝi englutis siajn larmojn.

Ŝjangzi sciis nenion pri tio, sed liaj noktoj estis ree maltrankviligitaj. Ĉar Huniŭ jam komencis “helpi” Ŝjaŭfuzi, kaj volis ankaŭ reakiri sian perditan junecon per li.

Notoj:

1. Vd. noton 6 de ĉapitro I.
2. vintro-komenco: unu el la 24 sunperiodoj, en la 7-a aŭ 8-a denovembro. La tuta jaro estis dividita en 24 sunperiodojn, kiuj montras la ŝanĝiĝojn de klimato kaj utilas al la agrikultura produktado.

XVIII

Estis jam la sesa monato. La granda korto estis plene silenta dum la tago. Tre frue la infanoj eliris kun siaj difektitaj korboj por kolekti ĉifonojn. Je la naŭa horo la brula suno jam preskaŭ rostfendigis iliajn malgrasajn dorsojn, tiel ke ili devis reveni hejmen kun siaj trovaĵoj kaj manĝis kion iliaj gepatroj povis al ili doni. Poste la pli aĝaj, se ili povis kune havigi al si kelkajn kuprajn monerojn da kapitalo, aĉetis aŭ ŝteletis kelkajn glacipecojn el la glaciaĵoj kaj ilin revendis. Se ili ne havis eĉ tiom malmulte da kapitalo, ili iris en grupoj al la ĉirkaŭurba rivero por sin bani. Dum la vojo ili ŝteletis, se eble, kelkajn karbopecojn el la fervoja stacio aŭ kaptis libelojn kaj cikadojn por vendi al infanoj el riĉaj familioj. La pli junaj, kiuj ne kuraĝis vagi malproksimen, restis en la ombro de la arboj ekster la korto, ludante kun la vermoj, kiujn ili trovis sur la soforarboj, aŭ elfosante iliajn pupojn. Kun la infanoj for el la hejmo kaj la viroj ĉe la laboro, la virinoj restis endome nudaj ĝis la talio. Neniu paŝis eksteren, – ne pro hontemo, sed pro tio, ke la tero de la korto estis jam snubakita, tro varmega por iliaj nudaj piedoj.

Ĉe la sunsubiro viroj kaj infanoj revenis hejmen unu post alia. Tiam fariĝi iom da malvarmeta venteto en la korto ombrata de la muroj, dum endome la varmo de la tago estis enfermita kvazaŭ en vaporumilo. Oni ĉiuj sidis ekstere atendente, ke la virinoj finpretigu la vespermanĝon. La korto estis plena de bruo kaj ekscitiĝo kiel bazaro sen varoj. Suferinte de la varmego la tutan tagon kaj premate de malsato, ĉiuj estis en la kolerema humoro. Nur pro unu vorto nekonvena la viroj eĉ batis siajn infanojn aŭ sian edzinon, aŭ elverŝis sian koleron sur ilin per furiozaj blasfemoj. Tia bruado daŭris ĝis post la vespermanĝo. Iuj el la pli junaj infanoj endormiĝis en la korto, aliaj ludis sur la strato. Kun stomakoj plenigitaj la plenaĝuloj ricevis pli –malpli mildan humoron kaj la societemaj grupiĝis tri- kaj kvarope por babili pri la tagaj suferoj. Pro la noktiĝo tiuj, kiuj perlaboris ne sufiĉe por la vespermanĝo, jam ne povis lombardi, nek vendi ion, eĉ se ili havis ankoraŭ ion por tio. La viro kutime ĵetis sin sur la briklikton kaj kuŝi sur ĝi malgraŭ la varmo en la ĉambro. Iafoje li malgaje silentis, alifoje li laŭte blasfemis. Kun larmoj en la okuloj, la edzino iris peti prunton ĉe najbaroj kaj nur post sufero de multj rifuzoj povis ricevi ĉifitan du ĝjaŭan monbiletan. Kun tiu ĉi trezoro en la mano ŝi iris aĉeti iom da maizfaruno por kuiri kaldronon da kaĉo por la familio.

Huniŭ kaj Ŝjaŭfuzi ne apartenis al la rondo de tiuj personoj. Huniŭ

gravediĝis – ĉi-foje tio estis efektiva. Ŝjangzi eliris tre frue ĉiun tagon, dum ŝi kuŝis en la lito ĝis la oka aŭ naŭa horo, havante la tradician eraran ideon, ke graveda virino devas moviĝi kiel eble plej malmulte. Krom tio, ŝi povis kuŝi komforte tiom longe kiel al ŝi plaĉis. Vespere ŝi portis benketon al venta loko ekster la korto kaj sidis tie ĝis ĉiuj aliaj iris enlitiĝi, ĉar ŝi pensis, ke ne estas inde paroli kun ili.

Ankaŭ Ŝjaŭfuzi leviĝis malfrue, sed pro alia kialo. Ŝi timis, ke la viroj en la korto strabus al ŝi, kaj tial ŝi ne kuraĝis eliri, ĝis ili foriris. Dum la tago ŝi aŭ iris vidi Huniŭ aŭ promenis ekstere por sin reklami. Vespere, por eviti la atenton de la najbaroj, ŝi denove vagis sur stratoj kaj enŝteliĝis hejmen nur kiam ŝi supozis, ke ĉiuj jam enlitiĝis.

Inter la viroj, Ŝjangzi kaj Erĉjangzi estis esceptoj. Ŝjangzi timis enveni en tiun ĉi korton, kaj eĉ pli en siajn ĉambrojn. La senĉesaj babiloj ekscitis liajn nervojn kaj li volis trovi kvietan lokon, kie li povis sola sidi. Hejme, Huniŭ fariĝis pli kaj pli tia kia tigrino. En la malgrandaj ĉambroj estis varmege kaj sufoke, kaj kun tiu tigrino tie li trovis la aeron eĉ pli premanta. Antaŭe, li devis reveni hejmen frue por eviti, ke Huniŭ kverelu kun li. Nun kun Ŝjaŭfuzi kiel sia kunulino, ŝi ne plu tiel turmentis lin kaj li revenis hejmen pli malfrue.

Koncerne Erĉjangzi, li apenaŭ sin montris lastatempe. Sciante pri la negoco de sia filino, li hontis vidi la najbarojn. Tamen li, nekapabla vivteni siajn infanojn, ne povis ŝin haltigi. Tial li tenis sin malproksime de sia hejmo, ĉar “for de la okuloj estas for de la menso”. Iafoje li malamamis sian filinon. Se ŝi estus viro, ŝi certe ne farus tian hontindaĵon. Kial ŝi devis naskiĝi en lian familion? Aliffoje li kompatis ŝin, ĉar ŝi vendis sian korpon por nutri siajn fratojn. Ĉu li ŝin malamamis, ĉu kompatis, li povis fari nenion. Kaj kiam li drinkis kaj fariĝis senmona, li ne malkamis, nek kompatis ŝin, sed revenis hejmen por postuli de ŝi monon. En tiaj tempoj li vidis en ŝi nur mon-gajnilon, ĉar li, ŝia patro, ja havas ĉiujn rajtojn postuli iom el ŝia mono. Tiam li ankaŭ penis konservi sian dignon: ĉiuj malestimas Ŝjaŭfuzi, nu, ankaŭ li ne indulgu ŝin! Dum li eldeviĝis monon el ŝi, li eĉ laŭte insultis ŝin, kvazaŭ por diri al aliaj, ke li ne kulpas pri tio, dum ŝi estas denaske senhonta.

Kiam li kriegis kontraŭ Ŝjaŭfuzi, ŝi diris neniun vorton. Tiam Huniŭ, duone riproĉante, duone konsolante persvadis lin foriri. Kompreneble, li foriris ĉiam kun kelkaj kupraj moneroj, per kiuj li povis daŭrigi la drinkadon, ĉar se li ĉesus esti ebria kaj vidus ilin, li prefere sin dronigus en rivero aŭ sin pendumus.

La dekkvina de la sesa monato estis varmega tago. Tuj kiam la suno leviĝis, la tero kvazaŭ ekbrulis. Amaso da grizaĵo, nubeca aŭ nebuleca, malalte

pendis en la ĉielo kaj la atmosfero estis sufoka. Neniu venteto moviĝis. Ŝjangzi ekrigardis la grizruĝan ĉielon kaj decidis eliri post la kvara horo posttagmeze, por tiri la rikiŝon je la nokta skipo. Se li perlaboros nesufiĉe, li povos daŭrigi la tiradon ĝis la mateniĝo, ĉar la nokto certe estos pli elportebla ol la tago.

Huniŭ urĝis lin tuj eliri, ne volante, ke li restu hejme, ĉar Ŝjaŭfuzi povos venigi eventualan klienton. “Ĉu vi opinias, ke resti hejme estas komforte? Ĉirkaŭ la tagmezo eĉ la muroj estas varmegaj!”

Li diris nenion, trinkis kuleregon da malvarma akvo kaj eliris.

La salikoj, kiuj borderis la stratojn, kvazaŭ malsaniĝis kun volvitaj folioj polvokovritaj kaj kun senmovaj branĉoj inerte pendantaj malsupren. La stratpavimo estis sekega kaj blanke brilis. Polvo leviĝis de sur la piediraj vojetoj kaj kuniĝis kun la grizaĵo sur la ĉielo, formante venenan sablovualon, kiu brogis la vizaĝon de la pasantoj. Ĉie estis sekeco kaj prema varmego, kvazaŭ la antikva urbo estus brikbakujo forte hejtita. Hundoj surventre kuŝis sur la tero, kun pendanta ruĝa lango; la naztruoj de muloj kaj ĉevaloj disstreĉiĝis kiel eble plej larĝe; la kolportistoj ne kuraĝis prikrii siajn varojn; la asfalta pavimo moliĝis; eĉ la latunaj butikaj ŝildoj ŝajnis esti fandiĝontaj.

La stratoj estis aparte kvietaj, kun nur monotona, enuigaj tintadoj el forĝejo. La rikiŝistoj estis tiel malviglaj, ke ili eĉ ne volis proponi sin al klientoj, kvankam ili sciis, ke ne laborante ili akiros neniom da mono por siaj morgaŭaj manĝoj. Iuj parkis sian rikiŝon en ombra loko, starigis kapuĉon kaj dormetis sur la sidloko. Aliaj estis trinkantaj en malgrandaj tetrinkejoj; ankoraŭ aliaj elvenis sur la stratojn sen sia rikiŝo, nur por vidi, ĉu la vetero permesas aŭ ne la rikiŝotiradon. Tiuj, kiuj estis portantaj pasaĝeron, eĉ la plej fortikaj junuloj inter ili, volonte suferis la vizaĝoperdon kaj preferis malrapide paŝi kun klinita kapo anstataŭ kuradi. Ĉiu akvoputo estis por ili vivsavanto. Eĉ post kelkaj paŝoj, ekvidinte puton, ili tuj kuregis al ĝi kaj, se tie ne estis sitelo kun freŝe ĉerpita akvo, ili soife trinkegis el la trogo kune kun la muloj kaj ĉevaloj. Aliaj, trafitaj de sunfrapo aŭ de koliko, subite falis teren kun la kapo antaŭen kaj neniam releviĝis.

Eĉ Ŝjangzi iom timiĝis. Post kelkaj paŝoj kun sia malplena rikiŝo, li sentis brulan varmegon de la kapo ĝis la piedoj, kaj eĉ la mandorsoj estis ŝvitantaj. Kaj tamen, kiam li ekvidis klienton, li tuj decidis akcepti lin, ĉar li pensis, ke post kiam li komencos kuri, eble estiĝos al li iom da vento. Sed, kiam li ekportis la pasaĝeron, li konstatis, ke la varmega vetero jam atingas tian altan gradon, ke en ĝi neniu povas labori. Kiam li kuris, li anhelis kaj liaj lipoj sekiĝis. Li ne soifis, tamen ekvidinte akvon, li avidis ĝin trinki. Se li

malrapidiĝis, li sentis, ke la brula suno rostas ĝisfende lian dorson. Kiam li finfine alvenis al la celo, liaj vestoj algluiĝis al lia korpo. Li prenis la palmofolian ventumilon kaj forte ventumis al si, sed vane, ĉar ĝia vento estis varma. Malgraŭ ke li jam multfoje trinkis malvarman akvon, li tamen ankoraŭfoje kuris al la proksima tetrinkejo, kaj nur trinkinte du kruĉojn da varma teo li eksentis sin iom pli bone. Kun ĉiu gluto, ŝvito elverŝiĝis el li, kvazaŭ lia korpo likus kaj ne plu povus konservi eĉ unu guton da likvaĵo. Li ne kuraĝis sin movi.

Sidinte tie longan tempon, li enuiĝis. Timante eliri eksteren kaj tamen havante nenion por fari, li sentis, ke la vetero kvazaŭ intence malfavoras lin. Ne, li ne devas cedi. Tio ja ne estas la unua fojo, ke li tiras rikiŝon en varmeĝo somera, kaj li ne povas tiel senfare perdi la tutan tagon. Li volus eliri, sed liaj kruroj estas tro inertaj por lin obei, kaj li sentas sian korpon senforta, kvazaŭ li ĵus elirus el ŝvitbanejo, ne bone forlavinte la lacecon el liaj ostoj. Li sidadis ankoraŭ kelkan tempon kaj poste decidis foriri. Eĉ sidante tie li ŝvitas, do kial ne provi iom sin movi?

Sed, tuj kiam li eliris, li eksciis, ke li eraris. La grizaĵo sur la ĉielo malaperis kaj la aero fariĝis malpli sufoka, sed la suno ĵetadis pli terurajn radiojn ol iam ajn. Neniu kuraĝis levi la kapon por rigardi supren, ĉar ĉie estis tiom blindige lume, — la aero, la tegmentoj, la muroj kaj la tero, ĉio radiis blankan lumon, nuancitan de karmezino. La tuta mondo estis kvazaŭ granda bruliga lenso, sur kiu la radioj de la suno fokusiĝis por kaŭzi bruladon. En tiu ĉi blanka lumo ĉiuj koloroj pikis la okulojn, ĉiuj sonoj skrapis la orelojn, ĉiuj odoroj miksiĝis kun haladzo eliĝanta el la tero. La stratoj estis preskaŭ senhomaj kaj ŝajnis subite plilarĝiĝi, sed en la tuta spaco estis neniu spiro de malvarmeta aero, kaj la luma blankeco elvokis teruron.

Ŝjangzi ne sciis kion fari. Kun kapo klinita li trenis la piedojn peze, sencele, kaj lia korpo odoraĉis de glueca ŝvito. Dum la vagado liaj plandoj baldaŭ gluiĝis al liaj ŝtrumpoj kaj ŝuoj, kvazaŭ li vadus en ŝlimo. Tio estis al li tre malagrabla. Ĉiufoje, kiam li vidis puton, li pretervole iris al ĝi kaj trinkis ankoraŭ kelkajn glutojn, malpli por kvietigi sian soifon, ol por ĝui la malvarmeton de la akvo. Irante malsupren tra lia gorĝo en lian stomakon, la malvarma akvo frostotremigis lin, kaj liaj poroj subite kuntiriĝis, kio donis al li ian senton de agrableco. Poste li plurfoje ruktadis, kvazaŭ lia stomako volus elpuŝi la tutan akvon.

Jen paŝante, jen ripozante, li vagadis ĝis la tagmezo, sen la energio sin proponi al klientoj. Li ne sentis malsaton kaj, kvankam jam estis tempo por

tagmanĝi, tamen la sola ekvido de manĝaĵo lin naŭzis. Lia stomako akvoplena eligadis bruetojn, kiel la ventro de ĉevalo aŭ mulo post ĝia satrinko de akvo.

Ŝjangzi ĉiam trovis vintron pli timinda ol somero kaj neniam antaŭe supozis, ke somero povas esti tiel neelportebla. Li vivis en la urbo jam plurajn jarojn, sed, kiom li memoris, li ĉi tie neniam antaŭe spertis tian someran varmegon. Ĉu nun efektive estis pli varme ol en la antaŭaj someroj, aŭ lia korpo fariĝis malpli fortika? Tiel pensante, li subite eksentis sin malpli konfuza, kaj lia koro ekstremitis. Jes, lia korpo difektiĝis! Li ektimis, sed kion li povas fari? Li ne povas liberigi sin de Huniŭ, li fariĝos kiel Erĉjangzi, kiel tiu altkreska rikiŝisto, kiun li renkontis, aŭ kiel la avo de Ŝjaŭmar. Li estos finita!

Ĉirkaŭ la unua horo posttagmeze li ekhavis ankoraŭ unu klienton. Tiam estis la plej varma tempo de la plej varma tago en tiu somero, sed li, malgraŭ tio, decidis tiri la pasaĝeron. Kiel ajn brule varmega estu la suno, se li povos fari tiun ĉi tiradon sen akcidento, tio pruvos, ke li estas ankoraŭ sana kaj forta; se ne, li prefere falu morta sur la brulan teron!

Post kelkaj paŝoj li eksentis spiron de malvarmeta aero, similan al enblovo de aero tra fendeto en pordo en varmegan ĉambron. Apenaŭ kredante al siaj sensoj, li ĵetis sian rigardon al la salikaj branĉoj — ili efektive estis delikate moviĝantaj. Subite la stratoj pleniĝis de homoj, ĉar homoj en la butikoj konkure eliris eksteren ĉiu kun palmofolia ventumilo super sia kapo. Kaj preskaŭ eksaltante de ĝojo, ili ĉiuj kriis: “Venteto, malvarmeta venteto! Finfine leviĝis venteto!” La salikoj kvazaŭ fariĝis anĝeloj alportantaj novaĵon el la ĉielo: “Jen balanciĝas la salikaj branĉoj! Donu al ni pli da malvarmeta vento, ho Ĉielo!”

Estis ankoraŭ varmege, sed ĉiu sentis sin multe pli bone, ĉar la venteto, kvankam tre malforta, portis al ili esperon. Post kelkaj pluaj ventoblovetoj la suno ŝajnis fariĝi malpli brula. Ĝi jen brilis, jen paliĝis, kvazaŭ nuboj da sablo naĝus sur la ĉielo. Subite la vento plifortiĝis kaj la salikoj, kiuj ree estis senmovaj, kvazaŭ inspiritaj de ĝojo, skuiĝis kaj svingis siajn branĉojn, kiuj kvazaŭ kreskis pli longaj. Ekblovo de forta vento pasis kaj la ĉielo malheliĝis. La aero pleniĝis de polvo kaj, post kiam ĝi iom klariĝis, vidiĝis nigra nubego ĉe la norda horizonto. Ŝjangzi ĉesis ŝviti. Li ĵetis rigardon al la nordo, poste starigis la kontraŭpluvan kapuĉon kaj pendigis la pluvŝirman tukon. Li sciis, ke ŝtormoj en somero plejofte estas subitaj, kaj li ne havis tempon por perdi.

Apenaŭ li tion faris, alia ventoblovo alpelis la ruliĝantajn nigrajn nubojn, tiel ke ili tuj kovris la duonon de la ĉielo. La varmo eliĝanta el la tero miksiĝis kun la malvarmeta vento, kiu kirle levis la sekan, odoraĉan polvon en la aeron, kiu impresis varma kaj ankaŭ malvarmeta. La suda duono de la ĉielo estis

ankoraŭ hela kaj serena, dum la norda estis nigra kiel fulgo. Ĉie estiĝis konfuzo kaj paniko, kvazaŭ ia katastrofo minacus okazi. La rikiŝistoj rapide starigis sian kontraŭpluvan kapuĉon, la butikistoj tuj deprenis sian pendoŝildon, la kolportistoj haste forkolektis siajn varojn kaj la piedirantoj pelis siajn piedojn antaŭen. Ankoraŭ unu ventoblovo kaj tuj malpleniĝis la stratoj: butikaj pendoŝildoj, standoj, piedirantoj, ĉio kvazaŭ estis forblovita de la vento.

Eĉ antaŭ ol la nuboj plene kovris la tutan ĉielon, mallumo jam kuŝis sur la tero. La hela, varmega tagmezo subite fariĝis nigra nokto. Unuopaj pluvgutoj, portataj de la vento peze falis jen tien, jen ĉi tien, kvazaŭ serĉante ion sur la tersurfaco. Ekbrilo de ruĝa fulmo malproksime en la nordo faris sangfaŭkan fendon en la nuboj. La vento iom malfortiĝis, sed ĝia akra fajfado tremigis la homojn. Post kiam forpasis tiaj ventoblovoj, ĉio dronis en necerteco kaj eĉ la salikaj branĉoj kvazaŭ atendis ion kun timo. Ankoraŭ unu fulmo ekbrilis rekte supre kaj tuj blankaj, brilaj pluvgutoj ĵetiĝis malsupren, levante polvon, kiu nun odoris je humideco. Kelkaj grandaj gutoj batis sur la dorson de Ŝjangzi kaj li ekretmetis. La pluvgutoj ĉesis fali, kaj la ĉielo plene drapiris sin per nigraj nuboj. Alia, ankoraŭ pli forta ventoblovo flugigis horizontale la salikajn branĉojn: polvo, pluvo, ĉio intermiksiĝis en vastan, furiozan, malvarman grizaĵon, tiel ke nek la arboj, nek la tero, nek la nuboj estis distingeblaj unu de alia. Ĉie regis konfuzo, bruego, nebuleco. Kiam la vento denove kvietiĝis, la pluvego daŭris, torentante malsupren en granda amaso. Sennombraj sagoj pafiĝis surpen de la tero, miloj kaj miloj da kaskadetoj falis de la tegmentoj. En kelkaj minutoj la tero kaj la ĉielo kunfandiĝis en grizbrunan akvan mondon kun de-tempo-al-tempaj blankaj ekbriloj.

La vestoj de Ŝjangzi jam de longe tramalsekiĝis, estis neniu seka loko sur lia korpo. Sub lia pajla ĉapelo liaj haroj plene malsekiĝis. Sur la stratoj jam akumuliĝis ĝismaleole profunda akvo, kiu malfaciligis la paŝadon. Pluvo draŝfalas sur liajn kapon kaj dorson, frapadis lian vizaĝon kaj vipis liajn okulojn. Li povis nek levi la kapon, nek malfermi la okulojn, nek spiri, nek paŝi. Haltinte en la akvo, li perdis la orientiĝon. Konsciante, ke ĝisoste malvarma akvo verŝiĝas sur lian tutan korpon, li konfuziĝis. Nur profunde en sia koro li sentis iom da varmo, kaj liaj oreloj estis plenaj de la pluva bruo. Li intencis demeti la rikiŝon, sed ne sciis kien. Li volus kuri, sed la akvo katenis liajn piedojn. Penege, kun kapo klinita, li sin movis paŝo post paŝo, tirante la pasaĝeron, kiu kvazaŭ mortis en la rikiŝo, tiel silenta li sidis, nur lasante la rikiŝiston barakti en la akvo.

La pluvo iom malfortiĝis kaj Ŝjangzi, iomete rektiginte sian talion kaj peze

elspirinte, diris: “Sinjoro, ni do ŝirmu nin kontraŭ la pluvo, ĉu bone?”

“Iru nur! Vi ne devas lasi min ĉi tie!” la pasaĝero kriis kun piedfrapado.

Ŝjangzi tre volus demeti la rikiŝon kaj trovi al si ŝirmejon. Sed, vidante la akvon fluantan de sur lia korpo. Li sciis, ke li komencus tremi de malvarmo, se li haltigus sian moviĝon. Kunpremante la dentojn, li ekkuris en la akvo, senkonsidere ĝian profundecon. Baldaŭ la ĉielo malheliĝis kaj tuj poste ree fariĝis hela, kaj la pluvo denove nebuligis liajn okulojn.

Kiam ili atingis la cellokon, lia pasaĝero donis al li eĉ ne unu kupran moneron pli. Ŝjangzi diris nenion, ĉar li jam estis tro elĉerpita por peti pli da pago.

La pluvo haltis por kelka tempo, kaj poste komencis pluveti. Ŝjangzi kuris hejmen per unu spiro kaj sidiĝis apud la forno por sin varmigi. Li tremis kiel folio en vento. Huniŭ infuzis por li bovlon da sukerita zingibra akvo kaj li fortrinkis ĝin per unu longa gluto. Poste li enlitiĝis kaj falis en duondormon, havante ankoraŭ la pluvan bruon en la oreloj.

Je la kvara horo la nigraj nuboj ŝajnis laciĝi kaj la fulmoj fariĝis malpli fortaj. Baldaŭ la nuboj en la okcidento disfendiĝis, tiel ke montriĝis iliaj nigraj krestoj borderitaj per oro, dum blankaj nebuletoj kirliĝe iradis sub ili. La fulmoj moviĝis suden, sekvataj de kelkaj murmurantaj tondroj. Iom pli poste la suno brilis tra la fendoj de la okcidentaj nuboj, kolorante per orverdo la foliojn malsekajn de la pluvo. En la oriento aperis duobla ĉielarko, kies ambaŭ ekstremoj staris sur la nigraj nuboj kaj kies supro subportis pecon da blua ĉielo. Post nelonge ĝi malaperis de la nun sennuba ĉielo, kiu estis nove lavita same kiel ĉio sur la tero. Ŝajnis, ke el la mallumo naskiĝis nova, malvarmeta mondo de belo kaj lumo. Eĉ al la pluvkavetoj en la korto venis kelkaj koloraj libeloj, kiuj ŝvebis super ili.

Tamen, krom la nudpiedaj knaboj ĉasantaj la libelojn, neniu en la korto emis ĝui la serenon ĉielon. Parto de la malantaŭa muro de Ŝjaŭfuzi disfalis kaj ŝi kaj ŝiaj fratoj nun klopodis kovri la breĉon per la mato, prenita de sur la briklito. La korta muro disfalis en pluraj lokoj, sed neniu havis tempon por zorgi pri tio, ĉar ili ĉiuj estis multe tro okupitaj pri siaj propraj ĉambroj. Akvo eniĝis en kelkajn ĉambrojn pro tio, ke la sojloj estis tro malaltaj, kaj nun oni penis eligi la akvon el la ĉambroj per polvoŝoveliloj kaj rompitaĵoj bovloj. Aliaj estis riparantaj difektitajn murojn. Ankoraŭ aliaj, kies tegmentoj tralasis pluvakvon, estis haste elportantaj siajn malsekiĝintajn objektojn por sekigi ilin ĉirkaŭ la forno aŭ en sunlumo sur la fenestrobreto. Dum la ŝtormo ili ŝirmis sin en tiuj ĉi ĉambroj, minacantaj disfali en ĉiu minuto kaj tiel vundi aŭ mortigi

ilin; nun la pluvo pasis, ili ĉiuj ordigis siajn objektojn kaj taksis la perdojn. Post tia pluvego la prezo de unu ĝino da greno eble malaltiĝis je duonkupro, sed tio ne povis kovri iliajn perdojn. Kvankam ili pagis la domlupagon, tamen neniu venis ripari la domojn, krom se ili fariĝis tro difektitaj por loĝo, kaj nur tiam unu aŭ du personoj estis senditaj simple ripari ilin per tero kaj rompitaĵ briktoj, kvazaŭ atendante refojan disfalon. Sed, se oni ne pagis la domlupagon, la tuta familio estis forpelita kaj senigita je siaj posedaĵoj. Neniu zorgis pri tio, ĉu la domoj estas danĝeraj por la homa vivo. Povante pagi nur tiel malaltan lupagon, kiajn aliajn domojn ili esperus lui krom tiuj ĉi kadukaj, disfali minacantaj?

La plej malbona sekvo de la ŝtormo estis, ke oni malsaniĝis pro ĝi. Plenkreskuloj kaj infanoj, kiuj pasigis la tutan tagon sur la stratoj por perlabori siajn vivrimedojn, estis plej ofte atakataj de somerj pluvegoj. Vendante siajn fortojn, ili estis konstante en ŝvito; kaj en norda Ĉinio ŝtormoj estis tiel abruptaj, tiel malvarmaj, iafoje eĉ kun hajleroj juglandograndaj. La malvarmaj pluvogutoj, kiuj peze falis sur iliajn malfermiĝintajn ŝvitporojn, estis sufiĉaj por kuŝigi ilin en febro sur la briklito almenaŭ unu aŭ du tagojn. Kiam infano malsaniĝis, mankis mono por medikamento. Kaj tial, kvankam la pluvo akcelis la kreskadon de la maizo kaj sorgo, tamen ĝi ankaŭ mortigis multajn el la urbaj malriĉaj infanoj. Kaj se la plenkreskuloj falis en malsanon, la situacio estis eĉ pli malbona. Post pluvo, poetoj povis kanti pri lotusfloroj kun akvoperloj sur ĝiaj folioj aŭ pri duobla ĉielarko; por la malriĉuloj, se malsaniĝis plenkreska viro, la tuta familio suferis malsaton. Ĉiu ŝtormo aldonis aron da novaj al la nombro de la prostituitinoj, ŝtelistoj kaj arestitoj. Se malsaniĝis tiu, kiu perlaboris vivrimedojn, liaj infanoj preferis fari ion ajn, ol suferi malsaton. Kvankam la pluvo falas egale al riĉuloj kaj malriĉuloj, al bonuloj kaj malbonuloj, tamen fakte ĝi estas maljusta, ĉar ĝi falas sur tian mondon, kie troviĝas nenia justeco.

Ŝjangzi malsaniĝis. Kaj li ne estis la sola en tiu granda korto.

XIX

Post kiam Ŝjangzi kuŝis surlite en duonkonscio du tagnoktojn, Huniŭ **litmiĝis**, **lis** iris al Templo de Diino kaj petis magian preskribon, kiu postulis iom da incensa cindero kaj du aŭ tri kuracajn herbojn. Ŝi enverŝis tian tizanon en la gorĝon de s kaj li efektive malfermis la okulojn, sed baldaŭ li denove endormiĝis. Malklare murmurante. Nur tiam Huniŭ iris voki kuraciston. Kelkaj pikoj de akupunkturo kaj dozo da medikamento revenigis lin al la vivo el la sveno. Tuj kiam li malfermis la okulojn, li demandis: “Ĉu ankoraŭ pluvas?”

La duan maldolĉan tizanon li rifuzis engluti, parte pro domaĝo pri la mono, kiun ĝi kostis, parte pro honto pri tio, ke li falis en malsanon nur pro sia malsekiĝo en pluvo. Por pruvi, ke li ne bezonas medikamenton, li decidis tuj leviĝi. Tamen apenaŭ li sidiĝis, li ekhavis la senton, ke granda ŝtono pezas sur lia kapo; kaj lia kolo moliĝis, oraj steloj dancis antaŭ liaj okuloj kaj li ree falis sur la liton. Estis ne necese diri ion ajn plu, kaj li levis la tizanon kaj ĝin englutis.

Dek tagojn li kuŝis tie, pli maltrankvile kun ĉiu tago. Iajoje li kaŝis la vizaĝon en la kapkusenon kaj senvoĉe ploris. Li sciis, ke nun kiam li ne povas perlabori, Huniŭ pagas ĉiujn elspezojn; kaj post kiam ŝia mono elĉerpiĝos, ilia vivteno dependos tute de lia rikiŝo. Ŝi estas elspezema kaj tre frandema, kiel do li povs vivteni ŝin kun la infano naskiĝonta? Ju pli longe li kuŝis, des pli li dronis en siaj turmentaj pensoj kaj maltrankviliĝis, kaj tio nur prokrastis lian resaniĝo.

Tuj kiam li sentis sin iom pli bone, li demandis: “Kiel statas la rikiŝi?”

“Estu trankvila,” diris Huniŭ. “Mi luigis ĝin al Ding Si.”

“Ĉu?” Li maltrankviliĝis, timante, ke Ding Si aŭ iu alia difektus ĝin. Sed, ĉar li ankoraŭ ne povis leviĝi, ĝi nature devis esti luita al iu ajn kaj ne povis esti neuzata. Li do komencis pripensi. Se li memtirus la rikiŝon, li ordinare povus enspezi kvin aŭ ses ĝjaŭojn ĉiutage, — sumon pli-malpli sufiĉan por pagi la domlupagon, karbon, nutraĵon, lampoleon kaj teon, ne enkalkulante la vestojn por du personoj. Eĉ tiam li devus esti ŝparema kaj ne elspezi tiel senbride, kiel Huniŭ. Nun li enspezas nur iom pli ol unu ĝuaŭon da lupago de la rikiŝo, kio signifas, ke ili devas malprofiti kvar aŭ kvin ĝjaŭojn, ne inkluzive la koston de medikamento.

Se li ne resanigus, kion do fari? Ne estas mirinde, ke Erĉjangzi drinkis kaj liaj sortobatitaj amikoj tiel fikondutis kaj diboĉis – fariĝis rikiŝisto ja estas

kvazaŭ eniri en sakstraton! Kiel ajn energie vi penadas kaj strebas, vi neniam devas edziĝi, nek malsaniĝi, nek fari mispaŝon. Hm! Li ekpensis pri sia unua rikiŝo kaj sia ŝparaĵo. Li antaŭe ofendis kaj incitis neniun, tamen li, nek pro malsano, nek pro edziĝo, senkaŭze perdis ilin. Kion ajn li faras, bonan aŭ malbonan, tiu ĉi vojo kondukos lin al morto, kaj li ankaŭ tute ne scias, kiam ĝi venos. Ĉe tiu ĉi penso, lia malĝojo cedis al malespero. Ba, se vi ne povas leviĝi, kuŝu do – estas tute egale ĉiaokaze. Kaj li ĉesis pensi, kviete kuŝante tie. Sed baldaŭ li ne povis plu elteni kaj ekintencis tuj ellitiĝi por denove fari la vivbatalon. Vere la vojo koondukos al morto, sed nun li ankaŭ vivas, kaj dum oni vivas, oni devas ĉiam havi esperon. Kaj tamen li ankoraŭ ne estis sufiĉe forta por stari surpiede.

Deprimita li kompatveke diris al Huniu: “Mi kredas, ke tiu rikiŝo estas fatala! Vere fatala!”

“Pensu nur pri via saniĝo. Ĉiam parolante pri la rikiŝo. Vi fariĝas rikiŝomaniulo!”

Li diris nenion pli. Jes, li estis rikiŝomaniulo! De kiam li komencis la rikiŝotiradon, li ĉiamn kredis, ke la rikiŝo estas ĉio...

Tuj kiam li sentis sin iom pli forta, li leviĝis kaj rigardis sin en la spegulo. Li apenaŭ povis rekoni sin. Lia barboplana vizaĝo aspektis kiel stoplaj, liaj tempioj kaj vangoj enfaliĝis, liaj okuloj estis du profundaj kavoj, kaj eĉ lia cikatro sulkiĝis! En la domo estis premvarme, tamen li ne kuraĝis iri eksteren, parte ĉar li sentis siajn kruojn kvazaŭ senoste molaj, parte ĉar li timus renkonti iun ajn. En tiu ĉi korto kaj ĉe la rikiŝoparkadejoj de la orienta kaj okcidenta pordoj de la urbo ĉiu ja sciis, ke Ŝjangzi estas unu el la plej fortaj junaj rikiŝistoj. Kiel li povas esti reduktita al tia mizera stato? Li ne volis iri eksteren, sed en la ĉambro li sentis la varmon tre sufoka. Li treege dezirus, ke li povu tute refortiĝi tuj post engluto de plenbuŝo da nutraĵo, por iri eksteren kaj rekomenci la rikiŝotiradon. Sed malsano estas konsumeca, ĝi venas kaj foriras malgraŭ homa volo.

Li ripozis unu monaton, poste, ne konsiderante, ĉu li plene resaniĝis aŭ ne, li rekomencis tiri la rikiŝon. Kun lia ĉapelo albrove tiritita, li esperis, ke oni ne rekonos lin kaj ke tiel li povos kuri iom malpli rapide. La nomo de Ŝjangzi estis ĉiam ligita kun “rapideco”, tial, se li publike malrapidus sur la stratoj, li farus sin ĉies mokindaĵo.

Tamen, ĉar li estis ankoraŭ ne tute resaniĝinta kaj, precipe, ĉar li tiris pli da klientoj, por kovri la perdojn, kiujn li suferis dum sia malsaniĝo, li baldaŭ ree falis en la saman malsanon, ĉi-foje ankaŭ kun disenterio. Malpacienca li

vangofrapadis sin, sed tio estis senutila; lia stomadko kvazaŭ gluiĝi al lia spino kaj lia ventro ankoraŭ ellasis flue. Finfine lia disenterio ĉesis, kaj tamen li restis tiel malforta, ke li eĉ apenaŭ povis restariĝi el kaŭra pozicio, por ne paroli pri la rikiŝotirado. Li ripozis ankoraŭ unu monaton, kaj li supozis, ke Huniŭ probable jam preskaŭ elspezis sian tutan monon.

La dekkvinan de la oka monato li decidis komenci labori. Se li ree malsaniĝos, li ĵuris, li dronigu sin en rivero!

De lia unua malsaniĝo Ŝjaŭfuzi ofte venis vidi lin. Ĉar li neniam povis superi Huniŭ en disputo, tiel ke li ne emis paroli kun ŝi, kaj ĉar li havis tiom multe en sia koro por elverŝi, li do iafoje diris ion al Ŝjaŭfuzi. Tio kolerigis Huniŭ. Kiam Ŝjangzi forestis el la hejmo, Ŝjaŭfuzi estis bona amikino; kaj dum li estis hejme, ŝi venis, laŭ Huniŭ, ja por fari senhontan koketadon al li. Ŝi do devigis Ŝjaŭfuzi pagi, kion ŝi ŝuldis, kaj diris: “De nun vi ĉiam estu for de mia domo!”

Kun neniu loko akcepti klientojn, ĉar ŝia ĉambro estis tiel kaduka – la mato de la briklito ankoraŭ pendis sur la breĉita muro –, ŝi havis nenan alternativon krom iri al la “transporta kompanio” or enskribi sian nomon. Sed la “kompanio” ne bezonis ŝin, ĉar ĝi estis speciale por “studentinoj” kaj “filinoj el bonaj familioj”. Ĝi servis nur al la mondumo kaj postulis altajn makleraĵojn, kaj pro tio ĝi ne volis akcepti ordinaran prostituitinon kiel Ŝjaŭfuzi. Ŝi ne sciis kion fari. Ŝi intencis dungiĝi en bordelon, ĉar pro manko de kapitalo ŝi ne povis memstare fari la “negocon”, sed tio signifus kompletan perdon de ŝia libereco, kaj tiam kiu do povus prizorgi ŝiajn fratojn? Morti estus por ŝi la plej simpla fino, vivo ŝia jam estas kvazaŭ en infero. Ŝi ne timas morti, sed morti ŝi ne volas, ĉar ŝi havas ion pli bravan kaj pli noblan por fari. Se ŝi povos vivi ĝis tiam, kiam ŝin vidos la fratojn perlabori siajn vivrimedojn, kiam ŝi povos morti kun trankvila animo. La morto pli aŭ malpli frue venos. Sed ŝi devas **Ŝjangzivi la du vivojn** koste de sia propra!

Post longa pripensado ŝi trovis nur unu elirejon: vendi sin pli malkare. Ĉiu, kiu volos enveni en ŝian domaĉon, kompreneble ne volos pagi multon. Tre bone, ĉiu do venu, se li nur pagos iom. Tiamaniere almenaŭ ŝi povos ŝpari al si la monon por pli bonaj vestoj kaj ŝminkado. La viroj, kiuj venos ŝin ĝui, ne povos esti postulemaj pri ŝia tualetto, ĉar ili pagos al ŝi nur malgrandan sumeton por la plezuro. Ŝi estas tiel juna, kaj por tia prezo ŝi ja estos malkare pagata.

Nun kiam Huniŭ jam fariĝis rondventra pro gravedo, por eviti aborton ŝi timis eĉ iri eksteren por fari aĉeton. Ĉar Ŝjangzi estis for de ŝi la tutan tagon kaj Ŝjaŭfuzi ne volis plu veni al ŝi, ŝi sentis sin tial soleca kiel hundo dome-ĉenita.

Tio nur pligrandigis ŝian koleron kaj ŝi sentis, ke Ŝjaŭfuzi malkare vendis sian korpon ĝuste por inciti ŝin. Kompreneble ŝi ne toleris tian ofendon. Por sin venĝi, ŝi sidis en la ekstera ĉambro kun la pordo malfermita kaj atendis. Vidante, ke iu ajn iras al la ĉambro de Ŝjaŭfuzi, ŝi kriis per forta voĉo insultojn, por embarasi kiel la vizitanton, tiel ankaŭ Ŝjaŭfuzi. Kiam la klientoj de Ŝjaŭfuzi malmultiĝis, ŝi ĝojis.

Ŝjaŭfuzi sciis, ke se tiel plu estos, la aliaj loĝantoj ĉi-tieaj baldaŭ kuniĝos kun Huniŭ por elpeli ŝin el ŝia loko. Ŝi timis, sed ne kuraĝis koleri, ĉar homo en ŝia situacio devas forgluti siajn larmojn kaj sin submeti al la realaĵoj. Kaj ŝi, kune kun siajn junaj fratoj, aliris kaj genuiĝis antaŭ Huniŭ. Ŝi diris nenion, sed ŝia vizaĝesprimo montris, ke se tiu ĉi humiliĝo ne sufiĉos, ŝi preparos sin al morto, sed nepre kune kun Huniŭ. Elporti humiliĝon estas la plej granda sinofero, kaj la plej profunda humiliĝo estas la prepariĝo al kontraŭbatalo.

Huniŭ siavice embarasiĝis, ŝi sentis, ke ŝi estas superruzita, sed kun sia ŝveliĝinta ventro ŝi ne povas riski pugnolukti kun ŝi kaj pro tio ŝi devas trovi ian elirejon. – Nu, ŝi faris tion nur ŝerce! Sed la simplanima Ŝjaŭfuzi prenis ĝin tiel serioze! Post tiuj ĉi klarigoj ili denove amikiĝis kaj Huniŭ helpis Ŝjaŭfuzi en ĉio kiel antaŭe.

De post la Aŭtŭmmeza Festo, en kiu Ŝjangzi rekomencis tiri la rikiŝon, li ĉiam estis singarda pri sia sano. La du malsaniĝoj pruvis al li, ke li ne estas tiel fortika kiel fero. Kvankam li ankoraŭ esperis perlabori pli multe da mono, sed la du suferitaj repuŝoj montris al li, kiel malforta estas la homo kia li. Bravulo estas iam devigita kunpremi siajn dentojn kaj eble eĉ sputi sangon. Kvankam la disenterio jam pasis, tamen li ankoraŭ havis ventrodoloron de tempo al tempo. Iajoje, ĝuste kiam li komencis peli siajn piedojn por iom pligrandigi la rapidecon, liaj intestoj kvazaŭ tordiĝis kaj pro doloro li malrapidiĝis. Li devis eĉ abrupte halti kun sia kapo klinita, por kiel eble plej forte elporti la doloron en sia ventro. Se li sola tiris la rikiŝon, tio ne estis tiel malfacila; sed kiam li estis en grupo kaj tiel ekhaltis, tio surprizis la alian, kaj ankaŭ li mem multe embarasiĝis. Li estis nur iom pli-ol-dudekjara kaj tamen li jam faris tian hontindaĵon. Kio do okazos, kiam li atingos la aĝon de tridek aŭ kvarde jaroj? La penso teruris lin tiel, ke el li tuj eliĝis malvarm ŝvito.

Konsiderante sian sanstaton, li preferus denove preni laŭmonatan laboron, ĉar tiuokaze li havus ŝancojn por ripozi. Kvankam li devus kuris pli rapide, kaj tio estus multe pli malpeza ol tiri okazajn klientojn sur la stratoj. Sed li sciis, ke Huniŭ neniel konsentos pri tio. Lia edziĝo signifas finiĝon de lia libereco kaj, krome, Huniŭ estas tia granda megero. Jen la missorto, kiun li devas toleri.

Kaj tiel li pasigis duonjaron, laborante nek diligente, nek maldiligente, korpemata kaj tamen firmanima. Li ĉiam singardeme tenis la kapon klinita, kaj ne plu estis tiel vigla kaj supera kiel antaŭe. Kaj tamen li perlaboris ankoraŭ pli multe ol ordinara rikiŝisto, ĉar li preterlasis neniun klienton, kiun li povis tiri, krom se lia ventrodoloro estis neelportebla. Li neniam akiris tiajn kutimaĉojn, kiajn ordinaraj rikiŝistoj havis, kiel ekzemple postuli tro altan prezon, ŝanĝi klienton duonvoje aŭ atendi nur klienton, kiu pagos pli multe. Tiamaniere li laboris pli pene, sed dank' al tio li havis regulan enspezon. Li neniam faris artifikon kaj tial riskis nenion.

Sed malgraŭe liaj enspezoj ne sufiĉis por tio, ke li havu iom da ŝparaĵo. Mono venis en lian maldekstran manon kaj foriris el lia dekstra, kaj tiel ĉiun tagon restis al li neniun groŝon ŝparita. Pri ŝparado li jam forlasis ĉian esperon. Kvankam li sciis domaĝi la monon, tamen Huniŭ estis terure elspezema! Laŭ antaŭvido ŝia akuŝado estos ĉirkaŭ la komenco de la dua monato post la Novjaro lunkalendaro, kaj efektive de la komenco de vintro ŝia ventro jam ŝvelis. Kaj plie, ŝi intence elstarigis sian ventron, por elmontri sian gravecon. Kiam ŝi rigardis sian ventron, ŝi eĉ ne volis leviĝi el la briklito kaj lasis la kuiradon al Ŝjaŭfuzi por fari. Kompreneble la manĝrestaĵoj devis aparteni al la fratino de la knabino kaj tio signifis pli da elspezo.

Inter la regulaj manĝoj Huniŭ amis manĝeti ian frandaĵon de tempo al tempo. Ju pli ŝvelis ŝia ventro, des pli ŝi opiniis, ke ŝi devas manĝi pli multe frandaĵojn. Ŝi ne nur mem aĉetis, sed ankaŭ petis Ŝjangzi alporti al ŝi iajn manĝaĵojn ĉiutage. Tial, kiom ajn multe da mono li perlaboris, ŝi elspezis ĝis tute, kaj ŝia postulo kreskis kaj malkreskis kun liaj enspezoj. Kaj Ŝjangzi povis diri nenion. Dum li malsanis, ili elspezis ŝian monon. Nun li devas repagi ĝin al ŝi, aĉetante kion ajn ŝi deziras. Se li iom streĉus la monuj-ŝnuretojn, ŝi eble tuj malsaniĝus.

“Gravedeco estas naŭ-monata malsano,” ŝi diris al li. “Vi scias nenion pri tio!” Kaj tio estis la vero.

Kiam la Novjaro proksimiĝis, ŝiaj postuloj plimultiĝis. Ne volante sin movi, ŝi sendis Ŝjaŭfuzi aĉeti jen tion, jen alion. Kvankam ŝin forte ĉagrenis, ke ŝi devas ĉiam resti hejme, tamen ŝi tro multe dorlotis sin mem por iri eksteren, kaj tial ŝi multe enuis. Ŝia sola distriĝo do kuŝis sur pli multaj aĉetoj. Tiuj ĉi aĵoj, ŝi insistis, estis ne por ŝi mem, sed por Ŝjangzi.

“Vi laboregas la tutan jaron, kiel do ne manĝi iom da frandaĵoj?” ŝi diris. “Vi ja ne komplete refortiĝis de post tiu malsano. Nun estas la jarfino, manĝu ion, aŭ ĉu vi atendas fariĝi maldika kiel litcimo?”

Ŝjangzi ne volis, nek sciis argumenti. Kiam la manĝaĵo estis preparita, ŝi manĝis du aŭ tri grandajn bovlojn da ĝi kaj poste, pro manko de korpa ekzercado, sentis sian stomakon tiel malagrabla troplenigita, ke ŝi ambaŭmane tenis al si la ventron kaj plendis, ke tion kaŭzis la gravedeco.

Post la Novjaro ŝi ne permesis Ŝjangzi iri eksteren en la vesperoj, ĉar ŝi ne sciis, kiam ŝi akuŝos, kaj ŝi timis. Nur nun ŝi ekmemoris sian efektivan aĝon kaj, kvankam ŝi ankoraŭ ne volis ĝin konfesi, ŝi tamen jam ĉesis diri: “Mi estas nur ‘iom’ pli aĝa ol vi.”

Ĉio ĉi tio ja konfuzis Ŝjangzi. La naskiĝo de infano signifas daŭrigon de la vivo, kaj Ŝjangzi, kvankam tute ne volante havi infanon, ne povis sin deteni de ĝojo, ĉar tiu plej simpla, plej sorĉa vorto “paĉjo”, kiam dirita al iu viro, certe devas tuŝi ties koron eĉ ŝtonan. Mallerta kaj stultmiena. Ŝjangzi trovis en si nenion fierinda; sed ĉe la ekpenso pri tiu sorĉa vorto, li subite ekkonsciis sian propran valoron. Ŝajnis al li, ke estus ne grave, se li havus nenion; kaj se nur li havos infanon, lia vivo ne estos vanta. Kaj tial li penis fari ĉion, kion li povis, por Huniŭ, kaj ĉiel servi ŝin ĉar ŝi ne plu estis “unu” persono. Ŝi ja estas abomene malbela, sed en tiu ĉi afero ŝi plene meritis laŭdon.

Kaj tamen, malgraŭe, la de ŝi estigita tumulto ja estis vere netolerebla. Ŝi konstante ŝanĝadis sian ideon kaj malkvietis tiel, kvazaŭ ŝi estus loĝata de demono, sed Ŝjangzi devis perlabori vivrimedojn kaj bezonis ripozi. Eĉ se Ŝjangzi devis perlabori vivrimedojn kaj bezonis ripozi. Eĉ se la mono estis malŝparita, li tamen bezonis bonan noktan dormon, por ke li povu komenci la penigan laboro de la sekvanta tago. Huniŭ ne permesis lin labori dum la nokto, nek dormi en paco, kaj tial li tuttage estis en sensobtuzeco, kun kapo pezega. Li sentis jen ĝojon, jen maltrankvilon, jen enuon. Li havis iafoje konscion de kulpeco pri sia ĝojo, alifojе sin konsolis en sia maltrankvilo kaj devis trovi ĝojon en sia enuo. Tiuj ĉi konfliktantaj inter si emocioj tiel konfuzis lin, la plej simplan homon, ke li ofte perdis la orientiĝon. Foje li eĉ forgesis la adreson, kiun lia kliento jam donis, kaj preterpasis la cellokon!

Ĉirkaŭ la Lanterna Festo Huniŭ sendis Ŝjangzi por voki akuŝistinon, ĉar ŝi jam ne povis plu elteni. La akuŝistino venis kaj diris al ŝi, ke estas ankoraŭ tro frue, kaj ankaŭ klarigis, kiaj estas la antaŭsignoj de la akuŝo. Huniŭ eltenis ankoraŭ du tagojn kaj poste denove bruegis, tiel ke la akuŝistino estis ree alvenigita. Sed ĉi-foje estis ankoraŭ tro frue. Ŝi ploris kaj kriis, ke ŝi volas morti, ne povante plu elteni tian turmenton. Ŝjangzi ne sciis kion fari, sed por montri, ke li estas zorgema al ŝi, laŭ ŝia postulo li portempe ĉesis tiri la rikiŝon.

Tio daŭris ĝis la fino de la monato, kiam eĉ Ŝjangzi povis vidi, ke ŝia

tempo efektive venas. Huniŭ jam aspektis apenaŭ kiel homo. La akuŝistino denove venis kaj aludis al Ŝjangzi, ke tio probable estos malfacila akuŝo pro la aĝo de Huniŭ kaj la fakto, ke ĝi estos ŝia unua infano. Ĉar ŝi neniam faris korpan ekzercadon kaj manĝis tro multe da grasaj nutraĵoj, la fetο estis tre granda, kaj ne estis espereble normala akuŝo. Cetere, dum la gravedeco ŝi neniam vizitis kuraciston kaj nun jam estis tro malfrue por ŝanĝi la malĝustan pozicion de la fetο en la utero. La akuŝistino ne havis tian lertecon. Ĉio, kion ŝi povis diri, estis ke la bebo eble eliĝos transverse kaj estos malfacila akuŝo.

En tiu ĉi miksa korto, la naskon de infano kaj morton ĉe akuŝo oni menciis preskaŭ samtempe. Sed por Huniŭ la danĝero estis pli granda. Aliaj virinoj ĉiam laboris ĝis la akuŝotempo kaj ne manĝis sufiĉe da nutraĵo, sekve iliaj beboj neniam estis tro grandaj kaj povis facile naskiĝi. Ilia plej granda risko estis post la nasko. Huniŭ estis ĝuste la malo. Estis ŝia bonstato, kiu kondukis ŝin al pereο.

Ŝjangzi, Ŝjaŭfuzi kaj la akuŝistino gardadis ŝin dum tri tagnoktoj. Ŝi alvokis ĉiujn spiritojn kaj budhojn kaj faris sennombrajn votojn, sed tute vane. Fine ŝi raŭkiĝis, tiel ke ŝi povis nur ĝemi: “Panjo, ho, panjo!” La akuŝistino povis fari jam nenion kontraŭ tio, nek ĉiu alia. Estis Huniŭ mem, kiu diris al Ŝjangzi, ke li iru voki Avinon Ĉen, kiu loĝis ekster la pordego Deŝengmen. La maljuna medio ne volis veni, krom se oni pagas al ŝi kvin jŭanojn. Huniŭ do elprenis siajn lastajn sep aŭ ok jŭanojn.

“Bona Ŝjangzi, tuj iru! Ne domaĝu la monon. Post kiam mi resaniĝos, mi ĉiam obeos vin dum la cetero de mia vivo. Rapidu!”

Nur ĉirkaŭ la lampo-eklumiga tempo vespere la maljuna virino finfine alvenis kun sia “helpanto-knabo” – ĉirkaŭkvardekjara grandkorpa viro kun flava vizaĝo. Avino Ĉen mem havis ĉirkaŭ kvindek jarojn. Ŝi portis bluan silkan jakon, kaj ŝiaj haroj estis ornamitaj per ruĝaj granatfloroj kaj kompleto da oritaj juveloj. Ŝiaj okuloj estis akraj kiel boriletoj. Unue ŝi lavis al si la manojn kaj bruligis incenson, poste koŭtois, sidiĝis malantaŭ la tablo, sur kiu staris la incensfasketo, kaj fikse rigardis la pinton de la incensfasketo. Subite ŝia korpo skuiĝis en forta spasma. Kun kapo klinita kaj okuloj fermitaj ŝi restis senmova dum longa momento. En la ĉambro regis tia silento, ke oni povis aŭdi eĉ falon de pinglo, kaj eĉ Huniŭ kunpremis la dentojn kaj ne kuraĝis plu ĝemi.

Malrapide Avino Ĉen levis sian kapon kaj rigardis ĉiujn ĉeestantojn, balancante la kapon; tiam la “helpanto-knabo” ektiris Ŝjangzi, ke li tuj koŭto-u. Ŝjangzi ne esits certa, ĉu li kredas je la spirito aŭ ne, sed li nur sentis, ke koŭtoado ne povas kaŭzi malbonon, kaj li en konfuziteco frapadis la plankon

per la frunto en pluraj fojoj. Kiam li releviĝis, li rigardis tiujn akrajn “spirit-okulojn” kaj tiujn brulantajn ruĝajn incenspintojn, kaj flaris la bonodoroan fumon, malklarmense esperante, ke io bona povos estiĝi el ĉio ĉi tio. Li atendis stultmiene, kaj liaj manplatoj malvarme ŝvitis.

La sorĉistino komencis balbuti per raŭka voĉo: “Ne, ne, ne grave! Faru sorĉskribaĵon por akceli, akceli la naskon!”

La “helpanto-knabo” rapide donis al ŝi maldikan flavan paperon. Ŝi kelkfoje penis kapti incensfumon per sia kavigita mano kaj poste, malsekiginte sian fingron per salivo, komencis skribi. Poste ŝi murmuris kelkajn vortojn, kies proksimuma signifo estis: en sia antaŭa enkarniĝo Huniŭ faris ŝuldon al tiu ĉi infano, kio estis la kaŭzo, kial ŝi nun devas suferi la turmenton. Kun zumanta kapo Ŝjangzi ne tute komprenis, sed li iom timiĝis.

Avino Ĉen larĝe kaj longe oscedis kaj, sidinte kelkan tempon kun fermitaj okuloj, levis la palpebrojn, kvazaŭ ŝi vekigŭs el sonĝo. La “helpanto-knabo” tuj raportis al ŝi, kion la spirito diris. Ŝajnis, ke ŝi multe ĝojas pro tio. “Hodiaŭ la spirito estas en bona humoro kaj parolis multe!” Dirinte tion, ŝi montris al Ŝjangzi kiel helpi al Huniŭ engluti la sorĉskribaĵon kune kun la pilolo, kiun ŝi donis.

Ĉar la maljuna virino volis atendi por vidi la efikon de la sorĉskribaĵo, Ŝjangzi devis doni al ŝi manĝaĵon. Li konfidis tion al Ŝjaŭfuzim, kiu aĉetis kelkajn varmajn sezamkukojn kaj gelatenan porkfemuraĵon. Eĉ tiam la maljuna virino plendis, ke mankas vino.

Post kiam Huniŭ prenis la sorĉskribaĵon kaj Avino Ĉen kaj ŝia helpanto-knabo” finis sian manĝadon, Huniŭ ankoraŭ ĝemante ruliĝadis sur la briklito. Tio daŭris pli ol unu horon, ĝis ŝiaj okulgloboj komencis turmiĝi supren. Avino Ĉen ehavis alian ideon kaj trankvile diris al Ŝjangzi, ke li genuu antaŭ brulanta incensfasketo. Tiam Ŝjangzi jam apenaŭ havis fidon al ŝi, sed, ĉar li jam pagis al ŝi kvin jŭanojn, li pensis, ke li devas provi ĉiujn ŝiajn metodojn. Li ja ne povas bati ŝin, do restas al li nur obei ŝin, kun la espero, ke eble la metodoj efikos.

Genuante kun la trunko rekta antaŭ la incensfasketo, li ne sciis, kiun spiriton li petegas, sed li sentis, ke li devas esti sincera. Fiksrigardante la flagretantan incensfasketon, li kvazaŭ vidis iajn ombrajn formojn sur ĝia brulanta pinto kaj al ili li tuj komencis en ŝi preĝi. La brulanta incensfasketo pli kaj pli malaltiĝis, kaj ĝia ruĝa pinto komencis griziĝi; li klinis la kapon pli malsupren, metis la manojn sur la plankon kaj komencis dormeti, ĉar jam de tri tagoj li ne bone dormis. Subite lia kapo ĵetiĝis antaŭen kaj li vekigŭs kun ekskuo.

Li direktis la okulojn al la incensfasketo: ĝi jam preskaŭ forbrulis. Sen konsidere al tio, ĉu jam estas tempo leviĝi aŭ ne, li malrapide stariĝis. Liaj kruroj estis sensentaj.

Avino Ĉen kaj ŝia “helpanto-knabo” jam forŝteliĝis.

Ŝjangzi ne havis la tempon ŝin malami. Li rapidis al Huniŭ, sciante, ke nun jam estas por ŝi preskaŭ nenia helpol ŝi malfacile spiregis, ne povante eĉ ĝemi. La akuŝistino konsilis al li porti Huniŭ al hospitalo, ĉar ŝiaj kapabloj estis jam elĉerpitaj.

Subite la koro de Ŝjangzi kvazaŭ disfendiĝis, li eksplodis en ploron. Ankaŭ Ŝjaŭfuzi ploris, se kiel apudestaranto ŝi konservis la kapoklarecon. “fraĉjo Ŝjangzi, ne ploru. Mi do iru al la hospitalo por peti helpon!” senkonsidere ĉu li aŭdis aŭ ne, viŝante al si la larmojn ŝi kuris eksteren.

Pasis unu horo ĝis ŝi kurante revenis. Ŝi tiel anhelis, ke ŝi preskaŭ ne povis paroli. Apogante sin al la tablo, ŝi finfine trovis sian voĉon, dirante, ke la kuracisto postulas dek jŭanojn por unu vizito, sed nur por ekzameni la pacienton. La akuŝigo kostas dudek. Se estas malfacila nasko, oni devas iri al la hospitalo, kio kostas plurajn dekojn da jŭanoj. Fraĉjo Ŝjangzi, kion do ni faru?”

Al Ŝjangzi restis nenio alia por fari, ol atendi ĝis mortos tiu, kiu devos morti.

Malklero kaj krueleco estis fenomenoj ĉi-tieaj, kiuj por sia ekzisto havis tian kaj tian kaŭzon.

Ĉe la noktomezo Huniŭ elspiris la lastan spiron kun mortinta fetu en sia ventro.

Notoj:

1. Vd. noton 5 de ĉapitro IV.
2. “transporta kompanio”: Loko, kie oni peris prostituon.
3. Vd. noton 1 de ĉapitro XVI

XX

Ŝjangzi vendis sian rikiŝon!

Mono forfluis tra liaj fingroj kiel akvo. La mortinto devis esti enterigita, kaj eĉ la mortatesto por esti gluita sur la ĉerko kostis monon.

Ŝjangzi gapis al ĉiuj, kiuj moviĝadis en konfuzo, kaj ĉio, kion li povis fari, estis elpoŝigadi monon. Liaj okuloj estis terure ruĝiĝintaj, kun flavblankaĵo ĉe la okulanguloj; kaj kvazaŭ surdulo, ne sciante, kion li devas fari, li iradis tien kaj ĉi tien post la aliaj.

Lia menso iom klariĝis nur tiam, kiam li sekvis la ĉerkon de Huniŭ ekstern el la urbo; tamen li ankoraŭ ne povis kolekti siajn pensojn. Krom Ŝjangzi nur la du fratoj de Ŝjaŭfuzi estis la funebrantoj. Ĉiu el la du knaboj tenis en la mano maldikan stakon da paperaj monimitaĵoj por ĵeti dum la vojo al la spiritoj, kiuj povis venis bari la vojon.

En mensobtuzeco, kun senlarmaj okuloj Ŝjangzi rigardadis la portistojn mallevi la ĉerkon en la tombofoson. En lia koro kvazaŭ brulis fajro, kiu sekigis ĉiujn liajn larmojn, tiel ke li ne povis plori. Li rigardadis kun stulta mieno, kvazaŭ li ne scius, kion ili faras. Nur kiam la ĉefportisto diris al li, ke ili jam finis la laboron, li ekpensis pri hejmeniro.

Ŝjaŭfuzi jam reordigis la ĉambrojn. Reveninte hejmen, li tuj ĵetis sin sur la brikliton, tute elĉerpita. Liaj okuloj estis tro sekaj por fermi, do li fikse rigardis la postesignojn sur la plafono, lasitajn de la pluvakva tralaso de la tegmento. Ne povante endormiĝi, li sidiĝis, ĵetis rigardon ĉirkaŭen kaj poste mallevis la okulojn. Ne sciante kion fari, li eliris kaj aĉetis skatolon da cigaredoj. Poste li sidiĝis sur la briklita rando kaj ekbruligis cigaredon, kvankam li ne emis fumi. Dum li gapis al la blua fumvolvaĵo eliĝanta el la cigaredo, subite torento da larmoj ekfluis malsupren sur liaj vangoj, kaj tiam li ekpensis ne nur pri Huniŭ, sed ankaŭ pri sia tuta vivo. Plurajn jarojn li estis en la urbo kaj jen tiel finiĝis ĉiuj liaj penadoj! Li aĉetis unu kaj ĝin perdis, aĉetis ankoraŭ unu kaj ĝin vendis! Du fojojn li atingis sian idealon, du fojojn li fiaskis, vane elportante ĉiujn tiujn suferojn kaj malĵustaĵojn. Nun restas al li nenio, nenio, eĉ lia edzino mortis! Vere Huniŭ estis megera, sed sen ŝi kian hejmon li povus havi? Ĉiuj objektoj en la ĉambro estis ŝiaj, kaj tamen ŝi jam estis enterigita ekster la urbo! Dum li pensis, amareco inundis lian animon, kaj liaj larmoj estis sekigitaj de flama kolero. Li do furioze suĉis sian cigaredon, li ripozigis sian kapon en la manoj, sentante la saman akran amarecon kiel en sia animo, tiel ankaŭ en sia buŝo, kaj

li forte dezirus kriegi aŭ sputi sian korsangon.

Ŝjaŭfuzi envenis oni ne scias kiam. Ŝi staris apud la haktabulon en la ekstera ĉambro, fikse rigardante lin. Kiam subite li levis sian kapon kaj vidis ŝin, la larmoj denove ekfluis rivere. En sia nuna stato li povus eklarmi eĉ ĉe vido de hundo, ĉar la apero de ia ajn viva estaĵo enigis lin al malĝojo-elverŝo. Li volus paroli kun ŝi, por ricevi iom da simpatio; sed liaj vortoj estis tro multaj por diri, kaj tial li restis silenta.

“Fraĉjo Ŝjangzi!” Ŝi iom proksimiĝis al li. “Mi jam ordaranĝis la objektojn.”

Li balancis la kapon, ne esprimante dankon al ŝi; ĉar en granda malĝojo ĝentileco estus malsincera.

“Kion vi intencas fari?”

“Ah?” Ŝajnis, ke li ne kaptis la sencon, sed tuj poste li ekkomprenis kaj skuis sian kapon – li ankoraŭ ne pensis pri tio.

Ŝi faris du paŝojn antaŭen kaj subite ruĝiĝis, montrante siajn blankajn dentojn, sed diris nenion. La vivo jam devigis ŝin forgesi pri pudoro, sed, kiam ŝi renkontis ion vere seriozan, ŝi estis ankoraŭ virino honesta, kiu penis agi konforme al la deco.

“Mi pensas...” Jen estas ĉio, kion ŝi diris. En la koro ŝi ja havis multon por diri, sed, kiam ŝi hontruĝiĝis, ĉio estis forgesita kaj ŝi povis memori eĉ ne unu vorton.

Malofte la homoj diras unu al alia la tutan veron, sed la ruĝiĝo de knabino estas pli esprimpova ol vortoj. Eĉ Ŝjangzi eksciis, kion ŝi volus diri. En liaj okuloj ŝi estas la plej bela virino, bela eĉ en ĉiuj siaj ostoj. Eĉ se ŝia tuta korpo estus kovrita de ulceroj kaj ŝia karno forputriĝus, li trovus ŝin bela. Ŝi estas bonaspekta, juna, kapabla kaj diligenta. Se li iam dezirus reedziĝi, ŝi estos lia ideala edzino. Sed nun li ne volas tion – estas tro frue por fari ian ajn planon. Sed, ĉar ŝi mem volas kaj estas pelata de la kruela realeco tion proponi tiel baldaŭ, ŝajnas al li, ke li ne povas ŝin rifuzi. Ŝi estas tiel bona kaj helpis al li tiom multe, ke al li restas nur konsente balanci la kapon. Li tre dezirus ĉirkaŭpreni ŝin kaj plori fortan ploron, por forplori el si la tutan kordoloron kaj poste rekomenci la vivon kun ŝi. En ŝi li trovus ĉian konsolon, kian viro povas kaj devas ricevi de virino. Kutime li estis silentema, sed kun ŝi kiel aŭskultanto, lia parolo certe ne estus senvalora. Ŝia kapobalanco aŭ ekrideto estus unu el la plej belaj respondoj kaj havigus al li la senton, ke li kvazaŭ vere havas sian hejmon.

Ĝuste tiam la dua frato de Ŝjaŭfuzi envenis. “Franjo! Paĉjo revenis!”

Ŝi kuntiris la brvovojn. Apenaŭ ŝi puŝmalfermis la pordon, Erĉjangzi jam troviĝis en la korto.

“Kion vi faras en la ĉambro de Ŝjangzi?” Erĉjangzi rondigis siajn okulojn kaj ŝanceliĝe paŝis al ŝi. “Jam estas sufiĉe hontinde, ke vi vin vendas! Ĉu vi ankoraŭ devas doni vian korpon senpage al Ŝjangzi? Vi senhontulino!”

Aŭdinte sian nomon, Ŝjangzi eliris kaj ekstaris malantaŭ Ŝjaŭfuzi.

“Mi diras al vi, Ŝjangzi!” Erĉjangzi penis elstarigi sian bruston, kvankam li ne povis eĉ rekte stari. “Mi diras, ĉu vi povas esti kalkulata kiel homo? Kial vi por nenio penas akiri ion prefere de ŝi ol de iu ajn alia? Fi al vi, aĉulo!”

Ŝjangzi ne volis bati ebruilon, sed li ne povis regi sian koleron. Li faris paŝon antaŭen. La briloj el la du paroj da sangruĝaj okuloj kvazaŭ kunfrapiĝis en la aero kaj ĵetis fajrerojn. Ŝjangzi ekkaptis la ŝultrojn de Erĉjangzi, levis lin kiel infanon kaj ĵetegis lin tre malproksimen.

Kun kordoloro Erĉjangzi trinkis kelkajn tasojn da brando kaj fariĝis furioza, ŝajnigante sin pli ebria ol li efektive estis. La falego preskaŭ malebriigis lin. Li volus fari rebaton, sed li sciis, ke li ne estas egalulo de Ŝjangzi. Aliflanke, se li silente forkurus, tio estus tro granda humiliĝo. Li do sidis sur la tero, ne volante leviĝi, sed, restante tie, li sentis sin ankaŭ embarasata. En sia konfuzo li povis nur grumbli: “Kial vi enmiksus vin en mian aferon, kiam mi admonis mian filinon? Vi batis min, ĉu? Malkhonoru al via avo! Vi iam pagos por tio!”

Ŝjangzi ne volis respondi. Li kviete atendis lian rebaton. Kun larmoj en la okuloj Ŝjaŭfuzi ne sciis, kion fari. Estus vane por ŝi diri ion por kvietigi la koleron de sia patro kaj, aliflanke, ŝi volis vidi lin plu batata de Ŝjangzi. Priserĉinte ĉiujn siajn poŝojn, ŝi trovis dekelkajn kuprajn monerojn, kiujn li donis al sia frato. En la ordinara tempo la knabo ne kuraĝis alproksimiĝi al sia patro, sed hodiaŭ, vidinte lin ĵetita teren, li kolektis sian kuraĝon. “Jen prenu ĝin. Prefere foriru!”

Erĉjangzi ĵetis straban rigardon al la mono, poste enpoŝigis ĝin kaj stariĝis, murmurante: “Ĉi-foje mi lasos vin bastardojn sen puno! Se vi min tro incitos, mi mortigos vin ĉiujn!” ĝuste elpaŝante el la korto, li kriis: “Nu, Ŝjangzi, nia afero ankoraŭ ne finiĝis. Ni renkontiĝos ekstere!”

Post kiam li foriris, Ŝjangzi kaj Ŝjaŭfuzi reiris en la ĉambron.

“Kion mi povas fari?” Ŝjaŭfuzi murmuris al si. Tiu ĉi frazo esprimis ŝian tutan mizeron kaj ankaŭ ŝian esperon, ke Ŝjangzi prenos ŝin al si, por doni al ŝi ian eliron.

Tamen tiu ĉi incidento igis Ŝjangzi ekvidi iajn ombrojn ĉirkaŭ ŝi. Li

ankoraŭ amis ŝin, sed li sentis, ke li ne povos preni sur sin la respondecon vivteni ŝiajn junajn fratojn kaj drinkeman patron. Li ne kuraĝis kredi, ke la morto de Huniŭ jam liberigis lin. Eĉ ŝi havis sian fortan flankon: almenaŭ ŝi multe helpis lin per sia mono. Li ne pensis, ke Ŝjaŭfuzi vivos tute el liaj enspezoj, sed estis ja fakto, ke ŝia familio estas nekapabla perlabori siajn vivrimedojn. Ami aŭ ne ami, la malriĉuloj devas fari sian decidonj laŭ mono. La “burĝonoj de amo” disvolviĝas en florojn nur inter la riĉuloj.

Li komencis paki siajn objektojn.

“Ĉu vi intencas transloĝiĝi aliloken?” Paliĝis eĉ ŝiaj lipoj.

“Jes!” Li malmoligis sian koron. En tiu ĉi mondo maljusta la malriĉuloj devas esti malmolkaraj por konservi sian iometon da libereco.

Ĵetinte al li rigardon, ŝi klinis sian kapon kaj foriris. Ŝi sentis nek malamon, nek koleron, nur malesperon.

Huniŭ estis enĉerkigita en siaj juveloj kaj iom pli belaj vestoj, kaj nun restis al Ŝjangzi nur ŝiaj kelkaj malnovaj vestoj, mebloj kaj kuiriloj. Ŝjangzi elektis kelkajn pli bonajn vestojn kaj metis ili aparte. Poste li forvendis ĉiujn aliaj vestojn, ĉiujn meblojn ktp sen marĉando al la brokantisto por dekkelkaj jŭanoj. Li volis transloĝiĝi aliloken kiel eble plej baldaŭ, por liberigi sin de tiuj objektoj, kaj tial li ne povis multe klopodi por serĉi tiun, kiu volus doni al li pli objektojn, en la ĉambro restis nur lia kunrulita litaĵo kaj la malnovaj vestoj sur la senmata briklito. Vidante la ĉambro tiel malplena, li sentis sin pli facila, kvazaŭ li jam forĵetus de si ĉiujn katenojn kaj nun estus libera forflugi malproksimen.

Tamen post momento li denove ekmemoris tiujn objektojn. La tablo jam estis for, sed ĝi lasis postsignoj remomorigis al li la mebojn, Huniŭ, ĉion, kio malaperis kiel sonĝo. Ĉu ili estis bonaj, ĉu malbonaj, sen ili lia koro ja havis neniu lokon por ripozi. Li sidis sur la rando de la briklito kaj elprenis cigaredon.

Kun la cigaredo elvenis el la poŝo ankaŭ unu ĉifita monbileto kaj senpripense li elpoŝigis sian tutan monon. Dum la lastaj tagoj li havis tiom multe da zorgoj, ke li neniu foje nombris ĝin. Estis amaso da mono: arĝentaj moneroj, unu-ĝjuaŭaj biletoj, unu fenaj biletoj kaj malgrandaj kupraj moneroj. Kvankam la amaso estis sufiĉe granda, tamen ĝi sumiĝis je apenaŭ dudek jŭanoj. Plus la dekkelkaj, kiujn li ricevis el la forvendo de la objektoj, lia tuta havaĵo estis nur iom pli ol tridek jŭanoj.

Li fiksrigardis la monon sur la briklito, ne sciante, ĉu ridi aŭ plori. En la ĉambro estis nenio alia krom li mem kaj tiu ĉi amaso da mucida, malpura mono,

kiu havis nenian signifon.

Li faris longan suspiron kaj reŝovis la monon en sian poŝon. Poste li levis sian litaĵon kaj la kelkajn vestojn kaj iris por trovi Ŝjaŭfuzi.

“Akceptu ĉi tiujn vestojn por via uzo. Mi lasos mian litaĵon ĉi tie por momento. Post kiam mi trovos rikiŝejon, kie mi povos loĝi, mi revenos ĝin preni.” Ne kuraĝante rigardi ŝin, kun kapo klinita li rapide diris la vortojn en unu spiro.

Ŝia sola respondo estis murmurita konsento.

Kiam Ŝjangzi, trovinte por si rikiŝejon, revenis por sia litaĵo, li vidis, ke la okuloj de Ŝjaŭfuzi ŝvelis de plorado. Ne sciante, kion alian diri, li penegis elbuŝigi nur: “Atendu min. kiam mia stato sufiĉe boniĝos, mi nepre revenos, nepre!”

Ŝi balancis la kapon, ankoraŭ silentante.

Ripozinte nur unu tagon, Ŝjangzi denove komencis la rikiŝotiradon. Li laboris ne plu tiel energie kiel antaŭe, nek malpeneme, sed nur lasis la tagojn pasadi en trankvileco. Tiel pasis ĉirkaŭ unu monato, dume li sentis sin tre kvieta kaj liaj vangoj iom rondiĝis, kvankam ili ne plu estis tiel sane ruĝaj kiel antaŭe. Li aspektis nek fortika, nek malforta. Liaj okuloj restis tre brilaj, sed sen esprimo; ili ĉiam ŝajnis tre viglaj, tamen ili kvazaŭ vidis nenion. Li estis kvazaŭ arbo post ŝtormo, staranta en la suno kviete kaj senmove. Kutime li ne amis babili, kaj nun li fariĝis eĉ pli silentema. La vetero jam sufiĉe varmiĝis, kaj la salikoj estis jam plene kovritaj de junaj verdaj folioj. Ifoje li tiris sian malplenan rikiŝon renkonte la la suno, kun kapo klinita kaj lipoj delikate moviĝantaj; alfoje li sidis kun vizaĝo turnita la la suno kaj dormetis momenton. Krom se devigate, li parolis preskaŭ kun neni. Li jam alkiŝiĝis al fumado. Kiam ajn li sidiĝis en la rikiŝo por atendi klienton, liaj grandaj manoj komencis palpi en la piedapogilo, kie li tenis siajn cigaredojn. Ekbruliginte cigaredon, malrapide li suĉis ĝin kaj elblovis la fumon, kaj liaj okuloj sin kroĉi al la fumspiraloj, kiuj ŝvebadis supren. Poste li balancis la kapon, kvazaŭ li jam venus al ia konkludo pri la fumo.

Li ankoraŭ kuris pli rapide ol plej multaj rikiŝistoj, sed li ne plu tutforte penis. Precipe ĉe vojkruciĝoj kaj sur deklivaj vojoj li estis preskaŭ tro singardema. Kiel ajn oni provokis lin al vetkuro, li ĉiam tenis sian kapon klinita kaj kuris per egalaj, pli-malpli rapidaj paŝoj, kvazaŭ li, plene seniluziĝinte, ne plu volus gajni premion, nek renomon.

Tamen en la rikiŝejo li amikiĝis kun multaj personoj malgraŭ sia silentemo,

ĉar laŭ li eĉ la silenta sovaĝa ansero amas flugi en la aro. Sen amikoj, lia soleco estus netolerebla. Ĉiufoje, kiam li elpoŝigis sian cigaredskatolon, li prezentis cigaredon runde al ĉiuj apudestantoj. Iafoje, kiam en lia skatolo restis nur unu cigaredo, kiun neniu volis elpreni, li tiam diris simple “Mi aĉetos plu!” kiam la aliaj faris hazardludon, li ne plu detenis sin for de ili kiel antaŭe, sed venis al ili por rigardi la ludon kaj iafoje eĉ aldonis vetaĵon, ne konsiderante, ĉu li perdos aŭ gajnos, kvazaŭ por montri, ke li estas unu el ili kaj scias, ke ili ĉiuj bezonas ian amuziĝon post la taga peniga laboro. Kiam ili trinkis alkoholaĵon, ankaŭ li tion faris, kvankam ne multe, kaj li eĉ pagis ĉies drinkaĵon kaj pladojn. Ĉio, kion li antaŭe malaprobis, nun ŝajnis al li pli-malpli pravigebla. Nun lia vojo jam pruviĝis neirebla, kial do ne konfesi, ke la vojo de aliaj eble estas ĝusta?

Kiam iu el liaj amikoj havis solenon geedziĝan aŭ funebran, li kontribuis per kvardek kupraj moneroj aŭ ia pli-malpli granda sumeto por kune aĉeti donacon, — afero, kian li neniam antaŭe faris. Plie, li eĉ iris mem esprimi kondolencon aŭ gratulon, ĉar li nun sciis, ke tiaj aferoj ja estas ne perdo de mono, sed esenca parto de la homa amikeco. La malĝojo aŭ ĝojo en tiaj okazoj estis vera – tie oni ne faris afektadon.

Sed malgraŭe tiujn tridekkelkajn jŭanojn li neniel kuraĝis tuŝi. Li per granda kudrilo mallerte enkudris la monon en pecon da blanka tolo kaj ĉiam kaŝis ĝin sub siaj vestoj plej proksime al la haŭto. Li ne volis ĝin elspezi, nek denove aĉeti rikiŝon. Li tenis ĝin ĉe si nur por eventuala uzo – oni ja neniam scias, kiam povos okazi ia katastrofo. Li povos iam fali en malsanon aŭ renkonti ian alian malfeliĉon neatenditan, kaj devas esti ĉiam preparita kontraŭ tio. Li nun sciis, ke la homo ne estas farita el fero.

Ĝuste antaŭ ol komenciĝis la aŭtuno, li ricevis laŭmonatan laboron. Ĝi estis pli malpeza ol liaj antaŭaj; alie li ne akceptus ĝin. Nun li jam sciis kiel elekti al si pli malpezan laboron. Se troviĝis konvena laŭmonata laboro, li ĝin akceptis; se ne, li preferis tiri okazajn pasaĝerojn. Li ne plu laboris tiel energie kiel antaŭe, sciante, ke li devas zorgi pri sia sano kaj ke, se rikiŝisto kuras tro rapide, kiel li faris antaŭe, tio signifas, ke li mortigas sin por nenio. Spertoj instruis al homoj, ke ili devas esti ruzaj – ĉiaokaze, oni havas nur unufojan vivon.

La loko, kie li nun laboris, estis proksime al la lamaejo Honghegong. Lia dunganto s-ro Ŝja estis instruita homo pli-ol-kvindekjara, kiu observis la leĝojn de la deco. Li havis edzinon kaj dek du infanojn. Tamen, malgraŭ tio, antaŭ nelonge li prenis al si konkubinon kaj, ne kuraĝante diri tion al sia familio, elektis tiun ĉi kvietan lokon, en kiu li fondis alian malgrandan familion. Ĝi

konsistis nur el s-ro Ŝja kaj la konkubino; ili havis servistinon kaj rikiŝiston – Ŝjangzi.

Tiu ĉi laboro tre plaĉis al Ŝjangzi. La domo estis malgranda kun nur ses ĉambroj, el kiuj s-ro Ŝja okupis tri, la kuirejo okupis unu kaj la servistoj la du aliajn. Ankaŭ la korto estis malgranda. Apud la suda muro kreskis juna jujubarbo kun dekelkaj ruĝetaj jujuboj sur siaj supraj branĉoj. Kiam Ŝjangzi balais la korton, al li nur kelkaj svingoj de balailo sufiĉis por balai ĝin de unu fino al la alia, kaj tio estis ekstreme facila. Vidante, ke estas neniu floro, kiu bezonus akvumadon, li ekintencis pritondi la jujubarbon; sed, konante la obstinan jujubarban naturon kreski tordita kaj malrekta, li detenis siajn manojn.

Ne peza estis ankaŭ la ĉefa laboro. S-ro Ŝja veturis al sia oficejo por labori en la mateno kaj ne revenis hejmen ĝis la kvina posttagmeze. Ĉio, kion Ŝjangzi devis fari, estis rikiŝe porti lin tien kaj hejmen. Reveninte hejmen, s-ro Ŝja neniam plu iris eksteren, kvazaŭ li sin kaŝus. Kvankam s-ino Ŝja neniam iris eksteren, tamen ŝi ĉiam revenis ĉirkaŭ la kvara, por ke Ŝjangzi povu per la rikiŝo porti ŝian edzon hejmen kaj tiel fini sian tutagan laboron. Plie, s-ino Ŝja iris nur al Dong'an-bazaro aŭ Parko Ĝongŝan, tial li ankaŭ havis multe da tempo por ripozi tie. Por li tio estis tiel facila kiel ludo.

S-ro Ŝja estis tre mondomaĝema kaj neniam vane elspezis kupran moneron. Kiam ajn li paŝis, li rigardis rekte antaŭen, kvazaŭ estus neniu kaj nenio ĉirkaŭe. Sed la sinjorino estis elspezema, kaj ĉiun duan aŭ trian tagon ŝi iris straten por fari aĉetojn. Se ŝi aĉetis mangajaĵon kaj ĝi ne plaĉis al ŝi, ŝi donis ĝin al la servistoj. Kiam ŝi volis aĉeti novajn objektojn, ŝi unue fordonis la malnovajn al ili, por ke ŝi poste povu elpostuli mononj de s-ro Ŝja por la aĉeto. Ŝajnis, ke la misio de s-ro Ŝja en la vivo estas klopodadi por dediĉi siajn energion kaj monon al sia konkubino – krom tio li havis neniun alian interesojn kaj ĝuon. Lia ĉiu monero elspeziĝis nepre pere de la manoj de lia konkubino; li mem neniam elspezis kupran moneron, por ne paroli pri donado de io ajn al alia. Lia leĝa edzino kaj liaj dek du infanoj loĝis en la urbo Baŭding kaj, laŭdire, iafoje eĉ en la daŭro de kvar aŭ kvin monatoj ili ricevis de li neniun moneron.

Al Ŝjangzi ne plaĉis tiu ĉi s-ro Ŝja, kiu, kun kurbigita dorso kaj suprentiritaj ŝultroj, ĉiam estis silentema, avara kaj severmiena. Kiam ajn li en-kaj eliris, li ŝtele paŝis kaj fiksas la okulojn sur siajn piedpintojn. Eĉ sidante en la rikiŝo li aspektis kiel malgrasa simio. En maloftaj okazoj kiam li diris ion, liaj vortoj nepre estis ofendaj, kvazaŭ ĉiu alia persono estus fripono kaj nur li estus honesta klerulo. Ŝjangzi abomenis tian homon. Sed okupo ja estas okupo, kaj se nur li povas ricevi pagon ĉiumonate, kial do li devus zorgi pri la cetero?

Plie, la sinjorino estis sufiĉe malavara kaj ofte donis al li bonan nutraĵon kaj iajn objektojn kiel donacon; nu, li do estu kontenta kaj portu lin simple kiel veran simion.

Fakte al Ŝjangzi ne aparte plaĉi la sinjorino, kiun li rigardis nur kiel virinon pli-malpli mon-donaceman. Ŝi estis multe pli bela ol Ŝjaŭfuzi, kiu neniel estis komparebla kun tiu parfumita kaj pudrita, vestita en silko kaj veluro. Sed, kvankam ŝi estis bela kaj elegante vestita, ŝi tamen rememorigis lin pri Huniŭ en ia stranga maniero. Ŝi similis Huniŭ ne per siaj vestoj, nek per sia vizaĝo, sed per io, kion ŝi havis en sia sinteno kaj konduto – pri tio li ne povis diri al si precize. Laŭ li ŝi kaj Huniŭ estis de la sama speco.

Ŝi havis nur dudek du aŭ dudek tri jarojn, tamen ŝi ŝajnis tre matura en siaj manieroj, kun nenia eco de nova edzino, same kiel Huniŭ, kiu neniam havis mildecon kaj hontemon de knabino. Ŝiaj haroj estis frizitaj, ŝi portis ŝuojn kun altaj kalkanumoj kaj ŝiaj vestoj estis fasonitaj por elmontri ŝiajn elegantajn liniojn dum ŝia gracia irado. Eĉ Ŝjangzi povis vidi, ke, kvankam ŝi estas en laŭmode eleganta tualetto, tamen ŝi ne havas la bontonecon de ordinara sinjorino, sed malgraŭe ŝi ne aspektis kiel tiu, kiu antaŭe estis prostituitino. Ne povante pli bone koni ŝin, li nur trovis ŝin tiel timinda kiel Huniŭ, kaj eĉ pli, ĉar ŝi estis pli juna kaj pli bela. Ŝi estis kvazaŭ la personiĝo de la tutaj ineksaj krueleco kaj malvirto, kiujn li jam spertis. Kaj li neniel kuraĝis rigardi ŝin rekte en la vizaĝon.

Post paso de kelka tempo li eĉ pli timis ŝin. Ŝjangzi apenaŭ vidis s-ron Ŝja elspezi monon, sed de tempo al tempo tiu ankaŭ aĉetis medikamenton en granda apoteko. Ŝjangzi ne sciis, kiaspecan li aĉetis, sed post ĉiu tia aĉeto gesinjoroj Ŝja ŝajnis aparte ĝojaj kaj precipe s-ro Ŝja, kiu kutime estis kvietia homo, montris eksterordinaran energion. Tamen post kelkaj tagoj li denove malvigliĝis kaj lia dorso eĉ pli kurbiĝis, simile al fiŝo aĉetita viva en la strato kaj denove metita en akvo, kie post momento da gaja naĝado ĝi baldaŭ kvietigis. Kiam ajn Ŝjangzi vidis, ke s-ro Ŝja sidas en la rikiŝo kvazaŭ fantomo, li sciis, ke jam estas tempo por denove aĉeti la medikamenton. Al Ŝjangzi ne plaĉis la viro, sed ĉiufoje, kiam li portis lin al la apoteko, li pretervole ekkompatis tiun ĉi malgrasan maljunan simion. Vidante, ke s-ro Ŝja revenis hejmen kun la medikamento, Ŝjangzi ekpensis pri Huniŭ kaj nedireble malgajiĝis. Li ne volis malami la mortinton, sed rigardante sin mem kaj s-ron Ŝja, li ne povis ne kulpigi ŝin. Estis fakte, ke li nun ne estis tiel fortika kiel antaŭe, kaj pri tio Huniŭ devis plejparte respondeci.

Li ekvolis forlasi la laboron, sed ŝajnus al li ridinde, se li tion farus el la

kaŭzo, kiu ne koncernis lin. Fumante cigaredon, li murmuris al si: “Ba! Kial do mi zorgu pri alies afero?”

Notoj:

1. Baŭding: Tiam ĉefurbo de Hebej-provinco, pli ol cent kilometrojn sude de Bejping.

XXI

Kiam la krizantemoj komencis aperi en la bazaro, s-ino Ŝja aĉetis kvar potojn da ili kaj la servistino Onjo Jang rompis unu el la potoj, pro kio ŝi estis superŝutita per insultoj. Onjo Jang venis el la kamparo, kaj por ŝi floroj kaj herboj ne estis io aparte valora. Tamen, ĉar ŝi jam difektis alies posedaĵon pro sia nesingardo, kiel ajn senvalora ĝi estis, ŝi ja kulpis kaj kuraĝis diri nenion. sed, kiam s-ino Ŝja plu kaj plu ĵetis sur ŝin cinikajn insultojn ĝis netolerebleco, tiu ĉi lasta ne povis deteni sin kaj komencis reciproki ŝiajn insultojn. Kiam kamparanoj tro ekscitiĝas, ili ne povas bridi sian buŝon, tial Onjo Jang ĵetis plej krudajn insultojn sur sian mastrinon. Pro tio s-ino Ŝja furioze kriegis kun salto kaj ordonis al Onjo Jang, ke ŝi tuj kunrulu sian litaĵon kaj foriru.

Ŝjangzi ne intervenis por ilin repacigi, ĉar li ne havis lertan langon kaj cetere la du partioj de la kverelado estis virinoj. Kiam li aŭdis, ke Onjo Jang nomas s-ion Ŝja ĉiesulino, li sciis, ke tiu certe maldungos ŝin, kaj antaŭvidis, ke kune kun ŝi ankaŭ li perdos sian laboron, ĉar s-ino Ŝja kredeble ne volos restigi en sia domo iun ajn serviston, kiu scias ŝian hontindan pasintecon. Post la foriro de Onjo Jang li atendis sian maldungiĝon pensante, ke tio okazos tiam, kiam la nova servistino jam alvenos. Sed li ne ĉagreniĝis, ĉar sperto jam instruis al li preni kaj perdi laborojn kun trankvilanimeco. Ne necesis ĉagreniĝi pro tio.

Kaj tamen, post kiam Onjo Jang foriris, s-ino Ŝja fariĝis eksterkute ĝentila al Ŝjangzi. Sen servistino ŝi devis mem fari kuiradon; ŝi donis al Ŝjangzi monon, ke li faru aĉeton de viando kaj legomoj. Kiam li revenis, ŝi diris al li, kion li lavu kaj kion li senŝeligu. Dum li faris, kion ŝi ordonis, ŝi hakis viandon kaj kuiris rizon, babilante kun li pri tio kaj alio.

Ŝi portis rozkoloran korsaĵon, nigran pantalonon kaj blankajn broditajn satenpantoflojn. Ŝjangzi mallerte faris sian taskon kaj ne kuraĝis ŝin rigardi, kvankam li tre dezirus levi la okulojn al ŝi, ĉar ŝia forta parfumo de tempo al tempo tiklis lian nazon, instigante lin turni la okulojn al ŝi, same kiel la aromo de floroj allogas la abelojn. Kaj pretervole Ŝjangzi ĵetis du ekrigardojn al ŝi.

Ŝjangzi konis la virinan timindecon kaj ankaŭ la virinan dolĉecon. Unu “Huniŭ” jam estas sufiĉa por igi iun ajn viron senti timon kaj ankaŭ voluptan inklinon al la ina sekso, tiom pli s-rino Ŝja, kiu estas multe pli apetita ol Huniŭ. Tion pensante, Ŝjangzi ne povis sin deteni kaj ĵetis rigardojn al ŝi. se ŝi estas same timinda kiel Huniŭ, ŝi tamen estas pluroble pli dezirinda ol ŝi.

Se ĉio ĉi okazus antaŭ du jaroj, li neniel kuraĝus ŝin tiel rigardi. Nun li tion faris, ĉar li, spertinta virinan tentadon, ne povis plu sin regi. Cetere, ĉar li jam suriris la vojon, kiun sekvas ordinaraj rikiŝistoj, kaj ĉion, kion ili opinias ĝusta, li nun trovas natura. Konstatinte, ke liaj penadoj kaj abnegacio atingis nenian rezulton, li venis al la opinio, ke la agmaniero de ĉiuj aliaj rikiŝistoj certe estas aprobinda, kaj vole nevole decidis mem nepre fariĝi unu el ili. Sin teni malsame de ili ja estas neeble. Kaj se estas pravigebla la espero de la ordinaraj mizeruloj ricevi ian profiton al ili nericevandan, kial do Ŝjangzi devas ne preni al si ion tian, kiam okazo sin prezentas? Li ĵetis rigardojn al ŝi: jes, ŝi estas nur virino! Se ŝi volontos, li ja ne povos rifuzi. Li ne kuraĝis kredi, ke ŝi povos agi tiel cinike, sed malgraŭe li ne volis forlasi sian esperon. Se ŝi ne ekagos, li kompreneble restos sen ago; sed se ŝi la unua esprimos sian intencon fari intimaĵojn kun li, li certe embarasiĝos. Eble ŝi jam faris tian esprimon? Alie kial ŝi, eksiginte Onjon Jang, ne tuj dungis alian servistinon kaj anstataŭe petis lin helpi al ŝi ĉe la kuirado? Kial ŝi tiom forte parfumis sin, antaŭ ol labori en la kuirejo? Ŝjangzi ne kuraĝis ion decidi kaj esperi, sed en sia korprofundo li tamen ial volus fari ian decidon kaj nutri ian esperon, kvazaŭ li songus tian belan songon, ke li, kvankam bone konsciante ĝian nerealecon, ne volus ĝin rompi. La vivo per ia varmoforto devigis lin rekoni sian senmoralecon, sed en tiu ĉi senmorala afero sin kaŝas plej granda ĝojo – aŭ eble plej granda aflikto!

Iom da espero vekis iom da kuraĝo, kaj la ioma kuraĝo estigis ardan deziron, kiu lian koron flamigis. En tia flamo estas nenia cinikeco: li kaj ŝi ambaŭ ne devas esti kalkulataj kiel cinikaj, ĉar ĉiun homon egale atakas la volupta pasio!

Iom da timo vekis la racion, kaj la racio estingis la korflamon, ke li preskaŭ volis tuj forkuri.; tie ĉi li sentis nur ĉagrenon, sciante, ke se li suriros tiun ĉi vojon, li certe kaŭzos al si malhonoron kaj honton.

Subita espero kaj subita timo alternis en lia koro, kio kvazaŭ malaro turmentis lin. Tiu ĉi turmento estis pli neeltenebla, ol kiam li unuafoje renkontis la tenton de Huniŭ. Tiam li, tute sensperta, kaptiĝis en ŝia reto, kvazaŭ abelete, unuafoje elfluginta el la abelujo, trafus en araneaĵon. Nun li jam sciis kiel esti singarda kaj kiel esti aŭdaca. Li volis, mem ne sciante kial, lasi sin vadi malsupren, sed en plena konscio li tamen timis falon!

Li ne malestimis tiun ĉi konkubinon, prostituitinon, belulinon, ĉar, kvankam ŝi estas ĉio ĉi tio, tamen ŝi estas ankaŭ nenio. Por pravigi tiun ŝian sintenon, li pensis, ke estas tiu malgrasa maljuna simio s-ro Ŝja, kiu estas abomeninda kaj riproĉinda. Kun tia edzo, kia li estas, ŝi neniel kulpus, kion ajn

ŝi farus; kaj kun tia dunganto li, Ŝjangzi, povus agi kiel al li plaĉas. Kaj li kuraĝiĝis.

Tamen ŝi ne donis atenton al liaj rigardoj, kaj post kiam la manĝaĵoj estis pretigitaj, ŝi sola manĝis en la kuirejo. Poste ŝi vokis Ŝjangzi kaj diris al li: “Manĝu kaj poste lavu la manĝilaron. Kiam vespere vi iros por porti la mastron hejmen, profitu la okazon aĉeti ion por la vespermanĝo kaj tiel vi ne bezonos denove iri sur la straton. Morgŭ estos dimanĉo. La mastro restos hejme, kaj mi devos eliri por trovi novan servistinon. Ĉu vi konas iun, kiun vi povus rekomendi al mi? Vere malfacile estas trovi taŭgan servistinon! Nu, manĝu tuj, alie la maĝaĵoj malvarmiĝos!”

Ŝi parolis tre nature, trankvile. Subite la rozkolora korsaĵo ŝajnis al Ŝjangzi multe malheliĝinta. Li iom senesperigis kaj poste li fariĝis hontema. Evidente, li ne plu estas homo honesta, li jam fariĝis malbonulo! Li formanĝis du bovlojn da rizaĵo, sentante nenian guston. Lavinte la manĝilaron, li iris en sian ĉambron kaj seninterrompe fumis oni ne scias kiom da cigaredoj.

Posttagmeze, portante s-ron Ŝja hejmen, li sentis fortan abomenon, li ne sciis kial, kontraŭ la malgrasa maljuna simio. Li tre dezirus plirapidigi la kuradon kaj abrupte forlasi la rikiŝon, por peze faligi la maljunulon ĝis duonmorto. Nur nun li ekkomprenis, kial la plej aĝa filo de la sinjoro, ĉe kiu li iam dungiĝis, preskaŭ ĝismorte venenis sian patron post malkovriĝo de sia kaŝita amrilato kun la tria kromedzino de sia patro. Antaŭe li opiniis, ke tion kaŭzis la impertinenteco de la tro juna, naiva sinjorido. Nun li ekkomprenis, kiel mortmerita estis tiu maljuna sinjoro. Sed li mem ja ne intencis mortigon. Li nur sentis, ke s-ro Ŝja estas abomena, malaminda, kaj bedaŭris, ke li ne povas lin puni. Li intence balancegis kelkfoje la timoneton por iom skui lin. La maljunulo diris nenion, kaj pro tio Ŝjangzi iom sentis konscienciproĉon. Li neniam antaŭe faris tian malicaĵon kaj, kvankam li nun havas bonan motivon por tio, li tamen ne povas sin pardoni. La konscienciproĉo faris lin iom pli apatia por ĉio. Kial do li devus intence kaŭzi al si malagrablaĵon? En kia ajn okazo, li estas rikiŝisto, kaj lia tuta devo estas bone servi al lia dunganto per rikiŝotirado. Kian utilon do alportus liaj pensoj pri aliaj aferoj?

Post kiam li kvietiĝis, li forgesis tiun ĉi sian senrezultan agon; kaj kiam li okaze rememoris ĝin, ĝi ŝajnis iom ridinda. La sekvantan tagon s-ino Ŝja eliris por trovi novan servistinon kaj baldaŭ revenis kun iu por provo. Ŝjangzi definitive perdis ĉiujn esperojn, kaj li sentis amaran bedaŭron en ŝia koro.

Post la tagmanĝo, lunde, s-ino Ŝia maldungis la novan servistinon, dirante, ke ŝi estas tro malpura. Poste ŝi sendis Ŝjangzi por aĉeti unu ĝinon da kaŝtanoj.

Alportinte la varmajn kaŝtanojn hejmen, li vokis al ŝi de ekster la pordo de ŝia ĉambro.

Li eniris kaj trovis ŝin pudranta sian vizaĝon antaŭ la spegulo. Ŝi ankoraŭ portis la rozkoloranj korsaĵon, sed jam ŝanĝis la pantalonon je helverda. Ekvidinte lin en la spegulo, ŝi rapide turnis sin kaj ekridetis al li. En tiu ĉi rideto Ŝjangzi kvazaŭ vidis Huniŭ, junan kaj belan Huniŭ. Li staris tie senmove kiel ligno. Forvaporiĝis liaj kuraĝo, espero, timo kaj singardemo, restis nur varma spiro, kiu lin subtenis. Tiu ĉi spiro estis lia movforto – li jam ne havis sian propran volon.

En la vespero de la sekvanta tago, li revenis kun sia litaĵo al la rikiŝejo.

Pri tio, kion antaŭe li plej timis kaj plej prihontis, li nun ŝerce parolis al ĉiuj: li jam ne povis facile urini!

Ĉiu konkure diris al li, kian medikamenton li aĉetu kaj kiun kuraciston li vizitu. Neniu trovis tion honinda, sed ĉiu simpatie donis al li konsilon kaj, kun iom da hontruĝo sur la vizaĝo, fiere rakontis sian similan travivaĵon. Iuj junaj rikiŝistoj iam pagis monon por ricevi tian malsanon; pluraj mezaĝuloj siatempe senpage ricevi tian malsanon; pluraj mezaĝuloj siatempe senpage ricevis ĝin; aliaj, kiuj antaŭe laboris kiel laŭmonataj dungitoj, iam troviĝis en preskaŭ la sama situacio; ankoraŭ aliaj, kiuj mem ne spertis tion, havis diversajn historiojn pri siaj dungintoj, tre indajn je rakontado. La malsano de Ŝjangzi vigligis al ili la langon kaj igis ilin tre intime interparoli. Kvankam li forgesis sian hontemon, tamen li ne sentis fieron. Li toleris ĝin kun rezignemo, same kiel oni eltenas malvarmumon aŭ mildan sunfrapon. Kiam lin turmentis doloro, li iomk pentis, kaj kiam la doloro estis for, li denove ĝuis la rememoron pri la ioma dolĉeco kaj agrableco. En kia ajn okazo, li ne estis maltrankvila. La vivsperto jam instruis al li subtaksi la vivon. Kial do esti maltrankvila pro ĝi?

La medikamentoj kaj preskriboj kostis al li dekkelkajn jŭanojn, tamen li ne estis komplete kuracita kontraŭ tiu malsano, ĉar kiam li iom resanĝis, li tuj ĉesis preni medikamenton. Kaj kiam liaj artikoj doloris dumpluvaj tagoj aŭ ĉe sezonŝanĝiĝo, li ree prenis iom da medikamento aŭ eltenis la doloron ĝis ĝia forpaso. Li tute ne zorgis pri tio. Se la vivo jam estas tiel amara, kian signifon do havas la sano?

Kiam li finfine resaniĝis, li ŝanĝiĝis al preskaŭ alia homo. Li estis ankoraŭ tiel alta, sed ne plu tiel fortika. Li intence lasis siajn ŝultrojn iom antaŭen pendantaj kaj tenis cigaredon oblikve inter la lipoj. Iafoje li alfiksas cigaredstumpon malanaŭ sia orelo, ne ĉar tio estis oportuna loko, sed por fari sin plaĉaspekta. Li estis ankoraŭ silentema, sed, kiam li volis, li povis ankaŭ

diri iajn spritaĵojn, kvankam ili estis ne naturaj, nek lertaj. Li ne plu havis ian celon, al kiu li strebus, kaj tial li fariĝis malpenema kaj sin tenis ĉiam malvigle, neserioze.

Tamen, kompare kun siaj kamaradoj li ankoraŭ ne estis tiel malbona. Kiam li estis sola kaj rememoris, kia li antaŭe estis, li ankaŭ deziris refariĝi bona. Li ne volis plu lasi sin tiel defali. Kvankam ambicio donis nenian rezulton, tamen sindetruo ne estas kalkulata kiel prudenta ago. En tiaj tempoj li denove pensis pri rikiŝoaĉeto. El siaj iom pli ol tridek jŭanoj li jam elspezis dekkelkajn por kuraci sin de la malsasno. Kia vana perdo! Sed, havante la dudek li ja povas kun pli da certeco fari ion ajn ol tiuj, kiuj ne havas eĉ unu groŝon. Tiel pensante, li tre volus forĵeti la duonskatolon da cigaredoj, kiuj estis al li, kaj de tiam abstini de tabako kaj alkoholaĵo por ŝpari monon. Poste liaj pensoj direktiĝis al Ŝjangzi kaj li eksentis sin iom kulpa kontraŭ ŝi. De kiam li forlasis la korton, li neniam reiris tien ŝin viziti. Nun li ne sole ne fariĝis bonstata, sed kontraŭe estis trafita eĉ de hontinda malsano!

Kaj tamen kiam li estis kun amikoj, li ankoraŭ fumis kiel antaŭe kaj, kiam ajn li tute forgesis Ŝjangzi. En la rondo de siaj amikoj li neniam propramove invitis aliajn fari ion ajn, sed li ne povis rifuzi, kion ili proponis, kaj ilin akompanis. La tagan penegadon kaj la ĉagrenon en la koro li povis forgesi portempe nur tiam, kiam li parolis kaj ŝercis kun ili. La momenta ĝuo povis forpeli altajn idealojn; li volis iom amuziĝi kaj poste fali en profundan pezan dormon. Kiu do ne preferus tion, vivante vivon tiel sencelan, amaran kaj senesperan? La ulcerojn de vivo oni povis portempe sendolorigi nur per tabako, alkoholaĵo kaj virinoj. Lasu venenon batali kontraŭ veneno. Ĉiu ja scias, ke pli aŭ malpli frue venos tago, kiam la veneno atakos la koron; sed kiu havus pli bonan eliron?

Lia sinkompato kreskis kun lia malpenemo. Antaŭe li timis nenian penigan laboron, nun li fariĝis komfortama: en ventaj aŭ pluvaj tagoj li ne eliris al laboro; se li sentis ian doloron aŭ doloreton, li ripozis du aŭ tri sensekvajn tagojn. Sinkompato faris lin egoisma. Li ne volis pruntedoni al iu ajn eĉ unu groŝon el sia mono, kiun li tenis ĉe si ekskluzive por la elspezoj dum tiuj ventaj aŭ pluvaj tagoj. Li povis prezenti al aliaj cigaredojn kaj brandon, sed pruntedoni monon li ne volis. Li opiniis, ke li mem pli multe meritas kompaton kaj prizorgon ol iu ajn alia. Ju pli li evitis penojn, des pli mallaborema li fariĝis kaj, enuante pro nenifarado, li ofte bezonis ian amuziĝon aŭ aĉeti ion bongustan por manĝi. Eĉ kiam venis al li en la kapon la penso, ke li ne devas tiel malŝpari la tempon kaj monon, li sin pravigis per argumento, kiun li ĉerpis el siaj multaj

spertoj: “Antaŭe mi multe strebis al mia celo, sed kion bonan mi riklotis el tio?” Ĝi estis nerefutebla kaj neresponebla, kaj tial nenio povis deteni Ŝjangzi de sindetruado.

Mallaboremo povas fari la homon kolerema, kaj nun Ŝjangzi fariĝis tre kruda al aliaj. Li ne plu estis cedema al klientoj, policanoj kaj iu ajn alia. Antaŭe, kiam li diligente laboris, li neniam ricevis justecon. Nun li jam konis la valoron de sia ŝvito, kaj se li povis ŝpari unu guton, li tion faris. Oni absolute ne plu povis preni de li profiton! Li ĉiam parkis sian rikiŝon kie al li plaĉis, ne konsiderante ĉu permesite aŭ ne. Kiam policano venis por lin foririgi, li argumentis kaj persiste restis sur la loko tiel longe, kiel li povis. Kiam evidentiĝis, ke li devas sin movi de tie, li fariĝis eĉ pli kriema kaj komencis insulti. Se la policano ne toleris liajn insultojn, tiam pugnobatalo estis por nenio serioza, ĉar li sciis, ke li estas forta. Ne konsiderante, ĉu li povos iri aŭ ne en malliberejon por kelkaj tagoj, li donis al la policano solidajn batojn. En pugnobatalo li sentis sin forta kaj kapabla. Bategante iun per la tuta forto, li estis tiel ekzaltita, ke la suno ŝajnis al li aparte brilanta. Antaŭe li neniam songis pri sia partopreno en pugnobatalo, tamen nun li eĉ trovis en ĝi plezuron. Kiel ridinda tio estas!

Lin timigis nek la senarmaj policanoj, nek la aŭtomobiloj sur la stratoj. Kiam aŭtomobiloj impete kuris al li, levante polvon post si, li rifuzis cedi al ili la vojon, kiel ajn laŭte sonoris iliaj hupoj kaj kiel ajn time kriegis la pasaĝeroj. Nur kiam la aŭtomobilo estis devigita malrapidiĝi, li deflankiĝis, por eviti enspiri multe da polvo. Kaj li faris la samon, kiam la aŭtomobilo venis de malanatiĝo. Sciante, ke neniu ŝoforo kuraĝas kurigi sian aŭtomobilon rekte al li, li ne komprenis, kial oni devas cedi la vojon jam tiam, kiam la aŭtomobilo estas ankoraŭ tre malproksime, kaj lasi al ĝi levi la tutan polvon sur la strato. Policanoj liberigis la vojon nur por motorveturiloj, ĝuste por ke ili povu rapide kuri kaj tiel levi pli da polvo. Ŝjangzi, kiu ne estis policano, kompreneble ne volis permesi ilin senbride kuregi. En la okulo de la policanoj li estis “akra pikilo”, kaj neniu el ili kuraĝis lin provoki. Inter la malriĉuloj mallaboremo estas la natūra sekvo de vana penado, kaj ilia “akrapikileco” ja havas ian justecon.

Li ankaŭ rifuzis esti kompleza al siaj klientoj. Li tiris ilin nur tien, kien ili diris, neniu paŝon pli. Se ili diris al li la “buŝon” de iu strateto, kaj poste petis, ke li tiru ilin “en” ĝin, absolute neeble! Se lia kliento pafis lin per furioza rigardo, li rigardis lin per pli vaste rondigitaj okuloj. Li sciis, kiel forte la sinjoroj timas, ke iliaj okcident-stilaj vestoj fariĝos malpuraj, kaj kiel arogantaj

kaj avaraj la pli multaj el ili estas. Kaj tial, se ili ekflamis per kolero, li estis preta ekkapti unu el la manikoj de iliaj sesdekjūanaj jakoj, por meti sur ĝin grandajn nigrajn fingrosignojn. Post tio ili ankoraŭ estis devigitaj pagi al li laŭ lia postulo, eksciinte, kiel granda estas la forto de lia granda mano, kiu dolorige premis iliajn maldikajn brakojn.

Li kuris ankoraŭ sufiĉe rapide, sed li neniel volis plirapidigi la kuron por nenio. Se lia kliento lin urĝis, li tuj lasis siajn grandaj piedojn frotiĝi sur la tero kaj demandis: “Kiom da mono por pli rapida kuro?” Kiel do estis kompleza li ja vendas sian ŝviton kaj sangon. Li jam ne plu nutris la esperon, ke ili malavare donacos al li pli da groŝoj. Ĉio havas sian prezon, kiu devas esti anticipite fiksita, antaŭ ol oni komencas fari fortostreĉon.

Li ne plu zorgis pri la rikiŝo kiel antaŭe. Post kiam li forlasis la ideon aĉeti al si rikiŝon, rikiŝo fariĝis indiferenta por li, des pli tiu de alia. Rikiŝo estas nur rikiŝo. Tirante ĝin li povis perlabori siajn vivrimedojn kaj ĝian lupagon. Se li ĝin ne tiris, li ne bezonis pagi la lupagon; kaj tial, se li nur havas sufiĉe da mono por unutaga nutraĵo, estis ne plu necese tiri ĝin eksteren. Tia estis la tuta interrilato inter homo kaj rikiŝo. Kompreneble, li ne volis intence difekti alies rikiŝon, sed al li ankaŭ ne estis necese doni apartan prizorgon al ĝi. Se hazarde iu alia rikiŝisto kunfrappe difektis ĝin, anstataŭ eksplodi de kolero, li kviete tirus ĝin returne al la rikiŝejo. Se oni postulis pagi kvinj ĝjaŭojn por la difekto. Li elpoŝigis nur du ĝjaŭojn kaj nenion pli. Se la rikiŝejomastro protestis, do, por solvi la aferon, plej bone estis fari pugnobatalon. Se la mastro tion volis, Ŝjangzi estis preta akcepti la batalon.

La vivo sin nutras per spertoj, kiuj formas la homan karakteron – estas neeble kreskigi peoniojn en la dezerto. Ŝjangzi nun jam estis en la vojsulko de la rikiŝista vivo: li estis nek pli bona, nek pli malbona ol aliaj rikiŝistoj, kvazaŭ li estus muldita en la sama muldilo kiel aliaj rikiŝistoj. Tiel li efektive sentis sin pli komforte kaj la aliaj ankaŭ volonte akceptis lin. Ĉiuj korvoj estas nigraj, kaj li ne volis esti la sola blanka inter ili.

La vintro denove venis. Dum nur unu nokto la sabloportanta vento el la dezerto povis frostmortigi multajn homojn. Aŭskultante la ventofajfadon, Ŝjangzi kuŝis kun sia kapo kaŝita sub la litkovrilo kaj ne kuraĝis releviĝi. Nur post kiam la venta ululado ĉesiĝis, li vole nevole ellitiĝis kaj hezitis, ĉu iri eksteren aŭ ne. Li ne volis teni tiujn glacie malvarmajn timonetojn en la manoj kaj timis la sufokan, naŭzan venton. Je la kvara posttagmeze la suno komencis subiri kaj la vento plene kvietiĝis; la polvoflava ĉielo estis delikate borderita de la vesperruĝo. Li truddevigis sin iri eksteren kaj, kun la manoj enŝovitaj en la

manikoj kaj kun duonfumita cigaredo pendanta inter la lipoj, promenis malrapide kaj malvigle, puŝante per sia brusto la transversan stangon de la timonetoj.

Post paso de iom da tempo falis la krepuska mallumo. Li esperis baldaŭ ekhavi klienton, ke li povu pli frue ĉesigi la laboron. Li estis tro malagema por ekbruligi siajn lampojn, kaj nur post kiam policanoj plurfoje lin urĝis, li ilin eklumigis.

Sub la strataj lampoj antaŭ la Tambura Turo li sukcesis akiri klienton kaj komencis tiri lin al la orienta urboparto. Ne demetinte sian dikan vatitan robon, li trotis antaŭen. Li sciis, ke tio donas al li nedecan aspekton, sed tion li ne priatentis. Ĉu oni volus pagi pli multe pro la bona aspekto de rikiŝisto? Ŝajnis, ke nun li ne rikiŝotiras, sed nur pasumas! Eĉ kiam sur lia frunto aperis ŝvitaj gutoj, li ankoraŭ ne volis demeti sian robon. En malgranda strateto unu hundo, probable nekutimante al rikiŝisto portanta longan robon, sekvis lin kun bojoj. Li haltis, ekprenis la polvoforigilon je la tola ekstremaĵo kaj persekutis la hundon. Forpelinte ĝin kaj atendinte kelkan tempon por certiĝi, ke ĝi ne revenos, li kontentiĝis kaj blasfemis: “Malbenon al vi! Ĉu vi pensas, ke vin mi timas?”

“Kiaspeca rikiŝotiristo do vi estas?” lia kliento kolere demandis.

Ŝjangzi streĉis siajn orelojn: la voĉo estis al li konata. En la strateto estis tre mallume, kaj kvankam brilis liaj lampoj, tamen la radioj direktiĝis malsupren, ke li ne povis klare vidi la vizaĝon de sia kliento. La homo portis kapuĉon kaj envolvis siajn buŝon kaj nazon en grandan koltukon, lasante nur la okulojn nekovritaj. Ŝjangzi ankoraŭ scivolis, kiu li estas, kiam la homo demandis:

“Ĉu vi estas Ŝjangzi?”

Ŝjangzi ekkomprenis, ke la homo estas Kvara Sinjoro Liŭ. Li preskaŭ senkonsciiĝis kaj tutkorpe ekflamiĝis. Dum momento li ne sciis, kion fari.

“Kie estas mia filino?”

“Mortis!” Ŝjangzi staris senmove sur sia loko, apenaŭ povante rekoni sian propran voĉon.

“Kio? Mortis?”

“Mortis!”

“En viaj manoj malbenindaj, kio alia povus okazi?!”

Ŝjangzi subite sin retrovis. “Eliĝu, eliĝu! Vi estas tro maljuna por ricevi miajn batojn, do eliĝu el mia rikiŝo!”

Kvara Sinjoro Liŭ malsupreniris el la rikiŝo, tremante. “Diru al mi, kie ŝi estas enterigita?”

“Tio ne estas via afero!” Ŝjangzi reprenis la timonetojn kaj foriris.

Irinte sufiĉe longan distancon, li turnis sian kapon kaj vidis, ke la maljunulo — granda nigra ombro, ankoraŭ staras tie en la strateto.

XXII

Ne sciante kien iri, Ŝjangzi sencele paŝadis antaŭen kun levita kapo kaj kun brilantaj okuloj, firme tenante la rikiŝajn timonetojn. Li sentis sin senzorga kaj ĝoja, kvazaŭ li jam elverŝus sur Kvaran Sinjoron Liŭ la tutan amaron, kiun li gustumis de post sia edziĝo al Huniŭ. Forgesinte la malvarmon kaj sian laboro, li volis nur plu kaj plu iradi antaŭen, kvazaŭ en iu loko li povus trovi sian malnovan memon, tiun senzorgan, honestan, ambician kaj peneman Ŝjangzi.

Ne necesis plu diri pri tiu nigra ombro, tiu maljunulo, kiu staris en la mezo de la strateto. Triumfante super Kvara Liŭ, li triumfis super ĉio. Kvankam li ne batis per la pugno aŭ la piedo de la maljunulon, tamen tiu perdis sian ununuran samfamilianon, dum li, Ŝjangzi, denove fariĝis tute libera kiel birdo aera. Se tio ne estus ties meritita puno, kio do estus? Eĉ se la maljunulo ne mortus de kolero, tio kredeble jam iĝis lin stari per unu piedo en la tombo! Maljunulo Liŭ havas ĉion, Ŝjangzi nenion, tamen Ŝjangzi povas tiri rikiŝon sen ĉagreno, dum la alia eĉ ne scias, kie estas la tombo de lia filino. Maljunulo Liŭ povas havi amason da mono kaj timindan temperamenton, sed li ne povas vekti eĉ sengroŝan rikiŝiston, kiu apenaŭ povas plenigi sian stomakon.

Ju pli li pensis pri tio, des pli li fariĝis bonhumora, tiel ke li tre volus laŭte kanti triumfan kanton, por ke la tuta mondo sciu, ke li, Ŝjangzi, reviviĝis, triumfis.

Kvankam la nokta glacia aero tranĉis lian vizaĝon, tamen li sentis ĝin ne malvarma, sed, kontraŭe, multe agrabla. La strataj lampoj verŝis malvarman lumon, sed lia koro estis plena de varmo, kaj ĉie estis lumo, kiu prilumis lian estontecon. Li ne fumis cigaredon jam sufiĉe longan tempon, sed li ankoraŭ ne havis la deziron je tio. De nun, neniam plu tabakon, nek alkoholaĵon; Ŝjangzi volis transturni novan paĝon, laboregi kaj penegi kiel antaŭe. Hodiaŭ li jam venkis Kvaran Liŭ, venkis lin por ĉiam. La malbeno de la maljunulo plenigis Ŝjangzi nur per pli granda espero pri sukceso.

Lia malamo, kiel elspiro de malpura aero, jam estis ellasita: de nun li ĉiam spiros freŝan aeron. Pririgardinte siajn manojn kaj piedojn, li konstatis, ke li estas ankoraŭ juna. Li volis, ke li restu ĉiam juna. Lasu Huniŭ morti, kvanran Liŭ morti, kaj li, Ŝjangzi, mi plu vivos, feliĉa kaj ambicia. Ĉiuj malbonuloj ricevos sian merititan punon kaj mortos: tiuj soldatoj, kiuj rabis lian rikiŝon, s-ino Jang, kiu malsatigis siajn servistojn, Huniŭ, kiu lin mistifikis kaj

subpremis, Kvara Liŭ, kiu lin malestimis, detektivo Sun, kiu lin ĉantaĝis, Avino Cen, kiu lin trompis kaj s-ino Ŝja, kiu lin tentis... ili ĉiuj mortis aŭ mortos. Nur honesta Ŝjangzi ĉiam vivos!

“Sed Ŝjangzi,” li diris al si, “de nun vi nepre devas pli bone labori.” “Kial do ne? Mi havas la volon, la forton, kaj mi estas juna!” li respondis kaj certigis sin, “Kiam mi sentas min feliĉa, kiu povus bari al mi la vojon al mia celo? Kun ĉio, kion mi suferis, kiu alia ne deprimiĝus kaj defalus de siaj esperoj? Sed ĉio tio jam estis for. De morgaŭ, mi estos nova Ŝjangzi, eĉ pli bona, multe pli bona, ol iam ajn antaŭe.”

Murmure dirante al si, li energie rapidigis siajn paŝojn, kvazaŭ por pruvi, ke tion, kion li diris, li nepre plenumos, kaj por tio li ja havas ankoraŭ fortikan korpon. Estis ne grave, ke li iam malsaniĝis kaj eĉ estis trafita de la hontiga malsano. Tiu ĉi lumigo en lia animo certe tuj refortigos lian korpon. Ŝvitante kaj soifante, nun li ekvidis, ke li jam atingis la pordegon Hoŭmen. Ne volante iri al la tetrinkejo, li parkis sian rikiŝon ĉe la rikiŝoparkadejo okcidente de la pordeto, vokis al si te-vendantan infanon, kiu portis grandan argilkruĉon en unu mano kaj flavan fajnenbovlon en la alia, kaj englutis du bovlojn da malbonkvalita teo. Ĝi malagrabla gustis, sed li diris al si, ke de nun li trinkos nur tian teon: li ne devas plu malŝpari monon sur bona teo kaj bona nutraĵo. Antinginte tiun ĉi decidon, li intencis ankaŭ manĝi ion malfacile engluteblan kaj per tio komenci sian novan vivon peneman kaj ŝpareman. Li do aĉetis dek nesufiĉe frititajn pastbulojn, kiuj estis faritaj el malaltkvalita faruno kaj farĉitaj nur per brasikaj folioj. Ili gustis terure malbone, sed li englutis ilin kaj viŝis al si la buŝon per la mandorso. Nun kien do li iru?

Restis nur du homoj, al kiuj li povis fidi kaj devis sin turni, se li volis atingi sukceson en sia strebado, nome Ŝjaŭfuzi kaj s-ro Caŭ. S-ro Caŭ estas “saĝulo”, kiu certe komprenos lin, helpos lin kaj donos al li konsilon. Se li sekvas la konsilojn de s-ro Caŭ kaj havos Ŝjaŭfuzi kiel sian kunulinon, li certe sukcesos, mem laborante ekstere kaj havante ŝin kiel mastrumantinon hejme; kaj tio estos absolute certa, senduba.

Sed ĉu s-ro Caŭ jam revenis? Ne grave. Morgaŭ li iru al la strato Beĵĉangĝje kaj informiĝu pri tio. Se li ne povos ricevi precizan informon de tie, li sin turnu al la domo de s-ro Zŭo. Ĉio estos en ordo, se li nur trovos s-ron Caŭ. Nu, bone, hodiaŭ li do rikiŝotiros la tutan nokton kaj morgaŭ matene iros viziti s-ron Caŭ kaj poste vidi Ŝjaŭfuzi. Li diros al ŝi la bonan novaĵon: kvankam Ŝjangzi ankoraŭ ne prosperis, tamen li diligente laboras kaj volas klopodi kune kun ŝi.

Tiuj ĉi planoj ĵetis lin en ĝojon, kaj liaj okuloj, brilantaj kiel tiuj de aglo, estis turnitaj jen tien, jen ĉi tien. Ekvidinte pasaĝeron, li tuj kuris al tiu kaj demetis sian vatitan robon eĉ antaŭ ol ili finis la prezodiskuton. Kvankam liaj kruroj jam ne estis tiel fortaj kiel antaŭe, tamen, subtenate de ekzaltiĝo, li kuregis tre rapide! Kiel ajn estis, li ankoraŭ estis Ŝjangzi kaj, se li plenforte kuris, neniu ja povis lin superi per rapideco. Li preterpasis ĉiujn aliajn rikiŝistojn, kiujn li kuratingis, kvazaŭ li estus freneziĝinta. Lia korpo estis banata de ŝvito. Portinte unu pasaĝeron al la celo, li sentis sin multe pli malpeza, liaj kruroj reakiris sian elastecon: li ankoraŭ estis preta por plu kuri, kiel ĉampiona ĉevalo, kiu ankoraŭ ne sufiĉe kuris kaj stamfas post vetkuro. Li revenis al la rikiŝejo nur je la unua nokte, kun pli ol naŭ ĝjaŭoj en sia poŝo, ne inkluzive la rikiŝan lupagon.

Li dormis ĝis la tagiĝo. Li rulis sin sur la alian flankon kaj ree malfermis siajn okulojn nur kiam la suno jam alte staris sur la ĉielo. Nenia ĝuo estas pli dolĉa ol la ripozo post laciĝo. Li sin etendis kaj aŭdigis kraketojn el siaj artikoj. Lia stomako estis malplena kaj li estis malsatega.

Manĝinte iom da nutraĵo, li ĝoje diris al la mastro de la rikiŝejo: “Mi ripozos unu tagon. Mi havas aferon por aranĝi.”

Li jam ŝpinis planon en la kapo: hodiaŭ li finaranĝos la tutan aferon kaj morgaŭ li komencos novan vivon.

Li direktis sin rekte al la strato Bejĉangĝje por vidi, ĉu s-ro Caŭ jam revenis aŭ ne. Dum li marŝis, li preĝis en si: Estu hejme s-ro Caŭ, ne lasu al mi vane klopodi! Se malbona estos al la komenco, ĉio ne povos iri glate. Nun kiam Ŝjangzi jam decidis transturni novan paĝon, Ĉielo certe gardos lin!

Li haltis ekster la domo de s-ro Caŭ kaj premis la sonorilon per tremanta mano. Kiam li atendis, lia koro batis en la gorĝo; forgesinte la tutan pasintecon, li atendis nur tion, ke tiu ĉi konata pordo malfermiĝu kaj montriĝu konata vizaĝo. Li atendis. Eble interne estas neniu homo, alie kial estas tiel silente, tiel timige silente? Subite li aŭdis ian sonon el interne kaj li ektimiĝis. La pordo knare malfermiĝis kaj tuj eksonis la plej kara, plej amika voĉo: “Ha!” Tio estis Onjo Gaŭ.

“Ŝjangzi? Longe nevidite! Ho, vi jam malgrasiĝis!” Onjo Gaŭ efektive iom plidikiĝis ol antaŭe.

“Ĉu la sinjoro estas hejme?” Tio estis ĉio, kion Ŝjangzi povis diri.

“Jes, hejme. Ho, kia bona peco estas vi, kiu pensas nur pri la sinjoro, kvazaŭ ni du tute ne konus unu la alian! Kaj vi eĉ ne diris al mi bonan matenon! Nu, eniru.”

Kiam ili paŝis internen, ŝi demandis: “Ĉu la aferoj prosperas al vi?”

“Hm, ne tiel bone!” Ŝjangzi ekridetis.

“Sinjoro!” Onjo Gaŭ vokis ekster la kabineto. “Jen venas Ŝjangzi!”

S-ro Caŭ estis movanta la narcisojn en la sunlumon. “Envenu!”

“Nu, eniru. Ni do babilu pli poste. Nun mi iros diri tion al la sinjorino – ni ja ofte parolas pri vi. Malsaĝulo estas pli ŝatata, estas vere!” Litanie dirante Onjo Gaŭ foriris.

Ŝjangzi eniris. “Sinjoro, jen mi estas!” Li sentis, ke li devas diri vorton de saluto, sed li ne povis elbuŝigi.

“Ah, Ŝjangzi!” S-ro Caŭ staris en la kabineto, li portis mallongan jakon kaj sur lia vizaĝo vidiĝis afabla rideto. “Sidiĝu!” Li pensis momenton. “Jam antaŭ longe ni revenis. Laŭ-Ĉeng diris al mi, ke vi estas ĉe la Rikiŝejo Harmonio. Onjo Gaŭ eĉ iris vinj scrĉi, sed ne trovis vin. Sidiĝu. Kiel vi fartas? Kiel iras via afero?”

Larmoj eksidis en la okuloj de Ŝjangzi. Liaj plej intimaj pensoj estis skribitaj per sango kaj kaŝitaj en la plejprofundo de lia koro. Li ne sciis, kiel esprimi ilin al iu ajn alia. Li silentis kelkan tempon, por provi tiun korsangon en simpalaj vortojn. Ĉio estis freŝa en lia menso, necessis nur ordigi la tuton iom post iom. Li havis vivan historion por rakonti kaj, kvankam li ne sciis ĝian signifon, tamen liaj suferoj estis efektivaj, nedubebblaj.

S-ro Caŭ vidis, ke li estas absorbita en siaj pensoj, kaj sidiĝis en silento, por atendi lin ekparoli.

Ŝjangzi staris senmove kun klinita kapo kelkan tempon. Subite li levis la kapon kaj rigardis s-ron Caŭ, kvazaŭ volante diri, ke li preferus resti silenta, se neniu volus aŭskulti lin.

“Diru do!” S-ro Caŭ balancis la kapon al li.

Kaj li komencis rakonti pri sia pasinteco, komencante de sia veno el la kamparo al la urbo. Li propre ne volus mencii tiujn senutilajn aferojn, sed, se li ne tion dirus, li ne sentus sian koron trankvila, kaj lia rakonto estus nekompleta. Liaj memoroj, formitaj el sango, ŝvito kaj doloro, ne povis esti facilanime eldiritaj, kaj tial li ne volis preterlasi ion ajn dum la rakontado. Ĉiu guto da sango kaj da ŝvito venis el lia vivo, kaj ĉiu detalo, kiu okazis al li, indis je mencio.

Li rakontis, kiel li venis en la urbon, laboris kiel kulio, kaj poste transiris al la rikiŝotirado; kiel li ŝparis monon kaj aĉetis al si rikiŝon, poste ĝin perdis... kaj tiel plu ĝis la nuna momento. La longeco de lia rakontado kaj lia parolflueco surprizis eĉ lin mem. Ĉiuj epizodoj unu post alia elsaltis el lia

animo, kvazaŭ ili mem povus trovi por si ĝustajn vortojn. La frazoj intersekvis sin, kiuj estis tiel kredeblaj, karaj kaj tragikaj. Li ne povis reteni tiujn memorojn kaj tiel la vortoj ne haltigeble torentis, senhezite, laŭvice, kvazaŭ li dezirus malfermi sian tutan koron. Ju pli li parolis, des pli facila li sin sentis kaj des pli li sin forgesis, ĉar li jam dronis en la rakontado. Ĉiu frazo el ĝi enhavis lin – la ambician, maljuste traktitan, penegeman, defalintan Ŝjangzi. Kiam li finis paroli, ŝvito perlis sur lia frunto, kaj li sentis sian koron malplena, tiel agrable malplena, kiel la koro de tiu, kiu svenis kaj ĵus revenis al la vivo en malvarma ŝvito.

“Vi volas, ke mi donis al vi konsilon, ĉu ne?” s-ro Caŭ demandis.

Ŝjangzi jese balancis la kapon. Ŝajnis, ke li, eldirinte ĉion, kion li havis en la koro, ne plu volas malfermi la buŝon.

“Ĉu vi ankoraŭ volas tiri rikiŝon?”

Denove li balancis la kapon.

“Tiuokaze,” diris malrapide s-ro Caŭ, “vi havas nur du alternativojn. Unu estas ŝpari monon kaj aĉeti rikiŝon, la alia estas provizore lui unu, ĉu? Vi ne havas ŝparaĵon kaj, se pruntepreni monon, vi devos pagi interezon, do, kia estas la diferenco inter la du? Prefere luan rikiŝon kaj faru laŭmonatan laboron. Tia laboro estas regula, kaj la loĝo kaj manĝado estas certigitaj. Vi do venu al mi, ĉi tien, mi konsilas. La rikiŝon mi jam vendis al s-ro Zŭo, tial se vi venos, vi devos lupreni rikiŝon, ĉu bone?”

“Tre bone, kompreneble!” Ŝjangzi stariĝis, “Ĉu vi jam forgesis tiun aferon, sinjoro?”

“Kiun aferon?”

“Tiu, pro kiu vi kaj la sinjorino rifuĝis ĉe s-ro Zŭo.”

“O!” Ekridis s-ro Caŭ. “Tiu aferon! Tiam mi estis iom tro senaplomba. Mi kaj mia edzino restis en Ŝanhajo kelkajn monatojn. Efektive estis ne necese tien forveturi, ĉar s-ro Zŭo jam glatigis la aferon. Kaj tiu Ĵuan Ming, kiu nun jam fariĝis ŝtatoŝefo, estas sufiĉe afabla al mi. Nu, probable vi tion ne scias. Ba, forgesu tion. Ni revenu al nia afero. Vi ĵus menciis tiun Ŝjaŭfuzi, kion vi faros kun ŝi?”

“Mi ne scias!”

“Jen mia ideo. Edziĝinte al ŝi, vi ne povos lui ĉambron ekstere, por loĝi, ĉar ĉambroluo, karbo kaj lampoleo ĉiuj kostos monon kaj da ĝi vi ne havos sufiĉe. Se ŝi laboros en la sama loko kun vi... sed la afero neniel povos esti tiel laŭdezira: estos ne facile trovi lokon, kie vi tiros rikiŝon kaj ŝi laboros kiel servistino. Certe malfacile!” li skuis sian kapon. “Nu, ne ofendiĝu kaj permesu

al mi demandi, ĉu ŝi estas vere fidinda?” Ŝjangzi ruĝiĝis kaj respondis heziteme: “Ŝi faris tion nur pro la pelado de la mizero. Mi vetas je mia kapo: ŝi estas bona knabino! Ŝi...” subite ĉiuj liaj emocioj kunfluis kaj penis trovi aperturon por eliĝi el li, tiel ke lia gorĝo sufokiĝis.

“Se tiel estas,” s-ro Caŭ daŭrigis malrapide, “eble nur ĉi tie mi povos doni al vi helpon. Egale, ĉu vi estos sola aŭ edziĝinta, vi okupos unu ĉambron, do via loĝado ne estos problemo. Cetere, ĉu ŝi estas lerta en lavado kaj kudrado? Se jes, ŝi povos helpi Onjon Gaŭ. Mia edzino baldaŭ naskos alian infanon, tiam Onjo Gaŭ sola estos tro okupita. Koncerne Ŝjaŭfuzi, se mi donos al ŝi manĝi, mi ne ŝin pagos. Kion do vi diru?”

“Tio estus bona.” Ŝjangzi naŭve ekridetis.

“Sed mi sola ne povas decidi tion. Mi devas konsiliĝi kun mia edzino.”

“Kompreneble. Se la sinjorino ne estas certa pri ŝi, mi venigos ŝin, por ke la sinjorino povu propraokule vidi ŝin.”

“Tio estas bona ideo.” Ankaŭ s-ro Caŭ ekridetis. Li ne atendis, ke Ŝjangzi povas havi tian sagacon. “Nu, mi diros tion al mia edzino kaj vi venigos ŝin ĉi tien alian tagon. Se mia edzino konsentos, la afero trovos sian solvon.”

“Ĉu jam nun mi povas foriri, sinjoro?” Ŝjangzi eksentis la hastemon trovi Ŝjaŭfuzi kaj diri al ŝi tiun ĉi neniam prirevitan bonegan novaĵon.

Kiam Ŝjangzi eliris el la domo de s-ro Caŭ, estis ĉirkaŭ la deknua horo, la plej bela tempo de vintra tago. La vetero estis aparte serena. Sur la blua ĉielo estis neniuj nubetoj, kaj la suno, sendanta siajn radiojn malsupren tra la seka kaj malvarma aero, donis agrablan varmon. La krioj de kokoj, la bojoj de hundoj kaj la vendovokoj de kolportistoj portiĝis tre malproksimen, tiel ke ili povis esti klare aŭdataj en la najbara strato, kvazaŭ grujaj krioj venintaj el la ĉielo.

Ĉiuj rikiŝoj jam malfaldis sian kapuĉon kaj iliaj latunaj partoj ore brilis. Ĉe la vojflankoj kameloj iradis malrapide, senhaste, dum aŭtomobiloj kaj tramoj rapide kuris sur la stratoj. La homoj kaj ĉevaloj, kiuj cirkulis sur la tero, kaj la blankaj kolomboj, kiuj flugis en la aero – ĉio ĉi tio donis al la antikva urbo atmosferon de vigleco miksitaj kun kvieteco. La serena blua ĉielo superkovris la tumulton kaj la vivpulsadon, dum ĉie staris arboj silentaj.

La koro de Ŝjangzi kvazaŭ volis elsalti el lia brusto kaj rondflugi en la aero kune kun la blankaj kolomboj. Li jam havos ĉion – laboron, salajron kaj Ŝjaŭfuzi. Li neniam antaŭe atendis, ke nur per kelkaj vortoj ĉio povos solviĝi tiel mirinde bone. Rigardu la ĉielon, kiu estis tiel klara kiel la malkaŝema naturo de la nordanoj. Kiam iu ĝojas, eĉ la vetero ŝajnas aparte serena. Li ne povis memori, ĉu li iam ajn vidis tian belan vintran tagon. Por esprimi sian

ĝojon, li aĉetis glaciigintan persimonon. La unua mordo plenigis lian buŝon per glacieroj. La malvarmo frostigis al li la dentojn, poste malrapide disvastiĝis malsupren ĝis lia brusto, lin frostotremigante. Li formanĝis la persimonon per kelkaj mordoj. Lia lango sentiĝis, sed lia koro havis la senton de agrableco.

Li rapidigis siajn paŝojn, por trovi Ŝjaŭfuzi. En lia spirito jam aperis bildo de tiu homplena korto, la malgranda ĉambro kaj lia karulino. Forte li dezirus ekhavi flugilojn por flugi tien! Estante kun ŝi, li povos forgesi la tutan pasintecon kaj komenci novan vivon. Nun li estas pli hastema ol tiam, kiam li iris trovi s-ron Caŭ, ĉar s-ro Caŭ estas lia amiko kaj mastro – ĉiu el ili helpas la alian pro amikeco kaj reciproka kor-al-kora sindonemo. Ŝjaŭfuzi ne sole estas amikino, ŝi eĉ volas doni sian tutan vivon al li. Ili estas du homoj en la sama infero, ĉiuj de nun forviŝos al si la larmojn kaj marŝos antaŭen mano en mano, ridetante.

La vortoj de s-ro Caŭ vere emociis lin, sed Ŝjaŭfuzi povus tuŝi lian koron eĉ sen diri ion ajn. Li konfidis sin al s-ro Caŭ, sed al Ŝjaŭfuzi li povus nudigi sian koron kaj diris tion, kion li neniel povis diri al iu ajn alia. Ŝi jam fariĝis lia vivo, sen ŝi nenio havus signifon por li. Li ne devas labori nur por kontentigi siajn proprajn bezonojn; li devas savi ŝin el la eta ĉambro, gaje digne kaj amante unu la alian kiel paro da birdetoj. Ŝi povos ĉesi zorgi pri siaj patro kaj du fratoj kaj anstataŭe devos veni helpi Ŝjangzi. Erĉjangzi ja povos perlabori siajn vivrimedojn, provante kune tiri unu rikiŝon aŭ fari ion alian, sed Ŝjangzi ne povos vivi sen ŝi. Korpe kaj anime li bezonas ŝin ankaŭ por sia laboro. Kaj ankaŭ ŝi siaflanke bezonas tian viron, kia li.

Lia ĝojo kreskis kun lia malpacienco. El ĉiuj virinoj en la mondo neniu estas tiel bona kaj tiel taŭga por esti lia vivkunulino kiel Ŝjaŭfuzi. Li jam edziĝis kaj adultis; li jam tuŝis virinojn belan kaj malbelan, junan kaj maljunan, sed ili ĉiuj ne povis konserviĝi en liaj pensoj. Ĉiu el ili estis nur virino kaj ne meritis esti lia vivkunulino. Vere, Ŝjaŭfuzi ne estas la ideala knabino pura kaj senmakula en liaj revoj, sed ĝuste pro tio ŝi estas pli kompatinda kaj povas esti sindone helpi lin. Simpla knabino el la kamparo povas esti virga, sed ŝi neniel havas la kapablon, nek la karakteron de Ŝjaŭfuzi. Kaj, aliflanke, kiel estas pri li mem? Ankaŭ li estase makulita, do ili estas perfekta paro: neniu el ili superas, nek malsuperas la alian per sia moraleco. Ili estas kiel du iom difektita, sed ankoraŭ uzeblaj akvovazoj, ĝuste taŭgaj por esti lokitaj unu apud la alia.

Kiel ajn ili konsideris, li rigardis tion kiel idealan vivaranĝon. Post tiaj belaj pensoj nun li venis al la praktika realo. Unue li prenos anticipe de s-ro Caŭ unumonatan salajron kaj aĉetos al Ŝjaŭfuzi vatitan robon kaj paron da

sufiĉe bonaj ŝuoj, poste li kondukos ŝin al s-ino Caŭ. Vestita en nova vesto, pura de la kapo ĝis la piedoj, kun siaj juneco, aspekto kaj manieroj, ŝi certe estos prezentebla kaj certe plaĉos al s-ino Caŭ. Nenia dubo pri tio!

Li atingis la celokon, estante banata de ŝvito. Vidante tiun kadukan pordegon, li kvazaŭ vidis la longe sopiratan malnovan hejmon. La kaduka pordego, la disfalonta muro, la flavaj herboj sur la pordeg-tegmento, ĉiuj ŝajnis al li tre karaj.

Li eniris en la korton kaj sin direktis rekte al la ĉambro de Ŝjaŭfuzi. Sen frapo je la pordo kaj sen voko al ŝi li puŝmalfermis la pordon kaj instinkte retiriĝis. Sur la briklito sidis mezaĝa virino. Ĉar en la ĉambro ne troviĝis forno, ŝi sin envolvis en ĉifonan litkovrilon. Ŝjangzi senmove staris ekster la pordo.

“Kio esta?” ŝi kriis el interne. “Ĉu vi venis por anonci ies morton, he? Kial vi abrupte eniris en alies domon sen voki? Kiun vi serĉas?”

Ŝjangzi ne volis ekparoli. Subite li ĉesis ŝviti. Apogante sin per unu mano sur la kaduka pordo, li ne kuraĝis forlasi sian tutan esperon. “Mi serĉas Ŝjaŭfuzi.”

“Mi ne konas ŝin! Kaj poste, kiam vi serĉos iun, petu permeson antaŭ ol eniri. For kun via Eta aŭ Granda Feliĉo!”

Kun vaka spirito li sidis ekster la korta pordego longan tempon, forgesinte, por kio li venis. Malrapide parto de tiuj memoroj revenis al li, kaj Ŝjaŭfuzi kvazaŭ vagis tien kaj reen en lia animo, kiel papera figuro sur senĉese turniĝanta karusela lanterno. Li kvazaŭ forgesis la rilatojn inter li kaj ŝi. Poste, iom post iom, ŝia figuro malgrandiĝis, sentoj revenis al li kaj lia koro komencis lin dolori.

Kiam la sekvo de iu afero estas ankoraŭ ne certa, oni ĉiam esperas ion plej bonan. Ŝjangzi supozis, ke Ŝjaŭfuzi probable transloĝiĝis, jen ĉio. Tio estis lia kulpo. Kial li ne ofte venis vidi ŝin? Honto instigis lin al ago, por ke li povus kovri sian kulpon. Plej bone estis, ke li unue informiĝu pri ŝia loĝejo. Reirinte en la korton, li demandis malnovan najbaron, sed li ricevis nenian precizan informon. Ankoraŭ nutrante la esperon, kun stomako malsata li decidis serĉi Erĉjangzi aŭ siajn du fratojn. Ili devas esti ie sur la stratoj, kaj ne estos malfacile ilin trovi.

Li petis informojn ĉie, kien li iris: ĉe rikiŝoparkadejoj, en tetrinkejoj, en grandaj miksaj kortoj. Demandante li iradis, kiom liaj kruroj povis sin movi, sed ĝis la tagfino li ankoraŭ sciis nenion pri ŝi.

Vespere li revenis en la rikiŝejon, tute elĉerpita kaj ankoraŭ obsedata de la pensoj pri ŝi. Post unutaga seniluziĝo li ne plu kuraĝis esperi ion ajn. La

malriĉuloj facile mortas kaj estas facile forgeseblaj. Ĉu eble Ŝjaŭfuzi jam mortis? Se ne, eble ŝia patro jam denove vendis ŝin al iu tre malproksima loko. Tio ĉi estas tre probabla kaj multe pli malbona ol morto.

Alkoholaĵo kaj tabako ree fariĝis liaj amikoj. Se li ne fumus, kiel li povus mediti? Kaj se li ne drinkus, kiel li povus ĉesigi la meditadojn?

Notoj:

1. Ŝjaŭfuzi signifas etan feliĉon.

XXIII

Kiam li malgaje promenis sur la strato, li renkontiĝis kun la avo de Ŝjaŭmar. La maljunulo jam ne plu tiris rikiŝon kaj nun liaj vestoj estis pli maldikaj kaj pli ĉifonaj ol antaŭe. Sur unu ŝultro li portis lignan stangon kun granda argila tekruĉo pendanta de unu fino kaj de la alia – ronda difektita korbo entenanta kelkajn bakitajn bulkaĵojn, frititajn pastopecojn kaj unu grandan brikon. Li ankoraŭ povis rekoni Ŝjangzi.

Post kelka konversacio la maljunulo diris al Ŝjangzi, ke Ŝjaŭmar mortis jam antaŭ pli ol duonjaro kaj li forvendis sian kadukan rikiŝon. Nun li ĉiutage vendis teon, bakitajn bulkaĵojn kaj frititaĵojn ĉe rikiŝoparkadejoj. Kvankam li estis ankoraŭ tiel milda kaj afabla kiel antaŭe, tamen lia dorso estis pli kurbiĝinta, liaj okuloj larmis en la vento kaj liaj palpebroj estis ruĝaj kvazaŭ de ĵusa plorado.

Ŝjangzi aĉetis de li tason da teo kaj mallonge rakontis al li sian malfeliĉon.

“Ĉu vi pensas, ke vi estante solulo, povas atingi la celon en via strebado?” la maljunulo komentariis. “Kiu ne tiel pensas? Sed kiu do atingus bonstaton? Siatempe mi estis fortika kaj honesta, tamen nun, rigardu min! Ĉu ankoraŭ forta? Eĉ homo el fero ne povus eskapi el tiu ĉi granda kaptilo, en kiu ni vivas. Honesteco? Kian utilon ĝi havus? Oni diras, ke de bono venas bono, kaj de malbono nur malbono; tiun diron ne kredu, ĉar tia afero neniam ekzistas! Kiam mi estis juna, mi estis tre varmkora kaj helkpema al aliaj. Ĉu mi ricevis bonon? Neniam! Mi eĉ savis homojn de drono kaj sinpendigo. Kian bonon do mi havis de tio? Neniam! Mi diras al vi, mi povos frostmorti iun tagon.

“Nun mi jam komprenas, ke por ni kulioj kiel soluloj atingi bonstaton estas la plej malfacila afero en la mondo. Kian estontecon la solulo povas havi? Ĉu vi iam vidis lokuston? Estante unuopa, ĝi saltas tre malproksimen, sed, kaptita kaj ligita de infano, ĝi ne povas eĉ flugi. Kaj tamen, se svarmo da lokustoj aperis, ha! Ili ja povas tuj kaj tute formanĝi centojn da muoj da grenplantoj kaj oni povas fari nenion kontraŭ tio, ĉu ne? Kaj mi, bonkora kaj honesta, eĉ ne povis vivteni unu malgrandan nepon. Li malsaniĝis kaj mi ne havis monon por aĉeti bonan medikamenton. Mi rigardis lin morti en miaj brakoj. Nu, tion forgesu kaj neniam plu menciu! – Teon! Kiu volas trinki varman teon?”

Nun Ŝjangzi vere ekkomprenis. Ĉiuj malbenoj liaj ne alportos punon sur Kvaran Liŭ, s-inon Jang kaj detektivon Sun. Koncerne lin mem, li neniel povos

ricevi bonon el sia strebado. Sola kun nenies helpo, li estis kvazaŭ lokusto kaptita kaj ligita de infano, ĝuste kiel la maljunulo diris. Kion do helpus nun liajflugiloj?

Li ne volis iri al la domo de s-ro Caŭ. Se li irus tien, li devus labori kiel eble plej bone, kaj kian bonon li povus ricevi de tio? Kial do ne lasi la tagojn pasi sen zorgoj, sen penoj? Kiam estos nenio por manĝi, li tiru rikiŝon eksteren kaj laboru; kiam la nutraĵo estos sufiĉa por la tago, li do ripozu kaj pensu pri la morgaŭo nur tiam, kiam ĝi jam venos. Tio estos vojo ne nur irebla, sed eĉ la sola. Ŝpari monon kaj aĉeti rikiŝon estos vana penado, ĉar oni ilin forrabos. Kial do ne ĝui la vivon dum li povas?

Kaj, cetere, se li trovus Ŝjaŭfuzi, li devus ankoraŭ fari penegojn, se ne por si mem, almenaŭ por ŝi. Sed, ne povante trovi ŝin, por kiu do li nun devus penlabori? Li estis same malfeliĉa kiel la maljunulo, kiu perdis sian nepon. Li do rakontis al la maljunulo pri Ŝjaŭfuzi, ĉar li rigardis lin kiel sian veran amikon.

“Kiu volas varman teon?” la maljunulo vokis. Poste li diris: “Laŭ mi, ŝi havis nur du elirojn. Aŭ ŝi estis vendita de Erĉjangzi por fariĝi kromedzino aŭ ŝi estis vendita al la Blanka Kabano. Probable ŝi nun estas en la Blanka Kabano. Kial? Ĉar se, kiel vi diris, ŝi antaŭe jam edziniĝis, estas ne facile trovi iun ajn alian viron, kiu volus ŝin. Viroj volas virgulinon kiel kromedzinon. Tial tre probable ŝi estas en la Blanka Kabano. Mi estas preskaŭ sesdekjara kaj jam multe vidis la mondon dum mia vivo. Se iu fortika juna rikiŝisto forestas de la rikiŝoparkadejoj kelkajn tagojn, li aŭ sin okupas per laŭmonata laboro aŭ kuŝas en la Blanka Kabano. Kaj se subite la edzino aŭ filino de iu rikiŝisto malaperis, tre povas esti, ke ŝi iris tien. Ni ĉiuj vendas nian ŝviton, niaj virinoj sian korpon. Mi scias, mi bone scias! Iru tien kaj serĉu ŝin. Mi ne esperas, ke vere ŝi estas tie, sed... Tion! Kiu volas varman teon!”

Unuspire Ŝjangzi kuris eksteren el la pordego Ŝjiĝimen.

Tuj kiam li trapasis la straton ekster la pordego, liajn okulojn frapis la kampara dezerteco. Senfoliaj arboj staris ambaŭflanke de la vojo, sur iliaj branĉoj estis neniu birdo. Grizaj arboj, griza tero, grizaj domoj silente ripozis sub la grizflava ĉielo. En la foro vidiĝis la siluetoj de la malvarmaj nudaj Okcidentaj Montoj. Norde de la fervojo estis arbaro, kaj ĉe ties rando staris kelkaj malaltaj dometoj. Ŝjangzi konjektis, ke tiuj devas esti la Blanka Kabano. En la arbaro aŭdiĝis nenia sono. Pli norde, ekster la bestĝardeno Ŭanŝengjŭan estis marĉoj, kies surfaco estis punktita de velkintaj fragmitoj kaj herboj.

Estis neniu homo ekster la dometoj, ĉirkaŭe regis tia dezerteca silento, ke

li eĉ dubis, ĉu tio estas la fifama Blanka Kabano. Kolektinte sian kuraĝon, li iris al ĝi. Super ĉiu pordo pendis flava pajlokurteno, kiu estis brile nova. Li iam aŭdis ke somere la virinoj ĉi-tieaj sidas eksterdome, nudbrustaj, invitante la preterirantojn. Alpaŝante ĉi tien, iliaj “gastoj” kantis bordelajn kantojn, por montri, ke ili ne estas novicoj. Sed kial nun estas tiel kviete? Ĉu ili ĉesis fari negocon dum la vintro?

Ĝuste kiam li sin demandis pri tio, la pajlokurteno super la pordo, kiu estis la plej proksima al li, ekmoviĝis kaj aperis kapo de virino. Li estis forte konsternita de ŝia simileco al Huniŭ. “Mi venas por trovi Ŝjaŭfuzi,” li pensis. “Se anstataŭe mi trovus Huniŭ, ja fantomo min trafus!”

“Envenu, vi kara stultulo!” ŝi diris. Ŝia voĉo, ne simila al tiu de Huniŭ, estis raŭka kaj urĝema, kian havis la maljunulo, kiun li ofte vidis vendi sovaĝajn kuracherbojn ĉe Tjanĉjaŭ.

En la ĉambro estis nenio krom la virino kaj malgranda briklito. Sur la briklito ne estis mato, sed ĝi estis hejtita per malgranda fajro, kiu plenigis la ĉambro per varma, tre naŭza malbonodoro. Sur la briklito troviĝis malnova litkovrilo, kies randoj estis grase brilaj kiel la brikoj, sur kiuj ĝi kuŝis. La virino aspektis ĉirkaŭ kvardekjara, kun hararo taŭzita kaj vizaĝo nelavita. Ŝi portis substofitan pantalonon kaj nigran vatitan jakon, kiun ŝi lasis nebutonumita. Ŝjangzi devis klini sian kapon tre malsupren por iri internen kaj, apenaŭ li eniris, ŝi ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ lian kolon. Ŝia nebutonumita jako malfermiĝis por montri ŝiajn grandajn pendantajn mamojn.

Ŝjangzi sidiĝis sur la rando de la briklito, ĉar la ĉambro estis tro malalta, por ke li povu rekte stari. Li tre ĝojis renkonti ŝin, ĉar li ofte aŭdis pri virino, kies moknomo estis Blankaj Farunsakoj. Tio ĉi devis esti ŝi. La moknomo venis de tiuj du supermezuraj mamoj. Sen ĉirkaŭdiro, li demandis ŝin, ĉu ŝi vidis Ŝjaŭfuzi. Ŝi ne sciis. Sed post kiam li priskribis la aspekton de Ŝjaŭfuzi, ŝi ekmemoris.

“Ho jes! Estis ja tia persono. Juna kaj havanta la kutimon de tempo al tempo montri tiujn siajn blankaj dentojn. Jes, ni nomis ŝin ‘Suka Karno’.”

“En kiu ĉambro ŝi estias?” La okuloj de Ŝjangzi ekradiis sovaĝan brilon.

“Ŝi? jam de longe mortis!” Blankaj Farunsakoj montris eksteren. “Ŝi sin pendigis en la arbaro.”

“Kio?”

“Kiam Suka Karno venis, ŝi tre plaĉis al la klientoj. Sed ŝi ne estis sufiĉe fortika por ilin elteni. Iun vesperon, ĉirkaŭ la lampo-eklumiga tempo – mi ankoraŭ klare memoras tion, ĉar tiam mi sidis kun du fratinoj ĉe la pordo – iu

kliento venis kaj sin direktis rekte al ŝia pordo. Ŝi kutime ne volis sidi ekstere kun ni, kaj pro tio ŝi eĉ ricevis batojn en la unuaj tagoj post sia veno. Sed poste, kiam ŝi iom disfamiĝis, ni ĉiuj do lasis ŝin sola sidi en sia ĉambro, ĉar ŝiaj klientoj volis neniun alian. Post iom da tempo ŝia kliento foriris kaj direktis sin al tiu arbaro. Ĉiu el ni pensis nenion pri tio kaj neniue eniris en ŝian ĉambron por ŝin vidi. Kiam la borelistino venis por kolekti la monon, ŝi trovis en la ĉambro tutnudan viron, kiu profunde dormis. Li estis morte ebria. Suka Karno metis sur sin liajn vestojn kaj forkuris. Vere sagaca ŝi estis. Se ne estus mallume, ŝi neniel povus forŝteliĝi; sed sub la kovro de la nigra nokto ŝi, vestita kiel viro, trompis nin ĉiujn. La bordelistino tuj sendis homojn eksteren, por ŝin serĉi. Apenaŭ ili eniris en la arbaron, ili vidis ŝin tie pendatan. Kiam ili metis ŝin sur la teron, ŝi estis jam mortinta, sed ŝia lango ne estis tro longe elŝovita kaj ŝi ne havis teruran aspekton. Eĉ mortinte ŝi estis aminda. Dum tiuj ĉi monatoj la arbaro estas tre kvietaj nokte kaj ŝia spirito neniam eliris por timigi homojn. Kiel bonkora ŝi estas!...”

Antaŭ ol ŝi finis sian parolon, Ŝjangzi jam ŝanceliĝe elpaŝis el la ĉambro. Li iris al iu tombejo, ĉirkaŭkreskita de orde aranĝitaj pinoj. Tie vidiĝis pli ol dek tomboj. Ka suno estis pala, kaj en la pinaro estis eĉ pli malhele. Li sidiĝis sur la tero, kiu estis kovrita de sekiĝintaj herboj kaj falintaj pinkonusoj. Ĉio estis kvietaj, nur kelkaj korvoj faris funebrajn, longe tiratajn grakojn sur la branĉoj. Li bone sciis, ke ĉi tie certe ne estas la tomboloko de Ŝjaŭfuzi, sed liaj larmoj falis per grandaj, pezaj gutoj. Ĉio forpasis, eĉ Ŝjaŭfuzi mortis kaj estis enterigita. Li siatempe estis strebema, tia estis ankaŭ Ŝjaŭfuzi, tamen ĉio, kio restis al li, estis senutilaj larmoj kaj ŝi jam sin pendigis. Esti envolvita en pajla mato kaj kuŝanta en la tombo en tiu ĉi forlasita tero, jen kien kondukis ŝia tutviva penado.

Reveninte en la rikiŝejon, li falis en letargian dormon por du tagoj. Li volis nek iri al la domo de s-ro Caŭ, nek sendi tien eĉ unu vorton, ĉar s-ro Caŭ ne povis savi lin. Post du tagoj li tiris rikiŝon eksteren, kun vaka spirito. Liaj pensoj kaj espero jam estis for, li sklavis nur por plenigi sian stomakon, kaj kiam li estis satigita, li do iris dormi. Kial plu nutri la esperon? Rigardante skelete malgrasan hundon, kiu atendis apud la portovekto de batato-kolportisto iajn ŝelpecojn kaj radiketojn, li sciis, ke li estas ĝuste kiel tiu ĉi hundo, kiu tuttage vagadas nur por trovi iajn forĵetaĵojn por manĝi. Se li nur povas treni sian vivon, kial do pensi pri io ajn alia?

La homoj levis sin alte super ĉiaj bestoj, sed nun oni ankoraŭ pelas siaspeculojn returne inter la bestojn. Ŝjangzi vivis ankoraŭ en la kultura urbo,

tamen li jam fariĝis kvazaŭ kvarpiedulo, tute ne konscianta sian kulpecon. Li jam ĉesis pensi kaj tial, eĉ se li mortigus homon, li devus porti nenian respondecon. Li ne plu havis esperon, kaj en sensobtuzeco li lasis sin fali en la senfundan abismon. Li frandis, li drinkis, li vizitis bordelon, li faris hazardludon, li maldiligentis, li ruzis, ĉar li jam ne havis la koron, kiu estis forŝirita for de li. Al li restis nur la alta skeleto kun karno senanima, kiu atendis putriĝon kaj estis preta enteriĝi sur dezerta tombejo.

Pasis jam la vintro. La printempa suno estas la vesto, kiun donacas la naturo al ĉiuj homoj; li do forvendis ĉiujn siajn vatitajn vestojn. Dezirante nur plezure manĝi kaj trinki, li ne plu havis la bezonon konservi la vintrajn vestojn, tiom pli ke li tute ne volis revidi la vintron. Li devis ĝui la hodiaŭon, ke morgaŭ li mortu sen bedaŭro. Se malfeliĉe li devos ĝisvivi la vintron, li tiam serĉu alian rimedon por ŝin vivteni. Antaŭe liaj pensoj ĉiam direktiĝis al lia tuta vivo, sed nun li zorgis nur pri tio, kio troviĝis tuj antaŭ lia nazo. La sperto diris al li, ke la morgaŭo, kiu estas la daŭrigo de la hodiaŭo, heredas la hodiaŭajn maljustaĵojn suferatajn.

Vendinte la vatitajn vestojn, li sentis sin treege ĝoja. Kun kontanta mono en la mano li ja povas fari, kio al li plaĉas. Kial do li devus restigi ilin ĉe si por la malvarma kruela vintro?

Kun la paso de la tempo Ŝjangzi fariĝis pli kaj pli diboĉema. Nun li forvendis ne nur siajn vestojn, sed ĉion, kion li trovis al li portempe nenecesa. Li volis vidi kun plezuro, ke liaj objektoj ŝanĝiĝis en monon al li disponeblan. Elspezita mono ne povas fali en alies manon – jen afero plej certa. En okazo de nebezono li faris forvendon; kaj kiam li ree bezonis ion uzi, li denove faris aĉeton. Se tiam li ne havis monon, li simple rezignis la uzon de ĉiutagaj necesajoj. Li povis ne lavi al si la vizaĝon, nek purigi la dentojn. Tio ŝparigis al li ne nur monon, sed ankaŭ penadon. Por kio servus la bonorda aspekto? Manĝi dabingojn kun sojsaŭce kuirita porkaĵo, kvankam esti ĉfonaĵe vestita – jen vera agrablaĵo! Kun bonaj nutraĵoj en la stomako, eĉ se li mortus, li kontentus, ĉar li tiam ne spektus kiel malgrasa muso mortinta de malsato.

Ŝjangzi, kiu antaŭe estis tiom sana kaj forta, nun jam fariĝis malaltklasa rikiŝisto, malgrasa kaj malpura. Li ne lavis al si la vizaĝon, nek sin banis, nek ŝanĝis la vestojn; iafoje eĉ dum pli ol unu monato li ne iris al barbiro. Lia rikiŝo ne estis plu bona: se nur ne granda estis la rikiŝa lupago, cian rikiŝon, novan aŭ malnovan, li akceptis. Dum rikiŝotirado, ekpensinte, ke lia perlaborita mono jam sufiĉas por la tago, li ne volis plu tiri kaj transcedis sian klienton al alia rikiŝisto. Se lia kliento protestis, li kverelis kaj lin batis. Iri al la policejo kaj

resti tie por du aŭ tri tagoj? – afero por li bagatela! Portante sola sian klienton, li tiris la rikiŝon tre malrapide, ĉar li domaĝis sian ŝviton; kaj kiam li estis dungita por kuna kurado kun aliaj rikiŝistoj, se en bona humoro, li povis, kvankam malgraŭvole, kuri kelkan distancon, ekskluzive por lasi la aliajn resti postuli. En tiaj okazoj li ofte faris malicaĵojn, kiel ekzemple transversan preterpason al antaŭa rikiŝo, intencan abruptan direktoŝanĝon kaj tiel plu. Antaŭe li pensis, ke rikiŝotirado estas tia riska okupo, ke dum kurado ioma malzorgemo povus kaŭzi morton. Nun li intence faris petolaĵojn: por li ne estus grave, se iu mortus pri tio, ĉar ĉiu ja devas morti.

Li denove dronis en mutio. Silente li manĝis kaj drinkis kaj silente li faris malicaĵojn. Parolo servas al la homoj por interŝanĝi opiniojn kaj esprimi sentojn unu al alia; havante nek opiniojn, nek esperon, por kio do li bezonas paroli? Krom diskuti pri la prezoj, li ĉiam tenis sian buŝon fermita, kvazaŭ ĝi servus ekskluzive por manĝi, trinki kaj fumi. Eĉ en ebrio li ne eligis unu vorton; tiam li nur sidis kaj ploris en silenta angulo. Preskaŭ ĉiufoje, kiam li ebriiĝis, li iris al la arbaro, kie Ŝjaŭfuzi sin pendigis, kaj verŝis larmojn. Post ploro li tranoktis en la Blanka Kabano. Malebriiĝinte li trovis sian monon elĉerpita, kaj lia korpo estis trafita de la abomena malsano. Li ne sentis bedaŭron. Se li havus ion pripentindan, li pentus nur, ke antaŭe li estis tiel penegema, tiel singarda, tiel honesta. Ĉio, kion li devus bedaŭri, nun jam estas for, kaj tial li havas nenian bedaŭrindaĵon.

Nun li fariĝis treege profitema. Li ĝojis, kiam li elpetis de iu cigaredon por fumi, aĉetis ion por falsa monero, manĝis iom pli da peklaĵo dum trinkado de fazeolsuko, aŭ akiris kelkajn pliajn kuprajn monerojn per malpli da forto dum rikiŝotirado. Lia profito signifis alies malprofitonj, tio ja estis venĝo! Iom post iom li eĉ plivastigis tion: li ankaŭ ellernis prunti de amikoj monon kun la intenco ĝin ne redoni. Kiam la pruntedonito firme postulis la redonon, alpremite al muro, li povis kanajle fornei la prunton. En la komenco oni tute ne suspektis lin kaj li povis tre facile prunti al si monon, ĉar oni konis lin kiel homon honestan kaj fidindan. Por tiu ĉi restaĵo de sia iama honesteco li ĉie petis pruntedonojn. La pruntita mono estis mono senpene akirita, kaj tial li sendomaĝe fordiboĉis ĝin tuj post ĝia ricevo. Kiam oni postulis ĝin redoni, li ŝajnis sin kompatinda kaj petegis pri prokrasto. Se tio ne efikis, li do klopodis prunti de alia du pliaj ĝiaĵojn, por redoni unu ĝiaĵon kaj kvin fenojn al la postulanto, kaj kun la restantaj kvin fenoj li ree iris al drinkejo. Post plurfoja ripetiĝo de tia artificio li ne plu povis deprunti eĉ unu kupran moneron, kaj li komencis trompakiri monon. Li vizitis unu post alia ĉiujn domojn, ĉe kiuj li

iam dungiĝis, kaj teksis mensogojn kiel al mastroj, tiel ankaŭ al servistoj, por trompe akiri de ili iom da donacita mono. Se ili ne havis monon ĉemane, li petis donaci al li eluzitan veston. En lia mano la vesto tuj ŝanĝiĝis en monon kaj la mono en cigaredojn kaj alkoholaĵon. Kun klinita kapo li meditadis por elpensi mensogojn, kaj unu mensogo povis enspezigi al li eĉ pli ol kiom li perlaboris en tago, tirante rikiŝon. Tio estis enspeziga kaj samtempe ŝparigis al li penadon, kaj li trovis tion tre preferinda. Li iris serĉi eĉ Onjon Gaŭ, kiu servis en la domo de s-ro Caŭ. Li staris malproksime de la domo kaj atendis. Ekvidinte ŝin, kiu eliris por aĉeti ion, li tuj rapide kuris al ŝi kaj intime salutis ŝin per treege dolĉa tono:

“Bonan tagon, Bofranjo Gaŭ!”

“Ha, kia surprizo! Kio estas al vi Ŝjangzi? Kiel vi povas aspekti tiel mizere?” Onjo Gaŭ rondigis siajn okulojn, kvazaŭ ŝi vidus monstron.

“Ne demandu. Mi hontas.” Ŝjangzi klinis la kapon.

“Ĉu vi ne jam donis promeson al la sinjoro? Kial vi ne revenis dum tiom longa tempo? Eĉ lastatempe mi demandis Laŭ-Ĉeng pri vi. Li diris, ke li ne renkontis vin. Kie do vi laboras? La sinjoro kaj sinjorino estas ĉiam maltrankvilaj pro vi.”

“Mi preskaŭ mortis de serioza alsano! Bonvolu diri al la mastro, ke mi petas ian monhelpon. Kiam mi tute resaniĝos, mi venos labori por li.” Ŝjangzi mallonge, sed kortuŝe eldiris la jam elpensitan mensogon.

“La mastro ne estas hejme. Ĉu vi ne volus eniri kaj vidi la sinjorinon?”

“Ne necesas. Tiel aĉa estas mia aspekto! Do bonvolu transdiri mian peton al la sinjorino!”

Onjo Gaŭ alportis al li du ĵuanojn el la domo: “Jen kion la sinjorino donas al vi. Ŝi diris, ke vi tuj aĉetu al vi medikamenton.”

“Jes! Dankon al la sinjorino!” preninte la monon, li tuj komencis pripensi, kiel li elspezos ĝin. Apenaŭ Onjo Gaŭ sin deturnis, li ekiris en la direkto al Tjanĉjaŭ, kie li sin amuzis tiun tutan tagon.

Tiamaniere unu post alia li vizitis ĉiujn de siaj iamaj mastroj kaj, kiam li faris refojan vizitadon, li ne tiel sukcesis, kiel antaŭe. Baldaŭ li vidis, ke tiu vojo ne plu estas irebla kaj li devas serĉi alian rimedon, per kiu li povus pli facile akiri monon, ol per rikiŝotirado. Antaŭe lia tuta espero estis metita sur la rikiŝotiradon, nun male li abomenis la rikiŝon. Kompreneble, li nun portempe ankoraŭ ne povis tute rompi kun la rikiŝo, sed, se nur li havis sufiĉajn vivrimedojn por ŝtopi al la la stomakon, li ne volis tuŝi ĝiajn timonetojn. Kvankam lia korpo estis mallaborema, tamen liaj oreloj estis akraj. Aŭdinte

famon, ke ie oni povas facile akiri al si monon, li tuj iris tien. Se oni nur pagis, li volis dungiĝi eĉ por marŝi en ia procesio aŭ manifestacio. Por tri aŭ du ĝjaŭoj li volonte portis flagon kaj ŝafe sekvis la antaŭirantan homamason la tutan tagon. Malgraŭ ĉio, li trovis tion pli bona ol la rikiŝotirado: kvankam la pago ne estis multa, tamen tio ne postulis fortostreĉon. Tenante malgrandan flagon en la mano, kun klinita kapo kaj kun cigaredo pendants inter la lipoj, li marŝis mute, duonridete, sekvante la antaŭirantojn. Kiam oni devis fari kelkajn kriojn, li vaste malfermis sian buŝon kaj iom movetis ĝin, eligante nenian voĉsonon el sia gorĝo, kiun li domaĝis. En ĉia okazo li ne volis uzi siajn fortojn, ĉar antaŭe li ja penegis per ĉiuj fortoj, tamen li rikoltis nenian bonon. Se dum marŝado sin prezentis ia danĝero, li la unua tre rapide forkuris. Lia vivo povis detruigi en siaj propraj manoj, sed li ne plu volis oferi ion sian al iu ajn alia. Homo, kiu luktas por sia propra celo, scias ankaŭ kiel ruinigi sin mem. Jen la du ekstretoj de la individuismo.

Notoj:

1. Vid. Noton 3 de ĉapitro VI

2. fazeolsuko: Restanta suko post farado de vermiĉeloj el fazeolo, loka trinkaĵo de Pekino. Ĝi estas tre acida, dum la trinkado oni kutimas manĝi iom da peklaĵo

XXIV

Jam ree estis la jartempo por pilgrimantoj oferi incenson en la templo sur la monto. Subite fariĝis varmege.

Vendistoj de paperaj ventumiloj subite kune aperis. Ili portis sian keston kun grapole ligitaj tintiloj sur ĝi, kiuj eligadis klaran, orelfrapantan sonon. Sur la stratoj verdaj abrikotoj jam estis vendataj poamase. Ĉerizoj blindige ruĝbrilis. Oraj abelaroj kolektiĝis sur la vazoj tenantaj rozkolorajn jujubojn. Fazeolgelateno en pelvoj donis tavolon de lakteca lumo, kaj apude estis orde metitaj diverskoloraj spicaĵoj kaj kondimentoj. Oni jam portis helkolorajn belaj vestojn maldikajn, tiel ke sur la stratoj subite aperis pli da bunteco, kvazaŭ multaj ĉielarkoj falus sur la teron. Stratbalaistoj pliintensigis sian laboron, senĉese priverŝante la pavimon, tamen la delikata polvo ankoraŭ leviĝis de la tero, elvokante ĉe la homoj abomenon. Sed en la polva aero oni tamen povis vidi flirtantajn longajn salikbranĉetojn kaj facilmove flugantajn hirundojn, kiuj donis al la homoj ian agrablecon. En tiu varmega vetero oni de tempo al tempo oscedis larĝe kaj longe, sentante laciĝon kaj samtempe plezuron.

Grupo kaj grupo da ludantoj de jango-danco, leonodanco kaj diversspecaj akrobataĵoj, kantante kaj dancante, iris supren al la monto. El la pilgrimantoj unuj tamburis kaj gongis, aliaj portis kestojn, triaj tenis abrikotflavajn flagojn. La tuta urbo vigliĝis. Oni havis ian nedireblan, sed intiman senton. En la aero vibris sonoj kaj pendis polvo. Ĉiuj homoj, kiel la pilgrimantoj, tiel ankaŭ la rigardantoj flanke strantaj, sentis ian fervoron, ian piecon, kaj ĝojan ekscitecon. En maltrankvilaj tempoj, la fervora tumulto devenas de superstiĉo, kaj la konsoliĝo de malkleruloj egalas sintrompon. Tiuj ĉi koloroj, tiuj ĉi sonoj, la facilaj nuboj sur la serena ĉielo, la polvo pendanta en la strata aero, vigligis la homojn kaj invitis ilin fari ion laŭ sia plaĉo: unuj iris supren al la monto, aliaj vizitis templan foiron, triaj ĝue rigardis florojn... Almenaŭ oni povis stari flanke sur la stratoj kaj rigardi la spektaklojn, murmurante preĝon al sia Budho.

La subita plivarmiĝo de la vetero kvazaŭ vekis la antikvan ĉefurbon el la printempa sonĝo. Ĉiu loko invitis al plezura promenado kaj ĉiu homo emis ion fari. La varmo akcelis la kreskadon de la herboj kaj arboj, ke ili povu ĝui la vivĝojon kune kun homoj. La verdaj salikoj kaj novaj tifaĵoj (*Typha*) ĉe la lagoj Bejhaj kaj Nanhaj allogis al si gejunulojn. Ili aŭ ripozis en boatoj sub salikoj aŭ remis inter freŝaj lotusfolioj, ludante per buŝharmoniko melodiojn de amkantoj kaj sendante unu al la alia okulumojn. La florantaj peonioj invitis al si

lirikistojn kaj elegantulojn, kiuj malrapide promkenadis inter la floroj, swingante sianj altvaloran paperan ventumilon. Laciĝinte ili sidiĝis antaŭ ruĝaj muroj aŭ sub verdaj pinoj kaj trinkis kelkajn tasojn da teo, de tempo al tempo ĵetante kaŝajn rigardojn al preterirantaj belaj knabinoj kaj raraj floroj. Eĉ al la ĉiam malofte vizitataj lokoj la zefiro kaj la varma suno tiris turistojn, same kiel papiliojn. La peonioj ĉe la templo Ĉongŝjaŭsi, la verdaj fragmitoj ĉe la pavilono Taŭĵanting, la morusarbaro kaj rizo en la Muzeo de la Naturo, allogis al si homajn voĉojn kaj senombrelajn ombrojn; eĉ en tiaj solenaj lokoj, kiaj la Ĉiela Altaro, la Konfucea Templo kaj la lamaejo Jonghegong, regis iom da brua vigleco. Amantoj de longa marŝo kaj lernejoj geknaboj ekskursis al la Okcidentaj Montoj, la Varma Fonto, la Somera Palaco, kie ili gaje kuradis, ŝirkolektis florojn aŭ fruktojn, kaj gravure skribis ion sur rokmuroj. Ankaŭ por mizeruloj ekzistis lokoj preferataj. La temploj Hugŭosi, Longfusi kaj Bajtasi, la Templo de Loka Dio, kaj la Flora Foiro, estis vizitataj de pli multaj homoj, ol en la ordinara tempo. Diversspecaj helkoloraj floroj estis montrataj sur la flankoj de la vojoj, kaj nur por unu aŭ du kupraj moneroj oni povis aĉeti kaj alporti “belecon” en sian hejmon. Sur la tabloj en la budoj de fazeolsuko la peklitaj legomoj, ornamitaj per ruĝaj papiriko, estis tiel belkoloraj kiel floroj. La kokaj ovojn nun estis vendataj tre malkare. La flavaj delikataj ovaĵoj estis tiel apetitovekaj, ke ĉe la nura vido salivo jam kolektiĝis al homoj en la buŝo. Pli vivoplena estis Tjanĉjaŭ. Nove konstruitaj tebudoj staris unu apud alia. La tablotukoj estis pure blankaj kaj la kantistinoj koketaj. En malproksimeco, vidalvide al ili, maljunaj pinoj etendis sajn kapojn trans la murojn de la Ĉiela Altaro. La sonoj de tamburoj kaj gongoj daŭris eĉ sep aŭ ok horojn. La serena seka vetero faris la sonojn kvazaŭ aparte klaraj kaj laŭtaj, kiuj ekscitis la homajn korojn. La prostituitinoj povis pli facile ornami sin: nur en maldika robo el flordeseĝna ŝtofo ilia korpo povis esti bele prezentata kun siaj okulfrapantaj elegantaj linioj. Tiuj, kiuj amis kvietecon, povis iri al lagoj kaj riveretoj en la ĉirkaŭurbo, kie ili faris hokfiŝadon. La naĝantaj fiŝetoj de tempo al tempo movetis junajn fragmitojn. Post hokfiŝado oni ankaŭ povis kun ĝuo trinki sorgobrandon kaj manĝi porkan kapajon, sojsaŭce kuiritan toufuon, kaj sale bolkuiritajn sojfabojn. Poste, portante fiŝkanon kaj kaptitajn fiŝetojn en la manoj, en la radioj de la subiranta suno ili malrapide iris returne al la antikva urba pordego, laŭlonge de la bordo borderita de salikoj.

Ĉiu loko estis vizitinda kaj homsvarma. Ĉie regis bruo kaj bunto. La frusomera subite varmiĝinta vetero kvazaŭ donis ian sorĉan forton al ĉiu loko de la malnova urbo. Malgraŭ ke ekzistis morto, katastrofo kaj mizero, ĝi tamen

per sia sorĉa povo endormigis la milionojn da homoj, ke ili somnambule kantis psalmojn al ĝi, la malpura, bela, maljuna, vigla, ĥaosa, kvieta, aminda, granda frusomera Bejping.

Nu en tia tempo oni soifis legon de ia malenuiga novaĵo, kiu estus inda je du-aŭ-trifoja legado kaj eĉ je tio, ke koni persone spektu ĝin post lego. La tago estis tiel longa kaj tamen la vetero tiel serena!

Finfine tia novaĵo venis! Apenaŭ la unua tramo elveturis el la tramejo, ĵurnalovendantaj knaboj jam kriadis: “Jen novaĵo pri pafmortigo al Ĵuan Ming! Novaĵo pri publika ekzekuto je la naŭa horo!” Kupraj moneroj unu post alia falis en la malpurajn manetojn. En la tramoj, butikoj, kaj en la manoj de pasantoj ĉiuj legataj ĵurnaloj portis la novaĵon pri Ĵuan Ming: lia foto, lia historio, ĵurnalista intervjuo kun li, presitaj en granda aŭ malgranda tipo, kun bildoj kaj klarigoj, sur tuta paĝo. Ĵuan Ming estis en la tramoj, en la homaj okuloj, en la buŝoj de la konversaciantoj, kvazaŭ en la malnova urbo ekzistus neniu alia krom Ĵuan Ming. Hodiaŭ Ĵuan Ming estos pafmortigita! Jen novaĵo valora, ideala. Oni ne nur parolis pri Ĵuan Ming, sed ankaŭ povis baldaŭ propraokule vidi lin. Virinoj urĝe faris sian tualetadon; maljunuloj jam frue eliris el sia hejmo, por ke ili ne perdu la okazon pro la malrapidemo de siaj kruroj. Eĉ lernejoj kaj intencis ne iri al la lernejo, por vidi la spektaklon. Je la oka kaj duono la stratoj jam estis homplenaj. La homoj ekscitiĝis, esperis, interpouŝiĝis, bruis, atendente la vidon de tiu ĉi viva novaĵo. Rikiŝistoj forgesis proponi sin al klientoj, komizoj en butikoj malzorgis sian servadon, kolportistoj ne emis fari vendovokojn, atendente la kaĝveturilon kaj Ĵuan Ming. Anoj de la nacio, kies historio konis Hŭang Ĉaŭ, Ĝang Ŝjangĝong kaj la ribelulojn de Tajpinga Ĉiela Regno, povas mem esti ekzekutiaj kaj ankaŭ emas vidi alies ekzekutiĝon. Pafmortigo ŝajnas tro simpla; ili preferas aŭdi pri tiaj ekzekutmanieroj, kiel ekzemple la dismembriĝo de korpo, kapdetranĉo, senhaŭtigo, enterigo de vivanto. Aŭdante tiaĵojn, ili sentas tremigan agrablecon, kvazaŭ ili manĝus glaciaĵon. Sed ĉi-foje krom pafmortigo oni povis spekti ankaŭ la eskortadon de la mortkondamnito tra la stratoj al la ekzekutejo. Ili preskaŭ volis danki tiun, kiu elpensis la ideon, kiu donis al ili la okazon vidi duonmortintan ekzekutoton, ligitan en kaĝveturilo, je ĝuo de iliaj okuloj. Tiuj ĉi homoj ne sciis pri bono kaj malbono kaj ne povis distingi pravon de malpravo. Obstine alkroĉiĝante al la feŭdaj moralaj leĝoj, ili tamen volis esti nomataj homoj civilizitaj. Ili ŝatus vidi siaspeculojn distranĉataj en mil pecojn, simile al tiaj infanoj, kiuj kruele mortigas hundeton. Se unu tagon ili ekhavis potencon, iu ajn el ili povus buĉi ĉiujn homojn de la urbo kaj detranĉi al virinoj la

mamojn kaj piedetojn, por formi el ili monteton, kiu estus ilia monumento. Efektive ili ne havis tian potencon, anstataŭe ili do devis pli multe vidi buĉadon de porkoj aŭ ŝafoj kaj ekzekutadon de homoj, por iom kontentigi sian deziregon. Se eĉ tiajn okazojn ili ne havis, ili povis ĵeti sur infanojn tiajn sakrojn, kiel ekzemple “al distranĉo en mil pecojn”, “al distranĉo en dek mil pecojn”, por esprimi sian malkontentecon.

Sur la serene blua ĉielo, proksime al la orienta horizonto, staris ruĝa suno. Ondoj da venteto delikate movis la branĉetojn de la salikoj flanke de la vojo. Sur la orienta trotuaro svarmis multnombraj homoj, junaj kaj maljunaj, viraj kaj virinaj, belaj kaj malbelaj, grasaj kaj malgrasaj. Unuj estis ŝike vestitaj, aliaj portis nur simple ĉemizon. Ĉiuj babilis, ridis kaj malpacience atendis, de tempo al tempo ĵetante rigardon suden aŭ norden kun elŝovita kapo. Se unu elŝovis la kapon, ĉiuj aliaj lin imitis, kaj ilia korbatado plirapidiĝis. Rezulte de tio, la interpremiĝantaj homamasoj moviĝis pli kaj pli antaŭen ĝis la rando de la ŝoseo kaj formis kvazaŭ muron el karno kun altaj kaj malaltaj movetiĝantaj kapoj. Grupo kaj grupo da policianoj eliris sur la stratojn, por gardi la ordon. Ili baris, insultis, kaj iafaje eĉ kaptis terbulosimilan knabeton kaj donis al li unu aŭ du batojn, kio elvokis ĉe ĉiuj gajan ekridegon. Ili atendis kaj atendadis. La kruroj laciĝis de longa starado, tamen ili ne volis reiri hejmen, antaŭ ol vidi la spektaklon. La antaŭe-starantoj ne volis foriri kaj la nove-venintoj penis ŝovi sin antaŭen, kio kaŭzis kverelojn kaj reciprokajn insultojn. Ili nur fortduelis, sed ne interbatis. La aliaj ilin aklamis. Iuj infanoj malpacientiĝis kaj pro tio ricevis de sia patro aŭ patrino vangofrapon. Poŝoŝtelisto sukcese faris lertaĵon, kaj la priŝtelito senretene sputis koleregajn blasfemojn. Ĉie regis konfuza bruo de voĉoj. Neniu volis foriri. Ju pli da homoj venis, des pli oni volis resti tie, por vidi la jam duonmortintan ekzekutoton.

Subite oni silentiĝis. De malproksime venis aro da armitaj policianoj. “Jam venas!” iu ekkriis. Tuj sekve releviĝis homaj voĉoj, kaj la homamasoj kvazaŭ maŝinoj kune moviĝis antaŭen colon post ĉolo. “Venas! Jam venas!” Ĉies okuloj ekbrilis aŭ ĉies buŝo aŭdigis ion. Estis granda tumulto, kaj en la aero ŝvebis ŝvita odoraĉo. La popolo de la etiketama lando tiom arde deziris spekti hom-mortigon!

Ĵuan Ming, malaltkreska, kun la brakoj ligitaj sur la dorso, sidis en kaĝveturilo, simila al malsana malgranda simio. Li tenis la kapon klinita, kaj sur lia dorso staris longa, mallarĝa tabulo kun algluita blanka papero, sur kiu estis skribita lia mortkondamno. La voĉa bruo ondadis, ĉiuj kritikis kun tordita buŝo, sentante ioman malkontentiĝon. Jen, kia malgrasa simio! Kia malbravulo,

kun la kapo klinita kaj la vizaĝo paliĝinta, sen diri eĉ unu vorton! Iu ekhavis ideon amuze lin inciteti. “Nu, ni do krii por li ion kuraĝigan!” tuj sekve aŭdiĝis ĥoro da krioj de “Brave!”, kvazaŭ oni aklamus aktorinon. Kun malŝato kaj malico oni abomeninte kriaĉis. Ĵuan Ming ankoraŭ silentis, eĉ ne levis la kapo. Vidante tiel malkuraĝan ekzekutoton, iuj vere koleriĝis; ili elŝovis sin el la homamaso ĝis la rando de la ŝoseo kaj kraĉis sur lin. Ĵuan Ming ankoraŭ ne sin movis kaj faris nenian reagon. Ju pli oni rigardis, des pli oni malkontentiĝis kaj ne volis foriri esperante, ke eble li subite diros: “Post dudek jaroj mi estos alia bravulo.” Aŭ eble li petos de drinkejo du boteletojn da sorgobrando kaj unu teleron da sojsaŭce kuirita porkaĵo. Neniu volis moviĝi de sia loko kun la espero vidi, kiel li fine povas sin teni. Kiam la kaĝveturilo jam preterpasis, oni eĉ sekvis ĝin, ĉar, kvankam ĝis nun li faris nenian bravan agon, tamen kiu povus antaŭvidi, ke li ne reakiros spiron por kanti el ia peco de la pekina opero? Do oni devis lin sekvi. Iuj sekvis eĉ ĝis Tjanĉjaŭ. Kvankam ĝisfine li faris nenian agon admirindan kaj kontentigan, tamen oni propraokule vidis lin trafita de kuglo, kaj tiel ilia penado estis rekompencita.

En tia ekscitoplena tempo tamen Ŝjangzi sola malrapide vagis kun klinita kapo proksime de la urba pordego Deŝengmen. Atinginte la lagon Ĝjiŝujtan, li ĵetis rigardojn ĉirkaŭen. Vidante, ke neniu estas tie, li malrapide kaj senbrue paŝis al laga bordo. Tie li haltis apud maljuna pino kaj, sin apogante al ĝi, staris kelkan tempon. Aŭdinte nenian sonon ĉirkaŭe, li delikate sidiĝis. Sed moveto de fragmita folio aŭ subita krio de birdeto igis lin tuj rapide stariĝi, kaj ekŝvitis sur la frunto. Li aŭskultis kaj rigardis. Konstatinte, ke estas nenia signo de homo, li ree malrapide sidiĝis. Post kiam tio ripetiĝis plurajn fojojn, li kutimĝis al la fragmitfoliaj movetoj kaj birdokrioj kaj decidis ne plu esti nerve timema. Stultmiene li fiksas sian rigardon sur la akvosurfaco de la apudlaga kanaletoj, en kiu naĝadis fiŝetoj, kies okuloj brilis simile al perletoj, jen kolektiĝante, jen disigiĝante. Iafoje ili sin kaŝis sub juna lemno, aliafoje ili eligis el la buŝo veziketojn. Ĉe la rando de la kanaletoj iuj ranidoj, kiuj jam ricevis kruojn, ŝvingis sian nigran kaj grandan kapon kun rektigita korpo. La fluo de la akvo subite iom plirapidiĝis kaj forportis kun si la fiŝetojn kaj ranidojn kun oblikve tenata vosto, sed kun la fluo venis ankoraŭ alia aro de tiaj bestetoj, kiuj baraktadis por sin haltigi. Unu hirudo rapidege pafiĝis al ili. La akva fluo pli kaj pli malrapidiĝis. Fiŝetoj denove ariĝis kaj malfermis sian buŝeton por mordeti flosantan verdan folion aŭ herberon. Iom pli grandaj fiŝoj sin kaŝis en la profundo. Okaze iu el ili vidigis sian dorson, sed ĝi tuj malsupreniĝi, lasante rondoturnon kaj sulkojn sur la akvosurfaco. Flugante sagrapide, alciono ektuŝis

la akvosurfacon kaj la fiŝoj, grandaj kaj malgrandaj, ĉiuj malaperis, tiel ke sur la surfaco de la akvo restis nenio krom lemnoj. Kun la okuloj vakece rigardantaj ĉion ĉi tion, Ŝjangzi vidis kvazaŭ nenion. Senpense li levis ŝtoneton kaj ĵetis ĝin en la akvon, kio levis aron da akveroj kaj dispelis multajn flosantajn lemnoj. Li ektimiĝis tiel, ke li ree ekdeziris stariĝi.

Post longa sidado li ŝtele palpis sian zonon per la nigra mano. Li kontente balancis la kapon kaj restigis la manon tie. Iom poste li elprenis staketon da monbiletoj kaj post kalkulo denove tre singarde metis ilin returne en ilian lokon.

Lia cerbo laboris tute por tiu mono: kiel li elspozos ĝin, lasante neniun scii pri tio, kaj kiel li ĝuos samtempe la senton de sekureco. Li pripensis jam ne por si mem: li jam fariĝis sklavo de la mono, kaj lia ĉio estis sub ĝia dispono.

La deveno de la mono jam destinis la manieron de ĝia elspezo. Tian monon li ja ne povis elspezi malkaŝe kaj en honesta maniero. La mono kaj la homo, kiu ĝin tenis, ambaŭ timis la sunon. Nun oni ĉiuj stair sur la stratoj por vidi Ĵuan Ming, dum Ŝjangzi sin kaŝis en tiu ĉi kvieta, malofte vizitata loko kaj eĉ volus iri al loko ankoraŭ pli kvieta, pli malhela. Li ne kuraĝis aperi sur la stratoj, ĉar li perfidis Ĵuan Ming kontraŭ mono. Eĉ sidante ĉi tie sola vizaĝe al la kviete fluanta akvo, kun la dorso al la urba murego, li ne kuraĝis levi la kapon, kvazaŭ ia fantoma ombro lin ĉiam sekvus. Ĵuan Ming, kiu falis en sango ĉe Tjanĉjaŭ, vivas en lia koro kaj en la mono ĉe lia zono. Li ne pentis, sed nur sentis timon al la fantomo, kiu ĉie kaj ĉiam lin sekvas.

Fariĝinte ŝtatoficisto, Ĵuan Ming ja ne malmulte ĝuis tion, kion li antaŭe opiniis kondamnenda. Mono povas enkonduki homon en la malbonan parton de la socio kaj igi lin forĵeti sian noblan idealon kaj volonte eniri en la inferon. Metinte sur sin elegantajn okcidentecajn vestojn, li vizitis bordelojn, faris hazardludon kaj eĉ fumis opion. Kiam li sentis konscienciproĉon, li pensis, ke estas la malicega socio, kiu malvirtigis lin, kaj li ne devas porti la respondecon. Li konfesis siajn agojn malpravaj, sed li imputis la kulpojn al la tenta forto de la socio: ĝi estas tro granda, ke li povu rizisti al ĝi. Tiel vivante, li baldaŭ trovis sian monon ne sufiĉa, kaj li denove ekmemoris tiujn radikalajn ideojn; sed li ne kolektis siajn fortojn por realigi tiujn ideojn, li volis nur interŝanĝi la ideojn kontraŭ mono. Ŝanĝi la ideojn en monon estis tiel same, kiel intenci akiri la noton “sufiĉe bone” per flatado al instruistoj dum la studentaj jaroj. La ideoj de mallaboremulo ne povas kunekzisti kun lia persona digno; ĉio, kio estas interŝanĝebla kontraŭ mono, estas neeviteble forvendota pli aŭ malpli frue. La organizo, kiu urĝe bezonis propagandi revolucion, ne povis fari severan elekton

de siaj batalantoj: ĉiuj, kiuj volis veni al ĝi, estis kamaradoj. Sed tiuj ja devis fari iajn servojn, kiel ajn plenumitaj ili estu; tio, kion la organizo bezonis, estis informoj. Cetere, al Ĵuan Ming ne estis permesite nenion fari. Li do partoprenis en la laboro organizi la rikiŝistojn. Ŝjangzi estis spertulo pri flagsvingo kaj hura-kriado, tial Ĵuan Ming konatiĝis kun Ŝjangzi.

Ĵuan Ming estis preta oferi Ĵuan Ming pro siaj propraj interesoj en okazo de bezono. Ĵuan Ming ne pensis pri tio, sed li tion faris – li perfidis Ĵuan Ming kontraŭ mono. Por tiu, kiu laboras pro mono, estas danĝere tuŝi pli da mono, kaj lojaleco ne sin bazas sur la mono. Ĵuan Ming estis fidela al siaj ideoj, kaj per ilia radikaleco pardonis al si ĉiujn siajn kulpojn. Aŭdante, kion Ĵuan Ming diras, Ŝjangzi opiniis lin prava, sed, vidante lian ĝuadon, li lin ankaŭ tre enviis. “Se mi nur havus pli da mono, ankaŭ mi povus ĝui plezuron dum kelka tempo, samekiel li!” mono reduktis la personan dignon de Ĵuan Ming kaj ankaŭ blindigis la okulojn de Ŝjangzi. Li vendis Ĵuan Ming por sesdek ĵuanoj. Ĵuan Ming volis forton de la popolamaso, dum Ŝjangzi pli multan plezurĝuadon – tian, kian Ĵuan Ming havis. La sango de Ĵuan Ming verŝiĝis, dum Ŝjangzi enŝovis monbiletojn ĉe sia zono. la subiranta suno jam kuŝis sur la okcidenta horizonto, verŝante orruĝan lumon sur la tifaĵojn kaj fragmitojn sur la lago kaj la salikojn ĉe ĝia bordo. Nur nun Ŝjangzi stariĝis kaj iris laŭ la urba murego okcidenten. Pri trompakiro de mono li jam spertiĝis, sed pri vendo de homa vivo pro mono li estis ankoraŭ novico. Plie, li ja trovis pravaj la dirojn de Ĵuan Ming, kiujn li aŭdis. La vakanteco de la spaco kaj la granda alteco de la urba murego elvokis ĉe li pli kaj pli grandan teruron dum lia irado. Kiam li okaze vidis kelkajn korvojn ripozantajn sur rubamaso, li eĉ ĉirkaŭiris ilin timante, ke surprizite ili farus al li kelkajn sinistrajn grakojn. Alproksimiĝante al la okcidenta urba murego, li plirapidigis la paŝojn kaj, simile al hundo ŝtele manĝinta ion, forŝteliĝis el la pordego Ŝjiĝimen. Li volis iri al loko, kie li povos tranokti en ies akompano, ke li fariĝus narkotita kaj ne plu havu timon. La Blanka Kabano estis tia ideala loko.

Fariĝis aŭtuno. La malsano de Ŝjangzi jam ne permesis al li plu tiri rikiŝon; cetere, lia kredito jam tute perdiĝis, ke li ne povis plu lui al si rikiŝon. Li fariĝis kutima kliento de malgranda gastejo. Nokte li loĝis tie pagante nur du kuprajn monerojn. Tage li faris nur tiajn laborojn, kiuj ebligis al li nur manĝi kaĉon. Li ne povis almozpeti sur la stratoj, ĉar oni ne volis kompati tian grandkreskulon kiel li. Li ankaŭ ne sciis kiel terure malbeligi sian korpon por peti almozon ĉe templaj foiroj, ĉar li ne estis instruita pri la metodo fari ulcerojn sur sia korpo kortuŝantaj kompatindaĵoj. Fari ŝteladon? Li ne havis ankaŭ tian kapablon;

cetere, eĉ la ŝtelistoj devis aliĝi al sia organizo kaj havi iajn sociajn rilatojn. Nur por sia propra forto li povis gajni sian vivtenon, ricevante nenian apogon, nek helpojn; li estis mortinto ankoraŭ spiranta, kaj egoismo estis lia animo. Tiu ĉi animo putros kune kun lia korpo en la tero.

De kiam Bejping estis nomita Antikva Ĉefurbo, ĝiaj apartaj luksaĵoj, metioj, bongustaĵoj, lingvaĵoj kaj eĉ policanoj jam iom post iom disvastiĝis al diversaj lokoj, kie ili subtenis la tiranadon de tiuj, kiuj havis la saman potencon kaj samajn financajn rimedojn, kiel imperiestro. En la moderniĝinta Ĉingdaŭ jam aperis brogita ŝafaĵo de Bejping; sur stratoj de la prospera Tjanĝin profundanokte oni povas aŭdi la malaltan malgajan vendovokon “Malmola – bobo!” ankaŭ en Ŝahhajo, Hankoŭ, Nankino vidiĝas policanoj kaj pedeloj parolantaj pekinan dialekton kaj manĝantaj bakitajn bulkaĵojn almiksitaĵojn per sezamkaĉo; teo el la sudo, dufoje parfumita en Bejping, estis transportita returne al la sudo; eĉ Bejping-aj ĉerkoportistoj iaforte veturis per vagonaro al Tjanĝin aŭ Nankino por porti ĉerkojn de tieaj altranguloj aŭ grandsinjoroj.

Bejping mem tamen iom post iom perdis siajn antaŭajn pompajn manierojn. Post la 9-a de la 9-a monato oni ankoraŭ povis aĉeti florkukojn en kukejoj; en aŭtuno oni eble jam komencis vendi ĵuanŝjaŭojn. Eĉ vendejoj kun historio de du- aŭ tricent jaroj subite festis sian jubileon por, profitante la okazon, disdoni flugfoliojn pri grandrabata vendo. Ekonomia malprosperiĝo devigis komercistojn serĉi alian eliron, ĉar per honoro oni ne povis ŝtopi al si la stomakon

Tamen la geedziĝaj kaj funebraj solenaĵoj ankoraŭ konservis siajn malnovajn formojn kaj manierojn, tiaj aferoj ja indus esti rigardataj kiel gravaj kaj devis bezoni pli aŭ malpli da pompeco. En Bejping la uzaĵoj de funebra procesio, muzikiloj kaj nupta palankeno ja estis pli bonaj ol en iu ajn alia urbo. La grupoj kaj leonoj faritaj el pinaj pingloj, la paperaj hom-figuroj, palankenoj kaj ĉevaloj por funebra procesio, la tuta eskorto por akompani la nuptan palankenon kaj la dudek kvar muzikiloj ankoraŭ paradis sur stratoj, kio memorigis pri la prospero de la pacaj jaroj.

La vivrimedoj de Ŝjangzi plej parte dependis de tiaj restantaj ceremonioj kaj kutimoj. Se okazis geedziĝo, li portis flagon antaŭ la nupta palankeno; kaj se okazis funebra procesio, li tenis florkronon kun elegia distiko. Li ne ĝois, nek ploris; nur por la dekkelkaj kupraj moneroj li marŝis en procesio. Portante la verdan veston aŭ bluan robon por ĉerk- aŭ palanken-portistoj kaj la nigran ĉapon ne bone sidantan al li, li povis portempe kovri per ili la ĉifonaĵojn sur si, kaj nur tiam li aspektis iom malpli mizere. Kiam li servis al iu riĉula familio kaj

devis, kune kun aliaj, esti razita kaj porti botojn, li havis okazon purigi sian korpon de la kapo ĝis la piedoj. Lia abomena malsano faris lin ne kapabla iri per grandaj paŝoj; feliĉe li devis nur teni flagon aŭ du tolpecojn kun elegia distiko kaj malrapide treni la piedojn sur ŝoserando.

Sed eĉ por tiu ĉi rolo li ne estis plu taŭga. Lia ora tempo jam pasis for. Li ne fondis al si feliĉan familion, nek atingis sukceson en sia kariero kiel rikiŝisto; lia ĉio jam fariĝis kune kun lia espero ventaĵo. Tiel altkreska, li tamen penis elekti al si la taskon teni nur malgrandan flagon aŭ paron da mallongaj kaj mallarĝaj tolpecoj kun elegia distiko; la pli pezajn aĵojn li tute ne volis tuŝi. Por elekti al si pli malpezan laboron, li konkuris eĉ kontraŭ maljunulo, infano aŭ virino. Aferon malprofitan li neniam volis fari.

Tenante tian malgrandan aĵon en la mano, kiun klinita kapo kaj kurbigita dorso li trenis siajn malfortajn kaj malrapidemajn kruruojn, lasante sian cigaredstumpon, kiun li levis survoje, pendis inter la lipoj. Kiam ĉiuj aliaj jam haltis, li eble ankoraŭ paŝis; kaj kiam oni jam rekomkencis iri, li eble ankoraŭ staris, kvazaŭ li ne aŭdis la ordondonantan gongosonon. Plie, li neniam donis atenton al la procesia ordec. Li marŝis ĉiam kun klinita kapo, kvazaŭ songante aŭ dronante en medito pri ia problemo. La gongisto en ruĝa vesto kaj la vokto kun silka flageto en la mano verŝis sur lin preskaŭ ĉiajn krudajn insultojn: “He vi, ĉies nepo, atentu! Paŝo teni kun la aliaj, vi kamelaĉo! Malhonoro al via patrino!” kaj li kvazaŭ aŭdis ankoraŭ nenion. La gongisto alkuris al li kaj per la gongo-fragilo ekbatis lin, kiu gape ekrigardis lin kaj poste turnis la nebulecajn okulojn ĉirkaŭen. Ne atentante, kion la gongisto diris, li direktis serĉantan rigardon nur al la pavimo por vidi, ĉu sur ĝi troviĝas ia levinda cigaredstumpo.

Ŝjangzi, la viro honest, ambicia, revema, sinama, individuisma, sana, forta kaj granda, ne sciis, kiom da funebraj procesioj li jam akompanis por mortintoj, nek kiam kaj kie li, la defalinta, egoisma, malfeliĉa naskito el la malsana utero de la socio, estos enterigita kiel viktimo de la individuismo!

Notoj:

1. jango-danco: Speco de populara kampara popoldanco en norda Ĉinio.
2. Vd. noton 3 de ĉapitro XI.
3. Huang Ĉaŭ: Gvidanto de kamparana leviĝo en la fino de Tang-dinastio (618-907). En 881 li kun siaj ribelaj trupoj iam konkeris la ĉefurbon kaj kronis sin mem imperiestro. En 884 li sin mortigis pro malvenko en militado.
4. Ĝang Ŝjanĝong (1606-1647): Ĉefo de kamparana leviĝo en la fino de

Ming-dinastio (1368-1644). Li estis mortigita en militado.

5. Tajpinga Ĉiela Regno (1851-1864): Reĝimo starigita en la plej granda kamparana revolucio en la ĉina historio. Ĝi pledis por egala divido de agroj, egleco inter viroj kaj virinoj k.a. Fine ĝi estis subpremita de la registaro de Ĉing-dinastio (1644-1911) kaj la agresantoj fremdlandaj.

6. En la malnova Ĉinio ekzekutotoj ŝatis diri antaŭ la publiko “post dudek jaroj mi estos alia bravulo” por esprimi sian kuraĝon, ili ankaŭ rajtis peti alkoholaĵon kaj kuiritan viandon kiel lasta manĝon.

7. Ĉingdaŭ: Ĉemara urbo en Ŝandong-provinco, kie troviĝas multaj domoj en eŭropaj stilo.

8. brogita ŝafaĵo: unu el la famaj frandaĵoj de Pekino. La ŝafaĵo estas tranĉita en tre maldikajn pecetojn, dum la manĝado oni unue ĝin brogas en bolanta akvo momente kaj trempas en miksaĵo de diversaj spicaĵoj.

9. la 9-a de la 9-a monato (lunkalendaro): Double-naŭa Festo, unu el la ĉinaj tradiciaj festoj.

GLOSARO

Ĉi-sube estas listigitaj ĉiuj vortoj, kiuj ne troviĝas en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

bobo: Speco de farunaĵo en norda Ĉinio.

feno: Vd. jŭano

ĝino: Ĉina pezunuo egala al duonkilogramo.

Ĝjaŭo: Vd. jŭano.

jŭano: Ĉina fundamenta monunuo. Tiam estis aplikata la sistemo de arĝenta monero kun jŭano, ĝjaŭo kaj feno kiel unuoj. Unu jŭano egalas dek ĝuaŭojn, unu ĝjaŭo dek fenojn. Kupra monero estis la plej malgranda monero el kupro.

Jŭanbaŭo: Arĝenta bloketo uzita kiel pagilo en la malnova tempo, ĉefe antaŭ ol la arĝenta jŭano estis enkondukita. La granda jŭanbaŭo pezas ĉ. 50 ljangojn, t.e. pli ol unu kilogramon kaj dunono.

jŭanŝjaŭo: Pastobulo el faruno de glueca rizo, manĝata precipe en la Lanterna Festo (la dekkvina de la unua monato lunkalendaro).

koŭtoi: Genuante tuŝi al teron per la kapo kiel signo de respekto, cedo aŭ pardonpeto, precipe en la malnovaj tempoj en Ĉinio.

ljango: Ĉina pezunuo, kiu tiam estis egala al 1/16 ĝino (nun egala al 1/10 ĝino).

mantoo: Kutima manĝaĵo de ĉinoj, precipe en la nordaj provincoj, farita el vaporumita fermentinta pasto.

muo: Ĉina mezurunuo por kampoj, egala al 1/15 hektaro.